



Mazirien la Magiisto

Jack Vance



Mazirien la Magiisto

Jack Vance



Enhavoj

Kovrilo

Titola Paĝo

Antaŭparolo

Mazirian la Magiisto

Turĝun de Mijr

Tsajs

Liejn la Vojiranto

Ulen Dor Finigas Songon

Gajal de Sfer

Vortaro

Atribuoj

Senpage Haveblaj

Permesilo

Mazirien la Magiisto

*(Ses-rakonta novelaro,
unua libro el la serio
'La Mortanta Tero')*

aŭtorita de majstro

Jack Vance

tradukita de

**Ĝan Ŭesli Starling
&
Orlando Hernández**

ilustrita de

Paul Rhodes

re-eldonita je

2015-01-26

Antaŭparolo

Nepre atentu almenaŭ la unuajn tri temojn sube prezentatajn: *Vortaro*, *Idiomoj* kaj *Propraj Nomoj*. Manko de tiuj informoj povas stumbligi la legadon.

Vortaro: Vidante vorton ‘ĉi-aspektan’ (sen citiloj), ŝvebu super ĝi per fingropinto aŭ muso kaj ekvidu, ke ĝi ŝanĝiĝos por aspekti ‘tiel ĉi’. Per tio vi scios ke tiu vorto havas difinon en la provizita vortaro. Klaku ĝin por ekvidi ties difinon. Post legi la difinon, atentu pri la komenco-vorto de la difino, kiu aspektos kiel ‘**difin/o**’. Klaku tion por salti reire al la rakonto.

Se sur via aparato ligiloj ne aspektas kiel supere, tio rezultas de afero kie la niaj [CSS](#)-aj reguloj super-regiĝus fare de interna sistemo de via propra aparato: [Nook](#), [Kobo](#), [Kindle](#), ktp. Do, substrekoj povas aperi *malgraŭ* niaj specifaj elektoj. Kulpigu la propran aparaton tiukaze.

Ni provis elekti mezan stilon post demandi ĉe Fejsbuko kaj alie pri diversaj personaj preferoj. Ni ja volas provizi elekton al ĉiu leganto. Bedaŭrinde, tio nuntempe ne eblas. Solvo devas atendi ĝis la plimulto el bitlibraj aparatoj subtenos la formaton [EPub 3](#), kio permesos funkcion pri elekto inter stiloj pere de [JavaScript](#). Sed [EPub 2](#), per kio la plimulto el aparatoj ankoraŭ

funkcias, ne ebligas tiajn elektojn.

Ni elektis difini nur la niaopinie maloftajn vortojn. Bonega helpo por esperantaj progresantoj, nur iometa helpo por komencantoj. Se viaopinie, plua vorto bezonas difinon, kontaktu nin, kaj ni aldonos.

Post finlegi iun rakonton, klaku la bildo-simbolon...



... kaj tuj vi eksaltos al la komenco de la sekva novelo.

Idiomoj: Ĉar ĉi tiuj rakontoj temas pri la ege fora futuro, tempopaso dum kiam preskaŭ ĉio estos ŝanĝita, la aŭtoro elektis

prezenti al sia denaske anglalingva legantaro fremde novajn nomojn por fikciaj futuraj estaĵoj: bestoj, monstroj, ktp. Aparta ŝoko por oni leganta en nove akirita lingvo. Ties unua inklino estus serĉi (tute vane) en vortaro.

Helpe je tio, ni foje indikas tian fremdecon per fremde akcentita vokalo, jene: *skiélo*, *háft-fadeno*, ktp. Prononcu laŭvole. Kiam signifo gravas, prenu tion el la cirkonstanco. Sed ne zorgu strebe. Foje tiaj vortoj ekzistas nur por aldoni plusan fremdecon. En tiaj kazoj manko de precizeco apenaŭ gravas. Estas same por denaskaj anglalingvanoj.

Fakte sciu, ke aparta leksikono haveblas en la angla lingvo pri la multaj

tiaj nomoj inventitaj de la aŭtoro: *The Jack Vance Lexicon: from Ahulph to Zipangote* kompilita de Dan TEMIANKA, ISBN 0887331181. Ĝi enhavas 136 paĝojn da difinoj, kaj temas pri ĉiuj 70 libroj de la aŭtoro dum lia 50-jara aŭtora kariero.

Propraj Nomoj: Plejparte ni lasis, ke propraj nomoj restu kiel eble plej proksimaj al la originalo. Tamen, por eviti falsajn sufiksojn ‘-an’ ktp, ni opiniis tion dece, ke ni faru necesajn ŝanĝetojn: *Mazirian* ⇔ *Mazirien*; *Turjan* ⇔ *Turĝun*; *Liane* ⇔ *Liejn*, kaj simile.

Pri la ofteco de majuskloj preter gramatikaj reguloj, ankaŭ tio sekvas la originalon, en kiu tiuj samaj majuskloj

aspektas egale ekstergramatikaj al anglalingvanoj. Tiu afero estas laŭvola konstruo de la aŭtoro, kion tradukanto ne rajtas ŝanĝi.

Kiam rilatas al propra nomo de urbo, lando, kaj simile ni nur malofte aldonis plusan literon ‘o’ por indiki substantivecon. Ni lasis ke sustantiveco memindikiĝi per nur la majusklo: *Askolajs*, ktp. Akceptu ilin kvazaŭ ajna fremda loknomo. Finaĵon ‘o’ ni aldonis nur se ties manko prezentos tro oftan problemon pri la akuzativo.

Angla Titolo: La referenca originalo kiun ni tradukis devenas el volumo 1a el la 44-voluma eldono *Vance Integral*

Edition (ISBN 0-9712375-1-4) en kiu, laŭ aŭtoro prefero, ĝi titoliĝas kiel *Mazirian the Magician*. Tamen sciu, ke ĝi vaste koniĝas ankaŭ per malsama titolo perforte anstataŭigita fare de la eldonejo *Hillman Publications* je ĝia unua presiĝo en la jaro 1950. Tiu titolo estas *The Dying Earth* kio nun servas kiel grupa titolo de tuta serio da noveloj kaj romanoj verkitaj de pluraj aŭtoroj sekvantaj la modon kaj stilon de Vance.

Tero Mortanta: En ĉi tiu rakontaro komencas priskribo de la pleja futuro, dudek epokoj post la nuntempo. Tempo dum kiam la suno grandos, ruĝos kaj brilos malforte. Tempo dum kiam la popolo atendos, ke je ajna momento ĝi

povas eke malbrili por ĉiam. Jack Vance desegnis apartan universon per tiu ĉi ses-rakonta novelaro kaj kelkaj romanoj plu. Poste, kun ties permeso, verkis rakontojn ankaŭ tiaj famuloj kiaj George R. R. Martin, Neil Gaiman, Robert Silverberg, Glen Cook, Kage Baker, Michael Shea kaj aliaj.

Magio kaj Sorĉo: Post detala interdiskuto kun e-istoj sur Fejsbuko, decidiĝis la sekvaj distingo inter *magio* kaj *sorĉo*. Oni preferu la terminojn *magio* kaj *magiisto* kiam temas pri supernatura scienco kaj detala esploro. La terminoj *sorĉo* kaj *sorĉisto* portu signifon pri parkera uzado de la tutaj samaj aferoj kiel nura teknikaĵo, aŭ kiam la efiko estas

triviala kaj unuopa.

Jack Vance, kiel aŭtoro, ne striktis multe pri tiu distingo. Ofte, sed ne ĉiam li faris. Krome ekzistas tria angla vorto *wizard* kiun li ankaŭ uzis, foje pri la sama figuro el historio. Leganto, do, prenu la sencojn propravole.

Ublitoj kaj Drakoj: La tiel nomita rolludo kreita de Gary Gygax kaj Dave Arneson uzas sistemon de magio prenita el tiu ĉi novelaro. Estas Jack Vance kiu inventis tiun sistemon, ne renverse.



Mazirien la Magiisto

Perdita en pensado, Mazirien la Magiisto marŝis sian ĝardenon. Arboj peze ŝarĝitaj de siaj fruktoj el multaj delir-ekstazoj superpendis lian vojon, kaj floroj riverencis lin kiam li pasis. Unu colon super la grundo, malbrilaj kiel agatoj, la okuloj de mandragoroj atentis la paŝadon de liaj piedoj en nigraj pantofloj. Jene estis la ĝardeno de Mazirien — tri terasoj kultivantaj strangajn kaj mirindajn vegetaĵojn. Certaj plantoj lumis pro naĝe movantaj, ŝanĝiĝantaj irizecoj; aliaj suprentenis florojn pulsantajn kiel aktinioj, purpuraj,

verdaj, violaj, rosaj, flavaj. Tie ĉi kreskiĝis arboj tiaj kiaj plumaj sunombreloj, arboj kun travideblaj trunkoj enhavantaj ruĝajn kaj flavajn vejnojn, arboj kun folioj tiaj kia metalo, ĉiu folio malsama metalo — kupro, arĝento, blua tantalio, bronzo, verda iridio. Tie ĉi, floroj kiaj bobeloj suprentiretis el vitre verdaj folioj, apuda arbusto montris mil tub-formajn florojn, ĉiu fajfanta mallaŭte por fari muzikon pri la malnova Tero, pri la rubene ruĝa sunlumo, akvo sorbiĝanta tra nigra tero, la molaj ventetoj. Kaj preter la rókŭo heĝo, arboj de la arbaro estis alta muro de mistero. En tiu ĉi fina horo el la vivo de l' Tero neniu viro povis aserti familiarecon pri la valetoj, montetoj, la arbaretoj kaj

profundejoj, la kaŝitaj maldensejoj, la ruinitaj pavilonoj, la sun-ŝprucitaj plezurĝardenoj, la krutvaloj kaj krutpintoj, la diversaj riveretoj, laĝetoj, herbejoj, densejoj, rompejoj kaj rokaj elstaraĵoj.

Mazirien paŝadis sian ĝardenon kun brovo malridetanta en penso. Liaj paŝoj malrapidis kaj liaj manoj intertenis malantaŭ lia dorso. Iu estis al li portanta konfuziĝon, dubon, kaj grandan deziron: ĉarmega virin-estaĵo kiu loĝis en la arbaro. Ŝi venadis al lia ĝardeno duone-ridanta kaj ĉiam singarda, rajdanta nigran ĉevalon kun okuloj tiaj kiaj oraj kristaloj. Multajn fojojn Mazirien estis provinta kapti ŝin; ĉiam ŝia ĉevalo portis ŝin for de liaj variaj logaĵoj, minacoj, kaj artifikoj.

Dolorega kriado ekmalpacigis la ĝardenon. Mazirien, hastigante siajn paŝojn, trovis talpon maĉantan al la stipo de plant-besta **hibrido**. Li mortigis la **marodanton**, kaj la krioj mallaŭtigis al malfortaj anheloj. Mazirien frotis felan folion kaj la ruĝa buŝo hisis en plezuro.

Poste: “K-k-k-k-k-k-k,” diris la planto. Mazirien haltis, tenis la ronĝulon al la ruĝa buŝo. La buŝo suĉis, la eta korpo glitis en la subteran stomakovezikon. La planto gorgŝonis, ruktis, kaj Mazirien rigardis kun kontenteco.

La suno estis jam malaltiĝinta en la ĉielo, fariĝante tiom nebrila kaj ruĝa ke la steloj videblis. Kaj nun Mazirien sentis rigardantan ĉeeston. Ŝajne estis la virino

de la arbaro, ĉar tiel ŝi lin distris antaŭe. Li paŭzis en sia paŝado, sente serĉanta la direkton de la rigardo.

Li diregis sorĉon de senmovebligo. Malantaŭ li la plant-besto haltis en eka rigideco kaj granda verda sfingo drivis al la teron. Li tuj ektorniĝis duoncirkle. Jen ŝi estas, ĉe la rando de la arbaro, pli proksima ol ŝi iam ajn antaŭe estis veninta. Ŝi ne moviĝis dum li aliris. La jun-maljunaj okuloj de Mazirien brilis. Ŝin li portus al sia domego por tenadi en karcero el verda vitro. Li testus ŝian cerbon per fajro, per malvarmo, per doloro kaj ĝojo. Ŝi estus servonta lin per vino kaj faros la dek ok moviĝojn de allogado laŭ flava lamplumo. Eble ŝi estis

spionanta lin; se jes, la Magiisto tuj malkovros, ĉar li povis nomi neniun viron amiko kaj devis ĉiam gardadi sian ĝardenon.

Ŝi malproksimis nur dek du paŝojn — eke okazis surgrunda martelado de nigraj hufoj kiam ŝi instigis sian rajdbeston **baŭme** forturniĝi kaj eskapis en la arbaron.

La Magiisto malsuprenĵetis sian mantelon en kolerego. Ŝi posedis gardilon — ian kontraŭ-sorĉon, **runon** de defendado — kaj ĉiam ŝi venis kiam liaj preparoj ne sufiĉis por ke li sekvu. Li stude enrigardis la malklaran arbaran profundecon, ekvidetis la palecon de ŝia korpo trapasanta radion de ruĝa lumo,

poste nigran ombron kaj ŝi forestis... Ĉu ŝi estas sorĉistino? Ĉu ŝi venadas propravole, aŭ — pli probable — ĉu malamiko sendas ŝin por kaŭzi al li maltrankvilon? Se tiel, kiu povas esti gvidanta ŝin? Jen Princo Kandajv la Ora de Kajin, de kiu Mazirien estis ruze trompinta de lian sekreton pri renovigebla juneco. Jen Azvan la Astronomo, jen Turĝun — apenaŭ Turĝun, kaj nun la vizaĝo de Mazirien lumiĝis en plaĉa rememoro... Li flankenmetis la penson. Pri Azvan, almenaŭ, li povus testi. Li turnis siajn paŝojn al sia laborejo, iris al tablo kie situis kubo el klara kristalo, lumetadanta per ruĝa kaj blua aŭreolo. El ŝranko li prenis bronzan gongon kaj arĝentan martelon. Li marteletis la

gongon kaj plaĉa tono kante soniĝis tra la ĉambro kaj eksteren, foren kaj pluen. Subite la vizaĝo de Azvan lumis el la kristalo, ŝvit-guta pro doloro kaj grada timego.

“Haltigu la frapojn, Mazirien!” kriis Azvan. “Frapu ne plu sur la gongo de mia vivo!”

Mazirien paŭzis, lia mano pozita super la gongo.

“Ĉu vi spionas al mi, Azvan? Ĉu vi sendis virinon por rehavigi la gongon?”

“Ne mi, Mastro, ne mi. Mi timas vin tro plene.”

“Vi devas liveri al mi la virinon, Azvan; mi insistas.”

“Ne eble Mastro! Mi scias pri nek kiu nek kio ŝi estas!”

Mazirien ŝajnis kvazaŭ li estus fraponta plu. Azvan elbuŝigis tian verŝegon da petegoj, ke li ĵetis malsupren la martelon kun gesto de naŭziĝo kaj remetis la gongon al ĝia loko. La vizaĝo de Azvan fadis malrapide for, kaj la delikata kubo el kristalo lumis senbilde kiel antaŭe.

Mazirien frotis sian mentonon. Evidente li mem devas kapti la junulinon. Poste, kiam nigra nokto kuŝis super la arbaro, li serĉos tra siaj libroj por sorĉoj

por gardi sin trairante la hazarde danĝerajn arbarajn maldensejojn. Ili devos esti akraj, korodaj sorĉoj, el tia kvalito, ke la cerbo de ordinara viro hezitus pro timo ke ili lin lasus freneza. Mazirien, per apliko de streba ekzercado, povis ensorbi kvar el la plej formidaj sorĉoj, aŭ ses el la malpli akraj.

Li puŝis la projekton elde siaj pensoj dumtempe kaj iris al longa baseno tute verŝita en verda lumo. Sube de verŝo de klara fluido kuŝis korpo de viro, malplaĉege aspekta sub la verda lumego, sed havanta belegecon en sia korpformo. Lia trunko grade maldikiĝis de larĝaj ŝultroj tra negrasa talio al fortikaj gamboj kaj arĥaj piedoj; lia vizaĝo estis pura kaj

senemocia kun malmolaj plataj aspektoj.
Grize ora hararo ĉirkaŭis lian kapon.

Mazirien rigardadis la aĵon, kion li estis kultivinta el sola kelo. Ĝi bezonis nur inteligenton, kaj tion ĉi li ne prisciis kiel provizi. Turĝun de Mijr tenis la scion, kaj Turĝun — Mazirien ekrigardis kun grimaca mallarĝigo de la okuloj al klappordo en la plafono — rifuzadis malkaŝi sian sekreton.

Mazirien pripensadis la enbasenan kreaĵon. Ĝi estis perfekta korpo; ĉu ne pro tio la cerbo estus orda kaj fleksebla? Li malkovru. Li startigis ilon por elsuĉi la likvaĵon kaj poste la korpo kuŝis senŝirme nuda sub la radioj. Mazirien injektis kvanteton da drogo en la kolo. La korpo

ekmovetis. La okuloj malfermiĝis, palpebrumis en la lumego. Mazirien forturnis la projektilon.

En la baseno la kreaĵo malforte movis siajn brakojn kaj piedojn, kvazaŭ nekonscia pri ilia uzado. Mazirien rigardis stude; eble li estis hazarde trovinta la ĝustan sintezon por la cerbo.

“Sidiĝu!” komandis la Magiisto.

La kreaĵo fiksis siajn okulojn sur li, kaj refleksoj ligis muskolon al muskolo. Ĝi eligis gorĝan muĝon kaj eksaltis risorte el la baseno celante la gorĝon de Mazirien. Malgraŭ tio ke Mazirien fortikas, ĝi kaptis lin kaj skuis lin tiel kiel pupon.

Malgraŭ la tuto de siaj sorĉoj Mazirien estis sendefenda. La hipnota sorĉo jam elspeziĝis, kaj li havis en sia menso neniun alian. Ĉiuokaze li tiam ne estus kapabla eldiri la spaco-tordajn silabojn pro la freneza strangolado ĉirkaŭ sia gorgo.

Liaj fingroj hazarde ĉirkaŭis la kolon de plumba botelego. Li svingis kaj frapis la kapon de sia kreaĵo, kiu velkis al la plafono.

Mazirien, ne tute malplaĉigita, studis la malseke briletantan korpon ĉe siaj piedoj. La spina kunordigo estis montrinta bonan funkciadon. Ĉe tablo li miksis blankan **pocion**, kaj, levante la orkoloran kapon, verŝis la likvon en la

malstriktan buŝon. La kreitaĵo movetis, malfermis siajn okulojn, apogis sin sur la kubutoj. Frenezeco estis elĉerpita de ĝia vizaĝo — tamen Mazirien serĉis vane por trovi lumeton de inteligenteco. La okuloj estis tiom vakuaj kiom tiuj de lacerto.

La Magiisto gestis kapnee pro agaciĝo. Li iris al fenestro kaj lia minace malfeliĉa silueto montriĝis nigre kontraŭ la ovalaj vitroj... Ĉu li provu je Turĝun refoje? Sube de la plej puna demandado Turĝun estis daŭre enteninta sian sekreton. La maldika buŝo de Mazirien kurbiĝis mok-humore. Eble se li enmetus pluan angulon en la pasejon...

La suno jam foriris el la ĉielo kaj

estis malhele en la ĝardeno de Mazirien. Liaj blankaj nokto-floroj malfermiĝis kaj siaj kaptitaj grizaj sfingoj flugadis de floro al floro. Mazirien tiris malferme la plafonan klappordon kaj malsupreniris ŝtonan ŝtuparon. Suben, suben, suben... Post longe koridoro branĉiĝis ortangule, lumigita per la flava lumo de eternaj lampoj. Maldekstre estis liaj fungo-bedoj, dekstre situis fortika pordo el kverko kaj fero, ŝlosita per tri seruroj. Malsupren kaj antaŭen la ŝtonaj ŝtupoj pluiradis, malsuprenirantaj en nigrecon.

Mazirien malŝlosis la tri serurojn, malfermegis la pordon. La ĉambro posta malplenis krom per ŝtona pedistalo subtenanta vitro-kovritan skatolon. La

skatolo larĝis je **jardo** ĉiuflanke kaj altis je kvar aŭ kvin koloroj. Interne de la skatolo — fakte kvadratigita koridoraro, kurejo kun kvar ortaj anguloj — moviĝadis du etaj vivuloj, unu ĉasanta, alia evitanta. La rabulo estis eta drako kun furiozaj ruĝaj okuloj kaj monstra dentega buŝo. Ĝi paŝadis anase ŝanceliĝanta sur ses lacerte disaj gamboj, ek-ek-e movadanta sian voston dum ĝi iradis. La alia altis nur duone tiom kiom la drako — fortikaspekta viro, tute nuda, kun kupra kapzono kuntenanta liajn longajn nigrajn harojn. Li moviĝis iomete pli rapide ol lia ĉasanto, kiu malgraŭ tio daŭre postsekvis, aplikanta iom da ruzo, foje ekrapidanta, foje ŝteliranta retrodirekte, foje kaŝe atendanta ĉe

angulo kontraŭ la ŝanco, ke eble la viro sengarde elpaŝu. Per teni sin ĉiumomente atenta, la viro kapablis resti for de la dentegoj. La viro estis Turĝun, kiun antaŭ kelkaj semajnoj Mazirien estis trompe kaptinta, malaltiginta kaj tiel malliberiginta.

Mazirien rigardis kun plezuro dum la reptilio eksaltis al la momente ripozanta viro, kiu sin ektiris sin eskape je distanco tiom fora kiom dikas sia haŭto. Tempo decas, Mazirien decidis, por doni al ambaŭ ripozon kaj nutron. Li faligis muretojn trans la koridoraro, apartiganta ĝin en duonoj, izoligante viron disde besto. Al ambaŭ li donis viandon kaj sakojn da akvo.

Turĝun sagiĝis en la irejo.

“Ah,” diris Mazirien, “vi lacegas. Ĉu deziras vi ripozon?”

Turĝun restis silenta, liaj okuloj malfermaj. Kaj tempo kaj la mondo jam estis perdintaj siajn signifojn. La nuraj realaĵoj estis la griza koridoraro kaj la senpaŭza fuĝado. Je hazardaj intertempoj estis okazintaj manĝo kaj kelkhora ripozo.

“Pensu pri la blua ĉielo,” diris Mazirien, “la blankaj steloj, via kastelo MiJr apud la rivero Derno; pensu pri libera vagado en la herbejoj.”

La muskoloj ĉe la buŝo de Turĝun

ekmovetiĝis.

“Konsideru, vi estus povinta dispremi la etan drakon sube de via kalkano.”

Turĝun suprenrigardis. “Mi preferus dispremi vian kolon, Mazirien.”

Mazirien ne afekciĝis. “Informu min, kiel vi donas inteligentecon al viaj elbasenaj kreitaĵoj? Parolu, kaj vi gajnos liberon.”

Turĝun ridis, kaj estis frenezeco en lia ridado.

“Informu vin? Kaj poste? Vi estus min mortigonta per varmega oleo post

nur momento.”

La maldika buŝo de Mazirien subfleksiĝis ofendite.

“Aĉa viro, mi scias metodojn por devigi vin al parolado. Eĉ se via buŝo estus plenŝtopita, fermita per vakso, tamen vi estus parolonta! Morgaŭ mi prenos nervon el via brako kaj trenados malmolan ŝtofon laŭ ĝia longo.”

La eta Turĝun sidanta kun la gamboj etenditaj trans la koridoro, trinkis sian akvon kaj diris nenion.

“Ĉivespere,” diris Mazirien kun koncentrita malbonvolo, “mi aldonos pluan angulon por ŝanĝi vian kurejon en

kvinangulon.”

Turĝun paŭzis kaj suprenrigardis tra la vitra kovrilo al sia malamiko. Post tio, li malrapide trinketis sian akvon. Ŝangiĝo al kvin anguloj lasus malpli da tempo por eviti alkuregojn fare de la monstro, malpli da koridoro videbla de unu angulo.

“Morgaŭ,” diris Mazirien, “vi bezonos ĉiom da via vikleco.” Sed kroma afero leviĝis en lia menso. Li studis al Turĝun hipoteze. “Tamen eĉ tiun ĉi mi ŝparus al vi se vi min helpus pri alia problemo.”

“Kio al vi malfacilas, febra Magiisto?”

“La figuro de virin-kreitaĵo hantas mian cerbon, kaj mi volas kapti ŝin.” Pensante pri tio, la okuloj de Mazirien esprimis ravan emocion. “Malfrue je posttagmezo ŝi venas ĝis la rando de mia ĝardeno rajdante grandan nigran ĉevalon — ĉu vi konas ŝin, Turĝun?”

“Ne mi, Mazirien.” Turĝun trinketis sian akvon.

Mazirien daŭrigis. “Ŝi havas sorĉpovon sufiĉan por ŝirmi sin de la Dua Hipnota Magio de Feloĵun — aŭ eble ŝi havas ian gardo-runon. Kiam mi alvenas, ŝi eskapas for en la arbaro.”

“Nu, do?” demandis Turĝun, manĝetante la viandon provizitan de

Mazirien.

“Kiu povas tiu ĉi virino esti?”
demandis Mazirien, rigardante malsupren
laŭ sia longa nazo al sia kaptito.

“Kiel povus mi diri?”

“Mi volegas kapti ŝin,” diris
Mazirien interne memdistrita: “Kiujn
sorĉojn, kiujn sorĉojn?”

Turĝun suprenrigardis, kvankam li
povis vidi la Magiiston nur malklare tra
la vitra kovraĵo.

“Liberigu min, Mazirien, kaj laŭ mia
ĵurdiro kiel Elektita Ĉefpastrarano de la
Máram-Or, mi prezentos al vi tiun ĉi

junulinon.”

“Kiel vi farus tion ĉi?” demandis la suspektema Mazirien.

“Postsekvante ŝin en la arbaro per miaj plej bonaj Botoj Vivantaj kaj kun kapo plena de sorĉoj.”

“Vi sukcesus ne pli ol mi,” argumentis la Magiisto. “Mi donos al vi vian liberon post kiam mi scios la sintezon de viaj basen-kreitaĵoj. Mi mem postsekvos ĉi tiun virinon.”

Turĝun klinis la kapon por ke la Magiisto ne [interpretu](#) liajn okulojn.

“Kaj rilate al mi, Mazirien?” li

demandis post momenton.

“Mi traktos vin post ol mi revenos.”

“Kaj se vi ne revenos?”

Mazirien frotis sian mentonon kaj ridetis, montrante bonajn blankajn dentojn. “La drako rajtus elmanĝi vin nun, se ne estus pro via malbenita sekreto.”

La magiisto supreniris la ŝtuparon. Noktomezo trovis lin en lia stud-ĉambro, strebe traserĉante lede binditajn librojn kaj malnetajn tekojn... Iam antaŭe estis konitaj mil aŭ eĉ pli da runoj, sorĉoj, magiaj kantaĵoj, malbeniloj, kaj magiaĵoj. La regiono de Granda Motolamo —

Askolajs, la Mezo de Kaŭĉikŭo, Almerio en la sudo, la Lando de la Falanta Muro en la oriento — plenis de sorĉistoj el ĉiaj specoj, inter kiuj la plej supra estis la Ĉef-Nekromanciisto Fanddeal. Cent sorĉojn Fanddeal mem formulis — kvankam onidiro proponis, ke demonoj flustris tiam en lia orelon kiam li verkis magiaĵojn. Pontecilo la Pia, tiama registro de Granda Motolamo, metis Fanddealon al turmentado, kaj post terura nokto, li mortigis Fanddealon kaj ordonis ke sorĉado estu kontraŭleĝa en la tuto de siaj landoj. La magiistoj de Granda Motolamo tiel forkuris kiel skaraboj sube de forta lumo; la sciaĵaro estis disigita kaj forgesita, ĝis nun, en tiu ĉi malluma tempo, kun la suno malhela, obstaklaj

sovaĝejoj en Askolajs, kaj la blanka urbo Kajin duone ruina, nur iomete pli ol cent sorĉoj restas en homara priscio. Inter tiuj ĉi, Mazirien havis aliron al sepdek tri, kaj grade, per strategioj kaj negocoj, estis akiranta la aliajn.

Mazirien elektis iun el siaj libroj kaj kun streba laboro enpremis kvin sorĉojn en sian cerbon: la **Girigo** de Fanddeal, la Dua Hipnota Sorĉo de Feloĵun, la Bonega Prisma Ŝpruco, la Sorĉo de Neelĉerpelba Nutro, kaj la Sorĉo de la Ĉiopova Sfero. Tio ĉi sukcese farita Mazirien trinkis vinon kaj ripozis sur sia kanapo por dormi.

La sekvan tagon, kiam la suno

pendis malsupre, Mazirien iris por marŝi en sia ĝardeno. Ne longe devis li atendi. Dum li fosetis por malstriktigi teron ĉe radikoj de siaj **lun-geranioj** mola frotsono kaj frapeto informis ke la objekto de lia deziro estis alvenita.

Ŝi sidis rekte en la selo, juna virino **ekskvizite** desegnita. Mazirien malrapide kaŭris, por ke li ne ektimigu ŝin, metis siajn piedojn en la Vivajn Botojn kaj fikis ilin super-genue.

Li stariĝis. “Ho knabino,” li kriis, “refoje vi estas veninta. Kial vi venas je vesperoj? Ĉu vi admiras la rozojn? Ili ege ruĝas pro tio ke viva ruĝa sango fluas en iliaj petaloj. Se hodiaŭ vi ne forkurus, mi farus donacon el unu al vi.”

Mazirien fortiris rozon de la tremanta arbusto kaj antaŭeniris al ŝi, rezistante la puŝemegon de la Vivaj Botoj. Li estis marŝanta je nur kvar paŝoj kiam la virino eke enpremis siajn genuojn al la ripojn de sia rajdbesto kaj tiel plongis for tra la arboj.

Mazirien permesis plenan amplekson al la vivo en siaj botoj. Ili faris grandan salton, kaj pluan, kaj pluan kaj tuj li ekis en plena ĉasado.

Do Mazirien eniris la arbaran fabelan. Ĉiuflanke muskaj arbotrunkoj etendiĝis vertikale por subteni altan diversecon el folioj. Radioj de sunlumo penetris je regulaj interspacoj por kuŝigi ruĝajn makulojn sur la herbon. Long-

trabaj floroj kaj delikataj fungoj leviĝis el la humo; en tiu ĉi elĉerpiĝanta tempo de la Tero naturo estis milda kaj ripozema.

Mazirien en siaj Vivaj Botoj saltegis kun granda rapido tra la arbaro, tamen la nigra ĉevalo, kurante sen laciĝo, restis facile antaŭa.

Kelkajn leŭgojn la virino rajdis, ŝiaj haroj flagrante malantaŭ ŝi tiel, kiel pintflageto. Ŝi rigardis malantaŭen kaj Mazirien vidis la vizaĝon super ŝia ŝultro kvazaŭ estis dum sonĝo. Ŝi klinis antaŭen; la or-okula ĉevalo tondris antaŭen kaj baldaŭ perdiĝis al vido. Mazirien sekvis atentante spurojn en la herb-tapiŝo.

Risorteco kaj puŝemo komencis ĉerpiĝi el la Vivaj Botoj, ĉar ili jam kuris longe kaj je granda rapido. La egaj saltoj fariĝis malpli longaj kaj pezaj, sed la kuraj interpaŝoj de la ĉevalo, montrataj de la spuroj, ankaŭ estis malpli longaj kaj malpli rapidaj. Post nelonge Mazirien eniris herbejon kaj vidis la ĉevalon, sen rajdanto, manĝanta herbon. Li ekĉesis paŝi. La tuta surfaco de mola herbaro kuŝis antaŭ li. La spuraro de la ĉevalo kondukanta en la maldensejon estis klara, sed estis neniuj spuroj elkondukantaj. Devas esti tial ke la virino eksrajdis ie antaŭe — pri kiom longe li havis nenian scipovon. Li marŝis al la ĉevalo, sed la besto ektimetis kaj forkuris inter la arboj. Mazirien faris unu provon postsekvi, kaj

atentis ke siaj Botoj subfleksiĝis lace kaj malrigide — mortintaj.

Li demetis ilin piedsvinge, priblasfemante la tagon kaj sian misfortunon. Skuanta liberige la mantelon malantaŭ si, kun malbonintenca esprimego brilanta ĉe sia vizaĝo, li komencis kontraŭpaŝi sian vojon.

En ĉi tiu parto de la arbaro, elstaraĵoj de nigra kaj verda roko, **basalto** kaj **serpenteno**, okazis ofte kiel antaŭmontraĵoj de la krutaĵoj starantaj super la Rivero Derno. Mazirien vidis, ke sur unu el tiuj ĉi rokoj estis malgrandega vir-estulo rajdanta **libelon**. Li havis haŭton el verdeta koloro; li portis **gazan** veston kaj tenis **lancon** duoble pli longa

ol si mem.

Mazirien haltis. La Tŭik-viro rigardis malsupren senemocie.

“Ĉu vi vidis virinon el mia raso preterpasantan, Tŭik-viro?”

“Mi vidis tian virinon,” respondis la Tŭik-viro post momento de pripensado.

“Kie ŝi povas esti trovata?”

“Kion mi atendu por la informo?”

“Salon — tiom multe kiom vi povas forporti.”

La Tŭik-viro gestis per svingi sian

lancon. “Salo? Ne. Liejn la Vojiranto provizas al nia ĉefulo Dandanflores salon por la tuta tribo.”

Mazirien povis diveni tiujn servojn por kiuj la trubadoro-rabisto pagadis salon. La Tũik-viroj, flugante rapide sur siaj libeloj, vidis ĉion kio okazis en la arbaro.

“Flakonon de oleo de miaj tĕlanksis-floroj?”

“Konsentite,” diris la Tũik-viro. “Montru al mi la flakoneton.”

Mazirien faris.

“Ŝi forlasis la vojeton apud la

fulmo-**frakasita** kverko kio kuŝas iomete antaŭ vi. Ŝi iris rekte al river-valo, la plej mallonge irebla vojo al la lago.”

Mazirien kuŝigis la flakonon apud la libelo kaj foriris celante la riveran kverkon. La Tŭik-viro rigardis lin iri, poste elseliĝis kaj ŝnure fikis la flakonon al la suba flanko de la libelo, apud la bukaro da bonega háft-fadeno kion donis la virino por ke li tiel irigu Mazirienon.

La Magiisto turnis ĉe la kverko kaj baldaŭ malkovris la spur-vojon montratan sur la mortintaj folioj. Longa malplena maldensejo kuŝis antaŭ li, klinanta facile al la rivero. Arboj staris ture ĉe ambaŭ flankoj kaj la longaj sunsubiraj radioj banis unu flankon en sango, maldekstre la

alian flankon en nigra ombro. Tiom profunda estis la ombreco ke Mazirien ne vidis la estulon sidanta sur falinta arbo; kaj li sentis ĝin nur tiam kiam ĝi pretis sursalti lian dorson.

Mazirien risortis turniĝe por alfronti la estulon, kiu remalstriktiĝis en sida pozo. Ĝi estis Deodando, tiel formita kaj vizaĝaspekta kiel bela viro, detale muskola, sed kun morte nigra haŭto sen ajna rebrileco kaj kun longaj fendo-truaj okuloj.

“Ho, Mazirien, vi vagas la arbaron malproksime de hejmo,” la voĉo de la nigra estulo leviĝis tra la maldensejo.

La Deodando, Mazirien sciis,

frandis lian korpon por viando. Kiel eskapis la virineto? Ŝia spuraro kondukis rekte preterpase.

“Mi venas serĉanta, Deodando. Respondu miajn demandojn, kaj mi provizos al vi multan viandon.”

La okuloj de la Deodando rebrilis flagre, ekrigardade al la korpo de Mazirien. “Vi eble tion faros en ajna kazo, Mazirien. Ĉu vi estas portanta fortajn ŝorĉojn hodiaŭ?”

“Mi estas. Diru al mi, kioma tempo post ol pasis la knabino? Ĉu iris ŝi rapide, malrapide, sola aŭ kune kun aliaj? Respondu, kaj mi donos al vi viandon je ajna tempo laŭ via deziro”

La lipo de la Deodando kurbiĝis moke. “Blinda Magiisto! Ŝi jam ne forlasis la maldensejon.” Li indikis fingromontre, kaj Mazirien sekvis la direkton de la morte nigra brako. Sed li eksaltis kiam la Deodando resortis. El lia buŝo verŝiĝis la silaboj de la Gira Sorĉo de Fandéal. La Deodando estis ektirata de sur la grundo kaj ĵetita alte en la areon, kie li pendiĝis ege rondiranta, alte kaj malalte, rapide kaj malrapide, supren ĝis la arbosuproj, malsupren ĝis la grundo. Mazirien rigardis kun duona rideto. Post momento li trenis la Deodandon malsupren kaj kaŭzis ke la rondirado malrapidiĝu.

“Ĉu vi mortus rapide aŭ malrapide?”

demandis Mazirien. “Helpu min kaj mi mortigos vin tuj. Alikaze vi leviĝos alte ĝis kie flugas la pelgrénoj.”

Furiozo kaj timo strangolis la Deodandon.

“Estu ke malhela Hial piku viajn okulojn. Estu ke Kraan tenu vian cerbon en acido!” Kaj ĝi aldonis tiajn pluajn ŝarĝojn ke Mazirien sentis tion devige ke li murmuru kontraŭ-sorĉdirojn.

“Supren do,” diris Mazirien fine, kun svinga gesto de sia mano. La nigra disetendiĝanta korpo ekiris supren super la arbo-suproj por rondiri malrapide en la ruĝa lumo de la subiranta suno. Post momento, makulita vampir-aspekta

estulo kun hoka beko turniĝis por flugi proksime kaj ĝia beko tranĉis la nigran gambon antaŭ ol la krianta Deodando sukcesis piedbati ĝin for. Plua kaj plua similaj formoj flugis rapide trans la suno.

“Suben, Mazirien!” aŭdiĝis la malforta krio. “Mi diros tion, kion mi scias.”

Mazirien trenis lin proksime al tero.

“Ŝi preterpasis sola antaŭ ol vi venis. Mi provis ataki ŝin sed ŝi forpelis min per manpleno da tájla polvo. Ŝi iris al la fino de la herbejo kaj prenis la vojeton al la rivero. Tiu vojeto kondukas preter la loĝejo de Hŕango. Do, ŝi estas perdita, ĉar li satigos sin sur ŝi ĝis ŝi mortos.”

Mazirien frotis sian mentonon. “Ĉu ŝi havis sorĉojn kun si?”

“Mi ne scias. Ŝi bezonos fortan magion por eskapi la demonon Ĥrang.”

“Ĉu restas io plue dirinda?”

“Nenio.”

“Tial vi mortu.” Kaj Mazirien kaŭzis ke la estulo rondiru je ĉiam pli granda rapido, pli kaj pli rapide, ĝis restis nur malklaraĵo. Strangolita plorkriado sekvis kaj poste la strukturo de la Deodando apartiĝis. La kapo pafiĝis kiel kuglo malproksimen trans la herbejo; brakoj, gamboj, internaj orgenoj ekflugis en ĉiuj direktoj.

Mazirien iris laŭ sia vojo. Ĉe la fino de la herbejo la vojeto kondukis krute malsupren laŭ bretaĵoj de verda serpenteno al la Rivero Derno. La suno estis jam subiranta kaj ombreco plenigis la valon. Mazirien atingis la riverbordon kaj turniĝis por sekvi la riverfluan celante malproksiman brileton kio koniĝas per la nomo Sánra Akvo, la Lago de Songôj.

Malbenaodoro prezentiĝis en la aero, malbonodoro de putriĝo kaj malpuro. Mazirien antaŭiris pli singarde, ĉar la loĝejo de Hrang la hulo-urso estis proksima, kaj en la aero estis la sento de magio — sorĉismo tiom brute forta ke siaj propraj pli subtilaj sorĉoj eble ne povus limigi.

La sono de voĉoj atingis lin, la gorgaj tonoj de Hrang kaj anhelaj krioj de teruro. Mazirien ĉirkaŭpaŝis rokegon, inspektis la fonton de la sonoj.

La loĝejo de Hrang estis kaverneto en la roko, kie putrinta maso el herbo kaj haŭtoj servis lin por dorm-kuŝejo. Li estis konstruinta krudan kaĝon por enteni tri virinojn, ĉi tiuj portantaj multajn kontuzojn sur siaj korpoj kaj la indikojn de multa hororo sur siaj vizaĝoj. Hrang estis preninta ilin el la tribo kiu loĝis en silke drapiritaj plat-boatoj laŭlonge apud la lago-bordo. Nun ili rigardis dum li baraktis por venki la virinon kiun li estis ĵus kaptinta. Lia ronda griza vir-vizaĝo esprimis tordite kaj li fortiris de ŝi ŝian

kamizolon per siaj viraj manoj. Sed ŝi fortendis la grandan ŝvitan korpon per mirinde lerta viglo. La okuloj de Mazirien duonfermiĝis. Magio, magio!

Do li staris rigardanta, konsideranta pri kiel detruĝi Hrangon sen ankaŭ vundi la virinon. Sed ŝi ekvidis lin de super la ŝultro de Hrang.

“Vidu,” ŝi anhelis, “Mazirien estas jam veninta por vin mortigi.”

Hrang turniĝis torde. Li vidis Mazirienon kaj eksturmis alvene, kureganta sur ankaŭ la manoj, ellasanta muĝegojn de sovaĝa pasio. Post la okazo, Mazirien estos demandonta al si ĉu eble la ĥulo estis uzanta ian sorĉon, ĉar

stranga paralizo tiam efikis por striktigi al li la cerbon. Eble la sorĉo ekzistis en la vidaĵo de la kolerega grize blanka vizaĝo, la grandaj brakoj etendiĝintaj por kapti.

Mazirien mense elbaraktis la sorĉon, se tio ĝi estis, kaj parolis sorĉon sian propran, kaj la tuta valo lumiĝis per fluantaj sagetoj el fajro kiuj venis el ĉiuj direktoj por vipe disigi la peze movantan korpon de Ĥrang en mil lokoj. Jen la Bonega Prisma Ŝpruco — mult-koloraj stabaj linioj. Ĥrang estis tuj mortigita, purpura sango elfluanta lin tra nekalkulebe multaj truoj kie la lumradia pluvo estis lin penetrinta.

Sed Mazirien atentis malmulte. La knabino jam eskapis. Mazirien vidis ŝian

blankan formon kurantan laŭ la rivero al la lago, kaj eksekvis ĉase, senzorge pri la kompatindaj krioj de la tri virinoj en la kaĝo.

Post nelonge la lago kuŝis antaŭ li, granda plato el akvo kies fora rando nur malklare videblis. Mazirien venis malsupren al la sabla bordo kaj staris serĉante trans la malhela faco de Sánra Akvo, la Lago de Songôj. Profunda nokto kun nur minimuma postlumo regis la ĉielon, kaj steloj briletadis sur la ebena surfaco. La akvo kuŝis malvarmeta kaj senmova, sen ajna tajdo kiel ĉiuj el la akvoj de la Tero post tiam kiam la luno forlasis porĉiame la ĉielon.

Kie estis la virino? Jen, pale blanka

formo, kvieta en la ombro trans la rivero. Mazirien staris sur la riverbordo, alta kaj ordonema, facila venteto ondetiganta la mantelon ĉirkaŭ liaj gamboj.

“Ho, knabino,” li vokis. “Jen mi, Mazirien, kiu savis vin de Hrang. Venu proksime, por ke mi paroli al vi.”

“Je tiu ĉi distanco mi aŭdas vin bone, Magiisto,” ŝi resondis. “Ju pli proksime mi alvenus, des pli malproksime mi devus kuri eskape.”

“Kial do vi forkuras? Revenu kun mi kaj vi estos majstrino de multaj sekretoj kaj tenos multan povon.”

Ŝi ridis. “Se mi estus deziranta tiujn

ĉi, Mazirien, ĉu mi estus forkurinta tiom malproksime?”

“Kiu vi estas do, ke vi deziras ne la sekretojn de magio?”

“Al vi, Mazirien, mi estas sennoma, kontraŭ tio ke vi malbenu min. Nun mi iros tien kie vi ne povos sekvi.” Ŝi kuris plu laŭ la bordo, vadis malrapide en la lagon ĝis la akvo ĉirkaŭis ŝian talion, poste ŝi subiĝis elde vido. Ŝi estis for.

Mazirien paŭzis sendecide. Ne estus bone, ke oni eluzu tiom multe da sorĉoj kaj tiel meti sin disde povo. Kio plu eble estus sube de la lago? Ia sentiĝo de kvieta magio estis tie, kaj kvankam li ne estis en malamikeco kun la Laga Sinjoro, aliaj

estuloj eble malŝatus altrudon. Tamen, kiam la figuro de la knabino ne poste rompis la surfacon, li parolis la Sorĉon de Neniam Laciĝanta Nutro kaj eniris la malvarmetan akvon.

Li plongis profunde en la Lagon de Sorĉoj, kaj dum li staris sur la subo, kun liaj pulmoj malgraŭe trankvilaj pro bonefiko de la sorĉo, li miris pri la fea loko kion li trovis. Anstataŭ nigrecon, verdeco lumis ĉie kaj la akvo nur iomete malpli klaris ol aero. Plantoj ondetis en la fluado kaj ankaŭ moviĝis la lagaj florplantoj, molaj kun floroj el ruĝo, bluo kaj flavo. Tien kaj reen naĝis grand-okulaj fiŝoj el multaj formoj.

La subo kondukis plue malsupren

per rokaj ŝtupoj al larĝa ebenejo kie arboj de la sublago etendiĝis supren per maldikaj trunketoj al ornamaj foliaroj kaj purpuraj akvo-fruktoj, kaj tiel plu ĝis la malklara distanco malvidebligis ĉion. Li vidis la virinon, aspektanta kiel blanka akvo-feo, ŝia hararo kiel malhela nuboj. Ŝi duon-naĝis duon-kuris trans la sabla planko de la akvo-mondo, fojfoje rigardanta trans sia ŝultro. Mazirien postsekvis, lia mantelo ondetanta malantaŭe.

Li pliproksimiĝis al ŝi, ĝojegante. Li devus puni ŝin pro tio ke ŝi postsekvigis li tiom longe... La praaj ŝtonaj ŝtupoj sub lia laborĉambro kondukadas profunden, fine al ĉambroj kiuj pli kaj pli grandiĝis

dum oni plue profundiĝus. Mazirien estis trovinta rustan kaĝon en unu el tiuj ĉi ĉambroj. Unu aŭ du semajnojn ŝlosita en la nigreco estus malpliigonta ŝian volemecon. Kaj iam antaŭe li estis malgrandiginta virinon ĝis tioma alteco kiom sia dikfingro kaj loĝigis ŝin en eta vitra botelo kune kun du zumadantaj muŝoj...

Ruina templo montriĝis tra la verdeco. Estis multaj kolonoj, kelkaj falintaj, aliaj ankoraŭ suprentenantaj la frontonon. La virino eniris la grandan portikon sube de la ombro de la arĥitravo. Eble ŝi provadas eskapi lin; li devos sekvi proksime. La blanka korpo flagretis ĉe la fora ekstremo de la navo, ĵus nun naĝante

super la **tribuno** kaj en duon-cirklan
ĉambreton malantaŭan.

Mazirien sekvis tiom rapide kiom li povis, duon-naĝe, duon-marŝe tra la solemna malheleco. Li strebis rigardi tra la malklareco. Ĉi tie, malpli grandaj kolonoj iom nesezure subtenis **kupolon** disde kiu la ĉefstono jam elfalis. Subita timo alfrapis lin, tuj poste venis kompreno kiam li vidis ekmovon supere. Je ĉiuj flankoj la kolonoj enfalis, kaj **lavango** el **marmoraj** blokoj rulfalis al lia kapo. Li eksaltis timege malantaŭen.

La senordega ĉio-movado ĉesis, la blanka polvo de la praa **mortero** drivis dise for. Sur la frontono de la ĉefa templo la virino genuis sur maldikaj genuoj,

rigardante malsupren por ekscii ĉu ŝi estis tute mortiginta Mazirienon.

Ŝi estis malsukcesinta. Du kolonoj, per plej hazarda bonŝanco, estis falegintaj ambaŭflanke de li, kaj trabo ŝirmis lian korpon kontraŭ la blokoj. Li movis sian kapon dolore. Tra fendo en la disfalinta marmoro li povis vidi la virinon, kliniĝanta por trovi lian korpon. Do, ŝi estus lin mortiganta? Lin, Mazirienon, kiu jam vivadis plimulte da jaroj ol li povis facile kalkuli? Tiom plimulte ŝi poste estos lin malamanta kaj timanta. Li vokis sian magiaĵon, la Sorĉo de la Ĉiopova Sfero. Kovraĵo el forto formiĝis ĉirkaŭ lia korpo, dilatante por puŝi for de li ĉion kio rezistis. Kiam la marmora

ruinaĵeroj estis puŝitaj for, li detruis la sferon, regajnis sian starpozon, kaj serĉe rigardis kun furioza esprimo por trovi la virinon. Ŝi malproksimis preskaŭ for de videbleco, malantaŭ kreskaĵo el purpura laminario, grimpanta la deklivon kondukantan al la bordo. Kun la tuto de sia povo li ekiris ĉase.



T'sajn trenis sin supren sur la strandon. Ankoraŭ malantaŭ ŝi venis Mazirien la Magiisto, kies povo estis venkinta ĉiujn el ŝiaj planoj. La memoro de lia vizaĝo aperis antaŭ ŝi kaj ŝi tremblis. Ne permeseblas ke li kaptu ŝin nun.

Lacego kaj malespero malrapidigis ŝiajn piedojn. Ŝi estis komencinta kun nur du magiaĵoj, la Sorĉo de Neniam Laciĝanta Nutro kaj sorĉo donanta forton al ŝiaj brakoj — tiu lasta permestante ke ŝi detenu Ĥrangon kaj faligu la templon sur Mazirien. Tiuj ĉi elĉerpiĝis; al ŝi defendiloj eke mankis; sed, kontraŭflanke, Mazirien ankaŭ povis havi nenion plu.

Eble li ne sciis pri la vampir-herbaĉo. Ŝi kuris supren laŭ la deklivo kaj staris malantaŭ kreskaĵaro de pala, vento-kuŝigita herbo. Kaj nun venis Mazirien el la lago, maldika formo videbla kontraŭ la rebrileteco de la akvosurfaco.

Ŝi retromarŝis, situigante la netimigan kreskaĵejon de herbo inter ili. Se la herbo malsukcesus — ŝia menso tremis je la penso pri tio kion ŝi devus fari.

Mazirien marŝis en la herbaron. La malsanaspektaj folietoj fariĝis **tendene** flekseblaj fingroj. Ili ĉirkaŭvolvis liajn maleolojn, tenante lin en nerompebla tenado, dum aliaj esploris por trovi lian haŭton.

Do Mazirien ĉantis sian lastan magiaĵon — la sorĉ-elvoko de paralizeco, kaj la vampiraj herboj fariĝis lacaj kaj glitis fadene al tero. T'sain rigardis kun mortinta espero. Ĉu al li mankus malforteco? Ĉu ne dolorus liaj fibroj, ĉu

ne lia spiro malfacilus? Ŝi ektuniĝis kaj kuris trans la herbejo, al arbareto de nigraj arboj. Ŝia haŭto sentiĝis malvarme je la profundaj ombroj, la sombraj formoj. Sed la frapsonoj de la piedoj de la Magiisto estis laŭtaj. Ŝi plonĝis en la mortan ombrecon. Antaŭ ol ĉiuj en la arbareto vekiĝos ŝi devas esti kurinta tiom for kiom ŝi eblas.

Frap! Ŝnuro vipis al ŝi. Ŝi daŭre kuris. Plua kaj plua — ŝi falis. Ankoraŭ plua granda vipo kaj plua vipis al ŝi. Si ŝancele stariĝis, kaj iris plu, tenante siajn brakojn antaŭ la vizaĝo. Frap! La viperoj tordiĝis en la aero, la fina frapo turnis ŝin rondire. Tial ŝi vidis Mazirienon.

Li batalis. Dum la frapoj falis pluve

sur lin, li provis ekteni la viperojn kaj rompi ilin. Sed ili estis flekseblaj kaj risortaj preter lia forteco, kaj tiris sin for por surfrapi lin refoje. Koleregaj pro lia rezistado, ili koncentris al la malbonŝanca Magiisto, kiu pasiis kaj batalis kun superhoma furiozo, kaj T'sain estis permesata rampi ĝis la rando de la arbareto ankoraŭ vivanta.

Ŝi retrorigardis kun miro al la esprimado de la pasio por vivo kion havis Mazirien. Li ŝancele iradis inter nubo el vipoj, lia furioze obstina figuro malklare siluetita. Li malfortiĝis kaj provis eskapi, kaj poste li falis. La batoj alfrapadis lin — liajn kapon, ŝultrojn, la longajn gambojn. Li provis leviĝi sed refalis

malantaŭen.

T'sain malfermis siajn okulojn en laciĝo. Ŝi sentis la sangon fluetantan el ŝia rompita histo. Sed la plej grava misio ankoraŭ atendis. Ŝi levis sin por stari sur la piedoj, kaj ŝancele komencis iri. Dum longa tempo la tondrado de multaj batoj atingis ŝiajn orelojn.

La ĝardeno de Mazirien estis surprize bela dum nokto. La stel-floroj etendiĝis larĝe, ĉiu el magia perfekteco, kaj la kaptitaj duon-vegetaĵaj sfingoj flugis tien kaj reen. Fosforeskaj akvolotusoj floris kiel ĉarmaj vizaĝoj sur la lageto kaj la arbusto kiun Mazirien estis portinta de malproksima Almerio en la sudo ornamis la aeron per frukta

parfumo.

T'sain, ŝanceliĝanta kaj anhelanta, nun venis serĉe tra la ĝardeno. Certaj el la floroj vekiĝis kaj rigardis ŝin kun kuriozo. La duon-besta hibrido dormece kvivitis al ŝi, pensante ke ĝi rekonus la tretadon de Mazirien. Mallaŭte aŭdita estis la sopira muziko de la blu-tasaj floroj kantantaj pri praaj noktoj kiam blanka luno tranaĝis la ĉielon, kaj grandaj ŝtormoj kaj nuboj kaj tondroj regis la sezonojn.

T'sain preterpasis senatente. Ŝi eniris la domon de Mazirien, trovis la laborĉambron kie lumadis la eternaj flavaj lampoj. La or-harara basen-kreitulo sidiĝis subite kaj ŝin alrigardis kun siaj

belaj malplenaj okuloj.

Ŝi trovis la ŝlosilojn de Mazirien en ŝranko, kaj strebe sukcesis unge malfermi la plafonan klappordon. Ĉi tie ŝi faletis por ripozi kaj lasis la rozan mallumetecon pasi for de ŝiaj okuloj. Vidaĵoj komencis veni — Mazirien, alta kaj aroganta, elpaŝanta por mortigi Ĥrangon; la strange-koloraj floroj de la lago; Mazirien, lia magio perdita, batalanta la vipojn... Ŝi eltiriĝis de la duon-senkonscieco fare de la basen-kreitulo timete ludanta kun ŝiaj haroj.

Ŝi skuis sin al vekiteco, kaj duon-marŝis, duon-falis malsupren laŭ la ŝtuparo. Ŝi malŝlosis la tri-seruran pordon, puŝis ĝin malferme per preskaŭ

la lasta furioza strebo de sia korpo. Ŝi envenis kaj tenegis al la piedestalo kie la vitro-kovrita skatolo staris kaj Turĝun kaj la drako estis ludantaj sian ĉionriskan ludon. Ŝi ĵetis la vitron frakase sur la plankon, facile ellevis Turĝunon kaj metis lin surplanke.

La sorĉo disrompiĝis je tuŝo de la runo ĉe ŝia pojno, kaj Turĝun fariĝis viro refoje. Li rigardis konsternite al la preskaŭ nereconebla T'sain.

Ŝi provis rideti supren al li.

“Turĝun — vi estas libera — ”

“Kaj Mazirien?”


“Li estas mortinta.” Ŝi subfalis lacege al la ŝtona planko kaj kuŝis malrigida. Turĝun explore rigardis ŝin kun stranga emocio en siaj okuloj.

“T’sain, kara kreitulo de mia menso,” li flustris, “pli nobla ol mi estas vi, kiu uzis la solan vivon kion vi konis por mia libero.”

Li levis ŝian korpon en siaj brakoj.

“Sed mi reportos vin al la basenoj. Per via cerbo mi konstruos pluan virinon T’sain, tiom bela kiom vi. Ni iras.”

Li portis ŝin supren laŭ la ŝtonaj ŝtupoj.



Turĝun de Mijr

Turĝun sidis en sia laborĉambro, gamboj etenditaj dise de la tabureto, dorso kontraŭ kaj kubutoj sur la benko. Trans la ĉambro estis kaĝo; en tiun rigardadis Turĝun kun amuzete bedaŭra ĉagreno. La kreitaĵo en la kaĝo redonis la studadon kun emocioj preter konjektebleco.

Ĝi estis aĵo por instigi bedaŭron — granda kapo sur malgranda, fostete maldikega korpo, kun malfortaj akvecaj okuloj kaj grase velkema butono por sia nazo. La buŝo pendiĝis malstrikte nefirma

kaj malseka, la haŭto briletis vakse roskolora. Malgraŭ ĝiaj memevidentaj malperfektecoj, ĝi estis ĝisdate la plej sukcesa produktaĵo el la basenoj de Turĝun.

Turĝun stariĝis, trovis bovlon da kaĉo. Per long-tenila kulero li tenis manĝaĵon ĉe la buŝo de la kreitaĵo. Sed la buŝo rifuzis la kuleron kaj kaĉo flufaletis malsupren laŭ la rebrileta haŭto por fali sur la kadukan korpformon.

Turĝun malsuprenmetis la bovlon, staris for kaj revenis al sia tabureto. Dum tuta semajno ĝi estis rifuzanta manĝi. Ĉu la idiota vizaĝo kaŝis la eblon percepti, volon al estingiĝo? Dum Turĝun rigardadis, la blanke-blujaj okuloj

fermiĝis, la granda kapo falis ŝrumpe kaj frapetis la plankon de sia kaĝo. La membroj malstriktiĝis; la estaĵo estis mortinta.

Turĝun suspiris kaj eliris la ĉambron. Li alpaŝis volvan ŝtuparon kaj fine eliris sur la tegmenton de sia kastelo Mijr, alte super la rivero Derno. En la okcidento la suno pendiĝis proksime al maljuna Tero; rubenaj radioj, pezaj kaj luksaj kiel vino, kliniĝis preter la **tuberformaj** arbotrunkoj de la praa arbaro por surkuŝi la tufan arbaran plankon. La suno sinkis laŭ akorde kun la malnova rito; malfru-epoka nokto surfalis la arbaron, mola, varmeta mallumo venis rapide, kaj Turĝun staris pripensanta la

morton de sia plej ĉitempa kreitaĵo.

Li konsideris ĝiajn multajn antaŭulojn: la aĵo tute el okuloj, la senosta kreitaĵo kun la pulsanta surfaco de sia cerbo senŝirma, la bela virina korpo kies intestoj etendiĝis ŝnure en la nutra solvaĵo kiel serĉantaj fibroj, la inversaj kreitaĵoj kun siaj internaĵoj eksterigitaj... Turĝun suspiris malgaje. Liaj metodoj kulpis; fundamenta elemento mankis en lia sintezo, matrico ordiganta la enhavojn de la skemo.

Dum li sidis rigardanta elen trans la malheliĝanta lando, Turĝun estis rememorigita pri nokto pasinta je multaj jaroj, kiam la Saĝulo staris apud li.

“En tempo praa je epokoj,” la Saĝulo estis dirinta, siaj okuloj fiksitaj al malalta stelo, “mil sorĉaĵoj sciiĝis al sorĉismo kaj la magiistoj efektivigis siajn volojn. Hodiaŭ, dum la Tero mortas, cento da sorĉoj restas al la scio de homoj, kaj tiuj ĉi alvenas nin pere de la praaĵ libroj... Sed ekzistas unu nomata Pandelumo, kiu konas ĉiujn sorĉojn, ĉiujn ĉantojn, kantaĵojn, runojn, kaj mirigilojn kiuj iam ajn tordis kaj muldis spacon...” Li silentiĝis, perdita en siaj pensoj.

“Kie estas tiu ĉi Pandelumo?” Turĝun demandis post ioma tempo.

“Li loĝas en la lando Embeljono,” la Saĝulo estis respondinta, “sed kie tiu lando situas, neniu scias.”

“Kiel oni trovas Pandelumon, do?”

La Saĝulo ridetis ete. “Se estis iam ajn necese, sorĉdiro ekzistas por porti onin tien.”

Ambaŭ restis silentaj momenton; poste la Saĝulo parolis, rigardadanta foren super la arbaro.

“Oni rajtas demandi ion ajn de Pandelumo, kaj Pandelumo respondos — kondiĉe, ke la demandanto plenumas tiun servon kiun Pandelumo postulas. Kaj Pandelumo negocas karan **kontrakton**.”

Poste la Saĝulo montris al Turĝun la sorĉdiron diskutitan, kiun li estis malkovrinta en praaĝa dosiero, kaj tenis

sekreta de la tuta mondo.

Turĝun, rememorante tiun ĉi konversacion, malsupreniris al sia studejo, longa malaltplafona halo kun ŝtonaj muroj kaj ŝtona planko moligita per dika rustkolora tapiŝo. La libretoj enhavantaj la sorĉaĵojn de Turĝun kuŝis sur longa tablo el nigra skiĉlo aŭ estis puŝe metitaj tute senorde sur bretojn. Tiuj ĉi estis volumenoj kompilitaj fare de multaj magiistoj el la pasinteco, malnetaj foliaroj kolektitaj de la Saĝulo, lede binditaj libretoj ordigantaj la silabojn de cent fortaj sorĉdiroj, tiom koncentrite potencaj, ke la cerbo de Turĝun povis koni nur kvar da ili samtempe.

Turĝun

trovis

mucidan

paperfoliaron, turnis la pezajn foliojn al tiu sorĉdiro kiun la Saĝulo al li montris, la Voko al la Violenta Nubo. Li rigardis fikse malsupren al la literoj kaj ili brulis kun urĝa povo, premiĝantaj de sur la papero kvazaŭ avidegaj por eskapi la solecon de la libro.

Turĝun fermis la libron, perfortante la sorĉdiron refoje en forgesitecon. Li vestis sin per mallonga blua mantelo, glitigis tranĉilon en sian zonon, ĝustigis ĉe pojno la **amuleton** kio entenis la Runon de Lakadel. Poste li sidiĝis kaj el ĵurnalo elektis la sorĉojn kiujn li estus portanta kun si. Kiajn danĝerojn li eble renkontos li ne povis scii, do li elektis tri sorĉojn el generala aplikebleco: la

Bonega Prisma Ŝpruco, la Mantelo de Ŝtelirado fare de Fandeaĵo, la Sorĉo de la Malrapida Horo.

Li supreniris al la tegmenta randmureto de sia kastelo kaj staris sub la foraj steloj, enspirante la aeron de antikva Tero... Kiom ofte ĉi aero enspiriĝis antaŭ ol li same faris? Kiujn kriojn de doloro spertis ĉi aero, kiujn suspirojn, ridojn, militkriojn, kriojn de ĝojego, anhelojn...

La nokto estis elpasanta. Blua lumo flagris en la arbaro. Turĝun rigardis momenton, post tio fine kuraĝigis sin kaj eldiris la Vokon al la Violenta Nubo.

Ĉio estis kvieta; poste venis flustro da moviĝo ŝveliĝanta por fariĝi muĝo el

grandegaj ventoj. Nubetaĵo blanka aperis kaj kreskis ĝis fariĝis kolono el nigra fumo. Voĉo profunda kaj grata elvenis la turbuladon.

“Je via ĝena potenco estas tiu ĉi instrumento alveninta; kien vi iros?”

“Kvar Direktojn, poste Unu,” diris Turĝun. “Vivanta mi devas esti portata al Embeljono.”

La nuboj kirlade surfalis lin; alte supren kaj eke for li estis prenita, ĵetita pied-super-kape tra nemezurebla distanco. Al kvar direktoj li estis puŝata, poste unu, kaj finfine granda blovaĵo ĵetis lin el de la nuboj, lin faligis dismembre kuŝanta en Embeljono.

Turĝun brakleve stariĝis kaj ŝanceladis momenton, duone stupora. Liaj sencoj grade stabiliĝis; li ĉirkaŭrigardis.

Li staris ĉe rando de klarega lago. Bluaj floroj kreskis ĉirkaŭ liaj maleoloj kaj kontraŭ lia dorso staris arbareto el altaj blu-verdaj arboj, la folioj malfokusiĝantaj alte en la nebuleco. Ĉu Embeljono estas el Tero? La arboj estis ter-aspektaj, la floroj el similaj formoj, la aero estis el sama teksturo... Sed ekzistis stranga manko je ĉi lando kaj ĝi malfacile identiĝeblis. Eble ĉi sento devenis el la kurioza necerteco pri la horizonto, eble le la malfokusa kvalito de la aero, luma kaj malcerta kiel akvo. Plej strange, tamen,

estis la ĉielo, interplekto el vastaj ondetoj kaj kruc-ondetoj, kaj tiu ĉi refraktis mil kolonojn kolore lumajn, radioj kiuj mezaere plektis mirindan **puntaĵon**, ĉielarkajn retojn, ĉio el la juvelaj koloroj. Do dum Turĝun rigardis, sur li balaiĝis lumkolonoj el kristala klareco, **topazo**, luksa violo, radianta verdo. Li nun perceptis ke la koloroj de la floroj kaj la arboj estis nur tio de la ĉimomenta funkcio de la ĉielo, ĉar nun la floroj estis el palrosa koloro, kaj la arboj el songa purpuro. La floroj pliprofundiĝis en kuprecon, poste kun **sufuzo** brile ruĝa, varmetiĝis tra brunruĝo al skarlato, kaj la arboj fariĝis mare bluaj.

“La Lando Neniu Scias Kie,” diris

Turĝun al si mem. “Ĉu mi estis portita alten, malaleten, en antaŭ-ekzistecon aŭ en la mondon postan?” Li rigardis al la horizonto kaj kredis vidi nigran kurtenon etendiĝantan alte en la malheleco, kaj ĉi kurteno cirkle ĉirkaŭis la landon laŭ ĉiuj direktoj.

La sono de galopaj hufoj alproksimiĝis; li turniĝis por trovi nigran ĉevalon vivoriske kuregantane laŭ la rando de la lageto. La rajdanto estis juna virino kun nigraj haroj sovaĝe vent-ondigitaj. Ŝi portis malstrikte blankan braĉon ĝis la genuo kaj flavan mantelon flagrantan pro vento. Unu mano tenegis la rimenojn, la alia svingis glavon.

Turĝun singarde flankenpaŝis, ĉar

ŝia buŝo estis strikta kaj blanka kvazaŭ pro kolero, kaj ŝiaj okuloj brilis per stranga frenezeco. La virino tiregis al la rimenoj, **karakoligis** sian ĉevalon alt-ĉirkaŭe, alkuris Turĝunon, kaj svinge atakis lin per la glavo.

Turĝun saltis retroen kaj vipe elprenis sian propran glavon. Kiam ŝi alkuris lin refoje, li forfendis la svingon kaj, klinante antaŭen, tuŝis per la pinto ŝian brakon elprenante guton da sango. Ŝi retroiris ektimigita; poste de sia selo ŝi ektiris pafarkon kaj ekmetis sagon al la ŝnuro. Turĝun risortis antaŭen, flanksalte evitanta la sving-arkon de ŝia glavo, ektenis ŝin ĉirkaŭ la talio, kaj tiris ŝin al la grundo.

Ŝi batalis kun freneza violento. Li havis nenian volon por ŝin mortigi, kaj sekve baraktis en maniero ne tute digna. Finfine li tenis ŝin senhelpa, ŝiaj brakoj kaptitaj malantaŭ la dorso.

“Kvietu, megero!” diris Turĝun, “pro timo, ke perdiĝus je mi la pacienco kaj mi vin svenigus!”

“Faru laŭ via propra volo,” la junulino anhelis. “Vivo kaj morto estas fratoj.”

“Kial vi celas vundi min?” demandis Turĝun. “Mi ne estas vin ofendinta.”

“Vi abomenindas, kiel ĉio ekzistanta.” Emocio raŭkigis la delikatajn

fibrojn de ŝia gorgo. “Se potenco estus mia, mi frakasmus la universon en sangan gruzon, kaj piede ekpremuss ĝin en la finfinan kotaĉon.”

Turĝun en surprizo malstriktegis sian tenon, kaj ŝi preskaŭ baraktis al libero. Sed li kaptis ŝin refoje.

“Diru al mi, kie mi trovos Pandelumon?”

La junulino haltigis sian strebadon, turnis ŝian kapon por rigardegi al Turĝun. Poste: “Serĉu la tuton de Embeljono. Mi helpos vin neniom.”

Se ŝi estus pli amikema, pensis Turĝun, ŝi estus estulo rimarkinde bela.

“Informu min pri kie mi trovu Pandelumon,” diris Turĝun, “alikaze mi trovus aliajn uzojn por vi.”

Ŝi estis silenta momenton, ŝiaj okuloj brulantaj kun frenezeco. Poste ŝi parolis en vivplena voĉo.

“Pandelumo loĝas apud la rivereto nur kelkajn paŝojn malproksime.”

Turĝun maltenis ŝin, sed li prenis ŝian glavon kaj pafarkon.

“Se mi redonus al vi tiujn ĉi, ĉu vi laŭirus vian vojon for en paco?”

Dum momento ŝi alrigardis minace; poste, sen paroli ŝi iris por sursidi sian

ĉevalon kaj rajdis for tra la arboj.

Turĝun rigardis ŝin malaperi tra la lumfaskoj juvelkoloraj, poste iris laŭ tiu direkto kiun ŝi estis indikinta. Li baldaŭ alvenis longan malaltan domegon el ruĝa ŝtono kontraŭ malhelaj arboj. Je lia alproksimiĝo la pordo svingiĝis malferme. Turĝun haltiĝis mez-paŝe.

“Envenu!” aŭdiĝis voĉo “Envenu, Turĝun de Mijr!”

Do Turĝun miroplene eniris la domegon de Pandelumo. Interne li trovis ĉambron kun murtapiŝoj, malplenan de mebloj krom per sola tableto. Neniu venis por lin bonvenigi. Fermita pordo situis ĉe la kontraŭa muro, kaj Turĝun aliris por

trapasi, pensante ke tion oni atendis de li.

“Haltu, Turĝun,” parolis la voĉo. “Neniu rajtas alrigardi Pandelumon. Jen estas leĝo.”

Turĝun, staranta meze en la ĉambro, parolis al sia nevidata gastiganto.

“Jen mia misio, Pandelumo,” li diris. “Dum ioma tempo mi strebadis por krei homecon en miaj basenoj. Tamen ĉiam mi malsukcesas, pro nescio pri tiu aganto kiu kuntenas kaj ordigas la aranĝojn. Tiu ĉi reĝo-matrico devas esti sciata je vi; pro tio mi alvenas vin por esti gvidata.”

“Vole mi helpos vin,” diris Pandelumo. “Ekzistas, tamen, plua

aspektaĵo interrilata. La universo metodas laŭ simetrio kaj egalpezeco; en ĉiu situacio de ekzisto observeblas tiu ĉi egalpezeco. Konsekvence, eĉ en la triviala amplekso de nia interkontraktiĝo, tiu ĉi egaleco devas esti subtenata, tial kaj tiel. Mi konsentas vin helpi; reciproke, vi elfaru servaĵon por mi. Kiam vi estos plenuminta tiun ĉi etan laboron, mi tiam instrukcios vin ĝis via plena kontentiĝo.”

“Kio estas tiu servo?” demandis Turĝun.

“Iu viro loĝas en la lando Askolajs, ne malproksime de via Kastelo Mijr. Ĉirkaŭ lia kolo pendas amuleto el gravurita ŝtono. Vi devas preni ĝin de li kaj ĝin portu al mi.”

Turĝun konsideris momenton.

“Nu bone,” li diris. “Mi faros tion kion mi povos. Kiu estas la viro?”

Pandelumo respondis molvoĉe.

“Princo Kandajv la Ora.”

“Ah,” eksklamis Turĝun amuz-ĉagreniĝe, “vi strebis neniom por fari, ke al mi la tasko estu agrabla... Sed mi plenumos vian postulon tiel bone kiel mi povos.”

“Bone,” diris Pandelumo. “Nun mi devas instrui vin. Kandajv portas tiun ĉi amuleton kaŝe sub la ĉemizo. Kiam malamiko aperas, li elprenas ĝin por

montri sur sia brusto, tiel estas la efikeco de la sorĉaĵo. Preter ĉio, neniel rigardu al tiu amuleto, nek antaŭ nek post ol vi ĝin prenos, kontraŭ puno plej horore konsekvenca.”

“Mi komprenas,” diris Turĝun. “Mi obeos. Nun jen afero pri kio mi volas demandi — kondiĉe, ke la respondo ne trudus al mi laboron pri revenigi la lunon denove al Tero, aŭ repreni **eliksiron** kion vi malbonŝance elverŝis en la maron.”

Pandelumo ridis laŭte. “Demadu plu,” li respondis, “kaj mi respondos.”

Turĝun diris sian demandon.

“Dum mi alproksimiĝis vian

loĝejon, virino freneze furioza volis mortigi min. Tion mi ne permesis kaj ŝi foriris en kolerego. Kiu estas ĉi virino kaj kial estas ŝi tiel?”

La voĉo de Pandelumo montris amuzon. “Mi, ankaŭ,” li respondis, “havas basenojn kie mi muldas vivecon laŭ diversaj formoj. Tiun ĉi junulinon T’sajs-on mi estigis, sed mi faris senzorge, kun eraraĵo en la sintezo. Do ŝi elgrimpis la basenon kun tordaĵo en sia cerbo, laŭ ĉi maniero: tio kion ni juĝas bela, ŝajnas al ŝi malaminda kaj malbela, kaj tio kion ni juĝas malbela, ŝajnas al ŝi netolereble aĉega, laŭ grado kion vi kaj mi ne povas kompreni. Ŝi trovas la mondon loko amara, popoligita per

formoj el la plej malkarega fienco.”

“Do jen la kialo,” Turĝun murmuris.
“Kompatinda mizerulino!”

“Nun,” diris Pandelumo, “vi devas eliri al Kajin; la aŭspicioj bonas... Post momento malfermu tiun ĉi pordon, eniru, kaj moviĝu laŭ la runaj desegnaĵoj sur la planko.”

Turĝun tiel faris kiel li direktiĝis. Li trovis la postan ĉambron cirkla kaj alte kupola, kun la variaj lumoj de Embeljono verŝiĝantaj malsupren tra la plafonaj fenestraĵoj. Kiam li staris sur la desegnaĵo de la planko, Pandelumo parolis refoje.

“Nun fermu la okulojn, ĉar mi devas

eniri kaj tuŝi vin. Atentu bone, ne provu ekvidi min!”

Turĝun fermis la okulojn. Postmomente paŝo malantaŭ li soniĝis. “Etendu vian manon,” diris la voĉo. Turĝun faris kaj sentis malmolan objekton esti tie metata. “Kiam via misio estos plenumita, preme rompu tiun ĉi kirstalon kaj tiumomente vi trovos vin en tiu ĉi ĉambro.” Malvarma mano kuŝis sur lia ŝultro.

“Dum momento vi dormos,” diris Pandelumo. “Kiam vi vekigōs vi estos en la urbo Kajin.”

La mano foriris. Malheleteco surkovris Turĝunon dum li staris

atendante la transiron. La aero subite pleniĝis per sonoj: klakado, tinklado de multaj etaj sonoriloj, muziko, voĉoj. Turĝun malridetis, kunpremis la lipojn: Stranga tumulto por la severa domo de Pandelumo!

Voĉo de virino soniĝis proksime.

“Rigardu, O Santaniĵo, vidu la strigo-viron kio fermas siajn okulojn al festeco!”

Estis vira ridado, subite kvietigita. “Venu. La viro estas frenezeta, eble malpacema. Venu.”

Turĝun hezitis, poste malfermis la okulojn. Estis nokte en la blanke ĉirkaŭ-

murita Kajin, kaj la tempo festivala. Oranĝaj lanternoj drivis en la aero, moviĝantaj tien kien portis ilin la venteto. De la balkonoj pendis floroĉenoj kaj kaĝoj de bluaj lampiroj. La stratoj onde plenis per la vino-levigita civitanaro, kostumita laŭ multege da bizaraj manieroj. Jen estis bargisto de Melanto, jen militisto el la Verda Legio de Valdarjo, jen alia el tempo praa portanta unu el la antikvaj kaskoj. En malgranda malplena loko florĉene ornamita amorantino de la insularo Kaŭĉikŭo dancis la Dancon de la Dek-kvar Silkaj Moviĝoj laŭ flut-muziko. En balkonombro ina barbaro el Orienta Almerio ĉirkaŭbrakis viron nigritan kaj portantan ledan jungilaron kiel Deodando de la arbaro. Ili gajis, tiu ĉi popoloj de

fadiĝanta Tero, febre feliĉaj, ĉar senlima nokto estas ne malproksima, kiam la ruĝa suno finfine flagros kaj fariĝos nigra.

Turĝun fandiĝis inter la homamaso. Ĉe taverno li refreŝigis sin per biskvitoj kaj vino; poste li ekiris al la palaco de Kandajv la Ora.

La palaco superstaris lin, ĉiu fenestro kaj balkono lumanta pro lampoj. Inter la lordoj de la urbo estis bankedado kaj festado. Se Princo Kandajv plenus de drinkaĵo kaj ne singarda, pripensis Turĝun, la tasko povus esti ne tre malfacila. Tamen, enirante brave, li povus rekoniĝi, ĉar li estis nekonata al multaj en Kajin. Do, parolanta la

Mantelon de Ŝtelirado fare de Pandejal, li fadiĝis for de la vido de ĉiuj homoj.

Tra la portiko li glitis, en la grandan salonon, kie la lordoj de Kajin tiel festiĝis kiel la popolamasoj de la stratoj. Turĝun iris serpente tra la ĉielarke kolora amaso el silko, **veluro**, **sateno**, rigardanta la ludadon kun amuzo. Sur teraso kelkaj staris rigardantaj en subplankan kuvon kie paro de kaptitaj Deodandoj, iliaj haŭtoj aspektantaj kia oleigita **gagato**, naĝaĉis kaj esprimis minace; aliaj ĵetis sagetojn al la dis-etendigita korpo de kaptita juna sorĉistino el la Koboldaj Montoj. En duonĉambretoj flore ornamitaj junulinoj ofertis sintezan amon al fajfspirantaj maljunaj viroj, kaj aliloke

aliaj kuŝis stuporigitaj per sonĝo-pulvoroj. Nenie Turĝun trovis Princon Kandajvon. Tra la palaco li vagis, ĉambro post ĉambro, ĝis fine en supera ĉambro li ekvidis la altan or-barban princon, ripozante duonkuŝe kun maskita infan-junulino kiu havis verdajn okulojn kaj harojn pal-verde kolorigitajn.

Ia intuo aŭ eble iu sorĉaĵo tiam avertis Kandajvon kiam Turĝun glitis tra la purpuraj pendaĵoj. Kandajv elsalte stariĝis.

“Iru!” li ordonis la knabinon. “El de la ĉambro rapide! Misfaro moviĝas ie proksime kaj mi devas dispafi ĝin per magio!”

La knabino kuris haste el la ĉambron. La mano de Kandajv kaŝe aliris sian ĝorgon kaj tiris eksteren la kaŝitan amuleton. Sed Turĝun jam ŝirmis sian rigardon per la mano.

Kandajv eldiris potenca sorĉdiron kio malstriktegis spacon liberige de ajna tordeco. Pro tio la sorĉaĵo de Turĝun nuliĝis kaj li fariĝis videbla.

“Turĝun de Mijr ŝteliras tra mia palaco!” diris Kandajv minace.

“Kun morto preta sur miaj lipoj,” diris Turĝun. “Turniĝu for, Kandajv, aŭ mi parolos sorĉdiron kaj traos vin per mia glavo.”

Kandajv faris kvazaŭ obei, sed anstataŭe eldiris la silabojn por ekestigi ĉirkaŭ si la Ĉiopovan Sferon.

“Nun mi vokas la gardistojn, Turĝun,” anoncis Kandajv malestime, “kaj vi estos ĵetata al la Deodandoj en la kuvo.”

Kandajv ne sciis pri la gravurita bando kion Turĝun portis ĉe la pojno, plej potenca runo, ĉirkaŭtenanta kampon solvan de ajna magio. Ankoraŭ ŝirmante sian vidon kontraŭ la amuleto, Turĝun trapaŝis la Sferon. La grandaj bluaj okuloj de Kandajv malfermegis.

“Voku la gardistojn,” diris Turĝun. “Ili trovos vian korpon multe penetrita

per linioj el fajro.”

“*Vian* korpon, Turĝun!” kriis la Princo, parolaĉante la sorĉon. Tuje la brulantaj dratoj de la Bonega Prisma Ŝpruco ekvenis el ĉiuj direktoj al Turĝun. Kandajv rigardis la furiozan pluvon kun lupa rideto, sed lia esprimo rapide ŝanĝiĝis en konsternecon. Je distanco dika kiel fingro for de la haŭto de Turĝun la fajrosagetoj dissolviĝis fariĝante mil nubetoj da fumo.

“Turniĝu por montri la dorson, Kandajv,” Turĝun postulis. “Via magio senutilas kontraŭ la Runo de Lakadelo.” Sed Kandajv prenis paŝon antaŭan celante risorton en la muro.

“Haltiĝu!” kriis Turĝun. “Unu paŝon pluan kaj la Ŝpruco disigos vin miloble!”

Kandajv haltiĝis abrupte. En senhelpa kolerego li turnis por montri la dorson, kaj Turĝun, paŝante antaŭen rapide, etendis manon super la kolo de Kandajv, ektenis la amuleton kaj leve liberigis ĝin. Ĝi rampis en lia mano kaj tra la fingroj elpasiĝis videtaĵo blua. Konfuzecon skuis al li la cerbon, kaj dum momenteto li aŭdis murmuron de avidaj voĉoj... Lia vidkampo klariĝis. Li paŝis malantaŭen de Kandajv, puŝante la amuleton en sian zonsakon. Kandajv demandis, “Ĉu mi nun rajtas turniĝi sekure?”

“Kiam ajn vi volas,” respondis

Turĝun, fermante sian zonsakon. Kandajv, vidante ke Turĝun okupiĝis, paŝis glate al la muro kaj metis sian manon sur risorton.

“Turĝun,” li diris, “vi estas perdita. Antaŭ ol vi povos eldiri silabon, mi malfermos la plankon kaj faligos vin en granda malhela distanco. Ĉu viaj sorĉdiroj povas helpi je tio?”

Turĝun haltiĝis mez-move, fiksis siajn okulojn sur la ruĝa kaj ora vizaĝo de Kandajv. Poste li mallevis siajn okulojn ŝafe. “Ho, Kandajv,” li diris zorge, “vi min trompis. Se mi redonus al vi la amuleton, ĉu mi rajtus foriri libera?”

“Ĵetu la amuleton al miaj piedoj,”

diris Kandajv, memgratulante. “Ankaŭ la Runon de Lakadelo. Poste mi decidis pri tio, kian kompaton mi al vi donu.”

“Eĉ la Runo?” Turĝun demandis, ŝajnigante tonon kompatopetan al sia voĉo.

“Aŭ vian vivon.”

Turĝun etendis en sian zonsakon kaj ektenis la kristalon donatan al li fare de Pandelumo. Li elprenis ĝin kaj tenis ĝin kontraŭ la **pomelo** de sia glavo.

“Ho, Kandajv,” li diris, “Mi distingis vian trompon. Vi nur volas timigi min al venkiĝo. Mi defias vin!”

Kandajv ŝultrolevis. “Mortu do.” Li premis la risorton. La planko ekis malferme, kaj Turĝun malaperis en la truegon. Sed kiam Kandajv kuregis malsupren por proprietiĝi al si la korpon de Turĝun, li trovis nenian spuron, kaj li spezis la reston de la nokto en kolero, cerbumante malbonhumore super vino.



Turĝun trovis sin en la cirkla ĉambro de la domo de Pandalumo. La multkoloraj lumoj de Embeljono fluadis tra la ĉiel-fenestroj sur lian ŝultron — safirbluo, la flavo de kalenduloj, sanga ruĝo. Estis silento tra la domo. Turĝun moviĝis for de la runo sur la planko, ekrigardante konsternite al la pordo,

timante kontraŭ tio, ke Pandlumo, senatente pri lia ĉeesto, eniru la ĉambron.

“Pandelumo!” li vokis. “Mi estas reveninta!”

Estis nenia respondo. Profunda kvieto tenis la domon. Turĝun sopiris al la malfermita aero tie kie laodoro de sorĉado malpli fortus. Li alrigardis la pordojn; unu kondukis al la enireja halo, la alia al loko de li nekonata. La pordo ĉe la dekstro devas konduki ekstere; li kuŝigis manon sur la [klink/o](#) por tiri ĝin malferma. Sed li paŭzis. Supozu, ke li miskomprenis, kaj la formo de Pandelumo montriĝis? Ĉu estus pli saĝe, atendi ĉi tie?

Solvo leviĝis en lia menso. Lia dorso kontraŭ la pordo, li svinge malfermis ĝin.

“Pandelumo!” li vokis

Mola *intermita* sono atingis liajn orelojn de malantaŭe, kaj li ŝajne aŭdis laboran ekspiron. Subite timigita, Turĝun paŝis refoje en la cirklan ĉambron kaj fermis la pordon.

Li rezignis sin al pacienco kaj sidiĝis sur la planko.

Anhela krio elvenis la apudan ĉambron. Turĝun eksalte stariĝis.

“Turĝun? Ĉu vi estas tie?”

“Jes; Mi estas ĵus reveninta kun la amuleto.”

“Faru la jenan rapide,” anhelis la voĉo. “Gardante la vidon, pendigu la amuleton de via kolo kaj eniru.”

Turĝun, stimulita per la urĝeco de la voĉo, fermis la okulojn kaj aranĝis la amuleton sur sia brusto. Li blindiris porden kaj svingis ĝin malfermege.

Silento el ŝokita intenseco daŭris momenton; poste okazis terure lamenta kriaĉo, tiom sovaĝa kaj demonia ke la cerbo de Turĝun vibradis. Fortegaj flugiloj bate flagrigis la aeron, poste estis ŝuŝo kaj metala skapsono. Poste, inter malklara muĝado, glacia vento mordis al

Turĝun la vizaĝon. Posta ŝuŝo — kaj ĉio kvietis.

“Mi danke ŝuldas al vi,” diris la kalma voĉo de Pandelumo. “Malofte okazis ke mi estis spertanta tian egan konsternon, kaj sen via helpo eblas ke mi ne estus forpelinta tiun estulon el infero.”

Mano levis la amuleton de sur la kolo de Turĝun. Post momenton silentan la voĉo Pandlumo sonis refoje trans distanco.

“Vi rajtas malfermi la okulojn.”

Turĝun faris. Li estis en la laborĉambro de Pandelumo; inter multo alia, li vidis basenojn tiajn kiaj la propraj.

“Mi vin ne dankos,” diris Pandelumo. “Sed por ke deca simetrio estu bontenata, mi faros servon repage por servo. Mi ne nur gvidos viajn manojn dum vi laboros inter la basenoj, sed plue mi instruos al vi pri kromaj afero valoraj.”

Laŭ ĉi maniero eniris Turĝun en sian metilernantan periodon sub Pandelumo. Tutetage kaj ĝis malfrue en la opaleskajn noktojn li laboris sube de la nevidata instruo fare de Pandelumo. Li lernis la sekreton de renovigita juneco, multajn sorĉojn de la prauloj, kaj strangan abstraktan sciencaĵon kion Pandelumo nomis “Matematiko”.

“Interne de tiu ĉi instrumento,” diris

Pandelumo, “loĝas la Universo. Pasiva en si mem kaj ne el sorĉaĵo, ĝi klarigas ĉiun problemon, ĉiun fazon de ekzisteco, ĉiujn sekretojn de tempo kaj spaco. Viaj sorĉdiroj kaj runoj estas konstruitaj sur ĝia potenco kaj ordigitaj laŭ granda **mozaiko** de magio. La desegno de tiu ĉi mozaiko ni ne povas konjekti; nia priscio estas parkera, **empiria**, arbitra. Fandegal ekvidis la rilatecon kaj tiel povis formuli multajn el la sorĉoj kiuj portas lian nomon. Mi strebadis tra la epokoj por rompi la nebulan vido-fenestron, sed ĝis nun mia enketado malsukcesis. Kiu malkovros la ordigilon, tiu komprenos ĉiom da sorĉismo kaj estos potenciulo preter ajna imagkapablo.”

Do Turĝun aplikis sin al la studado kaj lernis multajn el la pli simplaj rutinoj.

“En tio mi trovas mirindan belecon,” li diris al Pandelumo. “Jen estas neniascienco, anstataŭe jen arto, kie ekvacioj disfalas en elementojn tiel kiel malkomponentaj konsonancoj, kaj en kio ĉiam restas simetrieco aŭ specifa aŭ multparta, sed ĉiam el kristala sereneco.”

Malgraŭ tiuj aliaj studoj, Turĝun okupis sin plejpartatempe ĉe la basenoj, kaj sub la gvidado de Pandelumo akiris la **majstrecon** kion li serĉis. Por distri sin li formis knabinon el ekzotika desegno, kiun li nomis Floriel. La harojn de la knabino kiun li trovis kun Kandajvon je la nokto de la festivalo li tenis fikse en sia

menso, kaj li donis al sia kreitulinino palajn verdajn harojn. Ŝi havis haŭton kreme brunetan kaj larĝajn songaspektajn okulojn. Turĝun tiam deliris per feliĉo kiam li prenis ŝin malseka kaj perfekta el la baseno. Ŝi lernis rapide kaj baldaŭ sciis kiel paroli kun Turĝun. Ŝi kutime emis al revo kaj bonsopiro, zorgante pri malmulte pli ol vagadi inter la floroj de la herbejo, aŭ sidi kviete apud la rivero; tamen ŝi estis plaĉa estulo kaj ŝiaj manieroj amuzis Turĝunon.

Sed iun tagon la nigre harara T'sajs venis preterpase sur sia ĉevalo, ŝtalokula, tranĉanta svinge al floroj per sia glavo. La senkulpa Floriel pretervadis kaj T'sajs, kriante "Verd-okula virino — via

aspekto hororas al mi, jen morto por vi!” tranĉe faligis ŝin tiel kiel ŝi estis farinta la florojn survojajn.

Turĝun, aŭdinta la hufojn, venis el la laborĉambro ĝustatempe por vidi la glavsvingadon. Li paliĝis pro koleroj kaj sorĉdiro el tordiga **turmento** leviĝis al siaj lipoj. Tiame T’sajs lin alrigardis kaj malbenis, kaj en la pala vizaĝo kaj la malhelaj okuloj li vidis ŝian mizerecon kaj la spiriton kiu kaŭzis ŝin defii sian sorton kaj tenadi al sia vivo. Multaj emocioj batalis en li, sed je la fino li permesis al T’sajs, ke ŝi rajdu for. Li entombigis Florielon apud la riverbordo kaj provis forgesi ŝin per intensa studado.

Kelkajn tagojn poste li levis la

kapon for de la laboro.

“Pandelumo! Ĉu vi proksimas?”

“Kion vi bezonas, Turĝun?”

“Vi menciis, ke kiam vi kreis T’sajson, eraraĵo tordetis ŝian cerbon. Nun mi volas krei iun al ŝi similan, el la sama inteneseco, tamen bonorda je menso kaj spirito.”

“Laŭ via volo,” respondis Pandelumo neinteresite, kaj donis al Turĝun la ordoplanon.

Do Turĝun konstruis fratinon je T’sajs, kaj tagon post tago rigardis la saman **sveltan** korpon, kaj la samajn

fierajn aspektojn formiĝi.

Kiam venis ŝia tempo, kaj ŝi sidiĝis en sia baseno, okuloj brilante kun ĝoja vivo, Turĝun estis senspira en sia hasto por helpi ŝin elveni.

Ŝi staris antaŭ li malseka kaj nuda, ĝemelino je T'sajs, sed tiel kiel la vizaĝo de T'sajs estis striktigita per malamo, jene loĝis paco kaj feliĉemo; tie kie la okuloj de T'sajs lumis per furiozo, jene montriĝis la steloj de imagkapablo.

Turĝun staradis miriganta pri la perfekteco de sia propra kreaĵo. “Via nomo estos T'sajn,” diris li, “kaj jam mi scias ke vi estos parto de mia vivo.”

Li forlasis ĉion alian por instrui al T'sajn, kaj ŝi lernadis je mirinda rapido.

“Post iome ni reiros al Tero,” li diris al ŝi, “al mia hejmo apud granda rivero en la verda lando Askolajs.”

“Ĉu la ĉielo de Tero plenas je koloroj?” ŝi demandis.

“Ne,” li respondis. “La ĉielo de Tero estas el senlime profunda malhela bluo, kaj praa ruĝa suno iras trans la ĉielo. Kiam noktiĝas tiam aperas la steloj laŭ ordoj pri kiuj mi vin instruos. Embeljono belas, sed Tero largas, kaj la horizontoj etendiĝas malproksimen kondukanta al mistero. Tiom baldaŭe kiom permesas Pandelumo, ni reiros al Tero.”

T'sajn ŝategis naĝi en la rivero, kaj foje Turĝun venis malsupren por ŝpruci ŝin kaj ĵeteti ŝtonojn en la akvon dum li revis. Kontraŭ T'sajs li estis ŝin avertinta, kaj ŝi promesis esti singarda.

Sed iun tagon, dum Turĝun atentis preparojn por la foriro, ŝi vagis malproksime for tra la kampoj, atenta nur pri la koloroj montriĝantaj en la ĉielo, pri la majesto de la altaj malklaraj arboj, pri la ŝanĝiĝantaj floroj je siaj piedoj; ŝi alrigardis la mondon kun tia miro kio eblas nur al tiuj ĵus elvenintaj la basenon. Trans kelkaj malaltaj montetoj ŝi vagis, kaj tra malhela arbaro kie ŝi trovis malvarman rivereton. Ŝi trinkis kaj iris sencele laŭ la bordo, kaj tiel aliris etan

maldensejon.

Ĉar la pordo malfermis, T'sajn enrigardis por scii tion, kiu povis loĝi ĉi tie. Sed la domo estis senhoma, kaj la nuraj mebloj estis neta litaĵo el herboj, tablo kun korbo da nuksoj, breto kun kelkaj aĵoj el ligno kaj stan-plumba aloj.

T'sajn turniĝis por foriri sian vojon, sed ĝuste tiam ŝi aŭdis la malbonaŭguran frapadon de hufoj, alsvingante proksimen tiel kiel sorto. La nigra ĉevalo glitis haltiĝe antaŭ ŝi. T'sajn retropaŝis velke en la pordan aperturon, ĉiuj avertoj de Turĝun revenantaj en sia menso. Sed T'sajs jam estis malsupreniĝinta de sur sia ĉevalo kaj alvenadis tenante preta sian glavon. Kiam ŝi levis ĝin por ataki, iliajn

okulojn interrigardis, kaj T'sajs haltiĝis pro miro.

Estis vidaĵo por ekcitiganta la cerbon: la belaj ĝemelulinoj, portantaj la samajn blankajn talio-altajn pantalonojn, kun la samaj intensaj okuloj kaj neprizorgitaj hararoj, unu portanta sur sia vizaĝo malamon pri ĉiu atomo de la universo, sur la alia ĝojan entuziasmon.

T'sajs trovis sian voĉon.

“Kiel eblas, sorĉistino? Vi portas mian aspekton, sed vi ne estas mi. Aŭ ĉu okazis, ke bonsorta freneziĝo venis fine al mi por malheligi al mi la vidadon de la mondo?”

T'sajn respondis kapnee. “Mi estas T'sajn. Vi estas mia ĝemelino, T'sajs, mia fratino. Pro tio mi devas vin ami kaj vi ami min.”

“Amu? Mi amas nenion! Mi vin mortigos kaj tiel faru la mondon pli bona je mezuro de unu malbono malplia.” Ŝi levis la glavon refoje.

“Ne!” kriis T'sajn en korŝira turmentiĝo. “Kial vi volas min vundi. Mi estas farinta nenian malbonon!”

“Vi faras malbonon per ekzistado, vi ofendas min venante por moki mian propran malbelegan formaĵon.”

T'sajn ridis. “Malbelega? Ne. Mi

belas, ĉar Turĝun diras tiel. Sekve, vi belas ankaŭ.”

La vizaĝo de T’sajs’ estis tiel kiel marmoro.

“Vi min priŝercas.”

“Neniam. Vi estas ja tre bela.”

T’sajs lasis fali ĝisgrunde la pinton de sia glavo. Ŝia vizaĝo malstriktiĝis je pensado.

“Belo! Kio estas belo? Ĉu povas esti, ke mi blindas, ke diablo tordas al mi la vidon? Diru, kiel oni povas vidi belon?”

“Mi ne scias,” diris T’sajn. “Ŝajnas al mi tre simple. Ĉu ne estas bela la ludado de koloroj trans la ĉielo?”

T’sajs rigardis supren en miro. “La agacaj brilegoj? Ili aŭ koloras aŭ tedigas, je ambaŭ kazoj malŝategindas.”

“Vidu kiel delikatas la floroj, tiel fragilaj kaj ĉarmaj.”

“Ili estas parazitoj, ili odoras naŭzige.”

T’sajn konfuziĝis. “Mi ne scias kiel ekspliki belecon. Ŝajne, vi trovas ĝojon je nenio. Ĉu nenio ajn plaĉigas vin?”

“Nur mortigado kaj detruado. Tiuj ĉi

do, devas beli”

T’sajn malridetis. “Mi nomus tiujn ĉi konceptojn malbonegaj.”

“Ĉu vi kredas tiel?”

“Mi certas tiel.”

T’sajs konsideris. “Kiel mi sciu kiel agi? Antaŭe mi certis, kaj nun vi informas, ke mi faras malbonon!”

T’sajn ŝultrolevis. “Mi jam vivis nelonge, kaj mi ne saĝas. Tamen mi scias, ke ĉiu rajtas plu vivi. Turĝun povus ekspliki al vi facile.”

“Kiu estas Turĝun?” demandis

T'sajs.

“Li estas bonega viro,” respondis T'sajn, “kaj mi amas lin multe. Baldaŭ ni iros al Tero, kie la ĉielo estas vasta kaj profunda kaj el koloro malhele blua.”

“Tero... Se mi estus irinta al Tero, ĉu povus mi ankaŭ trovi belon kaj amon?”

“Povus tiel esti, ĉar vi havas cerbon por kompreni belon, kaj belecon propran por allogi amon.”

“Tial mi mortigos ne plu, sendepende de tio, kian ajn malbonecon mi vidas. Mi petos Pandelumon, ke li sendu min al Tero.”

T'sajn paŝis antaŭen, metis siajn brakojn ĉirkaŭ T'sajson, kaj ŝin kisis.

La vizaĝo de T'sajs rigidiĝis. Disŝiru, **ponardu**, mordu, diris al ŝi la cerbo, sed pli profunda ondo svelis el de sia fluanta sango, de ĉiu kelo de ŝia korpo, por sufuzi ŝin per subita burĝono de plezuro. Ŝi ridetis.

“Tial do — mi amas vin, fratino mia. Mi mortigos ne plu, kaj mi trovos kaj konos belon ĉe Tero aŭ mortos.”

T'sajs sursidiĝis sian ĉevalon kaj ekiris cele je Tero, serĉonte amon kaj belon.

T'sajn staris en la porda aperturo,

rigardante sian fratinon rajdi for tra la koloroj. Malantaŭ ŝi aŭdiĝis kriego, kaj Turĝun alproksimiĝis.

“Vi estas fratino mia kaj mi vin amos.”

“T’sajn! Ĉu tiu frenezigita megero estas vin vundinta?” Li ne atendis aŭdi respondon. “Sufiĉe! Mi ŝin mortigos per sorĉdiro, por ke ŝi ne plu atrudi doloron.”

Li turniĝis por elvoki teruran sorĉdiron el fajro, sed T’sajn metis sian manon al lia buŝo.

“Ne, Turĝun, vi maldevas. Ŝi ĵuris, ke ŝi mortigos ne plu. Ŝi iras al Tero serĉante pri tio, kion ŝi ne povas trovi en

Embeljono.”

Do Turĝun kaj T’sajn rigardis T’sajson malaperi trans la multklora herbejo.

“Turĝun,” diris T’sajn.

“Kio estas via deziro?”

“Kiam ni alvenos Teron, ĉu vi trovu por mi nigran ĉevalon similan kiel tiu de T’sajs?”

“Certe,” diris Turĝun, ridanta, dum ili komencis reiri al la domo de Pandelumo.



T'sajs

T'sajs venis rajdanta el arbareto. Ŝi haltigis sian ĉevalon ĉe la rando kvazaŭ sendecide, kaj sidis rigardante trans la ondete rebrilanta herbejo al la rivero... Ŝi movis la genuojn kaj la ĉevalo antaŭeniris trans la herbo.

Ŝi rajdis profunde pensanta, kaj superkape la ĉielo ondetis kaj kruc-ondetis, tiel kiel vasta etendejo el vente blovita akvo, en grandegaj ombroj de horizonto ĝis horizonto. Lumo de supere, ŝanĝita kaj **refraktita**, inundis la landon per mil koloroj, kaj pro tio, dum T'sajs

rajdis, unue verda lumstrio ekbrilis sur ŝi, poste profunde blua, kaj topaza kaj ruben-ruĝa, kaj la pejzaĝo ŝanĝiĝis laŭ similaj tintiĝoj kaj subtileco.

T'sajs fermis la okulojn kontraŭ la flanken-moviĝantaj lumoj. Ili gratis al ŝi la nervojn, konfuzis ŝian vidon. La ruĝo brilegis dolore, la verdo subpremis sufoke, la bluoj kaj purpuroj sugestis pri misteroj preter-kompreneblaj. Estis kvazaŭ la tuta universo desegniĝis specife laŭ plano por ŝin agaci per abrupteco, por ŝin provoki al kolera furiozo... Preterflugis papilio kies flugiloj montris desegnaĵon tian kia altpreza tapiŝo, kaj T'sajs gestis kvazaŭ ŝi ĝin atakus per sia rapiro. Ŝi sindetenis per forta sinregio; ĉar

T'sajs estis el pasia naturo kaj ne kutimis je sindeteno. Ŝi alrigardis la florojn sub la piedoj de sia ĉevalo — palaj **asteroj**, blusonoriloj, **ampeplosoj**, oranĝaj sunŝprucaĵoj. Ne plu ŝi ilin dispremus en pulpecon, ne plu ilin fortirus dis de la radikoj. Sugestiĝis al ŝi ke la difekto restis ne en la universo sed en ŝi mem. Entenanta sian vastan abomenon pri la papilio, floroj kaj ŝanĝiĝantaj lumoj de la ĉielo, ŝi progresis trans la herbejo.

Muro el malhelaj arboj leviĝis super ŝi, kaj poste venis aretoj da **junkoj** kaj la briletado de akvo, ĉio ŝanĝiĝanta je tinto laŭ la ŝanĝiĝoj de la ĉiela lumo. Ŝi turniĝis kaj sekvis la riveran randon celante la longan malaltan domegon.

Ŝi elseliĝis, marŝis malrapide al la pordo el nigra fumeca ligno, kio montris bildon de **sardona** vizaĝo. Ŝi tiris ĝian langon kaj sonorilo aŭdiĝis de interene.

Estis nenia respondo.

“Pandelumo!” ŝi vokis.

Iom poste estis malklara respondo: “Envenu.”

Ŝi puŝis malferme la pordon kaj envenis alt-plafonan ĉambron, senmeblan krom pro remburita tableto, malhela tapiŝo.

“Kio estas via deziro?” La voĉo, mola kaj sonanta pri senlima melankolio,

venis de malantaŭ la muro.

“Pandelumo, hodiaŭ mi lernis, ke mortigo malbonegas, kaj plue ke trompas min la okuloj, ankaŭ ke belo tie ekzistas kie mi vidas nur agace fortan lumon kaj abomenindajn formojn.”

Dum ioma tempo Pandelumo lasis silenton regi; poste la dampita voĉo aŭdiĝis, respondanta al la specifa peto pri scio.

“Tio, plejparte, pravas. Vivuloj, se nenio krome, rajtas je vivo. Ĝi estas ties sola valorega posedaĵo, kaj la ŝtelo de vivo estas malbonega ŝtelo... Koncerne pri la alia, la kulpo troveblas ne en vi mem. Belo ekzistas ĉie por esti vidata de

ĉiuj — de ĉiuj krom vi. Pro tio mi sentas bedaŭron, ĉar mi kreis vin. Mi konstruis vian komenco-ĉelon; mi ekpemis la fadenojn de la vivo per desegno-plano por viaj korpo kaj cerbo. Kaj malgraŭ miaj lertoj, mi iel eraris, tiel ke je via elgrimpo de la baseno, mi trovis, ke mi estis **muldinta** difekton je via cerbo; ke vi vidis malbelon en belo, malbonon en bono. Veran malbelon, veran malbonon, vi neniam estis vidanta, ĉar en Emblejono ekzistas nenio aŭ abomeninda aŭ putra... Se tiel malbonŝance okazus, ke vi renkontu ĉi tiajn aferojn, mi timus pri via cerbo.”

“Ĉu vi ne povus ripari min?” kriis T’sajs. “Vi estas magiisto. Ĉu mi devas

travivi la vivon blinda pri ĝojo?”

Voĉa ombro de suspiro penetris la muron.

“Mi estas ja magiisto, kun lertoj pri ĉiuj sorĉaĵoj jam elpensitaj, la komplikecoj de runoj, elkantaĵoj, desegnoj, ekzorcoj, talismanoj. Mi estas Majstra Matematikisto, la unua post Fandea, tamen mi povas fari nenion al via cerbo sen detruo vian inteligenton, vian personecon, vian animon — ĉar mi estas nenia dio. Eblas ke dio, per sia volo, povas ekzistigi aferojn; mi devas apogi min per magio, la sorĉdiroj kiuj vibrigas kaj tordas spacon.”

Espero fadis en la okuloj de T'sajs.

“Mi volas iri al Tero,” ŝi diris post nelonge. “La ĉielo de Tero senŝanĝe bluas, kaj ruĝa suno moviĝas super la horizontoj. Mi tediĝas pri Embeljono kie estas nenia voĉo krom la via.”

“Tero,” pripensis Pandelumo. “Malhela loko, maljunega preter kompreno. Iam antaŭe altforma mondo el nubotuŝaj montoj kaj brilaj riveroj, kaj la suno estis blanke brulanta pilko. Epokoj da pluvo kaj vento estas alfrapintaj kaj rondigintaj la graniton, kaj la suno nun estas febla kaj ruĝa. Kontinentoj estas sinkintaj kaj leviĝintaj. Miliono da urboj jam levis turojn, jam disfalis en polvon. Kie loĝis la malnovaj gentoj, kelkmiloj da strangaj estuloj nun vivas. Ekzistas

abomenindaĵoj sur Tero, la malbonon distilitan per tempo... Tero estas mortanta kaj spertas sian krepuskon... ” li paŭzis.

T’sajs diris dubeme: “Tamen mi aŭdis, ke Tero estas loko de belo, kaj mi volus koni belon, eĉ kontraŭ mia morto.”

“Kiel vi tiam rekonu belon, kiam vi vidos ĝin?”

“Ĉiuj homoj rekonas belon... Ĉu mi ne estas homa?”

“Certe.”

“Do mi trovos belon, kaj eble eĉ — ” T’sajs balbutis je la vorto, tiom fremda

ĝi estis je ŝia menso, tamen tiom plena de maltrankvila prisignifo.

Pandelumo silentis. Fine:

“Vi rajtas iri, se tion vi volas. Mi vin helpos kiel eble mi povas. Mi donos al vi runojn por gardi vin kontraŭ magio; mi enfrapos vivecon al via glavo; kaj mi donos al vi konsilon, kio estas jene: Emu singardi kontraŭ viroj, pro tio, ke viro elŝtelas belon por satigi sian volupton. Permesu intimecon al neniuj... Mi donos al vi sakon da juveloj, kio estas riĉaĵo ĉe Tero. Per tiuj ĉi vi povos akiri multon. Tamen, refoje, montru ilin nenie, ĉar certaj viroj vole mortigus kontraŭ kupra monero.”

Peza silento sekvis, ia pezaĵo ekestis for de la aero.

“Pandelumo,” vokis T’sajs mole. Ne estis respondo.

Post momenton Pandelumo revenis, kaj la sento pri lia ĉeesto atingis ŝian menson.

“Post momento,” li diris, “vi povos eniri ĉi tiun ĉambron.”

T’sajs atendis iomete; poste, kiel ŝi instruiĝis, eniris la postan ĉambron.

“Sur la benko je maldekstre,” venis la voĉo de Pandelumo, “vi trovos amuleton kaj saketon da juveloj. Fiksu

tiun ĉi amuleton al vi ĉe la brako; ĝi reflektos magion malice senditan kontraŭ tiu kiu estas ĝin eldirinta. Jen plej fortega runo; gardu ĝin bone.”

T’sajs obeis, kaj ligis la juvelojn interne de sia talia **skarpo**.

“Kuŝigu vian glavon sur tiun benkon, staru sur la runo en la planko kaj firme fermu la okulojn. Mi devas eniri la ĉambron. Mi ŝarĝas vin, ke vi ne provu vidi min — ĉar estas teruraj konsekvencoj.”

T’sajs demetis sian glavon, staris sur la metala runo, ŝlosis la okulojn. Ŝi aŭdis malrapidan paŝon, aŭdis la sonoron de metalo, kaj poste altan intensan grat-

fajfadon, malrapide elmortantan.

“Via glavo vivas,” diris Pandelumo, kaj lia voĉo sonis strange laŭte, aŭdita de tiom proksime. “Ĝi mortigos viajn malamikojn kun inteligenteco. Etendu la manon kaj prenu ĝin.”

T’sajs eningigis sian maldikan rapiron, nun varmeta kaj tremanta.

“Kien sur Tero volos vi iri?” demandis Pandelumo. “Al la lando de homoj, aŭ ĉe la grandaj ruinaj sovaĝejoj?”

“Al Askolajs,” diris T’sajs, ĉar tiu kiu alparolis ŝin pri belo menciis tiun ĉi landon.

“Laŭ via deziro,” diris Pandelumo.
“Nun atentu! Se iam ajn vi volos reveni
al Embeljono — ”

“Ne,” diris T’sajs. “Mi preferos
morti.”

“Plaĉu vin mem je tiu afero.”

T’sajs restis silenta.

“Nun mi tuŝos vin. Vi sentos
kapturŝanĝon dum momento — kaj poste
vi malfermos viajn okulojn al Tero. Estas
preskaŭ nokto, kaj teruraj estuloj vagadas
la mallumon. Do serĉu ŝirmejon rapide.”

En stato alte ekscitita T’sajs sentis la
tuŝon de Pandelumo. En ŝia cerbo okazis

Ŝanceliĝo, rapida nepensebla flugo...
Stranga humo ekestis sub ŝiaj piedoj, ĉe
ŝia vizaĝo ĉeestis stranga kun pli akra
gusto. Ŝi malfermis la okulojn.

La pejzaĝo estis stranga kaj nova.
Jen malhele blua ĉielo, praa suno. Ŝi
staris en herbejo, ĉirkaŭita de altaj morne
malhelaj arboj. Ĉi tiuj arboj malsamis je
la kalmaj gigantoj de Embeljono; ĉi tiuj
estis densaj kaj funebraj, kaj la ombroj
estis enigmaj. Nenio videblis, nenio pri
Tero estis akra aŭ raspa — la grundo, la
arboj, la roka breto staranta el la herbejo;
ĉiuj ĉi jam elfrotiĝis, rondiĝis, aĝiĝis,
moliĝis. La lumo de la suno, kvankam
malhela, estis riĉa, kaj enestigis je ĉiuj
objektoj de la lando, la ŝtonoj, la rokoj, la

arboj, la kvietaj herboj de la herbejo, per senco pri scioj kaj antikva rememoro.

Cent paŝojn malproksime staris muska ruino de jam delonge disfalinta kastelo. La ŝtonoj jam nigriĝis pro likenoj, fumo, aĝo; herbo kreskis malorde tra la rubaĵoj — la tuto estanta bizara vidaĵo en la longa lumo de sunsubiro.

T'sajs malrapide aliris. Kelkaj el la muroj ankoraŭ restis, ŝtono sur vetere elfrotita ŝtono, la mortero jam delonge elverŝita. Kun miro ŝi vagis ĉirkaŭ granda statuo, mucide putra, rompiĝeta, fendita, preskaŭ tute subteriĝinta; cerbumis momenton pri la signoj gavuritaj en la bazo. Surprizokule ŝi rigardegis al tio kio ankoraŭ restis de la vizaĝo — kruelaj

okuloj, aĉe ridetanta buŝo, nazo rompita for. T'sajs tremblis iomete. Trovindis nenio por ŝi ĉi tie; ŝi turniĝis por foriri.

Rido, **altpiĉa**, ĝoja, eksoniĝis trans la maldensejo. T'sajs, atenta pri la avertoj de Pandelumo, atendis en malhela kavejo. Movado ekvideblis inter la arboj; nun viro kaj virino venis ŝanceliĝe en la fadiĝantan sunlumon; poste venis juna viro paŝanta senpeze kiel aero, kantanta kaj fajfanta. Li tenis malpezan glavon, kion li uzis por instigi antaŭen la duopon, kiuj estis binditaj.

Ili haltis antaŭ la ruinoj, tuj proksime je T'sajs, kaj ŝi povis vidi la vizaĝojn. La bindita viro estis maldikvizaĝa aĉulo kun malorda ruĝa barbo kaj

okuloj rapide ĉie-serĉemaj kaj senesperaj; la virino estis malalta kaj diketa. Ilia kaptisto estis Liejn la Vojiranto. Liaj brunaj haroj ondete buklis, liaj aspektoj moviĝis kun ĉarmo kaj facila fleksebleco. Li havis ore bluetajn okulojn, grandajn kaj belajn, neniam senmovajn. Li portis ruĝajn ledajn ŝuojn kun kurbaj suproj, ensemblon el ruĝo kaj verdo, verdan mantelon, kaj pintan ĉapelon kun ruĝa plumo.

T'sajs rigardis sen kompreno. La tri egale abomenindis, estis el glueca sango, ruĝa pulpo, interna malpuraĵo. Liejn ŝajnis iomete malpli malnobla — li estis pli vigla, pli eleganta. Kaj T'sajs rigardis kun malmulta intereso.

Liejn lerte ĵetis tri ŝnur-cirklojn ĉirkaŭ la maleolojn de viro kaj virino kaj puŝis ilin tiel, ke ili falis inter la silikoj. La viro ĝemis mallaŭte, la virino komencis plore gemetadi.

Liejn faris gaje svingan geston per sia ĉapelo kaj risorte ekiris al la ruinoj. Ĉe proksimeco malpli ol dudek futoj for de T'sajs li flanken-glitigis ŝtonon inter la antikvaj pavimeroj, elprenis tindron kaj silikon, kaj ekbruligis fajron. El sia poŝo li prenis pecon de viando, kion li tostis kaj manĝis elegante, suĉante la fingrojn.

Nenia vorto diriĝis. Liejn fine stariĝis, streĉis, kaj ekrigardis la ĉielon. La suno estis subeniranta la malhelan muron el arboj, kaj bluaj ombroj jam

plenigis la maldensejon.

“Pri la aferoj,” kriis Liejn. Lia voĉo estis akra kaj klara kiel la voko de fluto. “Unue,” kaj li faris solenan svingetan geston, “Mi devas certigi ke niaj malkovroj pezu per sobreco kaj vero.”

Li ŝtupe reeniris sian sub-paviman kaŝfuĝejon kaj elprenis kvar dikajn stangojn. Li kuŝigis unu el tiuj trans la femuroj de la viro, pasigis la duan tra la interfemuro de la gamboj de sia kaptinto tiel, ke per facila puŝeto li povu premi vunde malsupren ĉe la femuroj kaj supren ĉe la malsupra dorso. Li testis sian aparaton kaj ridis virkok-bleke kiam la viro kriegis. Li ĝustigis similan aferon al la virino.

T'sajs rigardadis sen kompreno. Evidente la juna viro preparis kaŭzi doloron al siaj kaptitoj. Ĉu tiel estas kutimo ĉe Tero? Sed kiel ŝi juĝu, ŝi kiu sciis nenion pri bono kaj malbono?

“Liejn! Liejn!” kriis la viro. “Ŝparu mian edzinon! Ŝi scias nenion! Ŝparu ŝin, kaj vi rajtos havi ĉiom da miaj posedaĵoj, kaj mi servos vin dum tute la vivo!”

“Ho!” ridis Liejn, kaj la plumo en lia ĉapelo tremis. “Dank’ al vi, dankon pro via oferto — Sed Liejn deziras nenian faskojn da ligno, neniujn **kaŭlorapojn**. Liejn ŝatas silkon kaj oron, la brilon de ponardoj, la sonojn kiujn faras knabino dum amoro. Do dankon — sed mi serĉas la fraton de via edzino, kaj kiam via

edzino stranguliĝos kaj plorkriegos, tiam vi informos min pri kie li fuĝas.”

Je T'sajs la sceno komencis porti signifon. La du kaptitoj kaŝas informon kion la juna viro deziras; sekve li devus dolorigi ilin ĝis, pro senespero, ili agos laŭ lia postulo. Lerte ila metodo, io kian ŝi mem apenaŭ pensus.

“Nun,” diris Liejn, “mi devas certigi, ke oni ne lerte miksu mensogojn inter la veroj. Vi komprenus,” li konfidis, “ke kiam oni turmentiĝas, oni tro okupiĝas per doloro por povi inventi, por povi desegni — kaj pro tio parolas nenion krom precizeco.” Li ekprenis brulantan tigon el la fajro, puŝis ĝin kojne inter la binditaj maleoloj de la viro, kaj tuj

komencis funkcigi turmento-stangon al la virino.

“Mi scias nenion, Liejn!” balbutis la viro. “Mi scias nenion — ho, vere!”

Liejn movis stari iomete for malplaĉita. La virino jam svenis. Li ekprenis la brulaĵon for de la viro kaj ĵetis ĝin iritite en la fajron.

“Kiel agace!” li diris, sed baldaŭ lia bonanimo ree memprezentis sin. “Ho nu, ni havas multan tempon.” Li frotis al si la pintan mentonon.

“Eblas, ke vi parolas la veron,” li supozis. “Eblas, ke via bona edzino estos, preter ĉio, la informanto.” Li rekonsciigis

ŝin per polmobatoj kaj fortodoraĵo tenita sub ŝia nazo. Ŝi rigardis lin duonkonscie, ŝia vizaĝo tordesprima kaj ŝvela.

“Atentu,” diris Liejn. “Mi eniras la duan **fazon** de la demando. Mi rezonas, mi pensas, mi **teoriadas**. Nu, eble la edzo ne scias pri tio, kien forkuris tiu kiun mi serĉas, eble la edzino sola scias.”

La buŝo de la virino malfermiĝis iomete. “Li estas mia frato — kompaton — ”

“Ha! Do vi ja scias!” kriis Liejn kun ĝojego, kaj marŝis tien kaj reen antaŭ la fajro. “Ho, vi scias! Ni komencu denove la esploron. Nu, atendu. Per tiu ĉi sango mi **gelatenigus** la gambojn de via viro,

kaj puŝus lian spinon supren tra lia stomako — krom se vi parolus.”

Li komencis sian taskon.

“Diru nenion — anhelis la viro, kaj ekmalatentis pro doloro. La virino blasfemis, ploregis, petegis. Fine: “Mi diras, mi diros al vi ĉion!” ŝi kriis. “Deluro jam iris al Efredon!”

Liejn ĉesis sian strebadon. “Efredo. Do. En la Lando de la Falanta Muro.” Li faltigis la lipojn. “Povas esti prave. Sed mi malkredas. Vi diru al mi unu fojon plu, sub la influo de la ver-elprenilo.” Kaj li prenis brulantan tigon el la fajro kaj fiksis ĝin ĉe ŝiaj maleloj — kaj komencis surlabori la viron refoje. La

virino parolis neniom.

“Parolu, virino,” riproĉaĉis Liejn, anhelante. “Mi estas en stato ŝvita pro tiu ĉi laboro.” La virino parolis neniom. Ŝiaj okuloj estis larĝe malfermitaj, kaj rigardadis vitre supren.

“Ŝi malvivas!” kriis ŝia edzo. “Mortinta! Mia edzino estas mortinta! Ho — Liejn, vi demono, vi putraĵo!” li kriegis. “Mi malbenas vin! per Ĥial, per Kraun — ” Lia voĉi tremadis supren ĝis alt-piĉa frenezeco.

T’sajs maltrankviliĝis. La virino mortis. Ĉu ne malbonegas mortigado? Tiel ja diris Pandelumo. Se la virino estis bona, kiel diris la barbohava viro, sekve

Liejn estas malbona. Ĉiuj ĉi estuloj estis el sango kaj malpuraĵo, kompreneble. Malgraŭ tio, tamen ege ofendas, ke oni dolorigu vivulon ĝis ĝi mortu.

Komprenante nenion pri timo, ŝi paŝis el de sia kaŝejo kaj eniris la fajrolumon. Liejn ekrigardis supren kaj risortis malantaŭen. Sed la trudinto estis svelta knabino pasie belega. Li saltetis ĝojege, li dancis.

“Bonvenon, bonvenon!” Li esprimis malŝaton pri la korpoj sur la grundo. “Malplaĉaj; ni devas ignori ilin.” Li svinge ĵetis malantaŭen sian mantelon, firigardis ŝin per siaj lumaj, blu-oraj okuloj, fiere marŝis al ŝi kiel belpluma virkoko.

“Vi belas, mia kara, kaj mi — mi estas la viro perfekta; kiel ja vi trovos.”

T’sajs metis la manon ĉe sia rapiro, kaj ĝi risortis el la ingo per si mem. Liejn saltis malantaŭen, ŝokita pro la glavo kaj same pro la brulo kiu lumis el la tordita cerbo.

“Kion signifas tio ĉi? Nu, nu,” li plendis nerveze. “Formetu vian ŝtalon. Ĝi akras kaj malmolas. Vi devas kuŝigi ĝin for. Mi estas kompata viro, sed mi toleras nenian agaciĝon.”

T’sajs staris super la du korpoj. La viro suprenrigardis ŝin febre. La virino rigardadis la malluman ĉielon.

Liejn risortis antaŭen, kun plano ke li ektenu ŝin dum ŝia atento distriĝas. La rapiro risortis supren per si mem, ekis antaŭen, penetris la movlertan korpon.

Liejn la Vojiranto falis sur la genuojn, tusante sangon. T'sajs eltiris la rapiron, forviŝis la sangon al la feste verda mantelo, kaj reingigis ĝin kun malfacilo. Ĝi volis stabi, penetri, mortigi.

Liejn kuŝis senkonscie. T'sajs turniĝis for, naŭza. Febla voĉo atingis ŝin. "Liberigu min — "

T'sajs konsideris, poste tranĉis la ŝnurojn. La viro stumblis al sia edzino, frotetis ŝin, fortiris la ŝnurojn, vokis al ŝia suprentenita vizaĝo. Estis nenia

respondo. Li saltis stariĝi en frenziĝo kaj plorkriis lupe al la nokto. Braklevante la malrigidan formon li stumbladis for en la mallumecon, ŝancelante, falante, blasfemante...

T'sajs tremetis. Ŝi ekrigardis de la kuŝanta Liejn al la nigra arbaro kie la cirklo de fajrlumo malsukcesis penetri. Malrapide, kun multaj ekrigardoj malantaŭen, ŝi forlasis la disfalintan ruinon, la herbejeton. La sangiĝanta figuro Liejn restis apud la mortanta fajro.

La flagranta brileto de fajro fadis, perdiĝis en la mallumo. T'sajs palpserĉis sian vojon inter la minace duonaperaj trunkoj; kaj la malklareco ŝajnis plia pro la tordeco en ŝia cerbo. Neniam okazis

nokto en Embeljono, nur opaleca fadeto. Do T'sajs pluiris laŭ la supspiranta arbara pluejo, sufokite, pezigitte, tamen preteratenta pri la aferoj kiujn ŝi povus renkonti — la Deodandoj, la pelgrejnoj, la ĉasvagantaj erboj (kreituloj miksitaj el besto, viro kaj demono), la gidoj, kiuj saltas dudek futojn trans la grundo kaj alkroĉas sin al sia viktimo.

T'sajs pluiris senatakite, kaj baldaŭ atingis la randon de la arbaro. La grundo leviĝis kaj la arboj maldensiĝis, kaj T'sajs elvenis por alfronti senliman malluman etendejon. Jen Stepo Modavno, loko historieca, etendejo kio spertis la tretadon de multaj piedoj kaj sorbis multan sangon. Je unu fifama murdegado,

Golikun Kodek la Konkeristo jam amase elpelinta la civitanojn de du grandaj urboj, G'Vasno and Baŭtiko, kunstriktis ilin en cirklon tri mejlojn larĝan, grade kunpuŝis ilin pli strikte, strike, strikte, panikigis ilin al la mezo inter siaj longbrakaj, subhomaj soldatoj, ĝis je fine li sukcesis krei verme moviĝantan monteton, mil futojn altan, piramidon el plorkrieganta karno. Oni diras, ke Golikun Kodek studis dek minutojn pri sia monumento, poste turniĝis kaj rajdis sian saltantan rajdbeston returne al la lando Lajdenuro de kie li estis veninta.

La fantomoj de antikvaj popoloj estis jam fadintaj kaj dissolviĝintaj kaj Stepo Modavno estis malpli sufoka ol la

arbaro. Arbustoj kreskis kiel makulaĵoj sur la grundo. Linio el rokaj krutejoj ĉe la horizonto stabis akre kontraŭ la iomete purpura post-lumeto. T'sajs elektis sian vojon trans la herbaĵo, trankviligita ke la ĉielo malplenis supere. Post kelkaj minutoj ŝi alvenis vojon el malnova plataĵo, fendhava kaj rompita, flankita de longfosaĵo kie lumaj stelformaj floroj kreskis. Vento venis suspirante de sur la stepo por malsekigeti al ŝi la vizaĝon. Nenia ŝirmejo videblis, kaj la vento flagrigis ŝian mantelon malvarme.

Rapideco de piedoj, falado de formoj, kaj T'sajs ekestis baraktanta kontraŭ malmolaj alkroĉantaj manoj. Ŝi batalis por ekteni sian rapiron, sed ŝiaj

brakoj firme kaptiĝis.

Unu estigis lumon per frapo, ekbruligis torĉon, por ekzameni sian gajnaĵon. T'sajs vidis tri barbohavajn, cikatrigitajn viraĉojn de la stepo; ili portis grizajn surtutojn, makulitajn pro kotoj kaj malpuraĵo.

“Ho, estas bela junulino!” diris unu, firigardanta.

“Mi serĉos ŝin por arĝento,” diris alia kaj frotis per la manoj kun fia intimeco surtute la korpon de T'sajs. Li trovis la sakon da juveloj, kaj verŝis ilin en la manplaton, fluaĵo el cent-kolora fajreco. “Atentu ĉi tiujn! La riĉaĵo de princoj!”

“Aŭ de sorĉistoj!” diris alia. Kaj pro subita dubo ili malstriktigis sian tenadon. Sed tamen ŝi ne povis etendi ĝis sia rapiro.

“Kiu vi estas, virino de la nokto?” demandis unu kun iom da respekto. “Sorĉistino, ke vi havas tiajn juvelojn, kaj marŝas sola Stepon Modavnon?”

T’sajs havis nek lertecon nek sperton por ke ŝi **improvizu** malveraĵon.

“Mi estas nenia sorĉistino! Liberigu min, vi fiodoraj bestoj!”

“Ĉu nenia sorĉistino? Kia speco de virino vi estas? De kie vi venis?”

“Mi estas T’sajs, el Embeljono,” ŝi kriis kolere. “Pandelumo kreis min, kaj mi serĉas amon kaj belon ĉe Tero. Nun faligu viajn manojn, ĉar mi volas laŭiri mian vojon!”

La unua kanajlo ete ridis. “Ho, ho! Serĉante amon kaj belon! Vi jam sukcesis je iom da via serĉado, knabino — ĉar malgraŭ tio ke ni kunuloj ne estas beluloj, ja certe, Tagmun pro esti kovrita de **krustoj** kaj Lasard al kiu mankas kaj dentoj kaj oreloj — tamen ni havas tiom multe da amo kiom vi povas deziri! Ĉu prave, kunuloj?”

Kaj malgraŭ la hororigitaj kriegoj de T’sajs, ili trenis ŝin trans la stepo al ŝtona dometo.

Ili eniris, kaj unu estigis muĝan fajron, dum du apartigis la rapiron de T'sajs kaj ĝin ĵetis en angulon. Ili ŝlosis la pordon per granda fera ŝlosilo, kaj liberigis ŝin. Ŝi eksaltis por sia rapiro, sed puŝbato sendis ŝin al la malpuregan plankon.

“Lasu ke tio kvietigu vin, kat-diablino!” anhelis Tagmun. “Decas ke vi feliĉu,” kaj ili renovigis sian interparoladaĉon. “Agnoskite, ke ni ne estas beluloj, tamen ni prezentos al vi ĉiom da amo kiom vi povas deziri.”

T'sajs kaŭris en angulo. “Mi ne scias tion, kio estas amo,” ŝi anhelis. “Ĉiaokaze, mi deziras neniom da via!”

“Ĉu eble?” ili ridaĉis. “Ĉu ja ankoraŭ virge?” Kaj T’sajs aŭskultis kun okuloj vitriĝantaj dum ili komencis pridiri en fiaj detaloj sian koncepton pri amo.

T’sajs risortis el sia angulo kun freneza rapido, piedbatante, martelante siajn pugnoj al la step-viroj. Kaj kiam ŝi estis forĵetita en angulon, kontuzitan kaj duon-mortanta, la viroj elportis kaskon de **medo**, por sinfortigi kontraŭ sia venonta plezuro.

Nun ili **lotis** por decidi pri kiu unuavice ĝuu la knabinon. La afero decidiĝis, kaj tuj komencis disputo, du akuzantaj ke li kiu gajnis iel trompis. Koleraj vortoj plilaŭtiĝis, kaj dum T’sajs

rigardis, douon-konscia pro hororo preter ajna koncepto de normala menso, ili tiel interbatalis kiel virbovoj en stato seksarda, kun grandaj blasfemoj, fortegaj batoj. T'sajs rampis al sia rapiro, kaj tuj kiam ĝi sentis ŝian tuŝon, ĝi leviĝis en la aeron kiel birdo. Ĝi alpuŝis sin inter la batalon, trenante T'sajson malantaŭe. La tri kriis raspe, la ŝtalo flagre ekbriladis — enen, elen, pretervideble rapida. Krioj, muĝoj — kaj tri dise pozantaj korpoj sur la tersurfaca planko, malferm-buŝaj korpoj. T'sajs trovis la ŝlosilon, malŝlosis la pordon, forkuris freneze tra la nokta mallumo.

Ŝi kuris trans la malhela kaj venta stepo, trans la vojo, stumblis en la

flankfosaĵon, trenis sin supren ĝis la malvarma rando kaj falis sur la genuojn... Jen Tero! Ŝi rememoris Embeljonon, loko kie la plej malbonaj aĵoj estis floroj kaj papililoj. Ŝi rememoris pri kiel tiuj ĉi instigis al ŝi malamon.

Embeljono estis perdita, forlasita. Kaj T'sajs ploris.

Susurado inter la **erikoj** atentigis ŝin. Ŝokite ŝi levis la kapon, aŭskultis. Kia nova fisurprizo por ofendi al ŝi la menson? La malbonintencaj sonoj pluis, simile al zorgaj paŝofaloj. Ŝi serĉis la mallumon en teruro.

Nigra figuro ŝtele eniris ŝian

vidkampon, silente paŝetante laŭ la fosaĵo. Per la lumo de lampiroj ŝi vidis lin — Deodando vagis el la arbaro, senhara hom-estaĵo kun braĝe nigra haŭto, bela vizaĝo, malbeligita kaj demonigita per du dentegoj brilantaj longe, akre kaj blanke malsupren super la lipo. Ĝi vestiĝis per leda jungilaraĵo, kaj ĝiaj longaj fendtruaj okuloj fikis malsate je T'sajs. Li eksaltis al ŝi kun jubilea krio.

T'sajs eskapis stumble, falis, puŝe ekstarigis sin. Kriegante, ŝi forkuris trans la stepo, senatente pri gratantaj uleksoj, vundantaj dornoj. La Deodando saltkuris poste, ellasanta nenaturajn muĝojn.

Trans stepo, herbaĵo, monteto, dornejo kaj rivereto, trans la mallumaj

sovaĝejoj daŭris la ĉaso, la knabino kuregante kun okuloj alrigardantaj nenion, la ĉasanto eligante siajn sopirajn muĝojn.

Malklara formo, lumaĵo aperis je la antaŭo — kabana dometo. T'sajs, la spirado pene plora, ŝancelis al la pordlimo. La pordo komplete eblis puŝiĝi. Ŝi enfalis, fermegis la pordon, faligis la trabon. La Deodanda pezeco alfrapis kontraŭ tiun barilon.

La pordo estis dika, la fenestroj malgrandaj kaj surkrucitaj per fero. Ŝi sekuris. Ŝi faletis sur la genuojn, spiro raspa en gorgo, kaj malrapide fadis en senkonsciecon...

La viro kiu loĝis en la kabano leviĝis de sia sidejo ĉe la fajro, alta, larĝa je ŝultroj, moviĝanta kun kurioze malrapida paŝado. Eblis ke li estis juna viro, sed neniu povus certiĝi, ĉar kovre super lia vizaĝo kaj kapo pendis nigra kapuĉa tolo. Malantaŭ la porokulaj tranĉtruoj estis stabilaj bluaj okuloj.

La viro venis por stari super T'sajs, kiu kuŝis kvazaŭ pupo sur la ruĝa brika planko. Li kaŭris, levis la malrigidan formon, kaj portis ŝin al dika remburlita benko apud la fajro. Li deprenis ŝiajn sandalojn, ŝian tremantan rapiron, ŝian malsekegan mantelon. Li portis unĝventon kaj aplikis ĝin al ŝiaj dornvundoj kaj kontuzoj. Li volvis ŝin en

mola flanela blankedo, surkusenigis ŝian kapon, kaj certiĝinta ke ŝi komfortis, refoje sidigis sin apud la fajro.

La Deodando ekstera estis atendinta, kaj estis rigardinta tra la fere barita fenestro. Nun ĝi alfrapis la pordon.

“Kiu estas?” vokis la viro en la nigra kapuĉo, torde turniĝanta.

“Mi deziras tiun kiu eniris. Mi malsatas por ŝia karno,” diris la mola voĉo de la Deodando.

La viro en la kapuĉo parolis akre.

“Iru, antaŭ ol mi eldiros sorĉon por bruligi vin per fajro. Neniam revenu!”

“Mi iras,” diris la Deodando, ĉar li multe timis magion, kaj foriris en la nokton.

Kaj la viro turniĝis kaj sidiĝis por rigardadi en la fajron.



T’sajs sensis varmetan, fortodoran likvaĵon en la buŝo kaj malfermis la okulojn. Genuante apud ŝi estis alta viro, nigre kapuĉita. Unu brako subtenis ŝiajn ŝultrojn kaj kapon, alia tenis arĝentan kuleron al ŝia buŝo.

T’sajs kliniĝis time for. “Kivetu,” diris la viro. “Nenio minacos vin.” Malrapide, dubeme, ŝi trankviliĝis kaj

kuŝis senmove.

Ruĝa sunlumo verŝis internen tra la fenestroj, kaj la dometo varmetis. Ĝiaj muroj paneliĝis per ora ligno, kun fretaĵoj farbitaj per ruĝo kaj bluo kaj bruno laŭ cirklo ĉe la plafono. Nun la viro portis pluan brogaĵon de la fajro, panon el la ŝranko, kaj metis ilin antaŭ ŝi. Post momenta hezito, T'sajs manĝis.

Rememoro subite venis al ŝi; ŝi tremis, rigardis terure ĉirkaŭ la ĉambro. La viro atentis pri ŝia strikta vizaĝo. Li kurbiĝis kaj metis manon ĉe ŝia kapo. T'sajs kuŝis kviete, duone en terurega anticipo.

“Vi estas sekura ĉi tie,” diris la viro.

“Timu nenion.”

T’sajs spertis malfokusiĝon. Ŝiaj palpebroj fariĝis pezaj. Ŝi dormis.

Kiam ŝi vekiĝis la dometo malplenis, kaj la brun-karmezina sunlumo striis kline internen tra fenestro transĉambra. Ŝi streĉis la brakojn, intermetis manon sub la kapon, kaj kuŝadis pensante. Tiu ĉi viro en nigra kapuĉo, kiu li estas? Ĉu li malbonas? Ĉio alia de Tero preteris komprenon. Tamen, li estis farinta nenion al ŝi dolorigan... Ŝi ekvidis siajn vestojn sur la planko. Ŝi leviĝis de la lit-seĝo kaj vestis sin. Ŝi iris al la pordo kaj puŝis ĝin malferme. Antaŭ ŝi etendiĝis la stepo, fadiĝante malproksimen trans la sub-klineco de la

horizonto. Je ŝia maldekstro pintis elstaraĵo el rokaj krutaĵoj, nigra ombreco kaj trokolore ruĝaj ŝtonoj. Dekstre etendiĝis la nigra rando de la arbaro.

Ĉu tio ĉi estas bela? T'sajs primeditis. Ŝia tordita cerbo vidis malhelecon en la sinsekveco de la stepo, tranĉan akrecon je krutaĵoj, kaj en la arbaro — teruron.

Ĉu tio ĉi estas belo? Respondo al ŝi mankis, ŝi turnis kline la kapon, rigardis tra kunpremitaj palpebroj. Ŝi aŭdis piedpaŝojn, saltis ektorniĝe, larĝ-okula, atendanta ion ajn. Estis li de la nigra kapuĉo, kaj T'sajs kliniĝis malantaŭen kontraŭ la pordo-framo.

Ŝi rigardis lin alveni, alta kaj forta, malrapida je paŝado. Kial li portas la kapuĉon? Ĉu li hontas pro la vizaĝo? Ŝi povis kompreni iom pri tio, ĉar ŝi mem trovis la homan vizaĝon mallogan — objekto el akvecaj okuloj, malsekaj malplaĉaj aperturoj, spongecaj elkreskaĵoj.

Li haltis antaŭ ŝi. “Ĉu vi malsatas?”

T’sajs konsideris. “Jes.”

“Do ni manĝu.”

Li eniris la dometon, kirlis vivige la fajron, kaj surstangetis viandon. T’sajs staris sendecide en la fojno. Ŝi ĉiam antaŭe servis sin mem. Ŝi sentis

maltrankvilecon: kuna agado estis ideo kiun ŝi jam ne renkontis.

La viro baldaŭ leviĝis, kaj ili iris sidi por manĝi ĉe lia tablo.

“Rakontu al mi pri vi mem,” li diris post kelkaj momentoj. Do T’sajs, kiu neniam lernis kiel esti alia ol senarta, diris al li sian rakonton, jene:

“Mi estas T’sajs. Mi venis al Tero de Embeljono, kie la magiisto Pandelumo kreis min.”

“Embeljono? Kie estas Embeljono? Kaj kiu estas Pandelumo?”

“Kie Embeljono?” ŝi rediris

konfuzite. “Ĝi estas en loko kio ne estas Tero. Ĝi ne tre grandas, kaj lumoj el multaj koloroj venas el la ĉielo. Pandelumo loĝas ĉe Embeljono. Li estas la plej granda sorĉisto vivanta — tiel li min diras.”

“Aa,” la viro diris. “Eble mi komprenas...”

“Pandelumo kreis min,” daŭrigis T’sajs, “sed io estis misa en la desegna modelo.” Kaj T’sajs rigardegis en la fajron. “Mi vidas la mondon kiel malhelan lokon el hororaĵoj; ĉiuj sonoj al mi estas tro akraj, ĉiuj vivantaj estuloj estas abomenindaj, laŭ malsamaj gradoj — aĵoj el [limakeca](#) movado kaj interna malpuregeco. Dum la unua duono

de mia vivo mi pensis nur pri premi subpiede, dispremi, detruu. Mi konis nenion krom malamo. Iam mi renkontis mian fratinnon T'sajn, kiu samas je mi sed sen la difekto. Ŝi diris al mi pri amo kaj belo kaj feliĉo — kaj mi venis al Tero serĉante ĉi tiujn.”

La funebre seriozaj okuloj studis ŝin.

“Ĉu vi trovis ilin?”

“Ĝis nun,” diris T'sajs per voĉo perdita en pensoj, “Mi trovis nur tiajn fiaĵojn kiajn mi neniam antaŭe renkontis eĉ dum terur-songoj.” Malrapide ŝi rakontis al li pri siaj aventuroj.

“Kompatinda kreitulinino,” li diris kaj

refoje okupiĝis pri studi ŝin.

“Mi pensas ke mi min mortigu,” diris T’sajs, per la sama voĉo de pensforesteco, “ĉar tio kion mi deziras estas senlime perdita.” Kaj la viro, rigardanta, vidis kiel la ruĝa posttagmeza suno koloriĝis kupre je haŭto, atentis priobservis la malstriktan nigran hararon, la longajn pensoplenajn okulojn. Li tremis pri la ideo, ke ĉi tiu kreitino estu perdita inter la polvo de la forĝistaj duilionoj de Tero.

“Ne!” li diris akre. T’sajs ekrigardis lin kun surprizo. Certe, la vivo onia apartenas al oni mem, por trakti laŭ la propra volo.

“Ĉu vi trovis nenion sur Tero,” li demandis, “kion vi bedaŭrus forlasi?”

T’sajs kunpremis la brovojn. “Mi povas pensi pri nenio — krom se eble ĝi estu la paco de tiu ĉi dometo.”

La viro ridis. “Do tiu ĉi estos via hejmo, por tiom longe kiom ajn vi deziros, kaj mi provos montri al vi ke la mondo foje bonas — kvankam fakte — ” lia voĉo ŝanĝiĝis “ — mi ne estas trovinta ĝin tiel.”

“Rakontu al mi,” diris T’sajs, “kio estas via nomo? Kial vi portas la kapuĉon?”

“Mia nomo? Edur,” li diris en voĉo

subite acerba. “Edur estas sufiĉe da ĝi. Mi portas la maskon pro la plej malbonfaregema virino el Askolajs — Askolajs, Almerio kaj Kaŭĉikŭo — la tuta mondo. Ŝi refaris mian vizaĝon tiel ke mi ne povas toleri la propran aspekton.”

Li trankviliĝis, lace ridis. “Ne plu bezoniĝas kolero nun.”

“Ĉu ŝi vivas ankoraŭ?”

“Jes, ŝi vivas, kaj sendube ankoraŭ faras malbonegon sur ĉiu kiun ŝi renkontas.” Li sidis rigardanta en la fajron. “Iam mi sciis nenion pri tio. Ŝi estis juna, bela, ŝargita de mil bonodoroj kaj ĉarma ludemo. Mi loĝis apud la

maro — en blanka kampdometo inter poploj. Trans Haveno Tenebroso la Kabo de Malĝoja Rememoro etendis en la oceano, kaj kiam sunsubiro faris ruĝa la ĉielon kaj nigraj la montojn, la kabo ŝajne dormis sur la akvo kiel unu el la praaj terdiodoj... Mian tutan vivon mi loĝadis tie, kaj tiel kontentis kiel oni povas dum la mortanta Tero elĝiras siajn finajn malmultajn turniĝojn.

“Iun matenon mi suprenrigardis de miaj stel-mapoj kaj vidis Ĝavejn-on paŝantan tra la portalo. Ŝi estis tiel juna kaj svelta kiel vi. Ŝia hararo estis mirinde ruĝa, kaj individuaj haroj falis antaŭ ŝiaj ŝultroj. Ŝi estis ege bela, kaj — en sia blanka robo — pura kaj senkulpa.

“Mi amis ŝin, kaj ŝi diris ke ŝi amis min. Kaj ŝi donis al mi bandon el nigra metalo por porti. En mia blindeco mi fiksis ĝin al la pojno, neniel rekonanta ĝin por la abmonena runo kio ĝi estis. Kaj semajnoj da granda ĝojego pasis. Sed baldaŭ mi trovis, ke Ĝavejn estis iu kun mallumaj urĝoj tiaj kiaj la amo de homa viro neniam povus satigi. Kaj iun meznokton mi trovis ŝin ĉirkaŭbrakita de nigra nuda demono, kaj la vido trudis al mi la menson.

“Mi forstaris fisurprizita. Mi mem ne vidiĝis, kaj mi malrapide foriris. Je la mateno ŝi venis kurante trans la teraso ridetanta kaj feliĉa, kiel infano. ‘Foriru de mi,’ mi diris al ŝi. ‘Vi abomenindas preter

kalkulebleco.’ Ŝi diris vorton kaj la runo sur mia brako min sklavigis. La menso mia restis propra, sed la korpo apartenis al ŝi, devigita obei ŝiajn vortojn.

“Kaj ŝi devigis, ke mi rakontu tion kion mi vidis, kaj ŝi ĝojaĉis kaj mokis. Kaj ŝi devigis min al abomenindaj humiligadoj, kaj elvokis aĵulojn el Kalu, el Favun, el Ĝeldred, por moki kaj fiuzi mian korpon. Ŝi devigis, ke mi observu ŝian ludadon kun tiuj aĵuloj, kaj kiam mi identigis tiun kiu naŭzigis min plejege, per magio ŝi donis al mi ties vizaĝon, la vizaĝo kiun mi portas nun.”

“Ĉu tiaj virinoj povas ekzisti?” miris T’sajs.

“Ja tiel.” La sombraj bluaj okuloj studis ŝin atente. “Finfine iun nokton dum la demonoj rulĵetis min trans la krutaĵoj malantaŭ la montetoj, silika roko tiris la runon de sur la brako. Kaj mi liberiĝis; Mi kantetis sorĉon kio ekflugigis la aĵojn kriegantajn tra la ĉielo, kaj retretis al la kampodometo.

“Kaj mi renkontis Ĝavejnon ruĝharan en la granda halo, kaj ŝiaj okuloj esprimis malvarmete kaj senkulpe. Mi eltiris mian tranĉilon por stabi al ŝi la gorgon, sed ŝi diris, ‘Haltiĝu! Mortigu min kaj vi por ĉiam portos vian demonan vizaĝon, ĉar mi sola scias pri kiel ĝin ŝanĝi.’ Poste ŝi kuris indiferente feliĉa el la dometo, kaj mi, senkapabla toleri pluan

vidadon de tiu loko, venis al la stepo. Kaj ĉiam mi serĉas ŝin, por regajni la vizaĝon.”

“Kie estas ŝi nun?” demandis T’sajs, kies malfacilaĵoj ŝajnis malgrandaj kompare al tiuj de Edur.

“Je morgaŭa nokto, mi scias pri kie ŝin trovi. Estos la nokto Nigra Sabato — la nokto dediĉita al la malbono ek de la naskiĝo de Tero.”

“Kaj ĉu vi ĉeestos tiun festivalon?”

“Ne kiel celebranto — malgraŭ fakte,” diris Edur kun ĉagreno, “sen mia kapuĉo mi estus unu el la aĵuloj kiuj ĉeestas, kaj pasus sen priatento.”

T'sajs tremis kaj premis sin kontraŭ la muron. Edur vidis la geston kaj suspiris.

Alia ideo leviĝis en ŝi. “Post ĉiom da malbono kion vi jam suferadis, ĉu ankoraŭ en la mondo trovas vi belon?”

“Ja certe,” diris Edur. “Vidu pri kiel etendiĝas la stepo, malplena kaj pura, el mirinde subtilaj koloroj. Vidu pri kiel la krutaĵoj leviĝas grandmaniere, kvazaŭ la spino de la mondo. Kaj vi,” li rigardadis ŝian vizaĝon, “vi havas belon preteran ol ĉio.”

“Preter Ĝavejnon?” demandis T'sajs, kaj rigardis esprimante konfuzon tiam kiam Edur ridis.

“Ja preter Ĝavejnon,” li informis ŝin certige.

La cerbo de T’sajs’ ekpensis laŭ nova direkto.

“Kaj Ĝavejn, ĉu vi volas venĝi vin kontraŭ ŝi?”

“Ne,” respondis Edur, okuloj rigardantaj for trans la stepo. “Kio estas venĝo? Mi zorgas nenion pri tio. Baldaŭ, kiam la suno estingiĝos, homoj kune rigardados en la eternan nokton, kaj ĉiuj mortos, kaj Tero portos sian historion, siajn ruinojn, la montojn eroditajn por fariĝi nuraj rindaĵoj — ĉiuj en senliman mallumon. Pro kio venĝo?”

Post nelonge ili eliris la dometon kaj vagis trans la stepo, Edur provante montri al ŝi belecon — la malrapida rivero Skaŭm fluanta inter verdaj junkoj, nuboj sorbantaj la malfortan sunlumon super la krutaĵoj, birdo ŝvebanta laŭ cirklo sur etenditaj flugiloj, la larĝa fumeca disetendiĝo de Modavna Stepo. Kaj T'sajs strebis ĉiam devigi la cerbon, ke ĝi vidu tiujn ĉi belecojn, kaj ĉiam ŝi malsukcesis. Sed ŝi jam lernis limigi la sovaĝan koleron kion la vidaĵoj de la mondo antaŭe instigis al ŝi. Kaj ŝia bezono pri mortigado malgrandiĝis, kaj ŝia vizaĝo malstriktiĝadis el sia daŭra firmeco.

Do ili vagadis plu, ĉiu perdita en

propraj pensoj. Kaj ili rigardis la malgajan gloron de la sunsubiro, kaj ili vidis la malrapidajn blankajn stelojn supreniri la ĉielon.

“Ĉu ne belas la steloj?” flustris Edur tra sia nigra kapuĉo. “Ili havas nomojn pli malunajn ol la homaro.”

Kaj T’sajs, trovante nur mornecon en la sunsubiro, kaj pensante la stelojn nur etaj sparkoj en sensignifaj ordoj ne povis respondi.

“Certas, ke du pli misfortunaj homoj nenie ekzistas,” ŝi suspiris.

Edur diris nenion. Ili paŝadis en silento. Subite li ektenis al ŝi la brakon

kaj tiris ŝin grunden inter uleksoj. Tri grandaj formoj pasis flugilumante trans la krepuska ĉiellumo. “Pelgrejnoj!”

Ili flugis proksime supere — gargojlaj estuloj, kun flugiloj knarantaj kiel rustaj haspoj. T’sajs spertis ekvidon de mola ledeca korpo, granda hakilforma beko, ĉien-serĉantaj okuloj en plene sulkita vizaĝo. Ŝi ŝrumpis kontraŭ Eduron. La pelgrejno flugilumis trans la arbaro.

Edur ridis acerbe. “Vi ŝrumpas for de la vizaĝo de pelgrejno. La aspekto kion mi portas forflugigus eĉ la pelgrejnoj mem.”

La sekvan matenon li kondukis ŝin

en la arbaron, kie la arboj donis sensaĵon pri Embeljono. Ili revenis al la dometo je la frua posttagmezo, kaj Edur apartiĝis por studi siajn librojn.

“Neniel estas mi magiisto,” li diris al ŝi bedaŭre. “Mi konas kelkajn simplajn sorĉojn. Tamen mi sorĉas fojfoje, kio eble gardos min kontraŭ danĝero ĉinokte.”

“Ĉinokte?” T’sajs demandis necerte, ĉar ŝi forgesis.

“Ĉinokte estos la Nigra Sabato, kaj mi devos iri por trovi Ĝavejnon.”

“Mi volas iri kun vi,” diris T’sajs. “Mi volas spekti la Nigran Sabaton, kaj

ankaŭ Ĝavejnon.”

Edur certigis ŝin ke la vidaĵoj kaj sonoj hororos al ŝi kaj turmentos al ŝi la cerbon. T’sajs persistis, kaj Edur finfine permesis ke ŝi sekvu lin tiam, kiam du horojn postsunsubire li ekiris for laŭ la direkto je la krutaĵoj.

Trans la erikejoj, supren trans disfendemaj rokelstaraĵoj, Edur elektis vojon tra la mallumo, kun T’sajs prezentanta sveltan ombbron malantaŭan. En nigran fendejon, supren laŭ ŝtona ŝtuparo, eltranĉita en la nememorebla prapasinteco, kaj elen sur la klifa supro, kun Modavna Stepo kiel nigra maro sube de ili.

Nun Edur gestis al T'sajs pri granda singardemo. Ili ŝteliris tra spaco inter du ture altaj rokegoj; kaŝite en la ombro, ili stude rigardadis la kunvenon suban.

Ili subenrigardis al amfiteatro lumigita per du brile bruantaj fajroj. En la mezo leviĝis diska platformo el ŝtono, alta kiel viro. Ĉirkaŭ la frajo, ĉirkaŭ la platformo, kvardek figuroj, vestitaj per grizaj monaĥaj kapuĉhavaj roboj, ŝvite onde ĝiradis, iliaj vizaĝoj ne videblaj.

T'sajs sentis aŭguran ekmalvarmiĝon. Ŝi rigardis al Edur dube.

“Eĉ ĉi tie estas belo,” li flustris. “Stranga kaj groteska, tamen vidaĵo por sorĉi la menson.” T'sajs rigardis denove

kun iometa kompreno. Pli da robo- kaj kapuĉo-portantaj figuroj nun sinuadis antaŭ la fajroj; de kie ili venis T'sajs ne estis observinta. Evidentis ke la festivalo ĵus komencis, ke la celebrantoj nur antaŭvokadis siajn pasiojn.

Ili danc-marŝis, pied-trenis, plektiĝis mezen kaj elen, kaj baldaŭ komencis dampe ĉantadi.

La ondado kaj gestado fariĝis febra, la mantele vestitaj figuroj kunpremis sin pli proksime ĉirkaŭ la patformo. Kaj nun unu saltis sur la platformon kaj demetis sian robon — mez-aĝan sorĉistinon havanta malalt-dikan korpon kun granda larĝa vizaĝo. Ŝi havis ekstaz-esprimajn briler-plenajn okulojn, grandaj korperoj

pumpantaj en senĉesa idiota movado. Buŝo malferma, lango elstara, rigida nigra hararo kiel uleks-arbusto, falanta de flanko al flanko antaŭ ŝia vizaĝo kiam ŝi skuis la kapon, ŝi dancis **lascivan** flanke moviĝan dancon en la lumo de la fajroj, rigardante ruzesprime al la kunvenularo. La ĉantado de la **kapriolantaj** figuroj sube de ŝi ŝvelis por fariĝi naŭza ĥoro, kaj superkape malhelaj formoj aperis, surteriĝantaj kun malica memfido.

La homamaso komencis gliti el siaj roboj, tiel malkovrante ĉiujn manierojn de viroj kaj virinoj, maljunaj kaj junaj — orang-hararaj sorĉistinoj el la Monto Kobalta; arbaraj sorĉistoj el Askolajs; blank-barbaj magiistoj de la Lando

Malgaja, kun babilantaj etaj **sukuboj**. Kaj tiu vestita en lukse bela silko estis Princo Datul Omaŭt de Kanasparo, la urbo de falintaj kolonoj trans la Golfo Melantuno. Alia kreitulo de skvamoj kaj elstare rigardegaj okuloj devenis el la lacert-homoj ĉe la nudaj montetoj de Suda Almerio. Kaj jen tiuj du knabinoj, neniam apartaj, estis Saponedoj, la preskaŭ-elmortinta raso el la nordaj **tundroj**. La sveltaj mallum-okulaj uloj estis **nekrofaĝoj** el la Lando de la Falanta Muro. Kaj la songem-okula sorĉistino kun bluaj haroj — ŝi loĝas ĉe la Kabo de Malĝoja Rememoro kaj atendas nokte sur la strando por iu kiu venas el la maro.

Kaj dum la malalt-dika sorĉistino

kun nigra malorda hararo kaj svingiĝantaj mamoj dancadis, la **komuniĝantoj** fariĝis ekzaltitaj, levis la brakojn, tordis la korpojn, **pantomimis** pri ĉiom da fiecoj kaj perversecoj kiujn ili povis elpensi.

Krom unu — kvieta figuro ankoraŭ volvita en sia mantelo, moviĝanta malrapide tra la **saturnaliaĵoj** kun mirinda gracieco. Nun ŝi paŝis supren sur la platformon, lasis la mantelon fali for de la korpo, kaj Ĝavejn staris montrata en al kroĉema robo el nebulaĵo, kuntirita ĉirkaŭ la talio, freŝa kaj ĉasta kiel mara salŝpruco. Brilantaj ruĝaj haroj falis sur la ŝultroj kiel rivereto, kaj bukraj hararoj pendis sur la mamoj. Ŝiaj grandaj grizaj okuloj esprimis modeste, frageca buŝo

iomete malferma, ŝi rigardis ien kaj tien inter la amaso. Ili vokis kaj virkoke blekis, kaj Ĝavejn, kun **tantaliga** malrapido, movis sian korpon.

Ĝavejn dancis. Ŝi levis la brakojn, sinue mallevis ilin, tordante la korpon sur sveltaj blankaj gamboj... Ĝavejn dancis, ŝia vizaĝo brilanta kun la plej sengardaj pasioj. Malhela formo malleviĝis de supere, bela duon-homo, kaj li kunigis sian korpon al tiu de Ĝavejn en fantasta ĉirkaŭbrako. Kaj la amaso suba kriis, saltis, ruliĝis, memĵetis, kune partoprenis rapidan **klimakson** de siaj antaŭaj **burleskaĵoj**.

De inter la krutaĵoj T'sajs rigardis, la menso afliktita de intenseco tia kian

neniu normala cerbo povus kompreni. Sed — je stranga paradokso — la vidaĵo kaj sono **fascinis** ŝin, etendiĝis suben je ŝia menstordiĝo, tuŝis la mallumajn kordojn kiuj **latentas** en ĉiuj homoj. Edur subenrigardis al ŝi, okuloj brilantaj blufajre, kaj ŝi rigardadis responde en tumulto da kontraŭaj emocioj. Lia esprimo **spasmis** kaj li turnis sin for; post longe ŝi turniĝis rigardi la **orgion** suban — drogo-sonĝo, ondaĵo el sovaĝa karno en flagra fajrolumo. Preskaŭ-palpebla **aŭro** sendiĝis supren, tordiĝo de spaco plektita el diversaj malvirtoj. Kaj la demonoj falflugis kiel birdoj, surteriĝante kaj partoprentante la **deliran** agadon. Abomenan vizaĝon post vizaĝo vidis T'sajs, kaj ĉiu brulvundis al ŝi la cerbon

ĝis ŝi pensis ke ŝi devus kriegi kaj morti — vidaĵoj el rigardaĉaj okuloj, vezikaj vangoj, halucine frenezaj korpoj, nigraj vizaĝoj kun spika nazo, esprimoj ofendegaj al pripenso, skvermaj, saltetantaj, rampantaj, la vomajo el demon-landoj. Kaj unu havis nazon kiel tri-falda blanka vermo, buŝon kiu estis putra makula kavaĵo, makulaj vangegoj kaj nigra misforma frunto; la tuta ulaĵo estanta objekto el vomigo kaj hororo. Al tiu direktis Edur la rigardon de T'sajs. Ŝi vidis kaj ŝiaj muskoloj kramfis. “Jen,” diris Edur en kaŝa voĉo, “jen estas vizaĝo kiu spegulas tiun sub tiu ĉi kapuĉo.” Kaj T'sajs, rigardegante al la nigra kaŝilo de Edur, ŝrumpis malantaŭen.

Li ridis malforte, amare... Post momento T'sajs etendis kaj tuŝis lian brakon. "Edur."

Li turniĝis ree al ŝi. "Jes?"

"Mia cerbo difektas. Mi malamas ĉion kion mi vidas. Mi ne povas regi la timojn. Tamen tio kio kuŝas sube de mia cerbo — mia sango, mia kopro, mia spirito — tio kiu estas mi mem amas vin, vian memon kiu subas de la masko."

Edur studis la blankan vizaĝon kun strebega intenseco. "Kiel vi povas amikiam samtempe vi malamas?"

"Mi vin malamas kun la malamo kion mi havas por la tuta mondo; mi vin

amas per emocio kion nenio alia instigas.”

Edur turniĝis for. “Ni konsistas el stranga paro...”

La **agito**, la ĝemsonaj interkuniĝoj de karno kaj duon-karno kvietiĝis. Alta viro en konusa ĉapelo aperis sur la platformo. Li klinigis malantaŭen la kapon, elvokis sorĉdiron al la ĉielo, plektis run-signojn en la aero per la brakoj. Kaj dum li ĉantis, alte supere komencis aperi giganta ondanta figuro, alta, pli alta ol la plej altaj arboj, pli alta ol la ĉielo. Ĝi formiĝis malrapide, verdaj nebuloj faldiĝantaj kaj malfaldiĝantaj, kaj baldaŭ la aspekto klariĝis — ondanta formo de virino, bela, serioza, majesta.

La figuro malrapide stabiliĝis, lumanta per ekster-tera verda lumo. Ŝi ŝajne havis orajn harojn, buklo suprenplektitajn laŭ modo de la pretermemora pasinteco, kaj ŝiaj vestoj estis tiaj de la prauloj.

La magiisto kiu estis alvokinta ŝin kriis, ekzultis, laŭtege parolis vastajn ventajn mokojn kiuj sonoris preter la krutaĵoj.

“Ŝi vivas!” murmuris T’sajs ŝokita. “Ŝi movas! Kiu ŝi estas?”

“Estas Etodea, diino de la kompatato, el tempo dum kiam la suno ankaŭ flavis,” diris Edur.

La magiisto ĵete etendis sian brakon

kaj granda fulmo el purpura fajro flugis supren tra la ĉielo kaj ŝprucis kontraŭ la malklaran formon. La kalma vizaĝo tordiĝis en dolorego, kaj la rigardantaj demonoj, sorĉistinoj kaj nekrofaĝoj elvokis sian ĝojon. La magiisto sur la platformo eketendis la brakon refoje kaj fulmo post fulmo da purpura fajro ekĵetiĝis supren por vundi la kaptitan diinon. La hup-sonoj kaj ĝojkrioj de tiuj proksimaj al la fajro estis teruraj por la aŭdo.

Poste soniĝis klara fora voksono de **klariono**, tranĉante akre tra la ekzultado. La agitintoj ekhaltiĝis senspire atentaj.

La klariono, muzika kaj brilsona, sonis refoje, plilaŭte, sono fremda al tiu

ĉi loko. Kaj nun, alsupriĝanta la krutaĵojn kiel rompiĝanta marondo, alkuregis trupego da verde vestitaj viroj, moviĝanta kun fantasta volego.

“Valdarjo!” kriis la magiisto sur la platformo, kaj la verda figuro de Etodea ondiĝis kaj malaperis.

Paniko viŝiĝis tra la amfiteatro. Estis raŭkaj krioj, ĉirkaŭsvarmo de intertaj korpoj, nubigo da leviĝantaj formoj kiam la demonoj celis flugi. Kelke da sorĉistoj staris kuraĝe por ĉanti sorĉojn de fajro, dissolvo, kaj paralizigo kontraŭ la atako, sed ĉeestis forta kontraŭa magio, kaj la invadantoj saltis senvunditaj en la amfiteatron, sursaltigante la platformon. Iliaj glavoj leviĝis kaj falis, hakantaj,

tranĉantaj, stabantaj sen kompato aŭ deteno.

“La Verda Legio de Valdarjo de Justa,” flustris Edur. “Vidu, jen li staras!” Li indikis al sombra nigre vestita figuro ĉe la supro de la montetara kresto, rigardanta ĉion kun sovaĝa plaĉiĝo.

Nek eskapis la demonoj. Dum kiam ili flugilumis tra la nokto, grandaj birdoj rajdataj de viroj falflugis malsupren el la mallumo. Kaj tiuj ĉi portis tubojn kiuj ŝprucigis konusojn da erodega lumo, kaj la demonoj kiuj proksimis ties kampojn eligis terurajn kriegojn kaj ekfalis grunden, kie ili eksplodis en nigran polvon.

Kelkaj sorĉistoj eskapis al la krutaĵoj, por eke turniĝi kaj sinkaŝi inter la ombroj. T'sajs kaj Edur aŭdis rampegadon kaj anheladon de sube. Panike suprengrimanta la rokojn estis tiu kiun Edur venis por serĉi — Ĝavejn, ŝiaj ruĝaj haroj fluantaj malantaŭen de ŝia senmakula juna vizaĝo. Edur eksaltis, kaptis ŝin, **krampis** ŝin inter fortaj brakoj.

“Venu,” li diris al T'sajs, kaj portante la baraktantan figuron, li marŝis for tra la ombroj.

Post ioma tempo ili pasis malsupren kaj sur la stepon, la tumulto fadis en la malproksimeco. Edur starige demetis la virinon, malbindis al ŝi la buŝon. Ŝi ekvidis por la unua fojo tiun kiu estis ŝin

kaptinta. La furiozo elĉerpiĝis de ŝia esprimo kaj tra la mallumo rideto ekvideblis. Ŝi kombis siajn ruĝajn harojn per la fingroj, ĝustigis la harojn por fali malantaŭ la ŝultroj, tutatempe rigardante al Edur. T'sajs vagis proksimen, kaj Ĝavejn turnis al ŝi taksan rigardon.

Ŝi ridis. “Do, Edur, vi malfidelis je mi; vi trovis novan amatinon.”

“Ŝi estas nenia koncerno via,” diris Edur.

“Sendu ŝin for,” diris Ĝavejn, “kaj mi amos vin refoje. Ĉu vi memoras pri kiel vi min kisis unuafoje sub la poploj, sur la teraso de via kampara dometo?”

Edur eligis abruptan akran ridon. “Ekzistas nur unu afero kion mi postulas de vi, kaj tio estas mi vizaĝo.”

Kaj Ĝavejn mokis lin. “Via vizaĝo? Kio misas pri tio kion vi nun portas? Vi pli taŭgas je ĝi; kaj preter ĉiu okazo, via antaŭa vizaĝo perdiĝis.”

“Perdiĝis? Kiel?”

“Li kiu portis ĝin estis eksplodigita ĉi tiun nokton fare de la Verda Legio, estu ke Kraan konservu iliajn vivantajn cerbojn en acido!”

Edur turnis siajn bluajn okulojn al la krutaĵoj.

“Pro tio via aspekto nun estas polvo, nigra polvo,” Edur, en neregebla kolerego, paŝis antaŭen kaj batis al la dolĉe impertinenta vizaĝo. Sed Ĝavejn faris rapidan malantaŭan paŝon.

“Singardu, Edur, krom se mi mistraktu vin per magio. Eblas ke vi poste iru lambe marŝanta kaj saltanta kun korpo taŭga je via vizaĝo. Kaj via bela malhel-harara knabino estus ludilo por demonoj.”

Edur regis sin kaj faris paŝon retroan, liaj okuloj bruletantaj.

“Ankaŭ mi havas magion, kaj eĉ sen tio mi vin batus silentige per la pugno antaŭ ol vi povus eldiri la unuan kadron

de via sorĉo.”

“Ho, pri tio ni atendu,” kriis Ĝavejn, saltete dancanta for. “Ĉar mi havas sorĉeton de mirinda simpleco.” Dum Edur al ŝi eksaltis ŝi jam parolis sorĉeton. Edur eke haltiĝis mezpaŝe, liaj brakoj falis ambaŭflanke sen ajna volo, kaj li fariĝis estulo sen volo, ĉiom da lia volo ĉerpita per la parazite suĉa magio.

Sed Ĝavejn staris en precize la sama pozo, kaj ŝiaj grizaj okuloj rigardadis senesprime. Nur T’sajs estis libera — ĉar T’sajs portis la runon de Pandelumo kiu reflektis magion retroen al tiu kiu ĝin sendis.

Ŝi staris konfuzo en la malluma

nokto, la du senmovaj figuroj starantaj kvazaŭ **somnambuloj** antaŭ ŝi. Ŝi kuris al Edur, tiris al ties brako. Li rigardis ŝin kun malatentaj okuloj.

“Edur! Kio misas je vi?” Kaj Edur, ĉar lia volo estis paralizita, tiel ke li devigiĝis respondi ĉiujn demandojn kaj obei ĉiujn ordonojn, respondis al ŝi.

“La sorĉistino parolis sorĉon kiu lasis min sen volo. Pro tio mi ne povas movi aŭ paroli sen ordono.”

“Kion mi faru? Kiel mi savu vin?” enketis la maltrankviligita knabino. Kaj, kvankam Edur estis sen volo, li ankoraŭ tenis sian penson kaj pasion. Li povis doni al ŝi tian informon kian ŝi petis, kaj

nenion plu.

“Vi devas ordoni min al agado kio venkos la sorĉistinon.”

“Sed kiel mi sciu pri tiu ĉi agado?”

“Vi demandos kaj mi vin respondos.”

“Nu, ĉu ne estus pli efike se mi ordonus, ke vi agu laŭ la direktoj de via propra cerbo?”

“Jes.”

“Do faru tiel; agu en ĉiaj cirkonstancoj tiel kiel Edur mem estus aganta.”

Jene en la mallumo de nokto la sorĉo de Ĝavejn la sorĉistino estis ĉirkaŭirita kaj nuligita. Edur regajnis la volon kaj kondukis laŭ sia normalaj inklinoj. Li alproksimiĝis al la senmova Gavejn.

“Ĉu vi timas min nun, sorĉistino?”

“Jes,” diris Ĝavejn. “Mi ja timas vin.”

“Ĉu veras, ke la vizaĝo kiun vi ŝtelis de mi nun estas nigra polvo?”

“Via vizaĝo estas en la nigra polvo de la eksplodigita demono.”

La bluaj okuloj rigardis ŝin senmove

tra la longtruoj de la kapuĉo.

“Kiel mi regajnu ĝin?”

“Tio estas fortega magio, etendi en la pasintecon; kaj nun via vizaĝo estas pasintecaĵo. Magio pli forta ol la mia bezoniĝas, magio pli forta ol tio kion la sorĉistoj de Tero kaj demon-mondoĵ posedas. Mi scias pri nur du kiu fortas sufiĉe por fari muldon de la pasinteco. Unu nomiĝas Pandelumo, kiu loĝas en mult-kolora lando — ”

“Embeljono,” murmuris T’sajs.

“ — sed la sorĉdiro por vojaĝi al tiu ĉi lando forgesiĝis. Krome estas iu alia, kiu estas neniam sorĉisto, kiu scias neniam

magion. Por rehavi vian vizaĝon, vi devas peti ĝin de unu el tiuj ĉi,” kaj Ĝavejn haltis, la demando de Edur jam respondita.

“Kiu estas la aliulo?” li demandis.

“Mi ne scias lian nomon. Antaŭ longe en la pasinteco, longe preter pensebleco, tiel diras la legendo, raso el justa popolo vivis en lando orienta de la Montaro Maŭrenrona, trans la Lando de la Falanta Muro, apud la bordo de grandega maro. Ili konstruis urbon el turpintoj kaj malaltaj vitraj kupoloj, kaj loĝadis kun multa kontenteco. Al tiu ĉi popolo dio mankis, kaj post iom ili sentis bezonon por unu kiun ili povu adori. Do ili konstruis lumbrilan templon el oro,

vitro kaj granito, larĝan kiel la Rivero Skaŭm' kie ĝi trafluas la Valon de Gravuritaj Tomboj, same grandan laŭ ĝia longo, kaj pli altan ol la arboj de la nordo. Kaj ĉi tiu popolo el honestaj homoj amasiĝis en la templo, kaj ĉiuj eksendis fortegan preĝon, adoran alvokon, kaj, tiel diras la legendo, dio muldita el la volego de tiu ĉi popolo ekestiĝis, kaj li estis el iliaj kvalitoj, dia ulo de absoluta justeco.

“La urbo eventuale disfalis, la templo fariĝis vitraj pecetoj kaj splitaĵoj, la popolo malaperis. Sed la dio ankoraŭ restas, fiksita por ĉiam ĉe la loko kie ties popolo lin adoradis. Kaj tiu ĉi dio havas povon preter magio. Al ĉiu kiu lin alfrontas, la dio elvolas kaj justo

ekestiĝas. Pro tio malmultaj kuraĝas porti siajn vizaĝojn antaŭ tiu ĉi dio.”

“Do al tiu ĉi dio ni iros,” diris Edur kun makabra plezuro. “Ni tri, kaj ni tri alfrontos justecon.”

Ili reiris trans la stepo al la kabano de Edur, kaj li serĉis siajn librojn por trovi metodon kio transportos ilin al la praa loko. Vane; li havis nenian tian magion por komandi. Li turniĝis al Ĝavejn.

“Ĉu vi scias pri magio kapabla porti nin al tiu ĉi praa dio?”

“Jes.”

“Kio estas tiu ĉi magio?”

“Mi vokos tri flugilhavajn estulojn el la Feraj Montoj, kaj ili portos nin.”

Edur akre rigardis la blankan vizaĝon de Ĝavejn.

“Kian rekompencan ili postulas?”

“Ili mortigas tiujn kiujn ili portas.”

“Aĥ, sorĉistino,” eksklamis Edur, “eĉ kun via volo drogita viaj respondoj honestas trompe, vi provas malbonfari al ni.” Li staris ture super la belega fiaĵo de ruĝaj haroj kaj malsekaj lipoj. “Kiel ni vojaĝu al la dio senvundite kaj neatakite?”

“Vi devas meti la flugilhavajn estulojn sub bindiĝo.”

“Voku la aĵulojn,” Edur ordonis, “kaj metu ilin sub la bindiĝo; kaj bindu ilin per ĉiom da sorĉaĵoj kiom vi scias.”

Ĝavejn vokis la kreitulojn; ili surteriĝis per klapmovaj grandaj ledecaj flugiloj. Ŝi bindis ilin sub kontrakto de sekureco, kaj ili ĝemetis kaj stampis pro desapontiĝo.

La tri pozigis sin por rajdi, kaj la kreituloj portis ilin rapide tra la nokta aero, kio jam odoris je mateno.

Orienten, senĉese orienten.
Sunleviĝis, kaj la malhela ruĝa suno

balonumis malrapide supren en la malluman ĉielon. La nigra Montaro Maŭrenrona pasis sube; kaj la nebula Lando de la Falanta Muro forlasiĝis malantaŭen. Sude estis la dezertoj de Almerio, kaj antikva mar-plafono postplenigita de ĝangalo; je nordo, la sovaĝaj arbaroj.

Dum tute la tago ili flugadis, super polvaj malplenejoj, sekaj klifoj, plua grandega montaro, kaj ĵus kiam venis sunsubiro ili malrapide glitis suben super verda parkego.

Antaŭe lumis multbrilera maro. La flugilhavaj aĵuloj surteriĝis ĉe larĝa strando, kaj Ĝavejn bindis ilin je movmalkapabolo por atendi ilian reiron.

La strando, la arbaro malantaŭa, je ambaŭ mankis ajna signo pri la mirinda urbo antikva. Sed je duono da mejlo marflanke leviĝis kelkaj rompitaĵoj kolonoj.

“La maro venis,” Edur murmuris. “La urbo sinkis.”

Li vadis maren. La maro estis kalma kaj neprofunda. T’sajs kaj Ĝavejn sekvis. Kun la akvo ĉirkaŭ iliaj talioj, kaj krepusko malheliĝanta en la ĉielo, ili trairis la rompitaĵojn de la antikva templo.

Sombre medita etoso plenigis la lokon, senpasia, supermonda, el senlimaj volo kaj potenco.

Edur staris ĉe la mezo de la malnovega templo.

“Dio el la pasinteco!” li vokegis. “Mi ne scias pri kiel vi nomiĝas, aŭ mi vokus vin per la nomo. Ni tri venis de fora lando orienta por peti justecon de vi. Se vi aŭdas kaj administros al ni ĉiuj nian meritaĵon, komuniku per signo!”

Malalttona **sibleca** voĉo venis el la aero: “Mi aŭdas kaj donos al ĉiu sian meritaĵon.” Kaj ĉiu vidis vidaĵon de ora ses-braka figuro kun ronda, kalma vizaĝo, sidanta senpasie en la navo de la giganta templo.

“Al mi senigiĝs la vizaĝo,” diris Edur. “Se vi juĝas min merita, redonu la

vizaĝon kiun mi antaŭe portis.”

La dio de la vidaĵo etendis siajn ses brakojn.

“Mi serĉis vian menson. Justeco estos farata. Vi rajtas demeti vian kapuĉon.” Malrapide, Edur deprenis sian maskon. Li metis manon al la vizaĝo. Ĝi estis lia propra.

T’sajs alrigardis lin senemocie. “Edur!” ŝi anhelis. “Mia cerbo estas senmanka! — *Mi vidas la mondon!*”

“Al ĉiu kiu venas, justo fariĝas,” diris la sibileca voĉo.

Ili aŭdis ĝemon. Ili turnis kaj

rigardis al Ĝavejn. Kie la belega vizaĝo, la franga buŝo, la senmakula haŭto?

Ŝia nazo estis tri-falda skvermanta aĉaĵo, ŝia buŝo estis putriĝanta malkulaĵo. Ŝi havis pendantaj makulaj vangegoj kaj pinta nigra frunto. La sola restaĵo simila je Ĝavejn estis la longaj ruĝaj haroj pendantaj trans la ŝultroj.

“Al ĉiu kiu venas, justo fariĝas,” diris la voĉo, kaj la vidaĵo templa fadis, kaj refoje la malvarmeta akvo de la krepuska maro ondetadis al iliaj talioj, kaj la rompitaĵoj kolonoj klinis nigraj kontraŭ la ĉielo.

Ili reiris malrapide al la flugilhavaj estuloj.

Edur turniĝis al Ĝavejn. “Iru,” li ordonis. “Flugu reire al via kaŝloĝejo. Kiam la suno subiros je morgaŭ, liberigu vin de la sorĉaĵo. Neniam maltrankviligu nin estontece, ĉar mi havas magion kiu avertus min kaj eksplodigos vin se vi proksimiĝus.”

Kaj Ĝavejn senvorte suriris sian nigran kreitulon kaj flugilumis for tra la nokto.

Edur turniĝis al T’sajs, kaj ektenis ŝian manon. Li rigardadis malsupren al ŝia klinita blanka vizaĝo, en la okulojn brilantajn kun tia febra feliĉego ke ili ŝajnis bruli. Li kliniĝis kaj kisis al ŝi la frunton; poste, kune, manon en mano, ili aliris siajn malpacience atendantajn

flugilhavajn kreitulojn, kaj tiel flugis
revene al Askolajs.



-->



Liejn la Vojiranto

Tra la malhela arbaro venis Liejn la Vojiranto, marŝante laŭ la ombroplenaj maldensejoj kun kapriola, malpez-pieda paŝado. Li fajfis, li kantis, li montris sian animan ĝojon. Ĉirkaŭ fingro li girigis etan prilaboritan bronzan cirklaĵon gravuritan per angulaj densaj skribaĵoj, nun nigre makulitaj.

Per tre ega bonŝanco li ĝin estis trovinta, ĉirkaŭ-tenanta radikon de antikva taksuso. Ĝin liber-tranĉante, li ekvidis skribaĵojn sur la interna faco — krudaj fortaj simboloj, sendube la

sorĉilaro de potenca antikva runo... Plej saĝe estus, ke li portu ĝin al magiisto, ke ĝi estu testata pri sorĉeco.

Liejn grimace ridetis. Argumentoj kontraŭis tian elekton. Foje ŝajnis kvazaŭ ĉiuj vivantaj estuloj konspiras por lin ĉagrenigi. Nur ĉi matene, la spic-vendisto — kian tumulton li faris mortante! Kiel senzorge li estis ŝsprucinta sangon sur la virkok-krestajn ŝuojn de Liejn! Tamen, pensis Liejn, ĉiu malplaĉaĵo kunportis rekompencan. Elfosante la tombon li trovis la bronzan ringon.

Kaj la animstato de Liejn tiam suprenflugis; li ridis en pura ĝojo. Li eksaltis, saltadis. Lia verda mantelo

flagradis malantaŭ li, la ruĝa plumo en lia kapo briletis kaj pulsitis... Sed tamen — Liejn malrapidigis sian paŝadon — li estis neniom pli proksima al solvo de la mistero de la magio, se magion la ringo posedis.

Eksperimentu, jen la vorto!

Li haltis kie la ruben-kolora sunlumo **oblikvis** malsupren sen obstaklo de alta foliaro, ekzamenis la ringon, sekvis la simbolojn per fingra ungo. Li trarigardis. Estis filmo apenaŭ videbla, **flagreto?** Li tenis ĝin je braka distanco. Klare, ĝi estis kroneto. Li detiris sian ĉapelon, metis la cirklon sur sian brovon, suprenruligis siajn grandajn orajn okulojn... Strange. Ĝi glitis malsupren

ĝis liaj oreloj. Ĝi kliniĝis antaŭen preter liaj okuloj. Mallumo. Panike Liejn ĝin unge detiris... Bonza ringo, diametre granda je larĝo de mano. Strange.

Li provis refoje. Ĝi glitis malsupren ĉirkaŭ lia kapo, liaj ŝultroj. Lia kapo estis en la mallumo de stranga aparta spaco. Rigardante malsupren, li vidis, ke la bordo de ekstera lumo malleviĝis kun la ringo.

Malrapide malsupren... Nun ĝi ĉirkaŭis liajn maleolojn — kaj en subita paniko, Liejn ektiris la ringon supren de ĉirkaŭ lia korpo, eniris palpebrumante la brun-ruĝan lumon de la arbaro.

Li vidis blu-blankan, verd-blankan

flagradon kontraŭ la foliaro. Estis Tŭik-viro, rajdanta libelon, kun lumo flagre rebrile flagranta de sur la libelaj flugiloj.

Liejn alvokis akre, “Jen, sinjoro! Jen, sinjoro!”

La Tŭik-viro direktis sian rajdbeston por ke pi sidiĝu sur branĉeto. “Nu, Liejn, kion vi deziras?”

“Rigardu nun, kaj memoru tion kion vi vidis.” Liejn tiris sur si la ringon ĉe kape, malsuprenigis ĝin ĝis la piedoj, levis ĝin retroe supren. Li suprenrigardis la Tŭik-viron, kiu maĉadis folion. “Kaj kion vi vidis?”

“Mi vidis, ke Liejn malaperis de

vivula rigard-kapablo — escepte de la ruĝaj kurbaj pintoj de liaj ŝuoj. Ĉio cetere estis tia kia aero.”

“Ha!” Kriis Liejn. “Pensu pri tio! Ĉu vi iam ajn vidis samaĵon?”

La Tŭik-viro demandis senzorge, “Ĉu vi havas salon? Mi volas havi salon.”

Liejn haltigis abrupte sian jubiladon, alrigardis detale la Tŭik-viron.

“Kiajn novaĵojn vi portas al mi?”

“Tri érboj mortigis Floreĝiz-on la Songê-konstruiston, kaj rompis ĉiujn liajn bobelojn. La aero super la domego estis kolora dum multaj minutoj pro la

disflugantaj fragmentoj.”

“Unu gramon.”

“Lordo Kandajv la Ora konstruis boategon el gravurita mó-ligno, alta je dek mezuroj, kaj ĝi flosas sur la Rivero Skaŭm’ cele al la ŝipkurado, plena de valoraĵoj.”

“Du gramojn.”

“Ora sorĉistino nomata Léta venis por vivi sur Herbejo Tambro. Ŝi estas kvieta kaj tre bela.”

“Tri gramojn.”

“Sufiĉe,” diris la Tŭik-viro, kaj

kliniĝis antaŭen por rigardi dum Liejn pesis la salon en eta pesilo. Li pakis ĝin en etaj pend-poŝoj ambaŭflanke de la ripo-surfaca **torako**, ekflugigis la insekton aeren kaj abrupte forflugis tra la arbaraj **volboj**.

Fojon plu Liejn provis sian bronzan ringon, kaj ĉi foje tiris ĝin tute preter siaj piedoj, elpaŝis ĝin kaj suprenportis la ringon en la malumon tenante ĝin apud si mem. Kia mire bonega sekurejo! Truo kies enirejo povus esti kaŝata ene de la truo mem! Oni tiru malsupren la ringon ĝis siaj piedoj, enpaŝu, retiru ĝin supren ĉirkaŭ la korpo kaj eliru denove en la arbaron kun malgranda bronza ringo en sia mano.

“Ho! kaj nun mi foriru al Herbejo Tambro por vidi la belan oran sorĉistinon.”

Ŝia dometo estis simpla konstruaĵo el interplektitaj **fragmitoj** — malalta duonsfero kun du rondaj fenestroj kaj malalta pordo. Li ekvidis, ke Léta estis ĉe la lageto, nud-gamba inter la akvo-fragmitoj, ĉasante ranojn por sia vepermanĝo. Blanka **kitela** robo estis suprenfiksita strikte ĉirkaŭ ŝiaj kruroj; rigide senmove ŝi staris kaj la malhela akvosurfaco ondatis en cirkloj for de ŝiaj nedikaj genuoj.

Ŝi belis pli ol Liejn estus povinta imagi, kvazaŭ unu el la disigitaj bobeloj de Floreĝiz estus rompinta surakve ĉi tie.

Ŝia haŭto estis pala kremo kirlite ora, ŝia hararo el ia pli densa oro. Ŝiaj okuloj estis tiaj, kiaj tiuj de Liejn mem, grandaj oraj globoj, kaj la ŝiaj estis larĝe apartaj, iomete klinitaj.

Liejn alpaŝis kaj starigis sin ĉe la ter-akva bordo. Ŝi suprenrigardis timetigita, ŝia matur-frukta buŝo duone malferma.

“Vidu, ora sorĉistino, jen Liejn. Li venis por bonvenigi vin al Tambro; kaj li ofertas al vi sian amikecon, sian amon...”

Léta kliniĝis suben, kuleris manplenon da ŝlimo el la ter-akva bordo kaj surĵetis ĝin al lia vizaĝo.

Kriante la plej violentajn blasfemojn, Liejn viŝis purige siajn okulojn, sed la pordo jam frape fermiĝis.

Liejn paŝis al la pordo, pugne martelegis sur ĝi.

“Malfermu kaj montru vian sorĉistinan vizaĝon, aŭ mi bruligos la dometon!”

La pordo malfermiĝis, kaj la junulino elrigardis, ridanta. “Kion nun?”

Liejn eniris la dometon kaj sin ĵetis al la virineto, sed dudek maldikaj stangoj al li akcelis, dudek pintoj pikantaj al lia brusto. Li haltis, brovoj levitaj, buŝo nerveze movetiĝanta.

“Masupreniĝu, ŝtaloj,” diris Léta. La tranĉiloj ekforiris de vido. “Tiel facile mi povus celi vian vivpovon,” diris Léta, “se mi estus volinta.”

Liejn malridetis kaj frotis sian mentonon kvazaŭ pensanta. “Vi komprenas,” li diris konvinkcele, “kiel stultas la konduto kiun vi faras. Liejn estas timita de tiuj kiuj timas timon, amata de tiuj kiuj amas amon. Kaj vi — ” liaj okuloj aprezis la oran gloron de ŝia korpo “ — vi tiom maturas kiom dolĉa frukto, vi amemas, vi briletadas kaj tremblas pro ampleto. Vi plaĉas al Liejn, kaj li spezos multan varmetecon sur vi.”

“Ne, ne,” diris Léta, kun malrapida rideto. “Vi tro hastas.”

Liejn alrigardis ŝin kun surprizo.
“Ĉu vere?”

“Mi estas Léta,” diris ŝi. “Mi estas ĉio kion vi diris. Mi fermentas, mi brulas, mi bolas. Malgraŭ tio mi povas havi nenian amanton krom tiu kiu estis al mi servinta. Li devas esti brava, rapida, ruza.”

“Mi estas li,” diris Liejn. Li mordadis sian lipon. “Ne kutime estas tiel ĉi. Mi malŝategas tiun ĉi sendecidemon.” Li antaŭiris je unu paŝo. “Venu, lasu ke ni — ”

Ŝi retropaŝis for. “Ne, ne. Vi forgesas. Kiel vi estis min servinta, kiel vi estis gajninta la rajton pretendi mian

amon?”

“Absurdeco!” tondris Liejn. “Rigardu min! Atentu mian perfektan gracon, la belecon de miaj formo kaj vizaĝo, miaj grandaj okuloj, tiom oraj kiom la viaj, miaj memevidentaj volo kaj povo... Estas vi kiu pli dece servus al mi. Mi insistas ke estu tiel.” Li malleviĝis por sidiĝi sur malalta klinseĝo. “Virino, donu al mi vinon.”

Ŝi kapneis. “En mia eta kupola domo ne eblas ke oni min perfortu. Eble ekstere, sur Herbejo Tambro — sed interne ĉi tie, inter miaj bluaj kaj ruĝaj kvastoj, kun dudek tranĉiloj el ŝtalo atendantaj mian vokon, vi devas obei min. Do elektu. Aŭ leviĝu kaj iru, por

neniam reveni, aŭ konsentu ke vi min servos per unu eta misio, kaj poste havu min kaj ĉiom mian aman ardon.”

Liejn sidadis rekte kaj rigide. Stranga estulino, la ora sorĉistino. Sed, ja vere, ŝi valoris je iom da ekzerco, kaj li ŝin devigus pagi kontraŭ ŝia impertinenteco.

“Nu, akceptite,” li diris milde. “Mi vin servos. Kion vi deziras? Juvelojn? Mi povas sufoki vin en perloj, blindigu vin per diamantoj. Mi havas du smeraldojn tiom grandaj kiom via pugno, kaj ili similas al verdaj oceanoj, en kiuj la rigardo kaptiĝas kaj vagas senilime inter vertikalaj verdaj prismoj...”

“Ne, neniuj juveloj — ”

“Iun malamikon, eble. Ah, tiel simple. Liejn mortigos por vi dek homojn. Du paŝojn antaŭen, glavpuŝon — *tiel!*” Li antaŭsaltis. “Kaj spiritoj ekiros plenĝoje supren tiel kiel bobeloj en glaso da medo.”

“Ne. Mi deziras neniajn mortigojn.”

Li kliniĝis malantaŭen, malridetanta.

“Kion do?”

Ŝi paŝis al la malantaŭo de la ĉambro kaj tiris al drapiraĵo. Ĝi svingiĝis flanken, montrante oran tapiŝon. La sceno estis de valo bordita de du krutaj montoj, larĝa valo tra kiu serena rivero fluadis,

preterpasante kvietan vilaĝon kaj tiele en arbareton. Ora estis la rivero, oraj la montoj, oraj la arboj — oroj tiom variaj, tiom belplenaj, tiom subtilaj ke la efiko estis kvazaŭ multkolora pejzaĝo. Sed la tapiŝo estis krude fortranĉita en ĝia mezo.

Liejn trovis la ĉarmon deliriga. “Ekskvizite, ekskvizite...”

Léta diris, “Montriĝas la Magia Valo de Arivénto. La alian duonon oni de mi ŝtelis, kaj ĝia reakiro estas la servo kion mi deziras de vi.”

“Kie troviĝos la alia duono?” demandegis Liejn. “Kiu estas la fiulo?”

Nun ŝi rigardis lin stude. “Ĉu vi iam

ajn aŭdis pri Ĉún? Ĉún la Neevitebla?”

Liejn konsideris. “Ne.”

“Li ŝtelis la duonon de mia tapiŝo, kaj pendigis ĝin en marmora halo, kaj tiu halo estas en la ruinaĵoj situantaj norde de Kajin.”

“Ha!” murmuris Liejn.

“La halo estas apud la Placo de Flustroj, kaj markiĝis pere de klina kolono kun nigra medaliono de fenikso kaj du-kapa lacerto.”

“Mi iras,” diris Liejn. Li malsidiĝis. “Unu tagon por iri al Kajin, unu tagon por ŝteli, unu tagon por reveni. Tri

tagojn.”

Léta sekvis lin ĝis la pordo. “Singardu kontraŭ Ĉún la Neevitebla,” ŝi flustris.

Kaj Liejn forpaŝis fajfante, la ruĝa plumo saltetanta en lia verda ĉapelo. Léta rigardis lin, poste turniĝis kaj malrapide alproksimiĝis la oran tapiŝon. “Ora Arivénto,” ŝi flustris, “mia koro ploras kaj doloras sopire al vi...”



La Derno estas pli rapida, malpli dika rivero ol la Skaŭm, ĝia pli matura fratino fluanta pli sude. Kompare al la Skaŭm kiu fluas malstrebe tra larĝa

valego, purpura pro ĉeval-floroj, makulite blanka kaj griza de disfalantaj kasteloj, la Derno tranĉis per sia fluo krutflankan kanjonon, superklinita de arbaraj klifoj.

Praa silika vojo de antaŭ longe sekvis la irejon de la Derno, sed nun la pavimo estas entranĉita de la rivera vagado, tiel ke Liejn, surpaŝanta la vojon al Kajin, foje devis forlasi la vojon kaj ĉirkaŭiri tra kreskaĵoj el dornoj kaj tub-gresoj kiuj fajfadis en la venteto.

La ruĝa suno, drivante trans la universo kiel maljuna viro rampanta al sia morto-lito, pendiĝis malalte apud la horizonto kiam Liejn atingis Porfiran Cikatron, transrigardis al blank-jura Kajin kaj la blua Golfo Sanrealo posta.

Tuj sube estis la bazaro, intermiksaĵo de budoj vendantaj frukton, tranĉaĵojn de pala viando, moluskojn el la ŝlima golfbordo, mallumajn botelojn da vino. Kaj la kvietaj homoj de Kajin moviĝis inter la budoj, aĉetantaj siajn vivtenaĵojn, portantaj tion sengarde al siaj ŝtonaj ĉambroj.

Post la bazaro situis aro da altaj ruinaj kolonoj, kvazaŭ rompitaĵoj — gamboj de la stadiono konstruita ducent futojn super la grundo fare de Freneza Reĝo Ŝen; post tio, en arbareto de laŭroj, la vitreca kupolo de la palaco videblis, de kie Kandajv la Ora regis Kajinon kaj tiom multe da Askolajs kiom oni povis vidi de altrigardejo sur Porfira Cikatro.

La Derno, ne plu klara en sia fluaĵo, verŝadis tra retejo el mucidaj kanaloj kaj subteraj tuboj, kaj fine trasorbiĝis preter putriĝantaj kajoj enire al la Golfo Sanrealo.

Liton por la nokto, pensis Liejn; pritrakti la aferon je venonta mateno.

Li saltadis malsupren laŭ la zigzagaj ŝtupoj — tien, reen, tien, reen — kaj fine eniris la bazon. Kaj nun li surmetis gravan aspekton. Liejn la Vojiranto ne estis nekonata en Kajin, kaj multaj estis sufiĉe malicaj por celi al li malbonon.

Li iradis sobre en la ombro de la Muro Pámono, turniĝis por trairi ŝtone pavimitan straton, ambaŭflankita de

malnovaj lignaj domoj lumantaj per bruna koloro simila al malnova ŝtumpakvo en la radioj de la malsupreniranta suno, kaj tiele aliris etan placon kaj la altan ŝtonan facon de la Gastejo de l' Magiisto.

La gastigisto, malgranda grasa viro, malĝoj-okula, kun eta grasa nazo samforma je sia korpo, estis skrapanta cindrojn el la fajrujo. Li rektigis la dorson kaj rapidis por aliri la malantaŭon de la kontoro de sia eta alkovo.

Liejn diris, “Ĉambron, bone-ventita, kaj vespermanĝon el fungoj, vino kaj ostroj.”

La gastiganto riverencis humile.

“Certe, sinjoro — kaj kiel vi pagos?”

Liejn malsuprenĵetis ledan sankon, ĉi matene prenitan. La gastigisto levis siajn brovojn plezure je la bonodoro.

“La pistilitaj burĝonoj de la spáso-
arbusto, portita de fora lando,” diris
Liejn.

“Bonege, bonege... Vian ĉambron
sinjoro, kaj vian vespermanĝon tuj
prezentiĝos.”

Dum Liejn manĝis, kelkaj aliaj
gastoj de la domo aperis kaj sidiĝis antaŭ
la fajro kun vino, kaj la parolado
grandiĝis, kaj temis pri sorĉistoj de la

pasinteco kaj la grandaj tagoj de magio.

“Granda Fandeaĵo konis sciaron nunforĝesitan,” diris unu maljuna viro kun hararo tinkturita oranĝe. “Li ligis blankajn fadenojn al la gamboj de paseroj kaj sendis ilin turniĝantaj laŭ lia propra direktado. Kaj kie ili trenis tiun magian plektaĵon, grandaj arboj aperis, pezaj de floroj, fruktoj, nuksoj, aŭ vezikoj de raraj likvoroj. Oni diras, ke tiele li plektis la Grandan Arbon Daŭ’ sur la bordo de Sánra Akvo.”

“Ha,” diris malgaja viro en vesto el malhelaj bluo, bruno kaj nigro, “tion ĉi mi povas fari.” Li elprenis fadenan peceton, fingre batis ĝin, girigis ĝin, diris kvietan vorton, kaj la vivpovo de la sorĉ-

formilo fandis la fadeneton farante el ĝi ŝprucaĵon de ruĝa kaj flava fajro, kiu dancis, kurbiĝis, ekiradis tien kaj reen laŭ la tablo ĝis la magaja viro ĝin estingis per gesto.

“Kaj tion ĉi mi povas fari,” diris kapuĉita figuro en nigra mantelo surŝprucita de arĝentaj cirkloj. Li elprenis etan pleton, kuŝigis ĝin sur la tablon kaj ŝprucetigis en ĝi pinĉon da cindroj el la fajrujo. Li elprenis fajfilon kaj blovis klaran tonon, kaj de sur la pleto venis flagretantaj punktetoj, briletaj per la prismaj koloroj ruĝo, bluo, verde, flavo. Ili suprendrivis ĝis futa alteco kaj disrompiĝis en ŝprucaĵo el brilaj koloroj, ĉiu laŭ bela steloformo, kaj ĉiu aparta

rompiĝo sonis kun ripeto de la origina tono — la plej klara, plej pura sono en la mondo. La punkteroj fariĝis malpli multaj, la sorĉisto blovis malsaman tonon, kaj refoje la punktetoj drivis supren por rompiĝi en ŝprucon de gloraj ornamaj brilaĵeroj. Pluan fojon — pluan ŝvarmon da punktetoj. Fine la sorĉisto remetis sian fajfilon, viŝis purige la pleton, metis ĝin ene de sia mantelo kaj refariĝis silenta.

Nun la aliaj sorĉistoj sinpuŝis antaŭen, kaj baldaŭ la aero super la tablo svarmis de vidaĵoj, skuiĝis de sorĉaĵoj. Unu montris al la grupo naŭ novajn kolorojn de neimagebla ĉarmo kaj radia belo; alia kaŭzis buŝon aperi sur la frunto

de la gastigisto por insultadi la ĉeestantaron, multe malkomfortigante la gastigiston, pro tio ke la voĉo estis lia propra. Alia montris verdan vitran botelon el kiu la vizaĝo de demono rigardis kaj grimacis; alia montris globon el pura kristalo kiu rulis antaŭen kaj reen laŭ la direkto de la sorĉisto kiu ĝin posedis, kaj kiu proponis ke ĝi estis la orel-ringo de la fabela majstro Sankaferen.

Liejn atente rigardis ĉion, ridegis kun ĝojo pri la botele kaptita demoneto, kaj per pluraj rimedoj provadis trompe instigi la posedanton de la obeema kristalo al transdono, sen sukceso.

Kaj Liejn fariĝis malbonhumora,

plendanta ke la mondo plenas de ŝtonkoraj viroj, sed la sorĉisto kun la kristala orelingo restis indiferenta, kaj eĉ tiam kiam Liejn montris diskuŝige dek du pakaĵojn da rara spico li ankraŭ rifuzis apartiĝi de sia ludilo.

Liejn petegis, “Mi nur volas plaĉigi la sorĉistinon Léta.”

“Plaĉigu ŝin do per la spico.”

Liejn diris sensuspekte, “Vere, ŝi havas nur unu deziron, peceto de tapiŝo kiun mi devas ŝteli de Ĉún la Neevitebla.”

Kaj tuj Liejn trovis sin interrigardanta aron de subite silentaj vizaĝoj.

“Kio kaŭzas tian tujan sobrecon? Nu, proprietulo, pli da vino!”

La sorĉisto kun la orelringo diris, “Se la planko malsekiĝus per vino ĝis la maleoloj — eĉ per la ege bongusta ruĝa vino de Tanvilkát — la plumba postsigno de tiu nomo ankoraŭ pezigus la aeron.”

“Ha,” ridis Liejn, “lasu ke nur gusto de tiu vino trapasi viajn lipojn, kaj la parfumaodoro forigos la tuton de memorkapablo.”

“Vidu liajn okulojn,” venis ia flustro. “Grandaj kaj oraj.”

“Kaj rapidaj al vido,” diris Liejn. “Kaj tiuj ĉi gamboj — rapidaj al kuro, tiel

rapidemaj kiel stelbrilo sur la ondoj. Kaj tiu ĉi brako — rapida por stabi per ŝtalo. Kaj mia magio — kio provizas al mi fuĝejon ekster ĉia priscio.” Li glutegis vinon el botelo. “Nun atentu. Jen magio el la tagoj praaj.” Li metis la bronzan cirkon super sian kapon, trapaŝis, prenis ĝin supren en la mallumon. Kiam li taksis la tempopason sufiĉa, li elpaŝis ĝin refoje.

La fajro lumis, la proprietulo staris en sia alkovo, la vino de Liejn situis apude. Sed pri la kunstarantaj sorĉistoj, restis nenia signo.

Liejn ĉirkaŭrigardis kun nekompreneo. “Kaj kie estas miaj sorĉistaj amikoj?”

La gastiganto turnis sian kapon. “Ili foriris al siaj ĉambroj; la nomo kiun vi diris pezis al ilia animoj.”

Kaj Liejn trinkis sian vinon en malrideta silento.



La venontan matenon li foriris la gastejon kaj elektis ĉirkaŭiran vojon al la Malnova Urbo — griza sovaĝejo el disfalintaj kolonoj, subenfleksitaj frontonoj kun dispeciĝintaj gravuraĵoj, pavimitaj terasoj superkovritaj de kreskaĵoj el rustkoloraj muskoj. Lacertoj, serpentoj, insektoj rampis tra la ruinaĵoj; nenian alian vivaĵon li vidis.

Serĉante traireblan vojon inter la ruinaĵoj, li preskaŭ stumblis sur mortintulo — la korpo de junulo, iu kiu rigardadis la ĉielon per malplenaj okulkavoj.

Liejn sentis ĉeestanton. Li saltis retroen, **rapiro** duone elingita. Kurbspina maljuna viro staris lin rigardanta. Li parolis per malforta, skua voĉo: “Kaj kion vi volas en la Malnova Urbo?”

Liejn remetis sian rapiron. “Mi serĉas la Placon de Flustroj. Eble vi min direktus.”

La maljunulo faris ranan sonon ĉe la malantaŭo de sia gorgo. “Pluan? Pluan? Kiam ĉesos la afero...” Li indikis la

mortintulon. “Tiu ĉi venis hieraŭ serĉanta la Placon de Flustroj. Li estus provinta ŝteli de Ĉún la Neevitebla. Viu lin nun.” Li turniĝis for. “Venu kun mi.” Li malaperis malantaŭ disfalaĵon el ŝtono.

Liejn sekvis. La maljuna viro staris apud alia korpo al kiu la okulkavoj estis lasite malplenaj kaj sangaj. “Tiu ĉi venis antaŭ kvar tagoj, kaj renkontis al Ĉún la Neevitebla... Kaj tiuloke malantaŭ la arĥaĵo estas kroma. Kaj tie — kaj tie — ” li indikis, indikis. “Kaj tie — kaj tie — tiel kiel muŝoj prembatitaj.”

Li turnis siajn malsekajn bluajn okulojn refoje al Liejn. “Reiru, juna viro, reiru — aŭ via korpo kuŝos tie ĉi en ĝia verda mantelo por putriĝi sur la pavim-

ŝtonoj.”

Liejn eltiris sian rapiron kaj svinge montris ĝin. “Mi estas Liejn la Vojiranto; tiu timu, kiu estus min ofendonta. Nu, kie troviĝas la Placo de Flustroj?”

“Ĉar vi insistas scii,” diris la maljunulo, “ĝi situas preter tiu rompita obelisko. Sed vi iros al ega danĝero.”

“Mi estas Liejn la Vojiranto. Danĝerego iradas kun mi.”

La maljunulo staris tiel kvazaŭ ekzemplero de vetere erodita statuo dum Liejn forpaŝadis.

Kaj Liejn demandis al si, supozu ke

tiu maljunulo estus agento de Ĉún, kaj ĉimomente estus aliranta lin?... Estas saĝe ke oni ĉiel singardi. Li sursaltis altan tablaĵon kaj kaŭre kuris ree al tiu loko kie li estis lasanta la praulon.

Jen tiu venis, murmuranta al si, klinante al sia lam-bastono. Liejn faligis blokon de granito tiom granda kiom sia kapo. Frapo, gorĝa sono, elspirego — kaj Liejn turniĝis reiri laŭ sia vojo.

Li paŝadis preter la rompita obelisko por eniri larĝan korton — la Placo de Flustroj. Transe situis longa, larĝa konstruaĵo, markita de klina kolono kun granda nigra medaliono, la signo de fenikso kaj du-kapa lacerto.

Liejn sin kaŝis en ombro de muro, staradis observanta tiel, kiel lupoj, vigle atenta por ajna flagro de ekmoviĝo.

Ĉio estis kvieta. La sunlumo aldonis mornan grandiozecon al la ruinaĵo. Ĉiuflanke, ĝis limo de okula percepto, videblis nur rompitaĵoj, senviva lando elĉerpita per mil pluvoj, tiel ke nun la homaĵeco tute forestas kaj la ŝtono unuiĝis kun la natura tero.

La suno moviĝis trans la malhele blua ĉielo. Liejn eventuale ŝteliris de sia observejo kaj ĉirkaŭiris la konstruaĵon. Nek iun nek signon vidis li.

Li alproksimiĝis la konstruaĵon de malantaŭe kaj premis sian oreilon kontraŭ

la ŝtono. Ĝi estis morte inerta, sen vibrado. Ĉirkaŭire laŭ la flanko — rigardanta supren, malsupren, al ĉiuj flankoj; fendo en la muro. Liejn enrigardadis la internon. Ĉe la malantaŭo pendis duono de ora tapiŝo. Krom tio la halo estis malplena.

Liejn rigardis supren, malsupren, al ia kaj alia flankoj. Troviĝis nenio en la vidkampo. Li pluiris ĉirkaŭ la halo.

Li alvenis alian rompitan ejon. Li enrigardis. Ĉe la malantaŭo pendis la ora tapiŝo. Nenio alia, dekstre, maldekstre, nenia vidaĵo aŭ sono.

Liejn pluiris al la enirejo de la halo kaj serĉis la **alerojn**; senvivaj kiel polvo.

Li havis senobstaklan vidkampon de la ĉambro. Sen io, malplena, krom per la fragmento de ora tapiŝo.

Liejn eniris, paŝanta per longaj molaj paŝoj. Li haltis en la mezo de la plafono. Lumo venis al li de ĉiuj flankoj krom la malantaŭa muro. Estis dek du malfermejoj tra kiuj eblis forkuri kaj nenia sono krom la nelaŭta martelado de lia koro.

Li faris du paŝojn antaŭen. La tapiŝo estis preskaŭ ĉe liaj fingropintoj.

Li paŝis antaŭen kaj rapide ektiris la tapiŝon malsupren de la muro.

Kaj malantaŭe estis Ĉún la

Neevitebla.

Liejn kriegis. Li turniĝis sur paralizitaj gamboj kaj ili estis plumbaj, kiel gamboj en sonĝo kiuj rifuzas kuri.

Ĉún faliĝis el la muro kaj antaŭeniĝis. Sur lia rebrila nigra dorso li portis robon el okul-globoj surfadenigitaj per silko.

Liejn jam estis kuranta, rapide nun. Li eksaltis, preskaŭ flugis. La pintoj de liaj ŝuoj apenaŭ tuŝis la grundon. Elde la halo, trans la placo, en la sovaĝejon de rompitaĵoj kaj falintaj kolonoj. Kaj malantaŭe venis Ĉún, kuranta kiel hundo.

Liejn rapidis laŭ la kresto de muro

kaj risortis trans granda breĉego al rompitan fontanon. Malantaŭe venis Ĉún.

Liejn ekiris laŭ mallarĝa vojeto, grimpis super mason da forĵetaĵoj, malsupren en korton. Malantaŭe venis Ĉún.

Liejn rapidegis laŭ larĝa avenuo ambaŭflankita de kelkaj **nanaj** maljunaj cipres-arboj, kaj li aŭdis la sonon de Ĉún tuj proksima. Li turnis en arĥan pordon, prenis sian bronzan ringon ĉirkaŭ sia kapo, malsupren al siaj piedoj. Li trapaŝis, prenis la magian ringon supren en la mallumon. **Azilo**. Li estis izolita en malhela magia loko, malaperinta de tera rigard- kaj sci-povo. Daŭra silento, senviva loko...

Li sentis movetiĝon de malantaŭe, elspiron de aero. Ĉe lia kubuto voĉo diris, “Mi estas Ĉún la Neevitebla.”



Léta sidadis sur sia klinseĝo apud la kandeloj, plektanta ĉapelon el ranaj haŭtoj. La pordo de ŝia dometo estis barita per stango, la fenestro-ŝutoj fermitaj. Ekstere, Hebejo Tambro restis en mallumo.

Skrapsono ĉe ŝia pordo, grinca sono kiam la seruro estis provita. Léta rigidiĝis kaj rigardadis al la pordo.

Voĉo diris, “Ĉivespere, O Léta, ĉivespere estas du longaj brilaj fadenoj

por vi. Du ĉar la okuloj estis tiom bonaj, tiom grandaj, tiom oraj...”


Léta sidadis kvieta. Ŝi atendis horon; poste ŝtelirante al la pordo, ŝi aŭskultadis. La sento de proksimeco estis for. Rano blekis de proksime.

Ŝi malrapidege malfermetis la pordon, trovis la fadenojn kaj fermis la pordon. Ŝi kuris al sia ora tapiŝo kaj ĝustigis la fadenojn en la displektitaj interkrucoj.

Kaj ŝi rigardadis al la ora valo, dolorigita per sopiro al Arivénto, kaj larmoj malkarigis al ŝi vidon de la paca rivero, la kvieta ora arbaro. “La teksaĵo malrapide plilarĝiĝas... Iun tagon ĝi estos

finita, kaj mi povos veni hejmen...”





Ulen Dor Finigas Songon

Princo Kandajv la Ora parolis serioze al sia nepo Ulen Dor. “Necesas esti komprenate, ke pligrandiĝo de la metio kaj novaj ekscioj estu kunhavaĵoj inter ni ambaŭ.”

Ulen Dor, svelta junulo, kun plej nigraj haroj, okuloj, kaj brovoj, ridetis ĉagrenite. “Sed estos nur mi sola kiu transvojaĝos la akvon forgesitan, mi kiu devos subenbatadi la mardemonojn per propra remilo.”

Kandajv kliniĝis al siaj kusenoj kaj frapetis la nazon per stangetpinto el pura jado.

“Kaj estas mi kiu ebligas la vojaĝon. Krome, mi jam estas plensukcesa sorĉisto; la ampleksiĝo de sciaĵoj nur plibonigetas la mian metion. Vi, ne eĉ novico, gajnos sciaron tian kia levos vian rangon al membriĝo inter la magiistoj de Askolajs. Jen tre granda leviĝo el de via nuntempa senefika rango. Laŭ tiela rigardo, la gajno mia malmultas, la via grandegas.”

Ulen Dor grimacis. “Sufiĉe prave, tamen mi pridisputas la vorton ‘senefika’. Mi scias pri la Kritiko de la Malvarmo de Fandéal, oni agnoskas min mastro de la

glavo, rangita inter la Ok Delafasanoj kiel...”

“Fa!” ridaĉis Kandajv. “La tede malspritaj manieroj de pala popolo, eluzantaj siajn vivojn. Fidanca murdado, troeleganta diboĉado, dum Tero trapasas siajn lastajn horojn, kaj neniu el vi ankoraŭ veturis eĉ unu mejlon for de Kajin.”

Ulen Dor tenis silenta la langon, rememorante ke Princo Kandajv la Ora mem ne famis pro sia refuzado al la plezuroj de vino, litseĝo, aŭ tablo; kaj ke ties propra plej fora iro el la kupolan palacon portis lin al ties gravurita **barĝo** sur la Rivero Skaŭm’.

Kandajv, plaĉita pri la silento de Ulen Dor, portis antaŭen **eburan** skatolon. “Tiel kaj tial. Se ni interkonsentas, mi provizos al vi per scioj.”

Ulen Dor kapjesis. “Ni interkonsentas.”

Kandajv diris, “La misio portos vin al la perdita urbo Ampridatviro.” Li rigardadis la vizaĝon de Ulen Dor el flankenturnitaj okuloj; Ulen Dor tenadis senemocian esprimon.

“Mi neniam vidis ĝin,” daŭrigis Kandajv. “Pórrino la Naŭa listigas ĝin kiel la lastan el la urboj de la Olek’hnit-a popolo, situanta sur insulo en la maro Norda Melantino.” Li malfermis la

skatolon. “Tiun ĉi rakonton mi trovis en malnova aro da volvlibroj—la testamento de poeto kiu fuĝis el Ampridatviro post la morto de Rogol Domedonfors, ilia lasta estrego, magiisto kun grandega potenco, menciita kvardektri fojojn en la Enciklopedio...”

Kandajv elprenis kraketantan volvlibron, kaj vipe malfermante ĝin, legis:

Ampridatviro nun perdiĝas. Mia popolo jam forlasis la doktrinon de fortiko kaj disciplino kaj koncerniĝas nur pri superstiĉo kaj teologio. Senĉesa estas la disputado: Ĉu Panisu estas la bonega principo kaj

Kazdal perversa, aŭ ĉu Kadzal la
virta dio kaj Panisu la esenca
malbono?

Tiuj ĉi demandoj debatiĝas
per fajro kaj ŝtalo, kaj la memoro
naŭzas min; nun mi lasas
Ampridatvron je tiu malkreskiĝo
kiu ja certe sekvos, kaj
transloĝiĝos al la mildan valon
Mel-Palusaz, kie mi elspezos tiun
ĉi lampiran vivon mian.

Mi konis la Ampridatvron
antaŭan; mi vidis la turojn
brilantajn per mirindaj lumoj,
sendantaj lumstriojn tra la nokto
por defii la sunon mem. Tiam
Ampridatviro estis bela — ho!

Mia koro doloras kiam mi pensas pri la malnova urbo. Sémir-vinoj etendiĝis suben de mil pendantaj ĝardenoj, akvo fluis blue kiel váŭl-ŝtono en la tri kanaloj. Metalaj veturiloj ruladis sur la stratoj, metalaj ĉaroj tiel svarmis en la aero kiel abeloj ĉirkaŭ abelujo — por la mirindaĵo supera el ĉiuj mirindaĵoj, ni estis ellaborintaj plektaĵojn el ŝpruca fajro por defii la pezan povon de Tero... Sed eĉ dum la mia vivo mi vidis la elĉerpiĝon de spriteco. Lumo, varmecoj, nutraĵoj, akvo, estis senpagaj al ĉiuj homoj, kaj gajnitaj kontraŭ minimuma strebo. Sekve la

popolo de Ampridatvro,
liberigitaj de ĉia laboro, donis
ĉiam plian atenton al modoj,
perversoj, kaj okultismo.

Ĝis mia plej frua memoro,
Rogol Domedonfors estris la
urbon. Li lertis pri metioj el ĉiuj
epokoj, sekretoj pri fajro kaj
lumo, gravito kaj kontraŭ-
gravito, la scienco de superpsika
numerado, metatásmo,
korolópso. Spite al lia
profundeco, li estis malpraktika
je sia estrado, kaj blinda al la
moliĝado de la Ampridatvran
spiriton. Pri tia malfortikeco kian
li vidis, li konsideris, ke estis pro

manko de edukado, kaj en liaj lastaj jaroj li evoluigis grandegan maŝinon por liberigi homojn dis de ĉia laboro, kaj tiel permesi plenan libertempon por meditado kaj asketa disciplino.

Dum Rogol Demedonfors prilaboradis sian grandan kreaĵon, la urbo disiĝis en ĥaoson — rezulto de strangege religia histerio.

La rivalaj sektoj de Pansju kaj Kadzal jam delonge ekzistadis, sed malmutaj krom la pastroj atentis la disputon. Subite la kultoj fariĝis laŭmodaj; la poplo amasiĝis por adori aŭ unu

aŭ la alia el la dioj. La pastroj, jam longe ĵaluzaj rivaloj, sentis grandegan plaĉiĝon pro sia nova povo, kaj admonis ambaŭ sian sektanaron al fanatika fervoro. Disputoj leviĝis, emocio grandiĝis, okazis tumultado kaj violento. Kaj je unu malbona tago ŝtono frapis al Rogol Domedonfors, faligis lin de balkono.

Kripligita kaj plimalsaniĝinta sed rifuzanta sian morton, Rogol Demedonfors plenumis sian subteran meĥanisman, instalis vestiblojn multloke tra la urbo, kaj poste

aliris sian mortlilon. Li eldiris unu ordonon al sia nova maŝino, kaj kiam Ampridatviro vekigis postamatene, la popolo tiam trovis ke sia urbo estis sen kaj energio kaj lumo, la fabrikoj kvietaj, la kanaloj forfluigitaj.

En teruro ili rapidis al Rogol Domedonfors, kiu diris: “Longe mi blindis al via **dekadenco** kaj strangaĵoj; nun mi malestimas vin; vi fariĝis kaŭzo de mia morto.”

“Sed la urbo mortas! La gento pereas!” ili kriis.

“Vi devas savi vin mem,”

Rogol Demondonfors diris ilin. “Vi ignoradis la antikvan saĝaĵon, vi fariĝis tro pigraj por studi, vi serĉis facilan **komplezon** de religio, anstataŭ alfronti kuraĝe la mondon. Mi decidegis trudi al vi amaran spertaĵon, kion mi esperas, provos boninstruan.”

Li vokis al la rivalaj pastroj de Pansju and Kazdal, kaj mane transdonis al ĉiuj tabulon el travidebla metalo.

“Ĉi tiuj tabuloj unuope malutilas; kuŝitaj kune, mesaĝo povas leĝiĝi. Tiu kiu legus la mesaĝon ekhavos la ŝlosilon de antikva lertaĵo, kaj ordonpovus

tiun potencon kiun mi celigis je la propra uzo. Nun iru, kaj mi mortos.”

La pastroj, rigardantaj minace unu la alian, foriris, vokis siajn anojn, kaj tiel komencis grandegan militon.

La korpo de Rogol Demedonfors neniam troviĝis, kaj kelkaj diras ke lia skeleto ankoraŭ kuŝadas en la koridoroj sub la urbo. La tabuloj situas ŝirmitaj en la rivalaj temploj. Nokte okazas murdoj, tage okazas malsatmortiĝo en la stratoj. Multaj fuĝis al la kontinenton, kaj nun mi sekvas,

forlasante Ampridatvron, la lastan hejmon de la gento. Mi konstruos lignan kabaneton sur la klinflanko de Monto Liu kaj travivu miajn tagojn en la valo Mel-Palusaz.

Kandajv volvis la volvlibron kaj remetis ĝin en la skatolon. “Via tasko,” li diris al Ulen Dor, “estas veturi al Ampridatvro kaj akiri la magion de Rogol Domedonfors.”

Ulen Dor diris pensoplene, “Estis longe antaŭe... Milojn da jaroj...”

“Ĝuste,” diris Kandajv. “Tamen, neniuj el la historioj aŭ indekso mencias plu pri Rogol Domendonfors, kaj tial mi

kredas ke la saĝo de Rogol Domendonfors ankoraŭ daŭras por esti trovata en antikva Ampridatviro.”



Tri semajnojn Ulen Dor **navigadis** sur la **apatia** oceano. La suno leviĝis brila kiel sango de la horizonto kaj arĥis trans la ĉielo; kaj la akvo kalmis, krom pro ondetoj faritaj de la venteto kaj la du pliapartiĝintaj: La pli juna viro signoj de la postboata ondaro.

Poste venis la sunsubiro, la lasta malgaja rigardo al la mondo; poste purpura krepusko kaj la nokto. La malnovaj steloj traplenigis la ĉielon kaj la postboata ondaro malantaŭa montriĝis

morte blanka. Tiam li rigardadis la **hulojn** de la surfaco ĉar li sentis sin ege sola sur la malluma faco de la oceano.

Tri semajnojn Ulen Dor navigadis la Golfon Melantino, norden kaj okcidenten, kaj iun matenon li vidis dekstre la ombron de landlimo kaj maldekstre la maltrankvilige malklaran altformon de insulo, preskaŭ nevidebla pro nebuleco.

Proksime for de la **pobo** flosis maleleganta barĝo, moviĝanta peze sub kvadrata velo el plektitaj fragmitoj.

Ulen Dor navigis sian boaton por veturi apude, kaj vidis sur la barĝo du virojn en malglataj verdaj kiteloj

trenlogante por kapti fiŝojn. Ili havis **avene** flavetajn harojn kaj bluajn okulojn, kaj ili montris esprimojn de stultigita surprizo.

Ulen Dor lasis fali sian velon kaj ektenis per mano la bargon. Li fiŝkaptistoj nek movis nek parolis.

Ulen Dor diris, “Vi ŝajnas nefamiliaraj pri la vido de homoj.”

La pli maljuna viro komencis nervozan ĉanton kiun Ulen Dor komprenis defenda preĝo kontraŭ demonoj kaj frîtoj.

Ulen Dor ridis. “Kial vi kontraŭpreĝas min? Mi estas viro simila

je vi mem.”

La pli juna viro diris en plata dialekto: “Ni rezonas, ke vi estas demono. Unue, ekzistas neniu el nia gento kun nokte nigraj haroj kaj okuloj. Due, la Vorto de Pansju rifuzas la ekzistecon de ĉiuj aliaj viroj. Sekve, vi povas esti nenia viro, kaj devas esti demono.”

La pli maljuna viro diris malantaŭ sia mano, “Tenu kvieta la langon; parolu nenan vorton. Li malbenos la tonojn de via voĉo...”

“Vi malpravas, mi certigas vin,” respondis Ulen Dor ĝentile. “Ĉu iu el vi iam ajn vidis demonon?”

“Neniujn krom la Gaŭnoj.”

“Ĉu mi similas al la Gaŭnoj?”

“Neniel,” agnoskis la pli maljuna viro. Lia kunulo indikis la malhele skarlatan jakon kaj verdan pantalonon de Ulen Dor. “Li evidente estas Rabmisiisto; priatentu la kolorojn de liaj vestoj.”

Ulen Dor diris, “Ne, mi estas nek Rabmisiisto nek demono. Mi nur estas homo...”

“Neniuj viroj ekzistas krom la Verduloj — tiel diras Pansju.”

Ulen Dor klinis eke malantaŭen la kapon kaj ridis. “Tero estas nur sovaĝejoj

kaj ruinoj, ja vere, sed multaj viroj ankoraŭ marŝas sur ĝi... Diru al mi, ĉu la urbo Ampridatviro troveblas sur tiu insulo antaŭa?”

La pli juna viro kapjesis.

“Kaj vi loĝas tie?”

Refoje la juna viro jesis.

Ulen Dor diris senkomforte, “Mi komprenis, ke Ampridatviro estis senhoma ruino — forlasita, antikve malplena.”

La juna viro demandis kun kalkula esprimo, “Kaj kion vi serĉas ĉe Ampridatviro?”

Ulen Dor pensis, mi mencios la tabulojn kaj observos ilian reagon. Estus bone lerni pri tio, ĉu ĉi tabuloj estas konataj, kaj se tiel, kiel oni ilin rigardas. Li diris, “Mi jam veturis tri semajnojn por trovi Ampridatvron kaj enketi pri iuj tabuloj el legendo...”

“Ho,” diris la pli maljuna viro. “La tabulojn! Li estas Rabmisiisto, do. Mi vidas tion klare. Atentu lian verdan pantalonon. Rabmisiisto por la Verduloj...”

Ulen Dor, atendente malamikecon rezulte de tiu ĉi identiĝo, surpriziĝis pro trovi plaĉajn esprimojn sur la vizaĝoj de la viroj, kvazaŭ ili ĵus solvis probleman paradokson. Nu bone, li pensis, se ili

volas ke estu tiel, lasu esti.

La pli juna viro deziris plenan klarecon. “Ĉu tiel vi deklaras, malhela viro? Ĉu vi portas ruĝon kiel rabmisiisto por la Verduloj?”

Ulen Dor diris singarde, “Miaj planoj ne plene decidiĝis.”

“Sed vi portas ruĝon! Tio estas la koloro kion portas la rabmisiistoj!”

Ĉi tie estas strange disrompita pensmaniero, pensis Ulen Dor. Preskaŭ estas kvazaŭ roko blokas la fluadon de ilia pensado kaj deflankigas la kurenton en ŝprucon kaj nebulon. Li diris, “Kie mi devenas, tie viro portas tiajn kolorojn

kiajn li mem elektas.”

La pli maluna viro fervore diris, “Sed vi portas Verdon, do evidente vi elektis misie rabi por la Verduloj.”

Ulen Dor gestis ŝultroleve, sensante la blokon kiu kontraŭas mensan kanalon. “Laŭ via plaĉo... Kiujn aliajn ekzistas?”

“Neniajn, neniujn aliajn,” respondis la pli maljuna viro. “Ni estas la Verduloj de Ampridatviro.”

“Nu — kiun Misiisto rabas?”

La pli juna viro moviĝis senkomforte kaj entiris sian fadenon. “Li rabas ruinan templon de la demono

Kazdal, por la perdita tabulo de Rogol Domedonfors.”

“Tiukaze,” diris Ulen Dor, “mi eble fariĝus Rabmisiisto.”

“Por la Verduloj,” diris la maljunulo, alrigardante lin flanke.

“Sufiĉe, suriĉe,” diris la alia. “La suno jam pasis la zeniton. Decas ke ni hejmeniru.”

“Jes, ja,” diris la alia viro, kun subita energio. “La suno falas.”

La plijuna viro rigardis al Ulen Dor. “Se vi proponas rabi, decas ke vi venu kun ni.”

Ulen Dor ĵetis ŝnuron al la bargo, tiel kunigante la puŝforton de sia velo al tiu de la plektitaj fragmitoj, kaj ili turnis siajn pobojn al la insula bordo.

Estis tre bele, transirante la sunlumajn posttagmezajn hulojn alire al la arbara insulo, kaj dum ili rondiris la orientan kabon, Ampridatviro aperis al vido.

Linio de malaltaj konstruaĵoj frontis la havenon, kaj malantaŭe leviĝis turoj tiaj kiajn Ulen Dor neniam imagis, ke povis ekzisti — metalaj pinturoj etendiĝegantaj preter la alteco de la insulo mem por briletadi en la lumo de la subiranta suno. Tiaj urboj estis legendaĵoj el la pasinteco, sonĝoj pri tempo pri tiam

kiam la Tero estis juna.

Ulen Dor rigardadis teorie al la bargo, al la malmolaj verdaj manteloj de la fiŝkaptistoj. Kial ili estas kruduloj? Ĉu li mem fariĝus objekto priŝercinda pro tiel alveni la brilan urbegon? Li turniĝis maltrankvile al la insulo, mordante la lipojn. Laŭ Kandajv, Ampridatviro devus esti ruino el faliĝintaj turoj kaj rublo, kiel la Malnova Urbo super Kajin...

La suno falis kontraŭ la akvon, kaj nun Ulen Dor, kun subita ŝoko, atentis pri la rublaĵo ĉe turaj bazoj; jen tio atendita, tiom multe da forlaseco kiom Kandajv estis prognozinta. Strange, la fakto donis al Ampridatviro plian majestecon, tian dignecon kian havas perdita monumento.

La vento jam plimildiĝis, la antaŭiradon de la boato kaj bargho estis ja malrapida. La fiŝkaptistoj montris signojn de maltrankvilo, murmurantaj inter si, ĝustigantaj sian velon por plibone kapti la venton, plistriktigantaj la stajojn. Sed antaŭ ol ili flosis enen preter la moleo, purpura krepusko jam falis transkovrante la urbon, kaj la turoj fariĝis grandegaj nigraj monolitoj. En la preskaŭa mallumo ili ligis al kajo el arbostangoj, inter aliaj barghoj, kelkaj farbitaj verde, aliaj grize.

Ulen Dor saltis al la kajon. “Momenton,” diris la plijuna fiŝkaptisto, rigardante la ruĝan jakon de Ulen Dor. “Estus malsaĝe, ke vi portus tiajn vestojn, eĉ je nokto.” Li mane traserĉis skatolon

kaj elprenis verdan **pelerinon**, kadukan kaj fiŝe fiodoran. “Portu tion ĉi, kaj tenu la kapuĉon por kovri viajn nigrajn harojn...”

Ulen Dor obeis kun privata grimaco. Li demandis, “Kie povas mi manĝi kaj kuŝi ĉinokte? Ĉu estas hoteloj aŭ gastejoj en Ampridatviro?”

La plijuna viro diris sen entuziasmo, “Vi rajtas trapasi la nokton ĉe mia halo.”

La fiŝkaptistoj pendigis la kaptitaron trans la ŝultrojn, surpaŝis la kajon, kaj rigardegis maltrankvile tra la ruboj.

“Vi maltrankvilas,” observis Ulen Dor.

“Ja,” diris la pli juna viro. “Je nokto la Gaŭnoj travagas la stratojn.”

“Kioj estas la Gaŭnoj?”

“Demonoj.”

“Ekzistas multaj specoj el demonoj,” Ulen Dor diris facile. “Kiaj estu ĉi tiuj?”

“Ili similas al hororaj viroj. Ili havas grande longajn brakojn kiuj kroĉas kaj disŝiras...”

“Ho!” murmuris Ulen Dor, palpante la tenilon de sia glavo. “Kial vi permesas al ili vagadon?”

“Ni ne povas vundi ilin. Ili estas

sovaĝaj kaj fortikaj — sed feliĉe, ne tre lertmovaj. Kun bonŝanco kaj atentemo...”

Ulen Dor nun serĉe rigardis la rubon kun esprimo tiom zorga kiom tiuj de la fiŝkaptistoj. Ĉi tiuj homoj estis familiaraj pri la danĝeroj de la loko; li estos obeanta iliajn konsilojn ĝis tiam kiam li mem saĝos pli.

Ili iris fadene inter la unuaj disaĵoj de ruinaroj, eniris kanjonon ombritan per la postlumo post pinturoj ambaŭflankaj, plenan de mallumo.

Morteco! pensis Ulen Dor. La loko estis sub tavolo el polva morto. Kie estis la viglaj milionoj de antaŭlonga

Ampridatviro? Morta polvo, ilia akveco estante intermiksita en la oceano, apud tio de ĉiu alia viro kaj virino kiu iam vivis sur Tero.

Ulen Dor kaj la du fiŝkaptistoj moviĝis laŭ la avenuo, pigmeaj figuroj vagantaj ŝongourbon, kaj Ulen Dor rigardis malvarme flankon je flanko... Princo Kandajv estis parolanta prave. Ampridatviro estis la difina ekzemplero de antikveco. La fenestroj gapis nigre, betono jam fendiĝis, balkonoj pendis freneze, terasoj surhavis montetojn da polvo, stratoj pleniĝis de rubaĵo — blokoj da ŝtono de falintaj kolonoj, dispremita kaj frapita metalo.

Malgraŭ tio, Ampridatviro ankoraŭ

moviĝis kun stranga senĉesa viveco kie la konstruistoj estis uzintaj senaĝan materialon, eternajn energiojn. Strioj da malhela briletanta materialo fluis kiel akvo ambaŭflanke de la strato — malrapide ĉe la randoj, rapide ĉe la centro.

La fiŝkaptistoj paŝis kun ĉiutaga maniero sur tiun strion, kaj Ulen Dor delikate sekvis ilin al la rapidan centron. “Mi vidas, ke vojoj fluas kiel riveroj en Ampridatviro,” li diris. “Vi nomas min demono; fakte mi kredas, ke la ganto portiĝas sur la alia mano.”

“Ne estas magiaĵo,” diris la pli juna viro post nelonge. “Estas nur la kutima afero de Ampridatviro.”

Po regulaj interspacoj laŭ la strato staris ŝtonaj vestibloj ĉirkaŭ dek futojn altaj kiuj havis aspekton de ŝirmaj rampoj kondukantaj sub la straton.

“Kio troviĝas sube?” demandis Ulen Dor.

La fiŝkaptistoj gestis ŝultroleve. “La pordoj estas firmaj. Neniu viro iam ajn trairis. Legendo diras, ke firmigi ilin estis la fina farado de Rogol Domedonfors.”

Ulen Dor detenis sin je pluaj demandoj, observante kreskantan nervozecon en la fiŝkaptistoj. Infektita de ilia antaŭtimo li pozadis la manon ĉe sia ganto.

“Neniuj vivas en ĉi tiu parto de Ampridatvro,” diris la maljuna fiŝkaptisto en raŭka flustro. “Ĝi estas antikva preter imagkapablo, plena de fantomoj.”

La stratoj kondukis al centra placo, la turoj apartiĝis antaŭ ili en tiu spaco. La glitanta strio malrapidiĝis haltiĝe, kvazaŭ akvo enfluanta basenon. Ĉi tiel lumis la unua artefarita lampo kiun ekvidis Ulen Dor — brila globo pendants de volvforma metala fosto.

En tiu lumo Ulen Dor vidis junulon en griza mantelo haste transirantan la placon... Estis moviĝo inter la ruinaĵoj; la fiŝkaptistoj aĥis, ekkaŭris. Kreitulo mortintule pala risorte eksaltis en la lumon. Ĝiaj brakoj pendis nodecaj kaj

longaj; malpura felo kovris ties gambojn. Grandaj okuloj rigardegis el pinta, funge blanka kranio; du dentegoj pendis super antaŭpuŝa mandiblo. Ĝi sursaltis al kompatindulon grize vestitan kaj puŝmetis lin sub la brakon; poste, turniĝante, donis esprimon minace triumfan al Ulen Dor kaj la fiŝkaptistoj. Kaj nun ili vidis, ke la viktimo estis virino...

Ulen Dor elprenis sian glavon. “Ne, ne!” flustris la pli maljuna viro. “La Gaŭno laŭiros sian vojon!”

“Sed la virino kiun ĝi kaptis! Ni povas savi ŝin!”

“La Gaŭno estas kaptinta neniun.”

La maljuna viro alkroĉis lin je la ŝultro.

“Ĉu vi blindas, viro?” kriis Ulen Dor.

“Loĝas neniuj en Ampridatviro krom la Verduloj,” diris la plijuna viro. “Restu ĉu ni.”

Ulen Dor hezitis. Ĉu la virino en grizaĵoj, do, fantomo? Se jes, kial la fiŝkaptistoj ne tiel diris?... La Gaŭno, kun impertinenta malhasteco, marŝadis la longa konstruaĵo el malhelaj disfalintaj arkoj.

Ulen Dor kuris trans la blanka placo de antikva Ampridatviro.

La monstro tordiĝis por fronti lin kaj ĵetis grandan nodecan brakon, tiel longan kiel viro altas, finiĝantan en blank-fela nodo da fingroj. Ulen Dor hak-svingis grandegan alfrapon per sia glavo; la antaŭbrako de la Gaŭno pendis per peceto da karno kaj osta ŝplitaĵo.

Saltante malantaŭen por eviti la ŝprucon de sango, Ulen Dor kurbiĝis por ekteni la alian brakon dum ĝi preterpasis. Li hakis refoje, plua grandega alfrapo, kaj la dua antaŭbrako ekpendiĝis malstrikte. Li risortis proksimen, plonĝigis sian glavon al la okulo de la kreitulo kaj atakis supren en la kranion de la bestulo.

La kreitulo mortis dum serio da sovaĝaj saltiroj, frenezaj agonioj kiuj

portis lin ĉirkaŭen laŭ la placo.

Ulen Dor, anhelante, baraktante kontraŭ naŭzo, ekrigardis suben al la surpriz-okula virino. Ŝi estis leviĝanta por stari sur la piedojn. Li etendis brakon por helpi ŝin stabiliĝi, observante ke ŝi estis svelta kaj juna, kun blondaj haroj pendantaj malstrikte ĝis la nivelo de la mandiblo. Ŝi havis plaĉan, belan vizaĝon, pensis Ulen Dor — malkaŝeman, klar-okulan, senkulpecan.

Ŝajnis, ke ŝi ne atentis lin, sed staris duone turniĝinta for, volvante sian mantelon ĉirkaŭ si. Ulen Dor komencis timi ke la ŝoko estis afektinta al ŝi la menson. Li moviĝis antaŭe kaj rigardis rekte ŝian vizaĝon.

“Ĉu vi sanas? Ĉu la besto vundis vin?”

Surprizo ekmontriĝis sur ŝia vizaĝo, preskaŭ kvazaŭ Ulen Dor estis plua Gaŭno. Ŝia rigardo ekis al lia verda mantelo, rapide moviĝis reen al lia vizaĝo, liaj nigraj haroj.

“Kiu ... estas vi?” ŝi flustris.

“Fremdulo,” diris Ulen Dor, “kaj multe konfuzita pro la kutimoj de Ampridatvro.” Li rigardis serĉe por la fiŝkaptistoj; ili nenie videblis.

“Fremdulo?” la knabino demandis. “Sed la unua Instruaro de Kadzal diras al ni ke la Gaŭnoj jam detruis ĉiujn homojn

krom la Grizuloj de Ampridatviro.”

“Kazdal tiom eraras kiom Pansju,” rimarkis Ulen Dor. “Ankoraŭ restas multaj homoj en la mondo.”

“Mi devas kredi,” diris la knabino. “Vi parolas, vi ekzistas — tiom da aferoj klaras.”

Ulen Dor observis ke ŝi tenis sian rigardon turnita for de lia verda mantelo. Ĝi fiodoris fiŝe; sen plua ekspliko li ĵetis ĝin flanken.

Ŝia rigardo direktiĝis al lia ruĝa jako. “Rabmissisto...”

“Ne, ne, ne!” eksklamis Ulen Dor.

“Fakte, mi trovas tiun ĉi paroladon pri koloro agace teda. Mi estas Ulen Dor el Kajin, nepo de Princo Kandajv la Ora, kaj mi misio estas serĉi la tabulojn de Rogol Domedonfors.”

La virino ridetis milde. “Tiel faras la Rabmisistoj, kaj ili tial vestas sin ruĝe, kaj poste la manoj de ĉiuj homoj turniĝas atake kontraŭ ili, pro tio ke, kiam ili vestas sin ruĝe, neniu konas ilin por esti aŭ Grizuloj aŭ...”

“Aŭ kio?”

Ŝi aspektis ekkonfuzita, kvazaŭ tiu ĉi flanko de la demando ne prezentiĝis al ŝi. “Fantomoj? Demonoj? Troviĝas strangaj manifestaĵoj en Ampridatvro.”

“Nedisputeble,” kunsentis Ulen Dor. Li ekrigardis trans la placo. “Se vi deziras, mi gardos vin ĝis vi atingos la hejmon; kaj eble estos angulo kie mi povos dormi ĉinokte.”

Ŝi diris, “Mi ŝuldas al vi la vivon, kaj mi helpos vin kiel eble mi povas. Sed mi ne bravas riski tion, ke vin mi konduku al mia halo.” Ŝiaj okuloj vagis suben laŭ lia korpo ĝis lia verda pantalono kaj deflankiĝis for. “Okazus konfuziĝo kaj senĉesaj eksplikadoj...”

Ulen Dor diris oblikve, “Vi havas parulon, ĉu?”

Ŝi ekrigardis rapide al li — iome stranga **koketado**, stranga flirteco tie en la

ombroj de antikva Ampridatviro, la junulino en sia griza mantelo, ŝia kapo klinita flanken kaj la flavaj haroj falantaj ĝis la ŝultro; Ulen Dor eleganta, malhele aĝle aspekta, plene regkapabla je sia animo.

“Ne,” ŝi diris. “Estis neniuj, ankoraŭ ne.” Eta sono maltrankviligis ŝin; ŝi ekis, rigardis timoplene trans la placon.

“Povas esti pli da Gaŭnoj. Mi povas konduki vin al loko sekura; poste, morgaŭ ni parolos...”

Ŝi gvidis lin tra arka portiko enire al unu el la turoj, supren al duonetaĝan nivelon. “Vi estos sekura ĉi tie ĝis mateno.” Ŝi manpremis al li la brakon.

“Mi portos manĝaĵon al vi, se vi atendos min...”

“Mi atendos.”

Ŝia rigardo falis kun la duone-deflankigita ŝanceliĝo de la okuloj al lia ruĝa jako, nur momente glitis preter lia verda pantalono. “Kaj mi portos al vi mantelon.” Ŝi foriris. Ulen Dor vidis ŝin rapidi facile malsupren laŭ la ŝtuparo kaj elire de la turo tiel kiel fantomo. Ŝi estis for.

Li komfortigis sin sidiĝe sur la planko. Ĝi estis mola elasta substanco, varmeta je tuŝo... Stranga urbo, pensis Ulen Dor, stranga popolo, reagantaj al nekonjekteblaj devigoj. Aŭ ĉu ili estis

fantomoj, fakte?

Li senkonsciiĝis en serio da subitaj duondormoj, vekiĝis fine por trovi ke la malforta rozeco de sunleviĝo kutima al ĉi tiuj finaj tagoj de la suno jam likadis enen tra la arka portiko.

Li stariĝis, frotis la vizaĝon, kaj, post momenta hezito, malsupreniris de la duonetaĝo al la grunda nivelo de la turo kaj elmarŝis sur la straton. Infano en griza kitelo vidis lian ruĝan jakon, ekmovis la okulojn for por vidi la verdan pantalonon, kriis pro teruriĝo, kaj ekkuris trans la placon.

Ulen Dor retrois en la ombrojn kun blasfemo. Li estis atendanta senhomecon.

Malamikecon li estus povinta kontraŭi aŭ forkuri, sed tiu ĉi senkomprenanta ektimiĝo lasis lin sendecida pri kion fari.

Formo aperis ĉe la enirejo — la junulino. Ŝi strebe enrigardis la ombrojn; ŝia vizaĝo estis strikta, nervoz-esprima. Subite ŝi ridetis kaj ŝia vizaĝo ŝanĝiĝis.

“Mi portas vian matenmanĝaĵon,” ŝi diris, “ankaŭ taŭgan veston.”

Ŝi kuŝigis panon kaj funsekigitan fiŝviandon antaŭ li, kaj verŝis varmetan herban teon el argila poto.

Dum li manĝis li rigardis ŝin, kaj ŝi rigardis lin. Estis strikteco en ilia interrilato; ŝi sentis sin ne plene sekura;

kaj li povis senti la premecon de ŝia menso.

“Kiu estas via nomo?” ŝi demandis.

“Mi estas Ulen Dor. Kaj via?”

“Elaj.”

“Elaj... Ĉu tio entute?”

“Ĉu mi bezonas pluan? Tio sufiĉas, ĉu ne?”

“Ho, vere.”

Ŝi sidiĝis kruc-gambe kontraŭ li.

“Diru al mi pri la lando de kie vi venis.”

Ulen Dor diris, “Askolajs nun estas plejparte arbaro, kie malmultaj volas loĝi. Mi loĝas en Kajin, tre malnova urbo, eble tiom malnova kiom Ampridatviro, sed ni havas neniajn tiajn turojn kaj flosantajn vojojn. Ni loĝas en la antikvaj konstruaĵoj el marmoro kaj ligno, eĉ la plej malriĉa kaj servista. Fakte, kelkaj belaj domegoj disfalas en ruinojn pro manko de loĝantoj.”

“Kaj kio estas via koloro?” ŝi demandis en pritima voĉo.

Ulen Dor diris senpacience, “Kia sensencaĵo. Ni portas ĉiujn kolorojn; neniuj pripensas iel aŭ aliel pri la afero... Kial vi zorgas pri koloroj tiom ege? Ekzemple, kial vi portas grizon kaj ne

verdon?”

Ŝia rigardo ŝancelis kaj forturniĝis de lia; ŝi pugnigis la manojn nerveze. “Verdo? Tio estas la koloro de la demono Pansju. Neniu en Ampridatviro portas verdon.”

“Certe homoj portas verdon,” diris Ulen Dor. “Mi renkontis du fiŝkaptistojn hieraŭ surmare portantajn verdaĵojn, kaj ili gvidis min en la urbon.”

Ŝi kapneis, ridetnata malgaje. “Vi eraras.”

Ulen Dor kliniĝis malantaŭen. Li diris post nelonge, “Infano vidis min ĉimatene kaj forkuris krieganta.”

“Pro via ruĝa mantelo,” diris Elaj. “Kiam viro volas akiri honoron al si mem, li surmetas ruĝan jakon kaj ekiras trans la urbo al la antikva senhoma templo de Pansju, por serĉi la perditan duonon de la tabulo de Rogol Domedonfors. Legendo diras, ke kiam la Grizuloj rekiros la perditan tabulon, tiam refortiĝos ilia povo refoje.”

“Se la templo malplenas de homoj,” demandis Ulen Dor sekhumore, “kial ne okazis ke iu viro jam prenis la tabulon?”

Ŝi ŝultrolevis kaj rigardadis senfokuse en la distancon. “Ni kredas, ke ĝi estas gardata fare de fantomoj... Ĉiaokaze, foje viro portanta ruĝon troviĝas rabanta la templon de Kadzal

ankaŭ, post kiam li estas tuj mortigata. Viro vestita ruĝe tial malamikiĝas je ĉiuj, kaj ĉies manoj kontraŭas lin.”

Ulen Dor stariĝis kaj volvis sin en la griza mantelo kiun la junulino estis portanta al li.

“Kio estas viaj planoj?” ŝi demandis, rapide stariĝanta.

“Mi volas alrigardi la tabulojn de Rogol Domedonfors, kaj en la Temploj de kaj Kadzal kaj Pansju.”

Ŝi kapneis, “Ne eblas. La Templo de Kadzal estas malpermesata al ĉiu krom la honorataj pastroj, kaj la Templo de Pansju defendiĝas fare de fantomoj.”

Ulen Dor ridetis humore. “Se vi montrus al mi kie situas la temploj...”

Ŝi diris, “Mi iros kun vi... Sed vi devas resti volvita en la mantelo, aŭ estos malbone por ni ambaŭ.”

Ili elpaŝis en la sunlumon. La placo montris punktojn el malrapide moviĝantaj grupoj da viroj kaj virinoj. Kelkaj portis verdon, aliaj grizon, kaj Ulen Dor observis, ke estis nenia interagado inter la du. Verduloj paŭzis ĉe etaj verde farbitaj budoj vendantaj fiŝon, ledon, fruktojn, grenojn, argilaĵojn, korbojn. Grizuloj aĉetadis de similaj budoj farbitaj grize. Li vidis du grupojn da infanoj, unu en verdaj vestaĉoj, la alia en grizaj, ludantaj interproksime je dek

futoj, rekonanta unu la alian ne eĉ per ekrigardo. Pilko el kunligitaj tolpecoj ruliĝis de la Grizaj infanoj inter luktetanta grupo da Ferduloj. Griza infano alkuris, prenis la pilkon de sub la piedoj de Verda infano, kaj neniu el ili rekonis la alian eĉ minimume.

“Strange,” murmuris Ulen Dor.
“Strange.”

“Kio strangas?” demandis Elaj. “Mi vidas nenion strangan...”

“Rigardu,” diris Ulen Dor, “apud tiun kolonon. Ĉu vi vidas tiun viron en la verda mantelo?”

Ŝi alrigardis lin konfuzite. “Neniu

viro estas tie.”

“Viro estas tie,” diris Ulen Dor.
“Rigardu denove.”

Ŝi ridis. “Vi ŝercas ... aŭ ĉu vi povas vidi fantomojn?”

Ulen Dor kapneis pro venkiĝo. “Vi ĉiuj estas viktimoj de iu forta magio.”

Ŝi kondukis lin al unu el la fluantaj vojoj; dum ili portiĝis tra la urbo li observis boat-forman ŝelon konstruitan el brila metalo kun kvar radoj kaj travidebla kupola ĉambreto.

Li indikis fingre. “Kio estas tio?”

“Ĝi estas magia ĉaro. Kiam certa stango premiĝas tiam la sorĉaĵo de antikvaj tempoj donas al ĝi egan rapidon. Riskemaj junaj viroj rajdas ilin laŭ la vojoj... Rigardu tien,” kaj ŝi indikis fingre al iom simila ŝelo falinta en la basenon de longa, seka fontano. “Jen alia el la antikvaj mirindaĵoj — vehiklo kun la povo por flugi tra la aero. Estas multe da ili dise troveblaj tra la urbo — sur la turoj, sur altaj terasoj, kaj foje, kiel ĉi tiu, falintaj surstraten.”

“Kaj neniu flugrajdas ilin?” demandis Ulen Dor pro kuriozeco.

“Ni ĉiuj timas.”

Ulen Dor pensis, kia mirindaĵo estus

posedi unu el tiuj aero-ĉaroj! Li elpaŝis de la fluanta vojo.

“Kien vi iras?” demandis Elaj nervoze, sekvante post li.

“Mi volas ekzameni unu el tiuj ĉi aero-ĉaroj.”

“Estu zorga, Ulen Dor. Oni diras, ke ili danĝeras...”

Ulen Dor enrigardadis tra la travidebla kupolo, li vidis remburitan seĝon, aron da etaj stangoj surskribitaj de signoj al li nekonataj kaj grandan **iks-kanelitan** sferon muntitan sur metala stangeto.

Li diris al la knabino, “Tiuĵ evidente estas la gvidiloĵ de la meĥanismo... Kiel oni eniras tian ĉaron?”

Ŝi diris dubeme, “Ĉi tiu butono eble malfermos la kupolon.” Ŝi premis la elstaraĵon; la kupolo ekis malfermiĝe, ellasante venteton da malfreŝa aero.

“Nun,” diris Ulen Dor, “Mi eksperimentados.” Li etendis brakon internen, subenigis ŝaltilon. Nenio okazis.

“Estu zorga, Ulen Dor!” anhele flustris la knabino. “Gardu atente kontraŭ magio!”

Ulen Dor tordis anson. La ĉaro tremetis. Li tuŝis alian stangon. La boato

faris grincan sonon, ekmoviĝis. La kupolo komencis subeniri. Ulen Dor ekprenis for la brakon. La kuplo klakis firme sur faldaĵo de lia griza mantelo. La boato ekmoviĝis refoje, faris subitan moviĝon, kaj Ulen Dor estis trenata senhelpe postsekve.

Elaj elkriis, ektenis lin je la maleoloj. Blasfemante, Ulen Dor elfalis de sia mantelo, rigardis la aero-ĉaron dum ĝi flugis laŭ sovaĝe nekontrolita kurbiĝo, kraŝis kontraŭ flankon de turo. Ĝi falis kun plua sonoro de kolizianta metalo kaj ŝtono.

“Venontafoje,” diris Ulen Dor, “Mi faros...”

Li fariĝis atenta pri stranga premeco en la etoso. Li turniĝis. Elaj estis alrigardanta lin, mano kontraŭ la buŝo, okuloj turnitaj supren kvazaŭ ŝi estis entenanta kriegon.

Ulen Dor ekrigardis ĉirkaŭ la stratoj. La malrapide moviĝantaj homoj, Grizuloj kaj Verduloj, jam malaperis. La stratoj malplenis.

“Elaj,” diris Ulen Dor, “kial vi alrigardis min tiel esprime?”

“La ruĝo, en sunlumo — kaj la koloro de Pansju sur viaj gamboj — jen niaj mortoj, niaj mortoj!”

“Neniel,” diris Ulen Dor gaje. “Ne

dum mi portas mian glavon kaj...”

Ŝtono, alvenanta de nenie, kraŝis sur la grundon ĉe liaj piedoj. Li rigardis dekstren kaj maldekstren por identigi sian atakinton, naztruoj ekklarĝigitaj pro kolero.

Vane. La pordtruoj, la arkaroj, la portikoj estis nudaj kaj malplenaj.

Plua ŝtono, granda kiel lia pugno, frapis lin inter la **skapoloj**. Li risortis turniĝe kaj vidis nur la disfalintan aspekton de antikva Ampridatviro, la malplenan straton, la brilantan fluantan vojstrion.

Ŝtono siblis ses kolorojn proksime je

la kapo de Elaj, kaj sam-momente alia alfrapis lian femuron.

Ulen Dor rekonis venkiĝon. Li ne kapablis batali ŝtonojn per sia glavo. “Necesas, ke ni **retretu...**” Li ekkaŭre evitis grandan pavim-blokon kiu estus rompinta lian kranion.

“Reire al la strion,” la knabino diris en senemocia kaj senespera voĉo. “Ni povos fuĝi trans la placo.” Ŝtono, falanta turniĝe suben, frapis al ŝi la vangon; ŝi kriis pro doloro kaj falis sur la genuojn.

Ulen Dor **graŭlis** kiel besto kaj serĉis virojn por mortigi. Sed neniu vivanta persono, viro, virino, aŭ infano, estis videbla, malgraŭ tio ke ŝtonoj daŭre

flugis cele al lia kapo.

Li kaŭris, suprentenis Elaj-on kaj kuris al la rapida centra fluo de la strio.

La pluvo de ŝtonoj postnelonge haltis. La knabino malfermis la okulojn, ekspasmetis, kaj fermis la okulojn denove. “Ĉio giras,” ŝi flustris. “Mi freneziĝis. Preskaŭ mi povus pensi — ”

Ulen Dor kredis, ke li rekonis la turon kie li tranoktiĝis. Li elpaŝis la strion kaj alproksimiĝis la portikon. Li estis malprava; kristala panelo obstaklis lin ekster la turo. Dum li hezitis, ĝi ekfandiĝis ĉe loko tuj antaŭ li kaj formis pordan enirejon. Ulen Dor rigardis miranta. Plua magiaĵo de la antikvaj

konstruistoj.

Ĝi estis nepersona magio, kaj nedanĝera. Ulen Dor trapasis. La pordejo malgrandiĝis, kunfandiĝis, kaj fariĝis klara kristalo malantaŭ li.

La halo estis nuda kaj malvarma, kvankam la muroj estis riĉaj pro koloraj metaloj kaj belega **emajlo**. Murpentaĵo ornamis unu muron — viroj kaj virinoj en fluantaj vestaĵoj montriĝis vartantaj florojn en ĝardenoj kurioze brilaj kaj sunaj, ludantaj facilanimajn ludojn, dancantaj.

Tre bela loko, pensis Ulen Dor, sed nenia loko por defendi sin kontraŭ atako. Koridoroj je ambaŭ flankoj eĥis kaj

malplenis; antaŭe estis ĉambreto kun planko el briletanta **floko**, kiu ŝajnis radii lumon. Li paŝis internen. Liaj piedoj leviĝis de sur la planko; li flosis, pli malpeza ol **kardsema** tufero. Elaj ne plu pezis en liaj brakoj. Li eligis nevolan raŭkan sonon, baraktis por resurgrundigi la piedojn, sen sukceso.

Li ŝvebis supren kiel folio levita de vento. Ulen Dor atendis naŭzan ekfalon post kvietiĝo de la magio. Sed la etaĝoj preterpasis suben, kaj la grundo fariĝis pli kaj pli malproksima. Mirinda sorĉo, pensis Ulen Dor makabre, ke oni tiel rabas viron de ties starkapablo; kiom baldaŭe okazos, ke la energio malstrikiĝos por faligi ilin al iliajn

mortojn?

“Etendu,” diris Elaj malforte.
“Ektenu je la stango.”

Li kliniĝis streĉiĝe antaŭen, ektenis la relon, tiris sin ambaŭ al la plankrando, kaj, ne kredante pri sia propra sekureco, enpaŝis apartementon plurĉambran. Subŝurmpiĝintaj amasoj da polvo estis ĉio kio restis el la mebloj.

Li kuŝiĝis Elaj-on sur la molan plankon; ŝi levis la manon al la vizaĝo kaj ridetis malforte. “Uuh — doloras.”

Ulen Dor rigardis kun stranga sento de malforto kaj senvoleco.

Elaj diris, “Mi ne scias kion ni faros. Ne plu estas hejmo por mi; do ni malsatos, ĉar neniu donos al ni manĝaĵon.”

Ulen Dor ridetis amare. “Neniam al ni mankos manĝaĵo — ne dum proprietulo de verda budo ne povas vidi viron en griza mantelo... Sed aliaj aferoj pli gravas — la tabuloj de Rogol Domedonfors — ŝajnas, ke ili tute neatingeblas.”

Ŝi diris honeste, “Vi estus mortigata. La viroj en ruĝo devas batali ĉiun — kiel vi vidis hodiaŭ. Kaj eĉ se vi atingus la Templon de Pansju, ekzistas falkaptiloj, aliaj kaptiloj, venenaj pintstangoj, kaj la fantomoj gardantaj.”

“Fantomo? Sensencaĵo. Ili estas viroj, same kiel la Grizuloj, krom tio ke ili portas verdaĵojn. Via cerbo rifuzas vidi virojn vestitaj verde... Mi aŭdis pri tiaj aferoj, tiaj obstakloj de la menso...”

Ŝi diris en vundita voĉtono, “Neniu aliaj Grizuloj vidas ilin. Eble estas vi kiu suferas la halucinojn.”

“Eble,” agordis Ulen Dor kun seka rideto. Ili sidadis ioman tempon en la polva silento de la malnova turo, poste Ulen Dor klinsidis antaŭen, ĉirkaŭbrakis la genuojn, malridetanta. **Letargio** estas la antaŭaĵo de venkiĝo. “Ni devas konsideri tiun ĉi Templon de Pansju.”

“Ni estos mortigata,” ŝi diris simple.

Ulen Dor, jam en pli bona animstato, diris, “Decas ke vi praktiku optimismon... Kie mi trovu pluan aerocaron?”

Ŝi fiksrigardis lin. “Certas, ke vi ja freneziĝis!”

Ulen Dor stariĝis. “Kie iu povas troviĝi?”

Ŝi kapneis. “Vi celas mortiĝon, laŭ unu aŭ alia metodo.” Ankaŭ ŝi stariĝis. “Ni supreniros laŭ la **Ŝakto** de Mankanta Pezeco al la plej alta nivelo de la turo.”

Senhezite ŝi paŝis en la malplenejon, kaj Ulen Dor timete sekvis. Al la plej kapturna alteco ili suprenflosis, kaj la

muroj de la ŝakto kuntiriĝis al punkto longe malsupra. Ĉe la plej supra etaĝo ili tiris sin al solidejo, elpaŝis sur terason altan en la puraj ventoj. Pli alte ol la plej altaj montoj ili staris, kaj la stratoj de Ampridatviro estis grizaj fadenoj tre subaj. La haveno estis bankuvo, kaj la maro kuŝetendiĝis malproksimen for en la nebulon ĉe la horizonto.

Tri aerĉaroj sidis sur la teraso, kaj la metalo estis tiom brila, la vitro tiom klara, la emajlo tiom kolora kvazaŭ la ĉaroj estus ĵus sidiĝintaj sur la terason el la ĉielo.

Ili aliris la plej proksiman; Ulen Dor premis la enirbutonon, kaj la kupolo glitis malantaŭen kun seka siblo de interfroto.

La interno estis tia kia tio de la alia ĉaro — longa remburita seĝo, globeto muntita sur stangeto, kelke da ŝaltiloj. La ŝtofo de la seĝo **krepitis** pro aĝo dum Ulen Dor puŝis al pi per la mano, kaj la kaptita aero odoris tre malfreŝe. Li paŝis internen, kaj Elaj sekvis. “Mi akompanos vin; morto per falego pli rapidas ol malsatego, kaj estas malpli dolora ol la rokoj...”

“Mi esperas, ke ni nek falos nek malsategos,” respondis Ulen Dor. Zorte li tuŝis la ŝaltilojn, preta por elmalŝalti ilin je ajna danĝera okaziĝo.

La kupolo frape fermiĝis super iliaj kapoj; **relajsoj** mil jarojn malnovaj intertuŝis, **kamoj** rondiris, ŝaftoj glitis

hejmen. La aerĉaro ekspasmis, saltis supren en la ruĝan kaj malhele bluan ĉielon. Ulen Dor ektenis la globon, malkovris kiel turni la boaton, kiel turni la nazon supren kaj malsupren. Estis pura ĝojo, ebriiĝo — bonega majstreco de la ĉielo! Estis pli facile ol li imagis. Pli facile ol marŝi. Li provis ĉiujn ansojn kaj ŝaltilojn, malkovris kiel ŝvebi, subeniri, bremsi. Li trovis la rapidoregan anson kaj puŝis ĝin multe antaŭen, kaj la vento kantis preterpase de la aerboato. Tre malproksimen super la maro ili flugadis, ĝis la insulo estis blua elstaraĵo ĉe la rando de la mondo. Malalte kaj alte — preskaŭ tuŝante la ondosuprojn, plonĝante tra la purpure ruĝaj tufaĵoj de la superaj nuboj.

Elaj sidis trankviliĝinta, kalma, ekzaltita. Ŝi etis ŝanĝiĝinta; ŝi ŝajnis pli proksima al Ulen Dor ol al Ampridatvro; iu subita ligilo estis tranĉita. “Ni iru plu,” ŝi diris. “Plu kaj plu kaj plu — trans la mondon, trans la arbarojn...”

Ulen Dor alrigardis ŝin flanke. Ŝi estis tre bela nun — pli pura, pli fajna, pli forta ol la virinoj kiujn li konis en Kajin. Li diris bedaŭre, “Tiel ni malsategos ja vere — ĉar neniu el ni havas la lertojn por subtenadi en la sovaĝejo. Kaj mi estas ĵure devigita serĉi la tabulojn...”

Ŝi suspiris. “Nu, do. Ni estos mortigataj. Pro kio gravas? La tuta Tero mortas...”

Vespero venis, kaj ili reiris al Ampridatviro. “Jen,” diris Elaj, “tie situas la Templo de Kazal kaj tie la Templo de Pansju.”

Ulen Dor malsuprenigis la boaton malalte super la Templo de Pansju. “Kie la enirejo?”

“Tra tiu arko — kaj ĉiu loko kaŝas malsaman danĝeron.”

“Sed ni flugas,” Ulen Dor rememorigis al ŝi.

Li mallevis la boaton ĝis dek futoj super la grundo kaj glitigis ĝin tra la arkon.

Gvidita per malhela lumo antaŭa, Ulen Dor **manovris** la boaton laŭlonge la malhelan pasejon, tra plua arko; kaj ili estis en la navo.

La **podio** kie la tabulo situis estis tia kia la **citadelo** de urbo ĉirkaŭmura. La unua obstaklo estas larĝa fosaĵo, frontita de vitra muro. Post tio estis ringofosaĵo pleja de **sulfur**-odora likvaĵo, kaj preter tio, en malplena spaco, kvin viroj deĵoris torporan gardadon. Sendetektita Ulen Dor movis la boaton tra la superaj ombroj kaj haltis rekte super la podio.

“Estu preta nun,” li murmuris, kaj surterigis la boaton. La briletanta tabulo proksimis preskaŭ tuŝeble je etendo. Li levis la kupolon; Elaj etendis, ektenis la

tabulon. La kvin gardistoj eligis korŝiran muĝon, rapidis kune antaŭen.

“Reen!” kriis Ulen Dor. Li deflankigis flugantan ĵet-lancon per sia glavo. Ŝi retiris sin kun la tabulo. Ulen Dor frape fermis la kupolon. La gardistoj sursaltis la ŝipon, unge kroĉanta al la glata metalo, alfrapanta ĝin per la pugnoj. La ŝipo leviĝis alte; unu post alia ili perdis la tenadon, falis krientaj al la plankon.

Reen tra la arko, laŭlonge tra la nigra pasejo, tra la enirejo kaj elen en la malhelan ĉielon. Malantaŭ ili grandega korno eksonigis frenezan brulegon.

Ulen Dor ekzamenis sian

akiraĵon — ovala folio el travidebla substanco montranta dekduon da senkompreneblaj skribaĵoj.

“Ni venkis!” diris Elaj mirigita. “Vi estas la Lordo de Ampridatviro!”

“Duono ankoraŭ restas,” diris Ulen Dor. “Restas ankoraŭ la tabulo en la Templo de Kadzal.”

“Sed — estas freneze! Vi jam havas — ”

“Unu senutilas krom havi la alian.”

Ŝiaj disputoj forlasiĝis nur tiam kiam ili ŝvebis super la arko kondukanta en la Templon de Kadzal.

Dum la boato glitis tra la malluma interspaco ĝi frapis fadenon kiu faligis grandegan ŝarĝon da ŝtonoj el ŝutilo. La unu el tiuj ĉi, frapanta la klinantan flankon de la aeroĉaro, puŝfrapis ĝin for. Ulen Dor blasfemis. La gardistoj estos avertitaj kaj atentemaj.

Li ŝvebis antaŭen ĉe la pleja supro de la pasejo, kaŝita en la mallumo. Baldaŭ du gardistoj, portantaj torĉojn kaj zorgaj pri siaj paŝoj, venis por enketi la sonon. Ili pasis rekte sub la boato, kaj Ulen Dor hastis antaŭen, tra la arko kaj en la navon. Kiel en la templo de Pansju, la tabulo brilis en la mezo de fortreso.

La gardistoj estis tute atentaj, nervoze rigardantaj la enirejon.

“Kuraĝe, nun!” diris Ulen Dor. Li sendis la boaton eke trans la murojn kaj fosaĵojn kaj fumantan ringofosaĵon, surteriĝis apud la podio, eke malantaŭigis la kupolon, elsaltis la boaton. Li ektenis la tabulon dum la gardistoj venis muĝantaj antaŭen, lancoj etenditaj. La plej antaŭa ĵetis sian lancon; Ulen Dor frapis ĝin suben kaj ĵetis la tabulon en la boaton.

Sed ili jam lin atingis; li estus trastabita se li provus engrimpi la boaton. Li saltis antaŭen, dehakis la ŝafton de unu lanco, hakis al la ŝultro de unu viro je la retira svingo, ektenis la ŝafton de la tria lanco, kaj tiris la viron al etenda distanco de sia glavpinto. La tria gardisto retroiris,

vokeganta por helpo. Ulen Dor tuniĝis, ensaltis la boaton. La gardisto ekis antaŭen, Ulen Dor ektuniĝis kaj renkontis lin per la pinto de sia glavo je ties vango. Ŝprucanta sangon kaj krieganta freneze, la gardisto falis malantaŭen. Ulen Dor ekmovis la suprenigan stangon; la boato leviĝis alte kaj moviĝis al la enirejo.

Kaj baldaŭ la atentiga korno ĉe la Templo de Kadzal aldonis sian raŭkan krion kune kun la sonego transurba.

La boato ŝvebis malrapide tra la ĉielo.

“Rigardu!” diris Elaj, ektenante al li la brakon. En torĉa lumo viroj kaj virinoj

amasiĝis kaj dise vagadis en la stratoj — Verduloj kaj Grizuloj, panikitaj de la mesaĝo de la kornoj.

Elaj ekanhelis. “Ulen Dor! Mi vidas! Mi vidas! La viroj en Verdo! Ĉu eblas... Ĉu ili ĉiam estis...”

“La cerbo-sorĉaĵo rompiĝis,” diris Ulen Dor, “kaj ne nur je vi. Sube ili vidas unu la alian, ankaŭ...”

Unuafoje en memorkapablo, Verduloj kaj Grizuloj alrigardis unu la alian. Iliaj vizaĝoj tordiĝis, grimacegis. En la flagrado de torĉoj Ulen Dor vidis ilin retroiri malantaŭen pro abomeno unu de la alia, kaj aŭdis la tumulto de iliaj kriegoj: “Demono!... Demono!... Griza

fantomo!...Naŭza Verda Demono!...”

Miloj da obsedaj torĉportantoj flankenpaŝis preter unu la alian, grimacante, blasfemante unu la alian, kriegantaj pro malamo kaj timo. Ili ĉiuj estas frenezaj, li pensis — torde interplektitaj, obstakligitaj je cerbo...

Kvazaŭ reage al sekreta signalo, la amaso interinundis je batalo, kaj la malamaj krioj koagulis al Ulen Dor la sangon. Elaj turniĝis ploregante for. Terura laboro estis fariĝanta, sur viroj, virinoj, infanoj — ne grave la viktimo, se tiu portis la kontraŭan koloron.

Pli laŭta graŭlado leviĝis ĉe la rando de la amaso — ĝoja sono, kaj dekduo da

ŝancele paŝantaj Gaŭnoj aperis, starantaj ture super la Verduloj kaj Grizuloj. Ili distiris, ŝiris, kaj la freneza malamo fandiĝis fronte al freneza timo. Verduloj kaj Grizuloj apartiĝis, forkuris al siaj hejmoj, kaj la Gaŭnoj staris solaj en la strato.

Ulen Dor tiris sian rigardon for kaj tenis al si la frunton. “Ĉi tiu estis mia faraĵo?... Ĉu tiu ĉi estas faraĵo mia?”

“Eventuale ĝi devus okazi,” diris Elaj malatente. “Krom se Tero mem fadis kaj mortis pli frue...”

Ulen Dor prenis la du tabulojn. “Kaj jen tio kion mi serĉis por akiri — la tabuloj de Rogol Domedonfors. Ili logis

min mil leŭgojn trans la Golfon Melantino; mi havas ilin en la propraj manoj nun, kaj ili estas tiaj kiaj senvaloraj rompitaĵoj de vitro...”

La boato ŝvebis alte, kaj Ampridatviro fariĝis vidaĵo el palaj kristaloj en la stellumo. En la lumiĝo de la regopanelo, Ulen Dor kunmetis la du tabulojn apude. La skribaĵoj kuniĝis, fariĝis literoj, kaj la literoj portis la vortojn de antikva magiisto:

*Malfidelaj infanoj — Rogol
Domedonfors mortas, kaj tial
vivas porĉiame en la
Ampridatviro kiun li estis amanta
kaj servanta! Kiam inteligenteco
kaj bonanimo reportos ordon al*

al urbo; aŭ kiam sango kaj ŝtalo instruas pri la malsaĝeco de direktita krueleco kaj pasio, kaj ĉiuj krom la plej duraj jam mortis: — tiam estos ĉi tiuj tabluloj legataj. Kaj mi diras al tiu kiu ĝin legas, iru al la Turo de Sorto kun la flava kupolo, supreniru al la plej supra etaĝo, montru ruĝon al la maldekstra okulo de Rogol Domedonfors, flavo al la ruĝa okulo, kaj poste bluo al ambaŭ; faru tion, mi direktas, kaj kunhavu la povforton de Rogol Domedonfors.

Ulen Dor demandis, “Kie la Turo de

Sorto?”

Elaj neis per la kapo. “Jen estas la Turo de Rodejl, kaj la Ruĝa Turo kaj la Turo de la Krieganta Fantomo, kaj la Turo de Trumpetoj kaj la Turo de l’ Birdoj, kaj la Turo de Gaŭnoj — sed mi konas neniun Turon de Sorto.”

“Kiu turo havas flavan kupolon?”

“Mi ne scias.”

“Ni serĉos je la mateno.”

“Je la mateno,” ŝi diris kliniĝante kontraŭ li dorme laca.

“La matenon...” diris Ulen Dor,

fingrumante ŝiajn flavajn harojn.

Kiam la malnova ruĝa suno leviĝis, ili ŝvebis revene super la urbon kaj trovis la popolon de Ampridatviro vekiĝintaj antaŭ ol ili mem, volemaj pri murdo.

La batalado kaj la mortigado ne estis tiom sovaĝaj kiom la nokton antaŭan. Estis pli lerta buĉado. Sinkaŝaj grupoj da viroj trompkaptis nekonatojn, aŭ enrompis domojn por strangoli virinojn kaj infanojn.

Ulen Dor murmuris grumble, “Baldaŭ restos neniuj en Ampridatviro al kiuj oni povos prilabori la povforton de Rogol Demedonfors.” Li turniĝis al Elaj. “Ĉu vi havas nenian patron, nenian

patrinon, pri kiu vi timas?”

Ŝi neis kape. “Mi estis trapasinte la vivon kun teda kaj tirana onklo.”

Ulen Dor turniĝis for. Li vidis flavan kupolon; neniu alia videblis: La Turo de Sorto.

“Jen.” Li indikis fingre, turnis malsupren la nazon de la aerĉaro.

Parkinte ĉe alta etaĝo, ili eniris la polvajn koridorojn, trovis kontraŭgravitan ŝakton, kaj leviĝis ĝis la plej alta etaĝo. Ĉi tie ili trovis malgrandan ĉambron, ornamitan per brilkoloraj murpentraĵoj. La sceno estis korto de antikva Amprdatvro. Viroj kaj virinoj en

koloraj silkoj konversaciis kaj bankedis kaj, en la centra panelo, omaĝis al patriarka estro havanta fortikan mentonon, burlantajn okulojn, kaj blankan barbon. Li estis vestita en purpura kaj blanka robo kaj sidis sur gravurita seĝo.

“Rogol Domedonfors!” murmuris Elaj, kaj la ĉambro entenis sian spiron, fariĝis tute senmova. Ili sentis la movon kiun ilia vivospiro faris en la longe kvieta aero, kaj la pentritaj okuloj fiksrigardis profunden al ili la cerbojn...

Ulen Dor diris, “Ruĝon al la maldekstra okulo, flavon al la dekstra; poste blunon al ambaŭ.” Nu — jen estas bluaj kaheloj en la halo, kaj mi portas

ruĝan jakon.”

Ili trovis bluajn kaj flavajn kahelojn, kaj Ulen Dor tranĉis strio el la orlo de sia tuniko.

Ruĝon al la maldekstra okulo, flavon al la dekstra. Bluon al ambaŭ. Klako, knaro, tia zumado kia cent abeloj.

La muro malfermiĝis al ŝtuparo. Ulen Dor eniris, kaj, kun Elaj spiranta forte ĉe lia dorso, aliris la ŝtupojn.

Ili eliris en inundon da taglumo, sube de la kupolo mem. Ĉe la mezo sur piedestalo sidis briletanta rond-supra cilindro, nigra kaj vitreca.

La zumado leviĝis por fariĝi akra grincado. La cilindro tremetadis, moliĝis, fariĝis preskaŭ travidebla, iomete subenfleksis. Ĉe la mezo pendis pulpa blanka amaso — cerbo?

La cilindro vivis.

Ĝi burĝonigis pseŭdo-brakojn kiuj pozis moviĝante en la aero. Ulen Dor kaj Elaj rigardis kvazaŭ glaciigintaj, tuj apude. Unu nigra fingro formiĝis fariĝante okulo, alia formis buŝon. La okulo inspektis ilin zorge.

La buŝo diris gaje, “Salutojn trans tempo, salutojn. Do vi venis postlonge por vekti maljunan Rogol-n Domedonfors el ties sonĝoj? Mi sonĝis longe kaj

bone — sed ŝajne dum nekomforta tempodaŭro. Kiom longe? Dudek jarojn? Kvindek jarojn? Mi enketu.”

La okulo svingiĝis al tubo sur la muro, plena je kvarono de griza pulvoro.

La buŝo eligis ploreto de miro. “La energio jam preskaŭ elĉerpiĝis! Kiom longe mi dormis? Kun duon-daŭro de 1,200 jaroj — pli ol kvin mil jaroj!” La okulo svingiĝis reen al Ulen Dor kaj Elaj. “Kiuĵ do, estas vi? Kie estas miaj disputantaj nacioj, la adorantoj de Pansju kaj Kadzal? Ĉu sekvas, ke ili elmortigis sin, tiom longe antaŭe?”

“Ne,” diris Ulen Dor kun grimaca rideto. “Ili ankoraŭ batalas en la stratoj.”

La okul-tentaklo etendiĝis rapide, puŝis sin tra fenestro, kaj rigardis suben super la urbo. La centra gelatenaĵo spasmetis, sufuzis oranĝalume. La voĉo parolis refoje, kaj ĝi havis teruran akrecon. La kolo de Ulen Dor piketadis kaj li sentis la manon de Elaj kroĉi forte al li la brakon.

“Kvin mil jarojn!” kriis la voĉo. “Kvin mil jaroj kaj la aĉuloj ankoraŭ kverelas? Ĉu tempo ne instruis al ili saĝecon? Pli fortaj agentoj devas esti uzataj. Rogol Domendonfors instruos al ili saĝecon. Jen!”

Vasta sonego aŭdiĝis de sube, cent ekaj resonoj. Ulen Dor kaj Elaj hastis al la fenestro kaj rigardis suben. Menso-

pleniga vidaĵo okupis la stratojn.

La dek futojn altaj vestibloj kondukantaj suben je la urbo estis ekmalfermiĝintaj. El ĉiu el tiuj lekis grandega tentaklo el nigra travidebla gelatenaĵo tia kia la substanco de la glitvojoj.

La tentakloj etendiĝis en la aeron, burĝonigis cent branĉojn kiuj ĉasis la freneze eskapantajn Ampridatvranojn, kaptis ilin, fortiris siajn vestojn el grizo kaj verdo, poste portante ilin vipmove alte tra la aero, faligetis ilin en la grandan centran placon. En la malvarmeta matena ero la popolo de Ampridaatvro staris nude intermiksita kaj neniu ulo povis distingi Verdulon disde Grizulo.

“Rogol Domedonfors havas grandajn longan brakojn nun,” kriis vasta voĉo, “tiom fortajn kiom la luno, ĉion-vidantaj kia la aero.”

La voĉo venis de ĉie, de nenie.

“Mi estas Rogol Domedonfors, la fina registro de Ampridatvro. Kaj al tiu ĉi fistato vi estis subenirinta? Loĝantoj de domaĉoj, manĝantoj de putraĵo? Rigardu — en nura momento mi riparos la malatentecon de kvin mil jaroj!”

La tentakloj burĝonigis mil elkreskaĵojn — malmolaj dornaj tranĉiloj, ŝpruciloj kiuj elverŝis bluan flamon, grandegaj fosiloj, kaj ĉiu kreskaĵo burĝonigis okulan tigon. Tiuj trairadis la

urbon, kaj kie ajn estis rompaĵo aŭ signo de malnoveco la tentakloj tie fosis, tiris, eksplodis, bruligis; post ŝprucis novajn materialojn tiuloke, kaj post ilia paso, novaj kaj brilantaj konstruaĵoj postlasiĝis.

Multi-brakaj tentakloj kolektis la rubon de epokoj; kaj ŝargitaj ili ekvipiĝis supren tra la aero, monstra **katapulto**, vipe ĵetanta la rubon malproksime for super la maron. Kaj kie ajn estis griza farbo aŭ verda farbo tentaklo elfrotis la koloron, ŝprucis novajn malsamajn pigmentojn.

Laŭlonge je ĉiuj stratoj la grandegaj radikaĵoj kaj kaj radikaĵetoj plonĝis en ĉiun turon, ĉiun loĝejon, ĉiun parkon kaj placon — malkonstruantaj, detirantaj,

konstruantaj, ordigantaj, riparantaj. Ampridatviro estis tenata kaj trapenetrata fare de Rogol Domedonfors tiel kiel la radikoj de arbo kroĉas la grundon.

En tempodaŭro mezurebla po spiroj, nova Ampridatviro antstataŭis la ruinojn, restis brila, briletanta urbo — fiera, aventurema, defienda kontraŭ la mortanta ruĝa suno.

Ulen Dor kaj Elaj estis rigardantaj en duon-konscia, senkomprena delireto. Ĉu eblas esti realeco; ĉu ekzistas tia estulo kiu povus malkonstrui urbon kaj rekonstrui ĝin dum homo rigardadis?

Brakoj el nigra gelatenaĵo ekis super la montetojn de la insulo, trairis fadene la

kavernojn kie la Gaŭnoj kuŝis tromanĝintaj kaj torporaj. Ĝi kaptis, ektiris ilin tra la aero, pendigis ilin super la amasigitaj Ampridatvranoj — cent Gaŭnoj sur cent tentakloj, hororaj fruktoj sur preternature stranga arbo.

“Atentu!” laŭtsonis voĉo, fanfarona kaj sovaĝa. “Ĉi tiuj kujn vi estis timanta! Atentu pri kiel Rogol Domedonfors traktas tiujn ĉi!”

La tentakloj vipetis, kaj cent Gaŭnoj ekflugis — disetendiĝantaj, rade turniĝantaj formoj — alte super Ampridatvro; kaj ili falis malproksime en la maron.

“La kreitulo estas freneza,” flustris

Ulen Dor al Elaj. “La longa sonĝado konfuzis ĝian cerbon.”

“Jen la nova Ampridatviro!” sonegis la fortega voĉo. “Vidu ĝin por la unua kaj lasta fojo. Ĉar nun vi mortos! Vi mem pruvis, ke vie malmeritas la gloran pasintecon — malmeritas la rajton adori la novan dion Rogol Domedonfors. Jen estas du ĉi tie apud mi kiuj fondos la novan genton — ”

Ulen Dor ektimis alarme. Kio? Li destinita por loĝi en Ampridatviro sub la regado de la freneza super-estulo?

Ne.

Kaj eblas, ke li neniam refoje estos

tiom proksima al la cerbo.

Je unua moviĝo li eltris sian glavon kaj ĵetis ĝin pint-antaŭe en la travideblan cilindron da gelatenaĵo — trapenetris la cerbon, stabis ĝin per la ŝafto el ŝtalo.

La plej terura sono jam aŭdida sur Tero frakasis la aeron. Viroj kaj virinoj freneziĝis en la placo.

La ĉirkaŭurbaj tentakloj de Rogol Domedonfors batadis supren kaj suben en freneza agonio, kiel vundita insekto dise vipmovas la gambojn. La belegaj turoj falis kline. La Ampridatvanoj forkuris kriegantaj tra la kataklismo.

Ulen Dor kaj Elaj kuris al la teraso

kie ili estis lasintaj la aerĉaron. Malantaŭe ili aŭdis raŭkan fluston — voĉon rompitan.

“Mi — ne estas — mortinta — jam! Malgraŭ ĉio, se ĉiuj songoj estas rompitaĵoj — mi mortigos vin du...”

Ili saltfalis en la aerĉaron. Ulen Dor eksendis ĝin en la aeron. Per terura strebado unu tentaklo haltis sian frenazan disan vipadon kaj spasme etendiĝis supren cele ke ĝi ilin kaptu. Ulen Dor stiris kurbe flanken, plongis for tra la ĉielo. La tentaklo ekiris sagorapide por ilin obstakli.

Ulen Dor premis forte suben al la rapideca regstango, la aero fajfis kaj

kantis malantaŭ la veturilo. Kaj tuj poste sekvis la ondanta nigra brako de la mortanta dio, strebegante por tuŝi la eskapantan muŝeton kiu tiome ĝin vundis.

“Pli! Pli!” preĝis Ulen Dor al la aerĉaro.

“Iru pli alte!” flustris la knabino.
“Pli alte — pli rapide — ”

Ulen Dor klinis la nazon; supren laŭ deklivo ekiris la ĉaro, kaj la strebanta brako sekvis malantaŭe — giganta membro streĉanta rigide tra la ĉielo, nigra ĉielarko kun piedo en malproksima Ampridatvro.

Rogol Domedonfors mortis. La brako ekdisiĝis formiĝante nubetaro el fumo kaj malrapide sinkis al la maro.

Ulen Dor tenis sian boaton je plena rapido ĝis la insulo malaperis trans la horizonto. Li malrapidigis ĝin, suspiris, ripozis.

Elaj subite ĵetis sin kontraŭ lian ŝultron kaj kreve histeriiĝis.

“Kvieton, knabino, kvieton,” admonis Ulen Dor. “Ni estas sekuraj; ni porĉiame finis pri la malbenita urbo.”

Ŝi kvietiĝis; postnelonge: “Kien ni iru nun?”

La okuloj de Ulen Dor ĉirkaŭrigardis la aerĉaron kun dubo kaj kalkulado. “Estos neniom da magio por Kandajv. Malgraŭ tio, mi havos grandegan rakonton por diri al li, kaj li eble plaĉiĝus... Li certe deziros la aerĉaron. Sed mi aranĝos, mi aranĝos...”

Ŝi flustris, “Ĉu ni ne povus flugi orienten, kaj flugi kaj flugi, ĝis ni trovos tiun lokon kie la suno leviĝas, kaj eble kvietan herbejon kie estas fruktoarboj...”

Ulen Dor rigardis al la sudo kaj pensis pri Kajin kun ĝiaj kvietaj noktoj kaj vin-koloraj tagoj, la larĝa palaco kio estas lia loĝejo, kaj la litseĝo de kiu li povis elrigardi trans la Golfo Sanrealo, la antikvaj olivaj arboj, la burleskaj festival-

sezonoj.

Li diris, “Elaj, vi ŝatos la urbon
Kajin.”





Gajal de Sfer

Gajal de Sfer naskiĝis kiel homo aparta de siaj kunuloj kaj fariĝis fonto da ĉagreniĝo je sia patro. Montranta normalan eksteran formon, tamen interne de lia menso estis mankejo kiu sopiris dolore por nutriĝo. Estis kvazaŭ iu surŝutis sorĉon al li je naskiĝo, agacilo trudita sur la infano pro animstato sardone mokema, tiel ke ĉiu ajn okazaĵo, sendepende de kiom bagatela, fariĝis afero inda je miro kaj scivolemego. Eĉ je aĝo tiom juna kiom kvar sezonoj li estis eldiradanta tiajn enketojn kiaj:

“Kial kvadratoj havas pli da flankoj ol trianguloj?”

“Kiel ni vidu tiam, post kiam la suno mallumiĝos?”

“Ĉu floroj kreskas sub la oceano?”

“Ĉu steloj siblas kaj krepetas kiam pluvo venas je noktoj?”

Pri kiuj lia senpacienca patro donis tiajn respondojn kiaj:

“Tiel ordigis la Pragmatiko; kvadratoj kaj trianguloj devas obei la fiks-regulon.”

“La afero devigos ke ni serĉu mane

kaj palpetu nian vojon.”

“Mi neniam esploris la veron de ĉi tiu afero; nur la **Kuratoro** scius.”

“Neniel, ĉar la steloj altas super la pluvo, pli altas ol eĉ la plej altaj nubajoj, kaj naĝas tie en maldensega aero kie pluvo neniam brediĝos.”

Dum Gajal kreskiĝis al junuleco, tiu ĉi mankejo en lia menso, anstataŭ fariĝi malstrikta kaj vaksa, ŝajne pulsadis kun pli violenta doloro. Kaj sekve li demandis:

“Kial homoj tiam mortas kiam oni ilin mortigas?”

“Kien iras beleco tiam kiam ĝi malaperas?”

“Kiom longe vivis homoj sur la Tero?”

“Kio estas malantaŭ la ĉielo?”

Pri tiaj demandoj lia patro, mordante acerbecon for de siaj lipoj, kutimis jene respondi:

“Morto estas la heredaĵo de vivo; la viveco de viro estas tia kia aero en veziko. Punkciu tiun ĉi vezikon kaj elen, elen, elen eskapas viveco, kiel la koloro de fadiĝanta sonĝo.”

“Belo estas glaceo kion amo aldonas

por trompi la okulon. Pro tio povus diriĝi, ke kiam la cerbo estas sen amo la okulo rigardas vidante neniom da belo.”

“Kelkaj diras ke viroj leviĝis el de tero kiel larvoj el de mortintulo; aliaj sugestas ke la unuaj viroj deziris loĝejon kaj tial kreis Teron per sorĉado. La demando estas ĉirkaŭita per detalismo; nur la Kuratoro povas respondi kun precizeco.”

“Senfina malplenejo.”

Kaj Gajal cerbumis kaj hipotezis, proponis kaj asertis ĝis okazis, ke li trovis sin subjekto de kaŝe publika amuzo. Onidiro cirkuladis, ke gléfto trovinta la patrinon de Gajal dum naskado, estis

Ŝtelinta parton de lia cerbo, lasante mankon kion li poste labore strebis ripari.

Gajal tial apartigis sin kaj travagadis la herbajn montetojn de Sfer en soleco. Sed ĉiam lia menso demandemis, ĉiam li serĉis eltrovi la sciojn pri ĉio ĉirkaŭ li, ĝis fine lia patro, pro ĉagreniĝo, rifuzis aŭdi pluajn enketojn, decidante ke ĉioma scio estis jam sciita, ke la bagatelaĵoj kaj senutilaĵoj estis jam forĵetitaj, lasante reziduon kio estas ĉio kio necesas por kompleta viro.

Je tiu ĉi tempo Gajal estis en la komenca parto de plenkreska vireco, negranda sed bonforma junulo kun klaraj okuloj, inklino je severe elegantaj vestoj, kaj kaŝita problemo kiu montris sin per

strikteco ĉe la anguloj de lia buŝo.

Aŭskultinta la koleran decidegon de sia patro Gajal diris, “Unu demandon pluan, kaj poste mi demandados ne plu.”

“Parolu,” deklaris lia patro. “Unu demandon pluan mi permesas al vi.”

“Vi ofte referencigis min je la Kuratoro; kiu li estas, kie mi trovu lin, por ke mi kuracu mian malsatdoloron pri kompreno?”

Momenton la patro detale inspektis la filon, kiun li nun konsideris jam transirinta la randon al frenezigeo. Poste li respondis en kvieta voĉo, “La Kuratoro gardas la Muzeon Homaran, kion antikva

legendo indikas por troviĝi en la Lando de la Falanta Muro — malantaŭ la montoj de Fer Akŭila kaj norde de Askolajs. Ne estas certe ke aŭ Kuratoro aŭ Muzeo ankoraŭ ekzistas; tamen ŝajne evidentas ke se la Kuratoro scius ĉiujn aferojn, kiel diras legendo, necesas ke li sciu la mort-evitilon de sorĉistoj.”

Gajal diris, “Mi volas serĉi la Kuratoron, kaj la Muzeon Homaran, por ke ankaŭ mi sciu ĉiujn aferojn.”

La patro diris pacience, “Mi donacos al vi mian bonegan blankan ĉevalon, mian Plivastigeblan Ovon por via ŝirmilo, mian **Scintilan** Ponardon por lumigi la nokton. Plue, mi eldiros benon laŭlonge sur via vojo, kaj danĝero preterglitos vin

kondiĉe ke vi ne vagos for de la propra irejo.”

Gajal entenis la cent novajn demandojn kiuj pretis sur sia lango, inkluzive de enketo pri kie la patro lernis tiujn ĉi manifestaĵojn de sorĉado, kaj akceptis la donacojn: la ĉevalon, la magian ŝirmilon, la ponardon kun la luma pomelo, kaj la benon por gardi lin de la malavantaĝaj cirkonstancoj kiuj malhelpegas vojaĝantojn laŭlonge de la malhelaj piedvojo de Askolais.

Li pretigis la ĉevalon, akrigis la ponardon, faris lastan ĉirkaŭrigardon en la malnova domego ĉe Sfer, kaj ekforiris al la nordo, kun la malplenejo en sia cerbo pulsante deziranta la plaĉigan

premon de kompreno.

Li transiris la Riveron Skaŭm' sur malnova barĝo. Surpaŝante la barĝon kaj pro tio depaŝinte la irejon la beno perdis sian efikofortecon kaj la barĝisto, kiu **avidis** la riĉaspektajn vestaĵojn de Gajal, provis **klabi** lin per pezoŝarĝita bastoneto. Gajal defendis la baton kaj piedbatis la viron en la netravedeblan profundan akvon, kie li dronis.

Suprenirante la nordan randon de la Skaŭm' li vidis antaŭ si la Porfiran Cikatron, la malhelajn poplojn kaj blankajn kolonojn de Kajin, la malfortan brilon de Golfo Sanrealo.

Vaganta sur la dispeciĝantaj stratoj,

li tiom multe demandadis al la langvoraj loĝantoj, ke unu en seka ŝercemo sugestis, ke li aliru profesion aŭguriston.

Tiu ĉi troviĝis en budo farbita kun la Signoj de la Aŭmokopelastiana Kabalo. Li estis alte maldika brunulo kun ruĝe randitaj okuloj kaj malpura blanka barbo.

“Kiom viaj prezoj?” demandis Gajal singarde.

“Mi respondas al tri demandoj,” statis la aŭguristo. “Kontraŭ dudek tĉrcoj mi ordigas respondon en klara kaj reaginda lingvaĵo; kontraŭ dek mi uzas la lingvon de ĉantado, kio foje enlasas ambiguecon; kontraŭ kvin mi parolas alegorion kion vi devas interpreti laŭ via

propra volo; kaj kontraŭ unu terco mi babiladas en nekonata lingvo.”

“Unue mi devas enketi, kiom profundas via scio?”

“Mi scias ĉion,” respondis la aŭguristo. “La sekretojn de la ruĝo kaj la sekretojn de la nigro, la perditajn sorĉojn de Granda Motolamo, la filozofion de la fiŝo kaj la voĉon de la birdo.”

“Kaj kie estis vi lerninta ĉiujn ĉi aferojn?”

“Per pura **induktado**,” eksplikis la aŭguristo. “Mi reeniras mian budon, mi enĉambrigas min kun absolute neniom da lumo, kaj, tiel apartigita, mi solvas ĉiujn

profundaĵojn de la mondo.”

“Kun ĉiom ĉi valoregaj sciaĵoj jam posedataj,” pridemandis Gajal, “kial vi vivtenas tiom malriĉe, kun ne eĉ unco da graso en via korpo kaj tiuj ĉi malvaloregaj vestaĵoj sur via dorso?”

La aŭguro staris rekte en furoro, “Iru pretere, iru pretere! Mi jam malŝparis kvindek tĉrcojn da saĝeco je vi, kiu havas ne eĉ kupran pecon en via zonsako. Se vi deziras senpagan eksaĝiĝon,” kaj li ridaĉis pro amuzego “iru serĉi la Kuratoron.” Kaj li ŝirmis sin en sia budo.

Gajal luis ĉambron por la nokto, kaj je la manteno pluiris norden. La detruitaj lokoj de la Malnova Urbo pasis je la

maldekstro, kaj la irvojo kondukis en la fablan arbaron.

Multajn tagojn Gajal rajdis norden, kaj, singarda kontraŭ danĝero, restis sur la irvojo. Je noktoj li ĉirkaŭis sin kaj sian ĉevalon en sia magia ŝirmejo, la Plivastigebla Ovo — membrano nepenetrigebla per muskolo, ungo, sorĉo, premo sono aŭ malvarmo — kaj tial restis senzorge malgraŭ la provoj de la avidaj estuloj de la mallumo.

La granda nebrila globo de la suno falis malantaŭ li; la tagoj fariĝis palaj kaj la noktoj akre malvarmaj, kaj fine la krutaĵoj de la montaro Fer Akŭila sinprezentis minimumege ĉe la norda horizonto.

La arbaro jam fariĝis malpli alta kaj malpli densa, kaj la kutima arbo estis dáobado, ronda dika afero el pezaj nodecaj branĉoj, tiuj ĉi el koloro de frot-polurita flav-ruĝa bronzo, surŝutita de malhelaj pilke tufaj foliaroj. Apud giganto de la genro Gajal trovis vilaĝon el herboteraj dometoj. Disa aro da malamiketaj aĉuloj aperis kaj ĉirkaŭis lin montrante esprimojn de kuriozeco. Gajal, ne mapli ol la vilaĝanoj, havis demandojn, sed neniuj volus paroli ĝis post alpaŝus la vilaĝestro — fortika viro kiu portis dikfelan ĉapelon, mantelon el bruna felo kaj brosaspektan barbon, tiel ke estis malfacile distingi kie unu finiĝis kaj la alia komencis. Li putre odoris, kio malplaĉis al Gajal, kiu, pro celo ĝentila,

kaŝis sian malplaĉiĝon.

“Kien vi iras?” demandis la vilaĝestro.

“Mi volas transiri la montojn al la Muzeo Homara,” diris Gajal. “Kien kondukas la vojeto?”

La vilaĝestro fingre indikis **noĉon** sur la silueto de la montaro. “Jen Omuna Intermonto, la plej mallonga kaj plej bona irejo, sed vojo mankas. Neniu venas kaj neniu iras, ĉar kiam oni pasas la Intermonton, tiam oni surmarŝas landon nekonatan. Kaj kie trafiko mankas, memevidente ne necesas esti vojeto.”

La informo ne feliĉigis Gajal-on.

“Pro kio, do, estas konate ke Omuna Intermonto kondukas al la Muzeo?”

La vilaĝestro ŝultrolevis. “Tiel indikas nia tradicio.”

Gajal turnis la kapon je aŭdiĝo de raŭka flarado kaj vidis enfermejon el plektitaj salikoj. Sur grundo malpura pro fekaĵo kaj surpaŝita pajlo staris kelke da grandegaj viroj altaj je ok aŭ naŭ futoj. Ili estis nudaj, kun malordaj tufoj da flavaj haroj kaj akvecaj bluaj okuloj. Ili havis vaksaspektajn vizaĝojn kaj esprimojn de aĉa stulteco. Dum Gajal rigardis, unu el ili paŝadis al baseno kaj komencis brue manĝegi grizan kaĉaĵon.

Gajal diris, “Kia speco de aĵoj estas

tiuj ĉi?”

La vilaĝestro palpebrumis pro amuziĝo je la naiveco de Gajal. “Tiu estas niaj aŭstoj, nature.” Kaj li gestis malestime je la blanka ĉevalo de Gajal. “Neniam mi vidis aŭston pli strangan ol tiu kiun vi sursidas. La niaj portas nin pli facile kaj ŝajnas esti malpli malignaj; pluse, neniu karno pli bongustas ol tiu de aŭsto ĝuste **brezita** kaj boligita.”

Starante proksimege, li palpis la metalon de la selo de Gajal kaj la ruĝe kaj flave **broditan** dorsotukon. “Viaj ornamaĵoj tamen estas riĉaj kaj el plejalta kvalito. Mi tial donacos al vi mian grandan kaj pezan aŭston kontraŭ tiu besto kun ĝiaj ekipaĵoj.”

Gajal ĝentile deklaris ke plaĉas al li la propra rajdobesto, kaj la vilaĝestro gestis ŝultroleve.

Kornblovo soniĝis. La vilaĝestro ĉirkaŭrigardis, post turniĝis al Gajal. “Manĝaĵo prepariĝis; ĉu vi manĝos?”

Gajal ekrigardis al la barilo da aŭstoj. “Mi ĝuste nun ne malsatas, kaj mi devas hasti antaŭen. Tamen, mi dankas al vi pro via bonkoreco.”

Li forrajdis; dum li pasis sube de la arkaĵo de la granda dáobado, li turniĝis ekrigardi al la vilaĝo. Ŝajnis esti troa aktiveco inter la dometoj. Rememorante la avidon de la vilaĝestro je lia selo, kaj atenta pri tio, ke li ne plu laŭiras la

benitan irejon, Gajal urgîs sian cêvalon antaŭen kaj tondris rapide sub la arboj.

Kiam li alproksimiĝis je la montpiedaj montetoj la arbaro fadis por fariĝi savano, tapiŝita de malbrilaj, artikohavaj herboj kiuj grincis sub la piedoj de la cêvalo. Gajal ekrigardis suben laŭ la ebenejo. La suno, maljuna kaj tiom ruĝa kiom aŭtuna granato, duonsubiris en la sud-okcidento; la lumo trans la ebenejo estis malforta kaj akveca; la montoj prezentis kuriozan aspekton de artefareco, kiel pentraĵo desegnita por efiko de nenature forlasita izoleco.

Gajal ekrigardis la sunon fojon plu. Restis plua horo da lumo, poste la malluma nokto de fintempa Tero. Gajal

turniĝis ensele, rigardis malantaŭ si, sentante sin sola, sendefenda. Kvar aŭstoj, portantaj virojn surŝultre, venis duonkurantaj el la arbaro. Vidante Gajalon, ili ekis peze kuradi. Kun tremo Gajalturnis rade sian ĉevalon kaj malstriktigis la rimenojn, kaj la blanka ĉevalo ekkuris trans la ebenejo al Omuna Intermonto. Malantaŭe sekvis la aŭstoj, surrajditaj de la per felo mantelitaj vilaĝanoj.

Ĝuste kiam la suno tuŝis la horizonton, plua arbaro antaŭa montriĝis kiel malklara linio de malheleco. Gajalrigardis malantaŭen al siaj sekvantoj, salte kurantaj nun je unu mejlo malantaŭe, turnis sian rigardon refoje al la arbaro. Malbona loko por rajdi dum

nokto...

La malhela foliario pendis minace super li; li pasis sub la unuaj nodecaj branĉegoj. Se la aŭstoj ne povus flare sekvi la spurojn, ili eble nun evitiĝus. Li ŝanĝis la direkton, turnis unuan fojon, duan, trian fojon, poste haltigis sian ĉevalon por aŭskulti. De malproksime frapega sono atingis liajn orelojn. Gajal elseliĝis, gvidis la ĉevalon en profundan valeton kie densa aro da folioj staris mure. Postnelonge la kvar viroj sur iliaj brute altaj aŭstoj pasis en la posta lumo super li, nigraj duopaj formoj en pozoj sugestantaj pri malbonhumoro kaj malesperiĝo.

La peza frapado kaj paŝado de

piedoj fadis kaj ĉesis.

La ĉevalo moviĝis senripozeme; la foliaro susuris.

Malseka venteto pasis malsupren laŭ la valetoj kaj malvarmetigis la nukon de Gajal. Mallumeco leviĝis de malnova Tero tiel kiel inko en baseno.

Gajal tremis: pli saĝe, ke li rajdu for tra la arbaro, for de la malĝojaj vilaĝanoj kaj iliaj sentomankaj rajdobestoj. Kvankam...

Li turnis sian ĉevalon supren al la suprejo kie la kvar antaŭe pasis kaj sidis aŭskultantaj. Malproksime malsupren laŭ la vento li aŭdis raŭkan vokon. Turnante

al la kontraŭa direkto li lasis, ke la ĉevalo elektu laŭvole la vojon.

Branĉoj kaj branĉegoj plektis desegnaĵojn sur la fadanta purpureco super li; la aero odoris de musko kaj malseka ŝimo. La ĉevalo haltis subite. Gajal, streĉita je ĉiu muskolo, kliniĝis iomete antaŭen, la kapo turnita, aŭskultanta. Estis senso pri danĝero ĉe la vango. La aero estis senmova, malnormala; liaj okuloj povis travidi ne eĉ dek futojn en la nigrecon. Ie proksime estis mortigo — pulvoriga, muĝanta mortigo, preta por subite ŝoki.

Ŝvitanta malvarme, tima kontraŭ ajna moviĝo, li devigis sin al elseliĝo. Rigide li glitis el la selo, elprenis la

Plivastigeblan Ovon, kaj ekĵetis ĝin ĉirkaŭ sian ĉevalon kaj si mem. Ah, nu ... Gajal ellasis la premon de sia entenita spiro. Sekureco.



Malforta ruĝa lumo striis kline tra la branĉoj el la oriento. La spiraĵo de Gajal vaporis en la aero kiam li elvenis la Ovon. Post porciumi por si mem manplenon da sekigita frukto kaj por la ĉevalo sakon da muelitaj grajnoj, li enseliĝis kaj ekiris al la montoj.

La arbaro pasiĝis malantaŭen, kaj Gajal rajdis el ĝi sur altan ebenejon. Li alrigardis la linion da montoj. Sufuze de rosa sunlumo, la griza, grize verda,

malhele verda montaro vagadis
okcidenten malproksime al la Golfo
Melantuno, orienten al la malproksima
Lando de la Falanta Muro. Kie Omuna
Intermonto?

Gajal de Sfer serĉis vane por trovi la
noĉon kiu estis videbla de la vilaĝo de la
fele mantelitaj murdistoj.

Li malridetis kaj turnis siajn okulojn
supren al la altecon de la montoj. Eroditaj
de la pluvoj de la durotempo de la Tero,
la deklivoj de la montflankoj estis facilaj
kaj la krutaĵoj leviĝis tiel kiel stumpoj de
elputriĝintaj dentoj. Gajal turnis sian
ĉevalon por supreniri kaj trairis la
senvojan deklivon en la montaron Fer
Akŭila.



Gajal de Sfer estis perdinta la vojon en lando de vento kaj nudaj krutaĵoj. Kiam venis nokto li kurbis senemocie en la selo dum la ĉevalo portis lin laŭ propra volo. Ie la antikva vojo tra Omuna Intermonto kondukus al la norda tundro, sed nun, sub malvarmiga tutĉiela nubaro, la nordo, oriento, sudo kaj okcidento similis sube de lavend-metale kolora ĉielo. Gajal rimene haltigis sian ĉevalon kaj, leviĝanta en la selo, serĉis la teron. La krutaĵoj staris, altaj, fremdaj; la grundo estis senvegetaĵa krom per aretoj de seka arbusto. Li faletis por sidiĝi kurbe en la selo, kaj lia blanka ĉevalo kuretis antaŭen.

Kapo klinita antaŭen kontraŭ la vento Gajal rajdis, kaj la montoj plasiĝis kline en la krepusko tiel kiel skeleto de fosilio de dio.

La ĉevalo haltis, kaj Gajal trovis sin ĉe la rando de larĝa valo. La vento jam mortis; la valo kvietis. Gajal kliniĝis antaŭen fikse rigardanta. Sube etendiĝis malhela kaj senviva urbo. Nebulo bloviĝis laŭ la stratoj kaj en la krepuska postlumo falis malbrile sur ardezajn tegmentojn.

La ĉevalo nazblekis kaj skrapis la multŝtonan grundon.

“Stranga urbo,” diris Gajal, “sen lumoj, sen sono, sen odoro de fumo...”

Preterdube forlasita ruino de antikvaj tempoj...”

Li pense **debatis**, ĉu li subeniru al la stratoj. Foje okazas, ke malnovaj ruinoj **hantiĝas** fare de strangaj **distilaĵoj**, sed tia ruino eble aliriĝas per vojeto. Tenante al tiu ĉi penso li startis sian ĉevalon subeniri la deklivon.

Li eniris la urbeton kaj la hufoj sonoris laŭte kaj akre sur la pavimŝtonoj. La konstruaĵoj estis el ŝtono kaj malhela mortero kaj ŝajnis esti nenormale bone konservitaj. Kelkaj **linteloj** jam rompiĝis kaj subfleksiĝis, kelkaj muroj gapis malfermaj, sed por la plejparto la ŝtonaj domoj sukcesis kontraŭstari la mordadon de tempo... Gaja flaris fumon. Ĉu homoj

ankoraŭ loĝis ĉi tie? Decis, ke li antaŭiru zorge.

Antaŭ konstruaĵo kiu tiel aspektis kiel gastejo floroj en urno ornamis. Gajal rimentire haltigis sian ĉevalon kaj pripensis ke floroj estas malofte ŝatataj fare de homoj malamike inklinaj.

“Saluton!” li vokis unu fojon — duan fojon.

Neniu kapoj aperis el pordoj, neniu oranĝa flagreto lumis la fenestrojn. Gajal malrapide turniĝis kaj rajdis plu.

La strato plilarĝiĝis kaj turniĝis al granda ĉefdomo, kie Gajal vidis lumeton. La konstruaĵo havis altan fronton, tiu

havanta kvar grandajn fenestrojn, ĉiu el kiuj havis du faldkurtenojn el surpentrita bronza **filigrano**, kaj ĉiu situis super balkaneto. Marmora **balustrado** antaŭ la teraso briletadis oste blanka, kaj, malantaŭ tio, masiva pordo estis iomete malferma; el tio venis la strio de lumo kaj ankaŭ frazo de muziko.

Gajal de Sfer, haltante, fiksrigardis nek la domon nek la lumon trairante la domon. Li elseliĝis kaj riverencis al la juna virino kiu sidis pensante sur la balustrado iom malproksime laŭ ĝia longo. Kvankam estis tre malvarme, ŝi portis nur simplan robon, flav-oranĝan, koloro de **dafodilo**. Topaz-koloraj haroj falis malstrikte ĝis la ŝultroj kaj donis al

Ŝia vizaĝo aspekton imponan kaj penseman.

Dum Gajal rektiĝis de sia riverenco la virino kapklinis, ridetanta iome, kaj senatente fingrumis la harbuklon apud la vango.

“Estas amara nokoto por vojaĝado.”

“Amara nokto por kontempli la ŝtelojn,” respondis Gajal.

Ŝi ridetis refoje. “Mi ne malvarmiĝas. Mi sidas kaj revas... Mi aŭskultas la muzikon.”

“Kiel nomiĝas tiu ĉi loko?” demandis Gajal, rigardanta laŭlonge la

straton unudirekte, aliadirekte, poste refoje al la junulino. “Ĉu estas iuj aliaj krom vi mem?”

“Tiu ĉi loko nomiĝas Karhaselo,” diris la junulino, “forlasita de ĉiuj antaŭ dek mil jaroj. Nur mi kaj mia maljuna onklo loĝas ĉi tiel, trovante tiun lokon rifuĝejo de la Saponedoj de la tundro.”

Gajal pripensis: tiu ĉi virino eble aŭ eble ne estas sorĉistino.

“Vi malvarmas kaj lacas,” diris la junulino, “kaj mi devigas vin plue stari surstrate.” Ŝi stariĝis. “Ni ofertas al vi gastigadon.”

“Tion mi feliĉe akceptas,” diris

Gajal, “sed unue mi devas konduki mian ĉevalon al ŝirmejo.”

“Li estos kontenta en la domo tie. Ni havas nenian ĉevalejon.” Gajal, sekvante ŝian fingromontron, vidis malaltan ŝtonan konstruaĵon kun malfermita pordo kondukanta al nigreco.

Li kondukis la blankan ĉevalon tien, deprenis la bridon kaj selon; poste, staranta en la pordo, li aŭskultadis la muzikon kion li estis atentinta antaŭe, la fajfado de tremige stranga kaj antikva fluta muziko.

“Strange, strange,” li murmuris, dorlote frotanta la muzelon de la ĉevalo. “La onklo ludas muzikon, la junulino

fiksrigardas la stelojn de la nokto...” Li konsideris momenton. “Eble mi estas tro suspektema. Se sorĉistino ŝi estas, nenion ŝi povas gajni de mi. Se ili estas simplaj rifuĝantoj kiel ŝi diras, kaj amantoj de muziko, eble ili ĝuos fajfaĵojn de Askolajs; tio pagos, iomete, kontraŭ ilia gastigemo.” Li etendis en la selosakon, elprenis sian fluton, kaj metis ĝin poŝte malantaŭ la ĉemizo.

Li alkuris reire al la loko kie la knabino atendis lin.

“Vi ne estis dirinta al mi vian nomon,” ŝi instigis al li, “por ke mi renkontigu vin al mia onklo.”

“Mi estas Gajal de Sfer, apud la

Rivero Skaŭm en Askolajs. Kaj vian?”

Ŝi ridetis, puŝante plimalferme la pordon. Varmeta flava lumo surfalis la pavimŝtonan straton.

“Mi havas nenian nomon. Mi bezonas nenian. Neniam estis iu alia krom mia onklo; kaj kiam li parolas, tiam estas neniu por respondi krom mi.”

Gajal fiksrigardis mirigite; poste, taksante sian mirigiĝon tro memevidenta por ĝentileco, regis al si la esprimon. Eble ŝi suspektus pri li sorĉistecon kaj timis prononci la nomon kontraŭ tio, ke li verku magiaĵon per ĝi.

Ili eniris la ŝtone pavimitan halon,

kaj la sono de flutado plilaŭtiĝis.

“Mi nomos vin Amna, se mi rajtas,” diris Gajal. “Tio estas floro el la sudo, tiom ora kaj ĝentila kaj bonodora kiel vi ŝajnas esti.”

Ŝi kapjesis. “Vi rajtas nomi min Amna.”

Ili eniris ĉambron ornamitan de murtapiŝoj, grandan kaj varmetan. Granda fajro lumadis ĉe unu muro, kaj jen staris tablo portanta manĝaĵojn. Sur benko sidis muzikitsto — maljunulo, malneta, iom malpura. Liaj blankaj haroj pendadis nekombitaj malsupren laŭ la dorso; lia barbo, en ne pli bona zorgstato, estis malpura kaj flava. Li vestiĝis per

eluzita kitelo, tre malpura, kaj la ledoj de liaj sandaloj montris fendojn pro sekiĝado. Strange, li neniam prenis la fluton for de la buŝo, sed daŭrigis la fajfadon; kaj la junulino en flavaĵoj, Gajal observis, ŝajne moviĝadis laŭ la ritmo de la tonoj.

“Onklo Ludoŭik,” ŝi vokis en gaja voĉo, “Mi kondukas al vi gaston, Sinjoron Gajal de Sfer.”

Gajal alrigardis la vizaĝon de la viro kaj konsideris. La okuloj, kvankam iom akvecaj, estis grizaj kaj brilaj — febre brilaj kaj inteligentaj; kaj, laŭopinie de Gajal, vekigitaj de stranga ĝojo. Tiu ĝojo estis plue konfuza je Gajal, ĉar la sulkoj de la vizaĝo indikis nenion krom jarojn

da mizero.

“Ĉu eble vi ludas?” demandis Amna. “Mia onklo estas bonega muzikisto, kaj tiu ĉi estas lia tempo por muziko. Li estis observinta la rutinon dum multaj jaroj...” Ŝi turniĝis kaj ridetis al Ludoŭik la muzikisto. Gajal kapjesis ĝentile.

Amna indikis la manĝaĵoplenan tablon. “Manĝu, Gajal, kaj mi verŝos por vi vinon. Poste eble vi ludos la fluton por ni.”

“Feliĉe,” diris Gajal, kaj li atentis, ke la ĝojo sur la vizaĝo de Ludoŭik fariĝis pli evidenta, tremetante ĉe la anguloj de ties buŝo.

Li manĝis kaj Amna verŝis por li oran vinon ĝis lia kapo komencis balanci. Kaj neniam ĉesis Ludoŭik sian fajfadon — nun estis kara melodio de fluanta akvo, poste estis serioza muzikaĵo kiu rakontis pri la perdita oceano okcidenta, alian fojon estis simpla melodio tia kian eble infano kantus ĉe siaj ludoj. Gajal observis tion, pri kiel Amna adaptis sian emocion je la muziko — serioze kaj gaje laŭ la muzika kondukado. Strange!, pensis Gajal. Tamen — homoj tiom izolaj emas kreski strangajn manierojn, kaj ili ŝajnis bonkoraj laŭ tutaspekto.

Li finis manĝi kaj stariĝis rekte, stabiligante sin kontraŭ la tablo. Ludoŭik

ludis svingetantan muzikaĵon, melodion pri vitraj birdoj flugantaj ade laŭ cirkloj ligitaj per ruĝa fadeno en la sunlumo. Amna venis dancante al li kaj staris proksime — tre proksime — kaj li flaris la varmetan parfumon de ŝiaj malstriktaj oraj haroj. Ŝia vizaĝo estis feliĉa kaj sovaĝa... Strange tio, ke Ludoŭik alrigardadis tiom serioze, tamen sen ajna vorto. Eble li mise dubis la volon de nekonato. Tamen...

“Nun,” anhelete diris Amna, “eble vi ludos la fluton; vi estas tiom forta kaj juna.” Poste, ŝi diris rapide, vidinte la okulojn de Gajal plimalfermiĝi, “Mi volas diri, vi ludos la fluton por maljuna onklo Ludoŭik, kaj li feliĉe foriros al sia

lito — kaj post tio ni sidos kaj konversacios longe en la nokton.”

“Feliĉe mi ludos la fluton,” diris Gajal. Kaj li malbenis la langon propran, samtempe tiom flua kaj tiom sensaĝa. Estis pro la vino. “Feliĉe mi ludos. Min oni taksas tre lerta ĉe mia hejma domo ĉe Sfer.”

Li rigardis al Ludoŭik, poste fiksrigardis al la esprimo de freneza ekĝojo kiun li surprize trovis. Mirinde, ke viro estu tiom entuziasma pri muziko.

“Do — ekludu!” anhelete diris Amna, urĝante lin iomete al Ludoŭik kaj la fluto.

“Eble,” sugestis Gajal, “Decas, ke mi atendu ĝis via onklo paŭzos. Mi ŝajnus esti malĝentile — ”

“Ne, kiam li vi indikas ke vi volas ludi, tiam li ĉesos. Simple prenu la fluton. Komprenu,” ŝi konfidis, “ke li iomete surdas.”

“Komprenite,” diris Gajal, “tamen mi havas fluton propran.” Kaj li elprenis ĝin de sub la ĉemizo. “Nu — kio problemas?” Ĉar frapa ŝanĝiĝo okazis je kaj la junulino kaj la maljunulo. Rapida eklumo leviĝis en ŝiaj okuloj, kaj la stranga esprimo de ĝojo ĉe Ludoŭik estis for, kaj estis nur malbrila senespero en ties okuloj, stulta rezigniĝo.

Gajal malrapide paŝis retroen, konfuzita. “Ĉu vi malvolas, ke mi ludu?”

Okazis paŭzo. “Kompreneble,” diris Amna, juna kaj ĉarma refoje. “Sed mi certas, ke Onklo Ludoŭik ŝatus aŭdi vin ludi ties fluton. Li al kutimiĝis al ĝia piĉo — malsama skalo eble estus malfamiliara...”

Ludoŭik kapjesis, kaj espero refoje brilis en la akvecaj maljunaj okuloj. Ĝi ja estis bonega fluto, Gajal observis, luksa ekzemplero el blanka metalo, randita kaj ornamita per oro, kaj Ludoŭik tenegis tiun ĉi fluton kvazaŭ li neniam ĝin maltenus.

“Prenu la fluton,” sugestis Amna.

“Li neniel malŝatos, ke vi tion faru.” Ludoŭik neis per la kapo por signi, ke liaflanke kontraŭstaroj tute mankas. Sed Gajal, observante kun malgusto la longan malpurece makulitan barbon, ankaŭ kapneis. “Mi povas ludi ajnan skalon, ajnan tonon sur la fluto propra. Neniel necesas ke mi uzu tiun de via onklo kaj eble lin maltrankviligi. Aŭskultu,” kaj li levis sian instrumenton. “Jen estas kanto de Kajin, nomata ‘La Opalo, la Perlo kaj la Pavo’.”

Li metis la fluton kontraŭ la lipoj kaj komencis ludi, ja tre lerte, kaj Ludoŭik sekvis lin, plenumante la paŭzojn, konstruante kordojn. Amna, forgesante sian obstakliĝon, aŭskultis kun la

palpebroj duone fermitaj, movis sian brakon laŭ la ritmo.

“Ĉu vi ĝuis tion?” demandis Gajal, kiam li finis.

“Tre multe. Eble vi provus tion sur la fluto de Onklo Ludoŭik? Ĝi estas bonega fluto por esti ludata, tre mola kaj facila al la spirado.”

“Ne,” diris Gajal, kun subita obstineco. “Mi kapablas ludi nur per la propra instrumento.” Li blovis refoje, kaj ĝi estis danco de la festivalo, salteta karnavala fajfaĵo. Ludoŭik, ludante kun supernatura lerteco, muzike trakuris feliĉajn sonfrazojn kiam ajn decis, kaj Amna, portata laŭ la ritmo, dancis dancon

tute propran, feliĉan paŝadon
ĝustatempan kun la muziko.

Gajal sonigis senbridan tarantelon de la kamparanaj popoloj, kaj Amna dancis pli sovaĝe kaj rapide, eketendis la brakojn, radiis, spasme movis la kapon en bonega spektaklo. Kaj la fluto de Ludoŭik ludis brilan sonfrazegon, saltante super, post sube de, akordante, kurbiĝante flanken, plektante etajn arĝentajn fadenojn da sono ĉirkaŭ la melodio de Gajal, aldonante ĝustatempajn etajn gracio-frazojn.

La okuloj de Ludoŭik nun fikse sekvis la girantan figuron de la dancanta junulino. Kaj subite li ekestigis temon propran, muzikaĵon plej sovaĝe

senbridan, el ritmo preskaŭ tambura; kaj Gajal, portita mem laŭ la fortika muziko, blovis tiel kiel neniam antaŭe li estis blovinta, tiel ke li mem inventis trilojn kaj skalojn, girajn arpeĝojn, blovis alte kaj akre, laŭte kaj rapide kaj klare.

Ĝi estis neniaĵo kompare al la muziko de Ludoŭik. Liaj okuloj elstaregis; ŝvito fluadis de sur lia sulkohava maljuna frunto; lia fluto ŝiris la aeron en ŝirstriojn treme ekstazajn.

Amna dancis freneze; ŝi ne plu estis bela, ŝi aspektis groteske kaj nefamiliara. La muziko fariĝis io pli ol povis toleri la sensoj. La vidado de Gajal koloriĝis roze kaj grize; li vidis, ke Amna falis svene, ke ŝi buŝoŝaŭme tremetadis; ka Ludoŭik,

fajr-okula, ŝancele stariĝis, ŝancele aliris ŝian korpon kaj komencis teruran konkordan muzikon, malrapidaj frazoj el la plej solena kaj timiga signifo.

Ludoŭik sonigis morton.

Gajal de Sfer turniĝis kaj kuris grand-okule el la ĉambregon. Ludoŭik, neniom atentante, daŭrigis sian teruran flutadon, ludis kvazaŭ ĉiu noto estus pinta rostostango penetranta al ŝi la skapolojn.

Gajal kuris tra la nokto, kaj malvarma akro mordis al li kiel **grajlo**. Li ekeniris la ŝirmejon, kaj la blanka ĉevalo blekis al li. Rapide almetiĝis la selo, rapide la brido, rapide al forkuro laŭlonge

la stratojn de malnova Karhaselo, preter la gapantaj nigraj fenestroj, sonore sur la stele lumigitaj pavimŝtonoj, for de la muziko de morto!

Gajal de Sfer supren-galopis la monton kun la steloj en sia vizaĝo, kaj ne ĝis post atingi la ŝultraĵon turniĝis li en la selo por rigardi malantaŭen.

La ĵus komencanta sunsupreniro tremble lumis la ŝtonan valon. Kie estis Karhasel? Nenie estis urbo — nur disfalaĵo el ruinoj...

Ho! Ĉu malproksima sono?...

Ne. Ĉie estis silento.

Sed malgraŭe...

Ne. Nur disfalintaj ŝtonoj sur la planko de la valo.

Gajal, kun fiksema rigardo, turniĝis por laŭiri la propran direkton, laŭ la vojo kiu etendiĝis norden antaŭ li.

La muroj de la deklivo kiuj kondukis la vojon estis el kruta griza granito, kolorigita skarlate kaj nigre per liĥeno, melduigita blue. La hufoj de la ĉevalo faris klop-klop-klop-ajn sonojn, laŭte al la oreloj de Gajal, hipnote al lia cerbo, kaj post la sendorma nokto li trovis sian formon subfleksiĝanta. Liaj okuloj fariĝadis malklaraj kaj varmetaj kun dormemo, sed la vojo antaŭa

kondukis al ne antaŭe viditaj vidaĵoj, kaj la malpleneco en la cerbo de Gajal instigis lin sen mildiĝo.

La laceco tiom grandiĝis ke Gajal glitis duone el la selo. Vekigante sin, li decidis, ke li ĉirkaŭiru unu turniĝon plu de la vojo kaj poste haltu por ripozi.

Supere la roko pasiĝis por kaŝi la ĉielon kie la suno ĵus pasis la zeniton. La vojo turniĝis krute ĉirkaŭ ŝultro el roko; antaŭe lumis eta montraĵo de *indiga* ĉielo. Unu turniĝon pluan mi prenos, Gajal diris al si mem. La deklivo malfermiĝis, la montoj malantaŭis lian dorson kaj li rigardis elen trans cent mejloj da stepo. Ĝi estis lando ombrita per subtilaj koloroj, verŝita per delikataj ombroj,

fadiĝanta kaj fandiĝanta en trokoloran nebulecon ĉe la horizonto. Li vidis solan eminentaĵon supere kaŝitan fare de arboj, vidis briletadon de lago ĉe ĝia piedo. Je la transa flanko situis amaso da grize blankaj ruinoj nur iomete videblaj. Ĉu la Muzeo Homara?... Post momenta sendecidado, Gajal elseliĝis kaj serĉis dormadon interne de la Plivastigebla Ovo.

La suno ruliĝis en malgaja luksa majesteco malantaŭ la montoj; krepusko falis trans la tundro. Gajal vekiĝis kaj refreŝiĝis sin ĉe proksima akvoflueto. Donante muelaĵon al sia ĉevalo, li manĝis sekigitan frukton kaj panon; poste li enseliĝis kaj rajdis malsupren laŭ la

vojeto. La ebenejo etendiĝis vaste norden antaŭ li, kondukante al senhomecon; la montoj staris nigraj supere kaj malantaŭe; malrapida malvarma venteto blovis al lia vizaĝo. Mallumeco profundiĝis; la ebenejo sinkis el videbleco kvazaŭ droninta lando. Hezitema pro la krepuskeco, Gajal rimene haltigis sian ĉevalon. Pli bone, li pensis, ke li rajdu en la mateno. Se li perdus la vojon en la mallumo, ne prognozeblas tion kion li povus renkonti.

Aŭdiĝis sono bedaŭra. Gajal rigidiĝis kaj turnis la vizaĝon ĉielen. Ĉu suspiro? Ĉu ĝemo? Ĉu plorego?... Plua sono, pliproksima, susuro de ŝtofo, malstrikta vestaĵo. Gajal timkaŭris en sia

selo. Ŝvebante malrapide malsupren tra la mallumo venis formo blanke investita. El de kapuĉo interne lumigita strangkoloro rigardadis vizaĝo kun okuloj tiaj kiaj truoj de kranio.

Ĝi elspiris sian mornan sonon kaj ŝvebis for en la alteco... Poste estis nur la blovado de vento preter la oreloj de Gajal.

Li enspiris tremetadan spiron kaj kurbiĝis kontraŭ la pomelo. Al li la ŝultroj sentiĝis senŝirmaj, nudaj. Li glitis grunden kaj aranĝis la ŝirmilon de la Ovo ĉirkaŭ si kaj sia ĉevalo. Pretiginte sian dormkusenon, li kuŝigis sin suben; postnelonge, dum li kuŝis alrigardante la nokton, dormo alvenis lin kaj tiel pasis la

nokto.

Li vekigis antaŭ ol sunsupreniro kaj refoje ekveturis. La vojeto estis rubando el blanka sablo inter flankaj deklivetoj el griza ulekso kaj la mejloj pasadis rapide.

La vojeto kondukis al la per arboj kovrita elstaraĵo kiun Gajal atentis de supere; nun li kredis, ke li vidis tegmentojn tra la peza foliaro kaj fumo en la akra aero. Kaj postnelonge ĉe dekstre kaj maldekstre etendiĝis kultivitaj kamparoj el **nardo**, ĥálo kaj medo-pomo. Gajal pluriradis kun okuloj atentaj pri homoj..

Ĉe unu flanko aperis barilo el ŝtono kaj nigra ligno: la ŝtono ĉizita kaj hakita

laŭ aspekto de kvar globoj bide aranĝitaj sur centra fosto, la nigraj lignostangoj servis kiel reloj enpoŝte fiksitaj en ingoj kaj gravuritaj por formi precizajn helicojn. Malantaŭ tiu ĉi barilo kuŝis regiono el nuda tero kirlita, kavetigita, frape kavegigita, bruligita kaj tordita, kvazaŭ samteme vizitita fare de fajro kaj grandega martelo. Mire hipotezante Gajal rigardadis kaj ne atentis la tri virojn kiuj proksimiĝis kviete al li.

La ĉevalo ektimiĝis nerveze; Gajal, turniĝante, vidis la triopon. Ili obstaklis al li la vojon kaj unu tenis la bridon de lia ĉevalo.

Ili estis altaj, bonformaj viroj, portantaj striktajn **ensemblojn** el sombra

ledo randita per nigro. Iliaj kapvestoj estis el peza brunruĝa ŝtofo premfaldita laŭ precizaj sulkoj, kaj ledaj pendaĵoj etendiĝis horizontale super ambaŭ oreloj. Iliaj vizaĝoj estis longaj kaj solenaj, kun senmakula ore ebur-kolora haŭto, oraj okuloj kaj haroj tiel nigraj kiel gagato. Memevidente ili ne estis sovaĝuloj: ili moviĝis kun silke mola memregado, ili fiksrigardis Gajal-on kun kritika taksado, iliaj vestaĵoj implikis la discipliniĝon de antikva kutimo.

La estro paŝis antaŭen. Lia esprimo estis nek timiga nek bonveniga. “Salutojn, nekonatulo; kien vi celas?”

“Salutojn,” respondis Gajal singarde. “Mi celas tien kien direktas mia

stelo... Ĉu vi estas la Saponedoj?”

“Tiu estas nia gento, kaj antaŭ vi situas la urbo Saponco.” Li studis Gajalon kun senkaŝa scivolemo. “Pro la koloro de via vestaro mi suspektas, ke via hejmo estas en la sudo.”

“Mi estas Gajal de Sfer, apud la Rivero Skaŭm’ en Askolajs’.”

“Tiu vojo estas longa,” observis la Saponedo. “Teruraĵoj agacas la vojaĝanton. Devas esti, ke via instigo intensas, kaj ke via stelo tiras per fervoriga logado.”

“Mi venas,” diris Gajal, “laŭ pilgrimado por trankviligi mian spiriton;

la vojo tiam ŝajnas mallonga kiam ĝi akiras la celon.”

La Sponedo ofertis ĝentilan akordiĝon. “Do vi estas transirinta la montaron Fer Akŭila?”

“Prave; kvankam tio ke ĝi estis malvarma vento kaj senhoma ŝtono.” Gajal ekrigardis malantaŭen al la superstara masivaĵo. “Nur hieraŭ je noktiĝo mi elvenis la intermonton. Kaj tiam ŝvebis fantomo supere tiel por devigi min pensi ke la tombo venis por nomi min sia propra.”

Li paŭzis pro surprizo; liaj vortoj ŝajne liberigis fortan emocion je la Saponedo. Iliaj vizaĝaj esprimoj

plilongiĝis, iliaj buŝoj fariĝis blankaj kaj kunpremitaj. La estro, lia ĝentila aparteco iom malpliigita, serĉis la ĉielon kun malsufiĉe kaŝita antaŭtimo. “Fantomo... En blanka vestaĵo, granda je tiel kaj tiel, ŝvebanta alte?”

“Jes; ĉu ĝi estas familiara konataĵo de la regiono?”

Sekvis paŭzo.

“Laŭ certa maniero,” diris la Saponedo. “Ĝi estas signalo de malbonego... Sed mi interrompis vian rakonton.”

“Ekzistas malmulto rakontinda. Mi elektis ŝirmiĝi por la nokto, kaj ĉimatene

mi iradis malsupren al la ebenejo.”

“Ĉu vi ne agaciĝis plu? Fare de Kubaŭ la Marŝanta Serpento, kiu ĉase marŝadas la deklivojn tiel neeviteble kiel la sorto?”

“Mi vidis nek marŝantan serpenton nek rampantan lacerton; beno ŝirmas al mi la vojon kaj mi renkontas nenian danĝeron tiom longe kiom mi laŭiras sendeflankiĝe la propran vojon.”

“Interese, interese.”

“Nu,” diris Gajal, “permesu, ke mi demandadu al vi, ĉar estas multo kion mi volas lerni; kio estas tiu ĉi fantomo kaj kian malbonaĵon li rememorigadas?”

“Vi demandas pri aferoj kiuj preteras mian scion,” respondis la Saponedo singarde. “Estas saĝe, ke oni ne preparolu tiun ĉi fantomon kontraŭ tio, ke nia atento plifortigus ĝian malignecon.”

“Laŭ via deziro,” respondis Gajal. “Eble vi instruu min...” Li haltigis la langon. Antaŭ ol demandi pri la Muzeo Homara, estus pli saĝe eklerni pri tio, kiel la Saponedoj taksas ĝin, kontraŭ tio, ke ili, atentigitaj pri lia intereso, strebus obstakli lin de informiĝo.

“Jes” enketis la Saponedo. “Kio mankas al vi?”

Gajal indikis la bruligitan lokon malantaŭ la barilo el ŝtono kaj ligno. “Pri

kio signifas tiu ĉi detruitejo?”

La Saponedo fiksrigardis trans la loko kun fikita senesprimeco sur la vizaĝo kaj ŝultrolevis. “Ĝi estas unu el la antikvaj lokoj; tiom multe oni konas, neniom pluan. Morto hantas ĉi tie, kaj neniu vivantulo povas transiri la lokon sen suferi plej malican magion kio instigas fortan malsanon kaj doloregajn **ulcerojn**. Ĉi tien ni sendas tiujn kiujn ni volas mortigi... Sed ne evitu. Vi estus deziranta ripozi kaj refreŝigi vin ĉe Saĝonco. Venu; ni gvidos vin.”

Turniĝante li laŭiris la vojeton kondukantan al la urbeto, kaj Gajal, sen kaj vortoj kaj kialoj por rifuzi la ideon, urĝis sian ĉevalon antaŭen.

Dum ili alproksimiĝis la per arboj ombrelita monteto la vojeto plilarĝiĝis por fariĝi vojo. Dekstraflanke la lago pliproksimiĝis, malantaŭ malaltaj deklivetoj da purpuraj fragmitoj. Ĉi tie estis kajoj konstruitaj el pezaj nigraj trabegoj kaj boatoj balancis ritme kun la per vento plumigitaj ondetoj. Ili estis konstruitaj laŭ la formo de **falĉiletoj**, kun pruo kaj pobo kurbiĝantaj alten super la akvo.

Pli alten enire je la urbeto, kaj la domoj estis el hakitaj trabegoj, el koloroj inter ore bruna ĝis vetere malkulita nigro. La konstrumaniero estis komplika kaj ornamega, la muroj leviĝantaj tri etaĝojn ĝis krutaj **gabloj** supere etendiĝantaj je

kaj antaŭo kaj malantaŭo. Fostegoj en kaj grundo kaj lago estis orname tranĉitaj per komplikaj desegnaĵoj: interplektantaj rubandoj, ĉiroj, folioj, lacertoj, kaj simile. La ekranoj ŝirmantaj fenestrojn simile ornamtranĉiĝis, kun foliaroj, bestaj vizaĝoj, radiantaj steloj: luksaj teksturoj en la milda ligno. Estis klare, ke multa esprimado elspeziĝis en la tranĉado.

Supren laŭ la kruta vojo, tra la maluma ombraro sub la arboj, preter domoj duone kaŝitaj per la foliaro, kaj la Saponedoj de Saponco elvenis por fiksrigardi. Ili moviĝis kviete kaj interparolis mallaŭtvoĉe, kaj iliaj vestoj estis el tia eleganteco kian Gajal ne supozis vidi sur la norda stepo.

Lia gvidanto haltis kaj turniĝis al Gajal. “Vi ne malbonvolus atendi dum mi raportas al la Vojevod, por ke li povu aranĝi taŭgan bonvenigon, ĉu?”

La peto estis parolata per senkaŝaj vortoj kaj kun netrompaj okuloj. Gajal pensis ke li perceptis ambiguecon en la frazkonstruo, sed pro tio ke la hufoj de la ĉevalo staris firme sur la vojmezo, kaj pro tio ke oni ne proponis, ke li eliru la vojon, Gajal konsentis kun senkaŝa esprimo. La Saponedo malaperis kaj Gajal sidis pensanta pri la plaĉa urbeto kio situas tiom alte super la ebenejo.

Aro de junulinoj alvenis por ekrigardi al Gajal kun scivolemaj okuloj. Gajal reciproke scivoleme alrigardis, kaj

nun atentis pri konfuziga manko je ili, strangeco kiun li ne povis tuj specifigi. Ili portis graciajn vestojn el plektita lano, striita kaj kolorigita diverskoloro; ili estis flekseblaj kaj sveltaj, kaj ŝajne al ili koketemo ne mankis. Tamen...

La Saponedo revenis, “Nun, Sinjoro Gajal, ĉu mi rajtas peti, ke ni pluiru?”

Gajal, provante kribri ajnan guston de suspektemo el siaj vortoj, diris, “Mi petas vin kompreni, ke pro la naturo de la beno de mia patro, mi ne riskus eliri la striktan sekvindejon de la vojeto; ĉar tiam, tuje, mi fariĝus sendefenda kontraŭ ajna malbeno, kio, celita je mi laŭ mia pasinta irado, eble celus ĝuste tian okazon por alproksimiĝi parazite mian

animon.”

La Saponedo gestis sian komprenon. “Nature; vi sekvas saĝan principon. Lasu min certigi al vi. Mi nur kondukas vin al akcepto kun la Vojevod kiu eĉ nun hastas al la placo por renkonti nekonatulon de la fora sudo.”

Gajal riverencis dankeme, kaj ili ekpluiris la vojon.

Cent paŝoj pasiĝis kaj la vojo ebeniĝis, transirante komunan kampon kie kreskis etaj, tremetantaj folioj, el koloroj en ĉiuj helecoj de purpuro, ruĝo, verde kaj nigro.

La Saponedo turniĝis al Gajal. “Pro

tio ke vi fremdas, mi devas averti vin pri tio, ke vi neniam surpaŝu la komunejon. Ĝi estas unu el niaj sanktaj lokoj, kaj tradicio postulas severan punon por pekoj kaj sakrilegio.”

“Mi atentis vian averton,” diris Gajal. “Mi obeos vian leĝaron kun respekto.”

Ili pasis densan arbustejon; kun terura bruego besta formo risortis el kaŝejo, fiksrigarda besto kun grandega dentega mandiblo. La ĉevalo de Gajal ektimiĝis, ekkuris, elsaltis la vojon surire al la sanktan komunejon kaj dispremis la tremetantajn foliojn.

Kelke da Saponedaj viroj hastis

amase antaŭen, ektenis la ĉevalon, kaptis Gajal-on kaj trenis lin elsele.

“Ho!” kriis Gajal. “Kion tio ĉi signifas? Liberigu min!”

La Saponedo kiu estis servinta kiel gvidisto alproksimiĝis, gestante malaprobon per kapneado. “Nekredeble, kaj mi je nur momento antaŭa emfazis al vi la seriozecon de tia fikonduto!”

“Sed la monstro timigis mian ĉevalon!” diris Gajal. “Mi estas neniel respondeca pri ĝia surpaŝo; liberigu min, lasu ke ni aliru la akcepton.”

La Saponedo diris, “Mi timas, ke la punoj postulataj de tradicio devas

efektiviĝi. Viaj protestoj, kvankam ŝajne kredeblaj je la surfaco, ne toleras seriozan enketon. Ekzemple, la besto kiun vi nomas monstro estas, en realeco, sendanĝera malsovaĝigita besto. Due, mi observis la beston kiun vi rajdas; li nek turniĝas nek tordiĝis krom per ekmoviĝeto de la rimenoj. Trie, eĉ se viaj proponoj estus agnoskitaj, vi mem tiel agnoskas kulpecon pri malatento kaj malinformo. Decas ke vi estus elektinta beston malpli inklinan al neprognozebla agado, aŭ post lerni pri la sankteco de la komunejo, decas ke vi estus konsiderinta tian eblecon kian ĵus nun okazis, kaj pro tio elseliĝus por gvidi vian beston. Pro tio, Sinjoro Gajal, malgraŭ mia malvolo, mi estas devigita kredi vin kulpa je

malrespekto, senreligieco, malatento kaj malhumileco. Tial, kiel Kastelano kaj Serĝent-Leganto de la **Litanio**, mi devas ordoni ke vi estu sekurigita, limigita, barita, enkarcerigita kaj ŝlosita ĝis tiu tempo kiam la punoj estos ekzekutitaj.”

“La tuta okazaĵo estas mokinde!” plendegis Gajal. “Ĉu vi estas sovaĝuloj, tiel, ke vi fitraktas solan vojaĝanton?”

“Neniel,” respondis la Kastelano. “Ni estas alte civilizita popolo, kun kutimoj hereditaj al ni el la pasinteco. Pro tio ke la pasinteco gloris pli ol la estanteco, kiel fie ni pretendus se ni pridubus tiujn ĉi leĝojn!”

Gajal silentiĝis. “Kaj kio estas la

kutimaj punoj por tia faro?”

La Kastelano faris trankviligan geston. “La parkeraĵo priskribas tri **pento-**faradojn, pri kiuj mi certas, ke viakaze ili estos mildaj. Sed — la farindaĵoj devas esti observataj; kaj necesas, ke vi estu maliberigita en la Krimula Ŝranko.” Li gestis al la viroj kiuj tenadis la brakon de Gajal. “Forkonduku lin; transiru nek paŝvojojn nek irejon, ĉar tiukaze via tenado fariĝus sennerva kaj li estus liberigita for de justeco.”

Gajal estis malliberigita en malbone lumigita kelo el ŝtono. Li trovis la plankon seka, la plafonon sen rampantaj insektoj. Li ne traserĉiĝis, nek forpreniĝis lia Scintila Ponardo el de lia zon-skarpo.

Kun suspektadoj plenigantaj al li la cerbon li kuŝiĝis sur la fragmita lito kaj, post iome, dormis.

Nun komencis pasado de la tago. Al li doniĝis manĝaĵo kaj trinkaĵo; kaj fine venis al li la Kastelano por viziti.

“Vi ja bonŝancas,” diris la Saponedo, “pro tio, ke kiel atestanto, eblis al mi sugesti, ke viaj pekoj rezutas pli el misfaro ol el malico. La antaŭafojaj punoj efektivigitaj estis striktaj; la krimulo estis ordonita plenumi la sekvajn tri farendaĵojn: unue, detranĉi siajn piedfingrojn kaj kudri la detranĉitajn membrojn sur la haŭto ĉe sia kolo; due, blasmfemi kontraŭ siaj praparencoj dum tri horoj, komencante per la Komuna Listo

de Tabuoj, inkluzive de ŝajnigita freneziĝo kaj hereda malsano, kaj fine malsanktigi la fajrejon de sia **klando** per fekaĵo; kaj trie, marŝadi mejlon sube de la lago kun plumbaj ŝuoj por serĉi la Perditan Libron de Kváloj.” Kaj la Kastelĉano alrigardis Gajal-on plaĉmaniere.

“Kiujn taskojn mi devas plenumi?” enketis Gajal sekahumore.

La Kastelano kunmetis la fingropintojn. “Kiel mi diris, la pentofaraĵoj mildas, laŭ decido fare de la Vojevod. Unue vi devas ĵuri ke neniam vi refaros vian krimon.”

“Tiel mi ĝoje faras,” diris Gajal, kaj

tiel ĵuris sin al detenado.

“Due,” diris la Kastelano kun milda rideto, “vi devas servi kiel juĝisto ĉe la Granda Spektaklo de Beleco inter la virgulinoj de la vilaĝo kaj elekti ŝin kiun vi trovas la plej bela.”

“Apenaŭ malfacila tasko,” komentis Gajal. “Kial ĝi falas sur mian taskaron?”

La Kastelano rigardis senesprime plafonen. “Ekzistas kelke da flankaferoj je venko en tiu ĉi konkurso... Ĉiu persono en la urbeto trovu parencojn inter la partoprenantoj — filinon, fratinon, nepinon — kaj pro tio apenaŭ konsiderindus sen antaŭjuĝemo. Imputo pri preferemo neniam povus esti celigita

al vi; tial vi decas kiel ideala elektulo por tiu ĉi grava ofico.”

Ŝajnis al Gajal, ke li aŭdis sonoron de sincereco en la voĉo de la Saponedo, tamen li scivolis la kialon pri tiu afero, ke tiel gravas la elektiĝo de la plej bela el la urbo.

“Kaj trie?” li demandis.

“Tio estos malkovrata post ol la konkurso, kio okazos ĉi posttagmeze.”

La Saponedo eliris la kelon.

Gajal, kiu estis tute sen vaneco, spezis kelkajn horojn por ripari sin kaj sian kostumon senige de la difektiĝoj de

veturado. Li banis sin, tondetis la harojn, razis la barbon, kaj tiam, kiam la Kastelano venis por malŝlosi la pordon, li kredis, ke li memprezentis ne malakceptinde.

Li kondukiĝis elen sur la vojon kaj direktiĝis supren laŭ la monteto al la supro de la surterase konstruita urbeto Saponco. Turniĝante al la Kastelano li diris, “Pro kio vi permesas, ke mi suriru la vojon refoje? Vi certe komprenas, ke mi nun estas sekura kontraŭ malbontraktiĝo...”

La Kastelano ŝultrolevis. “Prave. Tamen vi gajnus malmulton per via dumtempa imuneco. Antaŭe la vojo transiras ponton, kion ni povus detrui;

malantaŭe ni bezonas nur fendi la digon ĉe Peilmenĉalan Fluegon; poste, se vi marŝus la vojon, vi estus flankenverŝita kaj tiam, kaj tiel senŝirmiĝi. Ne, Sinjoro Gajal, tuj tiam, kiam la sekreto de via imuneco koniĝas vi ekfariĝas sendefenda kontraŭ diversaj taktikoj. Ekzemple, granda muro povus konstruiĝi obstakle sur la irejo, kaj antaŭ kaj malantaŭ vi. Sendube la sorĉbeno gardos vin kontraŭ soifo kaj malsato, tamen kion vi farus poste? Ĉu vi sidados ĝis la suno estingiĝos?”

Gajal parolis neniom. Trans la lago li observis triopon da lunarkformaj boatoj alproksimiĝantaj la kajojn, pruoj kaj pobj balancantaj flanken kaj antaŭen

kun facila movado. La mankeco en lia menso vokis sian atenton. “Kial la boatoj konstruiĝis tiumaniere?”

La Kastelano alrigardis lin senkomprene. “Ĝi estas la sola praktikebla metodo. Ĉu ne tiel kreskas la semuoj de óe-plantoj en la sudo?”

“Neniam mi vidis óe-semuojn.”

“Ili estas la fruktoj de grandega grimpoplanto, kaj kreskas laŭ lunarka formo. Kiam sufiĉe grandaj, ni detranĉas kaj purigas ilin, tranĉas laŭlonge la internan randon, interkroĉas la ekstremojn per fortika ŝnuro kaj kuntiras ĝis la semujo premiĝe malfermiĝas laŭ deziro. Poste, kiam hardigita, sekigita,

gravurita, plurita kaj lakita; provizita per deko, rembenkoj kaj fortikigaj pecoj — tiam ni havas niajn boatojn.”

Ili eniris la placon, plata logo ĉe la supro ĉirkaŭita je tri flankoj per altaj domoj el ĉizita malhela ligno. La kvara flanko malfermis al videbleco trans de la lago kaj transe ĝis la elstariĝo de montoj. Arboj superpendis ĉie kaj la suno tralumante faris skarlatan desegnaĵon sur la sabla planko.

Estis surprize al Gajal, ke ŝajne mankis kaj antaŭaj ceremonioj aŭ formalaĵoj por la konkurso, kaj malmulta festo-etoso videblis inter la urbetanoj. Fakte ili ŝajnis subpremetaj de subtila malespereco kaj alrigardis lin sen

entuziasmo.

Cent junulinoj staris kune en senespera grupo ĉe la mezo de la placo. Ŝajnis al Gajal, ke ili estis farintaj malmultajn strebojn por sin plibeligi. Kontraŭe, ili portis senformajn vestaĉojn, iliaj hararoj aspektis esti laŭvole malordigitaj, iliaj vizaĝoj estis malpuraj kaj grimacaj.

Gajal fiksrigardis kaj turniĝis al si gvidanto. “Ĉi tiuj knabinoj ŝajnas ne ŝati la **girlandon** de beleco.”

La Kastelano kapjesis tordamuze. “Kiel vi observis, ili neniel ĵaluzas pri la distingeco; modesteco ĉiam estis Saponeda kvalito.”

Gajal hezitis. “Laŭ kia metodo oni procedu? Mi ne volas pro mia nescio rompi pluan el viaj arkanaj apokrifaĵoj.”

La Kastelano diris kun senesprima vizaĝo, “Formalaj ritoj mankas. Ni kondukas tiujn ĉi konkursojn kun malprokrastemo kaj la plej minimuma ceremonio. Vi devas nur trapasi inter tiuj ĉi virgulinoj kaj indiku ŝin kiun vi trovas plej alloga.”

Gajal ekpaŝis por komenci sian taskon, sentante sin pli ol duone ridinda. Poste li pripensis: tiu ĉi estas puno por kontraŭi absurdan tradicion; mi kondutos efike por ke mi pli rapide liberigu min el la devo.

Li staris antaŭ la cent junulinoj, kiuj rigardis lin kun malamikeco kaj timeto, kaj Gajal ektrovis, ke la tasko ne estos simpla, ĉar entute, ili estis el ia beleco kion eĉ la malpureco, grimacado kaj vestaĵoj ne povis kaŝi.

“Apartigu vin, mi petas, formante linion,” doros Gajal. “Tiel ĉi, neniu suferos malavantaĝon.”

Malbonhumore la knabinoj aranĝis sin por formi linion.

Gajal rigardis juĝe la grupon. Li tuj vidis, ke kelkaj povus esti eligitaj: la malaltaj, la grasegaj, la makulitaj kaj maldelikate aspektaj — eble kvarono el la grupo. Li diris miele, “Neniam mi vidis

tiom komune senesceptan belecon; ĉiu el vi povus proprarajte alproprigi la premion. Mia tasko malfacilas; mi devas pesi delikatajn nemezureblaĵojn; je la fino mia decido estos sendube bazita sur subjektivismo kaj tiujn el vera ĉarmo estos preterdube la unuaj eligitaj de la konkurso.” Li paŝis antaŭen. “Tiuj kiujn mi indikos eliru.”

Li marŝis laŭlonge la linion, indikante per fingro, kaj la pli malbelaj, kun esprimoj de memevidenta trankviliĝo, hastis flanken.

Duan fojon Gajal faris prijuĝan rigardon, kaj nun, iom pli bone konanta tiujn pri kiuj li juĝas, li povis eligi tiujn, kiuj kvankam suferante nenian

minimumaĵon da malbeleco, estis nure ordinaraj.

Ĉirkaŭ triono restis. Tiuj ĉi fiksrigardis al Gajal kun diversaj gradoj da antaŭtimo kaj batalemo dum li pasis preter ili, studante ĉiun laŭ ties vico... Tuj je momento lia menso decidiĝis, lia elektulino difiniĝis. Iel la junularinaro sentis la ŝanĝiĝon kio en li okazis, kaj al ili la pritimo kaj emocia streĉiĝo forfalis de la esprimoj kiujn ili estis portantaj por lin obstakli kaj konfuzi.

Gajal faris kroman finan inspekton laŭtute la linio. Ne, li ja pravis je sia elekto. Estis knabinoj ĉi tiel tiel allogaj kiel la sensoj povas deziri, knabinoj kun opale lumaj okuloj kaj detaloj hiacint-

flore belaj, knabinoj **supraj** kiel fragmitoj, kun hararo silkeca kaj fajna malgraŭ la polvo kion ili ŝajne estis frotintaj sur si.

La knabino kiun Gajal estis elektinta altis iomete malpli ol la aliaj kaj posedis belecon ne tuj memevidentan. Ŝi havis etan triangulecan vizaĝon, grandajn sopir-esprimajn okulojn kaj densan nigran hararon kio estis tondita malorde mallonga ĉe orela nivelo. Ŝia haŭto estis el travidebla paleco, kiel la plej fajna eburo; ŝia formo estis svelta, gracia, kaj el atentodeviga allogo, urĝa je intimeco. Ŝajnis ke ŝi sentis lian decidon kaj ŝiaj okuloj pligrandiĝis.

Gajal prenis ŝian manon, kondukis ŝin antaŭen, kaj turniĝis al la Vojevod —

maljuna viro sidanta solide en peza seĝo.

“Jen ŝi kiun mi trovas la plej bela el viaj virgulinoj.”

Estis silente tra tute la placo. Post venis raŭka sono, krio de malĝojo de la Kastelano kaj Sergento-Legisto. Li venis antaŭen, kun malĝoje pendema vizaĝo, la korpomovoj malfortikigitaj. “Gajal de Sfer, vi estas verkinta grandan venĝon kontraŭ mia trompo al vi. Jen mia amata filino, Ŝierl, kiun vi estas destinigita al timegaĵo.”

Gajal turniĝis mirigite de la Kastelano al la knabino Ŝierl, en kies okuloj li nun rekonis aspekton de sensento, fiksrigardadon al fora

malproksimeco.

Returnigante al la Kaselano, Gajal ekparolaĉis, “Mi intencas tutan senpreferecon. Tiun ĉi vian filinon Ŝierlon mi taksas unu el la plej belaj estuloj el mia spertado; mi ne povas kompreni tion, pri kiel mi ofendis.”

“Ne, Gajal,” diris la Kastelano, “vi estas juĝinte juste, ĉar tiel ja estas mia propra penso.”

“Nu, do,” diris Gajal, “informu min pri mia tria tasko ke mi povu ekŝigi la aferon kaj daŭrigu mian pilgrimon.”

La Kastelano diris, “Tri leŭgojn je la nordo situas ruinon pri kiu tradicio

informas nin estas la malnova Muzeo Homara.”

“Ah,” diris Gajal, “daŭrigu, mi atentas.”

“Vi devas, por via tria tasko, konduki tiun ĉi mian filinon Ŝierl-on al la Muzeo Homara. Ĉe la portalo vi frapos sur kupran **gongon** kaj eldiru al kiu ajn respondos: ‘Ni estas tiuj alvokitaj de Saponco.’”

Gajal ektimetis, malridetis. “Kiel estas? ‘Ni’?”

“Tiel estas via tasko,” diris la Kastelano en tia voĉo kia tondro.

Gajal rigardis maldekstren, dekstren, antaŭen kaj malantaŭen. Sed li staris en la mezo de la placo ĉirkaŭita de la fortikaj viroj de Saponco.

“Kiam devas tiu ĉi tasko estu plenumita?” li demandis en regita voĉo.

La Kastelano diris en voĉo tiom amara kiom kverka suko: “Eĉ nun Ŝierl iras por vesti sin en flavo. Post unu horo ŝi aperos, je unu horo vi ekiros cele al la Muzeo Homara.”

“Kaj poste?”

“Kaj poste — ĉu por bono aŭ por malbono, tio ne estas konata. Vi tiel ekiros kiel dek tri mil estis ekirintaj antaŭ

ol vi.”



Malsupren de sur la placo, malsupren laŭ la arbofoliaj vojetoj de Saponco venis Gajal, indigna kaj strikta je la buŝo, kvankam li sentis pezecon kaj timon meze de la stomako. La rito portis malplaĉajn aspektojn: ekzekuto aŭ oferta buĉo. La paŝo de Gajal hezitis.

La Kastelano ektenis al li la kubuton per malmola mano. “Antaŭen.”

Ekzekuto aŭ oferta buĉo... La vizaĝoj flanke de la vojo plenis je mortomania scivolo, interna ekscitiĝo; ĝojaĉaj okuloj serĉis lin profunde por

priĝoji lian timon kaj hororon, kaj la buŝoj duone pendiĝis malfermaj, duone ridetis pro la interna memgratulado pro ne esti tiu ulo kiu marŝas malsupren laŭ la arbofoliaj vojoj, kaj foren al la Muzeo Homara.

La supro, kun la altaj arboj kaj gravuritaj malhelaj domoj, estis ĉe lia dorso; ili elmarŝis en la klaran sunlumon de la stepo. Jen estis okdek virinoj en blankaj ŝlám-robtoj kun ceremoniaj korboj el plektita pajlo surkape; ĉirkaŭ tendo el flava silko ili staradis.

La Kastelano haltis Gajal-on kaj voksignis al la Rita **Matrono**. Ŝi ekĵetis malferme la pendoŝtofoj ĉe la pordo de la tendo; la knabino interna, Ŝierl, elvenis

malrapide, okuloj grandaj kaj malhelaj pro timo.

Ŝi portis rigidan robon el flava brokaĵo, kaj la rekteco de ŝia korpo ŝajnis esti kaptita kaj detenita interne. La robo leviĝis strikte ĝis ŝia mentono, lasis nudaj la brakojn kaj leviĝis trans la malantaŭo de ŝia kapo en rigida lancopint-forma kapuĉego. Ŝi timis tiel, kiel timus besteto en kaptilo; ŝi fiksrigardis al Gajal, al ŝia patro, kvazaŭ ŝi estis neniam antaŭe vidinta ilin.

La Rita Matrono tuŝis milde per mano ŝian talion, antaŭenigis ŝin. Ŝierl paŝis unu paŝon, duan, sendecide haltis. La Kastelano kondukis Gajal-on antaŭen kaj situigis lin ĉe la flanko de la knabino;

nun du geknaboj, venis haste kun tasoj kiujn ili ofertis al Gajal kaj Ŝierl. Senatente Ŝierl akceptis la tason. Gajal prenis sian kaj ekrigardis suspekteme al la malklara likvaĵo. Li rigardis supren al la Kastelano. “Kio estas la naturo de tiu ĉi pocio?”

“Trinku,” diris la Kastelano. “Pro tio via vojo ŝajnos al vi malpli longe; por ke teruro forlasos vin, kaj vi marŝos al la Muzeo kun pli regula paŝado.”

“Ne,” diris Gajal. “Mi ne trinkos. Miaj sentkapabloj devas tiam esti la kutime propraj kiam mi rekontos la Kuratoron. Mi venis de malproksime por la privilegio; mi ne stultigus la okazon stumblante kaj ŝanceliĝante.” Kaj li

redonis la tason al la knabo.

Ŝierl fiksrigardis senemocie al la taso kion ŝi tenis. Diris Gajal; “Mi konsilas, ke ankaŭ vi evitu trinki la drogon; tiel ni alvenos la Muzeon Homaran kune kun nia digneco.”

Hezite ŝi redonis la tason. La esprimo de la Kastelano nebuliĝis, sed li faris nenian proteston.

Maljunulo en nigra kostumo portis antaŭen satenan kusenon sur kio ripozis **vipo** kun anso el gravurita ŝtalo. La Kastelano nun levis tiun vipon, kaj alvenanta, facile batetis tri foje la ŝultrojn de kaj Ŝierl kaj Gajal.

“Nun, mi ŝargas al vi, ekiru nun el Saponco, ekzilitaj por ĉiam el Saponco; vi estas orfoj elpelitaj. Serĉu helpon ĉe la Muzeo Homara. Mi ŝargas vin, neniam rigardu malantaŭen, lasu ĉiujn pensojn pri pasinteco kaj estonteco ĉi tie ĉe Gardeno Norda. Nun kaj por ĉiam vi eksiĝas disde ĉiuj ligaĵoj, alkroĉoj, interrilatoj kaj parencoj, kune kun ĉiuj pretendoj al amo, amikeco, gefrateco kun la Saponedoj de Saponco. Iru, mi urgas; iru, mi ordonas; iru, iru, iru!”

Ŝierl dente mordis la lipon suban; larmoj libere transfluis la vangon kvankam ŝi faris nenian sonon. Kun kapo pendanta ŝi ekiris trans la liĥeno de la tundro, kaj Gajal, kun rapida paŝado,

ekkuniĝis kun ŝi.

Nun malpermesiĝis, ke ili malantaŭrigardu. Dum ioma tempo la murmuroj, la sonoj de maltrankviliĝo sekvis ilian aŭdadon; poste ili estis solaj sur la ebenejo. La senlima nordo kuŝis trans la horizonto; la tundro plenigis la proksiman kaj malproksiman fojnojn, etendaĵo malĝojiga, senkolora kaj sensprita. Sole makulinta la regiono, la blankaj ruinoj — iam la Muzeo Homara — leviĝis antaŭ ili malproksima je leŭgo, kaj ili marŝadis laŭ la malmulte evidenta irejo sen paroli.

Gajal diris per tono hezitema, “Estas multe kion mi volas kompreni.”

“Parolu,” diris Ŝierl. Ŝia voĉo estis kvieta sed regata.

“Kial ni estas devigitaj kaj urĝitaj je tiu ĉi misio?”

“Estas tiel ĉar ĉiam estis tiel. Ĉu tio ne estas kialo sufiĉa?”

“Sufiĉa eble por vi,” diris Gajal, “sed por mi la kaŭzeco malkonvinkas. Mi devas informi vin pri la manko en mia menso, kio soifas al informoj tiom multe kiom seksmaniulo deziregas la karnecon; do, bonvolu esti pacienca se mia demandado ŝajnas al vi preternecese detalisma.”

Ŝi ekrigardis lin kun miro. “Ĉu ĉiuj

en la sudo tiom avidas informon kiom vi?”

“Neniom tiel,” diris Gajal. “Ĉie tie normaleco de la menso observeblas. La loĝantoj lerte ripetas la movadojn instruitajn al ili hieraŭ, la antaŭan semajnon, la antaŭan jaron. Oni akuzis min tute kaj plene pri mia **aberacio**. ‘Kial strebu por amasiĝo de pedanto?’ oni diris al mi. ‘Kial feliĉaĵojn, festadon, muzikon, kaj festandon favore al abstraktaĵoj kaj malklaraj profundaĵoj?’”

“Nu,” diris Ŝierl. “Bone ili tiel konsilas; tiel estas la komuna opinio ĉe Saponco.”

Gajal ŝultrolevis, “Hejme estas

onidiro ke demono forprenis mian ĵuĝkapablon. Eble tiel estas. Ĉiuokaze la efiko restas kaj la obsedo hantas min.”

Ŝierl indikis komprenon kaj akcepton. “Demandu plu tial; mi provos mildigi tiujn ĉi urĝecojn.”

Li ekrigardis ŝin flanke, studis la ĉarman tringulon de ŝia vizaĝo, la pezan nigran hararon, la grandajn rebrilajn okulojn, mallumaj kiel jû-safiroj. “En pli feliĉigaj cirkonstancoj, estus aliaj urĝoj pri kiuj mi estus penanta, ke vi ilin mildigu.”

“Demandu,” respondis Ŝierl de Saponco. “La Muzeo Homara proksimas; la okazo oportunas por nenio krom

vortoj.”

“Kial ni tiel ĉi elsendiĝis kaj ŝarĝiĝis, kun ŝajna akcepteco pri nia detruigo?”

“La plej proksima kaŭzo estas la fantomo kiun vi vidis sur la monteto. Kiam la fantomo aperas, tiam ni en Saponco scias, ke la plej bela virgulino kaj la plej bela junulo el la urbeto devas esti sendata al la Muzeo. La ĉefajon malantaŭ la kutimo mi ne scias. Tiel estas; tiel estis; tiel estos ĝis la suno estingiĝados tiel kiel brulanta karbo en la pluvo kaj mallumigos la Teron, kaj la ventoj blovos neĝon super Saponco.”

“Sed kio estas nia misio? Kiu

akceptos nin, kio estas nia sorto?”

“Tiaj detaloj ne sciiĝas.”

Gajal pripensis, “La probableco de plezuro ŝajnas malmulta... Estas malkonkordaĵoj en la **epizodo**. Vi estas preterdube la plej bela estulino el la Saponedoj, la plej bela sur Tero — sed mi, mi estas hazarda fremdulo, kaj apenaŭ la plej bone-formita junulo en la urbeto.”

Ŝi ridetis iomete. “Vi ne estas malbonaspekta.”

Gajal diris sombre, “Superokaze de la stato de mia esteco estas la fakto ke mi estas fremdulo kaj tiel kaŭzos malmultan

perdon al la urbeto.”

“Tiu aspekto preterdube estis konsiderita,” la knabino diris.

Gajal serĉis la horizonton. “Ni tial evitu la Muzeon Homaran, ni ĉirkaŭiru tiun ĉi konatan sorton kaj eskapu en la montojn, ke tiel celu suden al Askolajs. Deziro pri enluminiĝo neniam instigos min alfronti detruigojn tiom klare implikitan.”

Ŝi gestis neecon kape. “Ĉu vi supozas, ke ni gajnos per la ruzo? La okuloj de cent batalistoj sekvas nin ĝis tiam kiam ni transpasos la portalojn de la Muzeo; se ni provus eskapi nian devon ni estus ligitaj al fostoj, senhaŭtigataj

malrapidege, kaj fine ensakigitaj kun poste mil skorpioj verŝitaj ĉirkaŭ niaj kapoj. Tio estas la tradicia puno; dek du fojojn en historio ĝi estis aldevigita.”

Gajal rektigis malantaŭen la ŝultrojn kaj parolis nervozavoĉe. “Nu, do — la Muzeo Homara jam estis mia celo dum multaj jaroj. Tiucele mi ekiris de Sfer, kaj nun mi volas serĉi la Kuratoron por satigi mian obsedon por cerbopleniĝo.”

“Vi beniĝas je granda bonŝanco,” diris Ŝierl, “ĉar al vi doniĝas la deziraĵo de la koro.”

Gajal malpovis trovi ion dirindan, do dum ioma tempo ili marŝadis en silento. Poste li parolis. “Ŝierl.”

“Jes, Gajal de Sfer?”

“Ĉu oni dividos kaj apartigos nin?”

“Mi nescias.”

“Ŝierl.”

“Jes?”

“Se ni estus interrenkontintaj sub pli feliĉa stelo...” Li paŭzis.

Ŝierl paŝadis en silenteco.

Li alrigardis ŝin senpasie “Vi ne parolas.”

“Sed vi demandas nenion,” ŝi diris en surpriziĝo. Gajal turnis la vizaĝon

antaŭen, al la Muzeo Homara.

Post iome ŝi tuŝis al li la brakon.

“Gajal, mi multe timas.”

Gajal fiksrigardis la grundon ĉe la piedoj, kaj floriĝo de fajro ekflamiĝis en lia cerbo. “Ĉu vi vidas la markojn tra la liĥeno?”

“Jes; kio do?”

“Ĉu ĝi estas vojeto?”

Kun ioma dubo ŝi respondis, “Ĝi estas irejo erodita per la pasado de multaj piedoj. Tial do — ĝi estas vojeto.”

Gajal diris en regita jubulado, “Jen

estas sekureco, se mi neniam permesas, ke oni trompu min for de la vojo. Sed vi — ho, mi devas vin gardi; vi devas neniam foriru de mia flanko, ve devas naĝi en la beno kio ŝirmas min; eble tiel ni travivos.”

Ŝierl diris malĝoje, “Ni ne trompu la rezonadon propran, Gajal de Sfer.”

Sed dum ili marŝis, la paŝejo fariĝis pli evidenta, kaj Gajal fariĝis sekve pli **sangvina**. Kaj ĉiam pli grande prezentiĝis la disfalaĵo kio lokis la Muzeon Homaran, kiu post nelonge okupis la tutan vidkampon.

Se stokejo de scioj iam ekzistis ĉi tiel, malmuta signo postrestis. Troviĝis

granda, plata, planko, pavimita per blanka ŝtono, nun krete dispeciĝema, fendita kaj trapenetrita de herbaĉoj. Ĉirkaŭ tiu ĉi planko leviĝis serio da monolitoj, kavigitaj kaj eroditaj, supre difektitaj ĉe diversaj altecoj. Tiuj ĉi je ioma tempo estis subenintaj grandan plafonon; nun el plafono restis nenio kaj la muroj mem estis nur sonĝaĵoj de la fora pasinteco.

Do tie ĉi estis la plata planko randita de la rompitaĵoj kolumno-stumpoj, nuda al la ventoj de tempopasado kaj la brilado de la malvmeta ruĝa suno. La pluvoj estis lavintaj la marmoron, la polvo de la montoj estis sur ĝin falinta kaj forbalaita, kaj tiuj kiuj estis konstruintaj la Muzeon

jam fariĝis malpli ol polveron el tiu ĉi polvo, tiom foraj kaj forgesitaj nun estis ili.

“Pensu,” diris Gajal, “pensu pri la vasteco da scio kio iam estis kunigita tie ĉi kaj kio nun estas kuniĝinta kun la grundo — krom, kompreneble, la Kuratoro konservadis kaj prizorgadis.”

Ŝierl ĉirkaŭrigardis antaŭtime. “Mi pripensas anstataŭe la portalon, kaj tion kio nin atendas ... Gajal,” ŝi flustris, “Mi timas, mi timegas... Supozu, ke ili nin apartigus? Supozu, ke estos turmentado kaj morto por ni? Mi timas egan alfrapon, la ŝokon de hororo...”

La gorgo de Gajal mem estis varma

kaj plena. Li ĉirkaŭrigardis defie. “Dum mi ankoraŭ spiradas kaj havas povon en la brakoj por batali, estos neniu kiu nin vundos.”

Ŝierl ĝemis milde. “Gajal, Gajal, Gajal de Sfer — kial vi min elektis?”

“Ĉar,” diris Gajal, “la okulo mia logiĝs al vi kiel nektara *sfigno* flugetas al jacinto-floro; ĉar vi estis la plej bela kaj mi kredis, ke nenio krom boneco atendis vin.”

Kun trema enspiro Ŝierl diris, “Mi deve estu kuraĝa; malgraŭ ĉio, se ne estus mi anstataŭe estus alia virgulino same timema... Kaj jen la portalo.”

Gajal enspiris profunde, klinis la kapon, kaj ekpaŝis antaŭen. “Ni tion ekfaru, kaj eksciu...”

La portalo malfermiĝis konduke en apudan monoliton, pordo el nebrila nigra metalo. Gajal sekvis la irejon al la pordon, kaj alfrapis kuraĝe per la pugno sur la etan kupran gongon ĉe la flanko.

La pordo malfermiĝis sur grincantaj ĉarniroj, kaj malvarmeta aero, odora je la subgrundo, ventetis elen. En la nigra interspaco iliaj okuloj povis vidi nenion.

“Saluton internen!” vokis Gajal.

Mola voĉo, plena de notaj tremetoj, kvazaŭ tuj post plorado, diris, “Venu vi,

venu vi antaŭen. Vi estas dezirataj kaj atendataj.”

Gajal klinis antaŭen la kapon, strebanta vidi. “Donu al ni lumon, por ke ni ne flankeniru for de la vojo kaj tiel falu alfrape la subon.”

La spire streba tremvoĉo diris, “Lumo ne bezoniĝas; ien ajn kie vi paŝos, tio estos via irejo, laŭ aranĝo fare de la Vojo-Faranto.”

“Ne,” diris Gajal, “ni insistas vidi la vizaĝon de nia gastiganto. Ni venas je ties invito; la minimumo de ties gast-oferto estas lumo; lumo tial devas haviĝi antaŭ ol ni ekpaŝu en la ublieton. Estu informata, ke ni venas serĉanta scion; ni

estas vizitantoj honorindaj.”

“Ho, scio, scio,” sone venis la malĝoja spiremeco. “Tio estos via, en tuta pleneco — scioj pri multaj strangaj aferoj; ho, vi naĝos en tajdo da scieco —”

Gajal interrompis la malĝojan, suspirantan voĉon. “Ĉu vi estas la Kuratoro? Centojn da leŭgoj mi venis por alparoli la Kuratorn kaj prezenti miajn demandojn. Ĉu vi estas tiu?”

“Neniel. Mi malestimegas la nomon de la Kuratoro por esti perfida malnecesulo.”

“Kiu do estas vi?”

“Mi estas neniŭ, nenio. Mi estas abstraktaĵo, emocio, la eksudaĵo de teruro, la ŝvito de hororo, la skuo en la aero tuj post kriego forestiĝas.”

“Vi sonigas voĉon de homarano.”

“Kial ne? Tiaj aĵoj kiajn mi parolas kuŝas en la plej proksima kaj plej kara centro de la homa cerbo.”

Gajal diris en mildigita voĉo, “Vi ne faras, ke via invito estu tiom loga kiom povus priesperatiĝi.”

“Ne grave, ne grave; eniri vi devas, en la mallumon kaj tujmomente, ĉar mia sinjoro, kiu estas mi mem, kreskiĝas varmete kaj langvore.”

“Se lumo haveblas, ni enirus.”

“Nenia lumo, neniu insolenta brulvundeco iam ajn troveblas en la Muzeo.”

“Je tiu ĉi kazo,” diris Gajal, elprenante sian Scintilan Ponardon, “mi novenkondukas bonvenan riparo-ŝanĝon. Do vi nun vidu, jen estas lumo!”

El la sub-pomelo ekiris serĉa lumstrieĝo; la fantomo starante alta antaŭ ili kriegis alttone kaj falis dispeciĝante en rebrilantaj rubandeteroj kiel pulvorigita metala ornambandaĵo. Restis kelke da rebriletantaj pulvoretaj en la aero; li estis ne plu.

Ŝierl, kiu estis staranta rigide senmova kvazaŭ hipnotigita, elspiris molan varmetan anhelon kaj falis kontraŭ Gajal-on. “Kiel vi povas esti tiom defienda?”

Gajal diris en voĉo duone rida, duone trema, “Mi vere ne scias ... eble mi trovas tion nekredebla, ke Sorto direktus min for de plaĉa Sfer, tra kaj arbaro kaj montkruto, en la nordan malplenejnon por ludi la rolon de kaŭranta viktimo. Malkredante tian malplenan sorton, mi kuraĝas.”

Li movis la ponardon dekstren kaj maldekstren, kaj ili vidis, ke ili estis ĉe la portalo de fortikejo, tranĉita el betonigita roko. Malantaŭe ĝi kondukis al nigra

profundeco. Transirante rapide la plankon, Gajal surgenuiĝis kaj aŭskultadis.

Li aŭdis nenian sonon. Ŝierl, ĉe lia malantaŭo, fiksrigardis kun okuloj tiom nigraj kaj profundaj kiom la truo mem, kaj Gajal, turniĝante, ricevis subitan malracian senton pri feino el la antikvaj epokoj — estulino malgranda kaj delikata, peza pro kvantego da ĉarmo, pala, dolĉa, pura.

Kliniĝante kun sia lumanta ponardo, li vidis frenezan aron de ŝtupoj kondukantaj malsupren en la mallumon, kaj lia lumo montris ilin kaj iliajn ombrojn en tiom konfuza aspekto, ke li palpebrumis kaj tiris sin malantaŭen.

Ŝierl diris, “Kion vi timas?”

Gajal leviĝis, turniĝis al ŝi. “Ni estas dummomente ne akompanataj ĉi tie en la Muzeo Homaro, kaj ni puŝiĝas antaŭen fare de diversaj povfontoj; vi fare de la volo de via popolo; mi, fare de tio kio estis min puŝanta ek de tiam, kiam mi unue gustumis aeron... Se ni estus restontaj ĉi tie ne estus refoje aranĝotaj laŭ harmonio je malamika desegno. Se ni antaŭenirus kuraĝe, ni eble alirus al pozicio de strategio kaj avantaĝo. Mi proponas, ke ni ekiru kun plena kuraĝo, subeniru tiujn ĉi ŝtupojn kaj serĉu la Kuratoron.”

“Sed ĉu li ekzistas?”

“La fantomo parolis fervore kontraŭ li.”

“Ni iru do,” diris Ŝierl. “Mi rezignis al sorto.”

Gajal diris gravmiene, “Ni iru kun la mensa stato de aventuro, agresemo, entrepreno. Tiel okazas, ke timo malaperas kaj la fantomoj fariĝas kreituloj de menso-teksaĵo; per tio nia **vervo** krevigos la teruron subgrundan.”

“Ni iru.”

Ili komencis subeniri la ŝtupojn.

Tien, reen, tien, reen, malsuprenire la ŝtuparojn laŭ diversaj anguloj,

interplacetoj ĉe diversaj niveloj, ŝtupotraboj el diversaj altecoj kaj larĝecoj, tiel ke ĉiu paŝo estis afero por koncentrata atento. Tien, reen, suben, suben, suben, kaj la nigraŝtariaj ombroj moviĝis spasme laŭ strangaj manieroj sur la muroj.

La ŝtuparo finiĝis, ili staris en ĉambro simila al la enirejo supera. Antaŭ ili estis plua nigra portalo, polurita ĉe unu loko pro uzado; sur la muroj ambaŭflanke estis enkave lokitaj **latunaj** ŝildoj portantaj mesaĝojn en nekonataj literoj.

Gajal puŝis malferme la pordon kontraŭ premeto de malvarma aero, kio, blovante tra la aperturo, faris etan susuron, ĉesante kiam Gajal puŝis plue la

pordon.

“Aŭskultu.”

Estis sono malproksima, klakado foje paŭzanta, kaj ĝi portis signifon sufiĉe malbonaŭguran por levi la haretojn ĉe la nuko de Gajal. Li sentis la manon de Ŝierl ekteni lian kun malvarmete malseka premo.

Malpliigante la lumon de la ponardo ĝis lumeto minimuma, Gajal trapasis la pordon, kun Ŝierl sekvanta poste. De malproksime venis la malbonega sono, kaj per la eĥoj ili sciis, ke ili staris en grandega halo.

Gajal celigis la lumon al la planko:

ĝi estis el nigra elasta materialo. Poste al la muro: polurita ŝtono. Li permesis la lumon celi tiun direkton rekte kontraŭan je la sono, kaj malproksime je kelkaj paŝoj ili vidis masivan nigran ŝrankon, dissterniĝita de kupraj fostetoj, suprigita de malprofunda vitra pleto en kio vidiĝis komplika aro da metalaj aparatetoj.

Ĉar la funkcia celo de la nigraj ŝrankoj ne evidentiĝis, ili sekvis la muron, kaj dum ili marŝis similaj ŝrankoj aperadis, superstarantaj peze kaj malkare, laŭ regulaj interspacoj. La klakado mallaŭtiĝis dum ili marŝadis; poste ili alvenis angulon rektan, kaj turniĝante ĉe la angulo, ekŝajnis ke ili alproksimiĝis la sonon. Nigra ŝranko post nigra ŝranko

preterpasiĝis; malrapide, striktapozaj kvazaŭ vulpoj, ili paŝadis, okuloj strebe serĉantaj por videbleco tra la mallumo.

La muro prezentis pluan angulon, kaj ĉi tie estis pordo.

Gajal hezitis. Sekvi la novan direkton de la muro devigus alproksimiĝon al la fonto de la sono. Ĉu estus pli bone malkovri la plejan malbonaĵon rapide aŭ ĉirkaŭesplori dum la irado?

Li proponis la **dilemon** al Ŝierl, kiu ŝultrolevis. “Ĉio ĉi estas unuo; aŭ baldaŭ aŭ poste la fantomoj flugetos malsupren por plekti al ni; tiam ni estos perditaj.”

“Ne dum mi ankoraŭ posedas lumon por ekrigarde dispecigi ilin en nubetojn kaj ŝiraĵojn,” diris Gajal. “Nun mi volas trovi la Kuratoron, kaj eble li troviĝas post tiu ĉi pordo. Tion ĉi ni malkovros.”

Li metis la ŝultron sur la pordon; ĝi puŝiĝis malfermiĝete kun trafenda strieto el ora lumo. Gajal enrigardis. Li suspiris, muflita sono de mirego.

Nun li malfermis la pordon plue; Ŝierl kroĉis al li je la brako.

“Jen la Muzeo,” diris Gajal en tono fiksatenta. “Ĉi tie estas nenia danĝero... Li kiu loĝas inter belaĵoj el tia ĉi kvalito neniel povus esti alia ol benema...” Li puŝegis malfermege la pordon.

La lumo venis el nedistingebla fonto, el la aero mem, kvazaŭ likanta el individuaj atomoj; ĉiu elspiraĵo estis lumeta, la ĉambro ŝvebis plena de pliviviga lumado. Granda tapiŝo kovris fele la plankon, monstra ŝildo plektita el oro, bruno, du helecoj de verdo, griz-brune ruĝo kaj ruĝeta bluo. Belaj artaĵoj home faritaj dise prezentiĝis sur la muroj. En glora aranĝaĵo pendis paneloj el luksaj lignoj, gravuritaj, kavetigitaj, farbitaj; scenoj el antikvaj tempoj pentritaj sur plektita fibraĵo; formulaĵoj el koloro, desegnita por komuniki emocion anstataŭ realecon. Ĉe unu flanko pendis tabuloj el ligno interaranĝitaj kun tavoloj el sapŝtono, malakito, kaj jado en rektangulaj desegnoj, lukse diversaj kaj

subtilaj, kun miniaturaj fendaĵetoj el cinabro, rodokrozito kaj koralo por doni varmetecon. Apude estis sekcio apartigita por montri diskojn el luma verdo, flagrantaj kaj fluoreskaj en diversaj bluaj maldikegaĵoj kaj moviĝantaj punktoj el skarlato kaj nigro. Jen estis reprezentaĵoj de tri cent mirindaj floroj, floroj el epoko forgestita, ne plu vivanta sur malfortikiĝanta Tero; estis simila nombro da stelkrevaj desegnaĵoj, rigide normigita laŭ formo, sed ĉiu el subtila distingeco. Ĉiuuj ĉi kaj multega kvanto da aliaj kreaĵoj, elektitaj el la plejaj bonegaĵoj de homara fervoro.

La pordo malfermiĝis kun mola frapo malantaŭ ili; fiksrigardante, kaj kun

la haŭto piketanta surtute, la duopo el la fina tempo de Tero ekmoviĝis antaŭen tra la halo.

“Ie proksime devas troviĝi la Kuratoro,” flustris Gajal. “Estas etoso de zorga konservado kaj granda strebado ĉi tie en la galerio.”

“Rigardu.”

Kontraŭ ili situis du pordoj, ŝargitaj kun senco de multa uzado. Gajal paŝadis rapide trans la ĉambro sed malkapablis observi metodon por funkciigi la pordon, ĉar ĝi portis nenian anson, ŝlosilon, tenilon aŭ fosteton. Li alfrapis per la fingroartikoj kaj atendis; neniam sono respondis.

Ŝierl ektiris al li je la brako. “Ĉi tiuj estas privataj lokoj. Estas pli bone ne veturi tro malĝentile.”

Gajal turniĝis for kaj ili pluiris la galerion. Preter la vera esprimo de la plej brilaj sonĝadoj de la homaro ili paŝadis, ĝis la koncentriĝo de tiom multa faroj kaj animo kaj kreemo ilin miregigis. “Kiom grandegaj la mensoj kiuj nun kuŝas inter polvo,” diris Gajal en mallaŭta voĉo. “Kiel belegaj estis la animoj malaperintaj en la entombigitaj epokoj; kiom mirinde la kreituloj kiuj perdiĝis en la plej pasinta memoro... Neniam plu estos iuj similaj; nun en la finaj rapide pasantaj momentoj, homaro putras tromatura kiel putriĝanta frukto. Anstataŭ mastrumi kaj superregi

nian mondon, nia plej alta celo estas trompe gajni pere de sorĉismo.”

Ŝierl diris, “Sed vi, Gajal — vi apartas. Vi ne estas tiel ĉi...”

“Mi volus kompreni,” deklaris Gajal kun sovaĝa emfazo. “Tratute mia juneco tiu ĉi dolora sopiro antaŭenpuŝadis min, kaj mi estis vojaĝinte de la malnova domo ĉe Sfer por lerni de la Kuratoro... Min malplaĉas la senmensaj sukcesaĵoj de la magiistoj, kiuj gajnis ĉiom da siaj scioj parkere.”

Ŝierl alrigardis lin kun mira esprimo, kaj la animo de Gajal pulsadis kun amo. Ŝi sentis lian tremon kaj flustris senzorge, “Gajal de Sfer, mi estas via, mi fandiĝas

por vi...”

“Kiam ni sukcesos al paco,” diris Gajal, “poste nia mondo konsistos el ĝojeco...”

La ĉambro prezentis turnejon ĉe angulo, plivastiĝis. Kaj nun la klakada sono kion ili antaŭe atentis en la malluma ekstera halo revenis, pli laŭte, pli sugeste je malplaĉeco. Ĝi ŝajne eniris la galerion tra arkforma pordo transĉambra.

Gajal moviĝis kviete al tiu ĉi pordo, kun Ŝierl tuj sekvanta, kaj tiel ĉi ili enrigardis la postan ĉambron.

Grandega vizaĝo elrigardis la muron, vizaĝo pli alta ol Gajal mem, tiom

alta kiom Gajal eble povus etendi kun la manoj suprentenataj. La mentono ripozis sur la planko, la krania supro etendiĝis kline malantaŭen en la panelon.

Gajal rigardadis fikse, ŝokita. Inter tiu ĉi paĝento de belaj objektoj, la groteska vizaĝo estis tia disaĵo kaj dissoneco kian eble kreus frenezulo. Malbela kaj naŭziga estis la vizaĝo, io el intesto-torda stulta **obsceneco**. La haŭto reflektetis blu-metale, la okuloj rigardis senfokuse el klinantaj faldaĵoj el verdeta histo. La nazo estis eta nodo, la buŝo estis naŭziga pulpeca tranĉtruo.

En subita malcerteco Gajal turniĝis al Ŝierl. “Ĉu tiu ĉi ne ŝajnas esti stranga kreaĵo por esti honorita ĉi tie en la Muzeo

Homara?”

Ŝierl staradis kun la okuloj dolorigitaj kaj larĝe malfermitaj. Ŝia buŝo malfermiĝis, tremis, malsekeco striigis ŝian mentonon. Kun mano spasmantaj, tremantaj, ŝi ektenis lian brakon, ŝancelis retroen en la galerion.

“Gajal,” ŝi kriis, “Gajal, venu for!” Ŝia voĉo altiĝis ĝis suprotono. “Venu for, venu for!”

Li alfrontis ŝin en surpriziĝo. “Kion vi diras?”

“Tiu hororaĵo en tie — ”

“Ĝi estas nur la freneza artaĵo de

antikva artisto.”

“Ĝi vivas.”

“Kiel tio ĉi!”

“Ĝi vivas!” ŝi balbutis. “Ĝi alrigardis min, poste turniĝis por alrigardi vin. Kaj ĝi moviĝis — kaj poste mi tiris vin for...”

Gajal skue maltenigis de si ŝian manon; en tuta malkredo li frontis antaŭen tra la pordejo.

“Ahhhh...” elspiris Gajal.

La vizaĝo jam ŝanĝiĝis. La torporo estis foriginta; la senfokuseco estis for de

la okuloj. La buŝo tordiĝadis; siblo de ekspansianta gaso soniĝis. La buŝo malfermiĝis; grandega griza lango etendiĝis malstrikte antaŭen. Kaj de tiu ĉi lango ekiris ĉiro ŝlima de mukozajo. Ĝi finiĝis per kroĉa mano, kiu etendiĝis celante ekteni la maleolon de Gajal. Li saltis flanken; la mano maltrafis je sia ekteno, la ĉiro heliciĝis.

Gajal, en ekstrema emocio, kun la intestoj kramfintaj pro naŭziga timo, risortis malantaŭen en la galerion. La mano ektenis Ŝierl-on, kroĉis al ŝia maleono. La okuloj brilis malseke; kaj nun la malstrikta lango ŝvele kreskis pluan elstaraĵon... Ŝierl stumblis, falis malstrikte, ŝiaj okuloj fiksrigardantaj,

ŝaŭmo ĉe ŝiaj lipoj. Gajal, krieganta en voĉo kion li mem ne povis aŭdi, krieganta altvoĉe kaj freneze, kuris antaŭen svinge tranĉanta per sia ponardo. Li tranĉadis al la griza manradiko, sed lia tranĉilo risortiĝis for kvazaŭ la ŝtalo mem estis hororigita. Stomaka acido ĉe liaj dentoj, li ektenis la ĉiron; per fortega strebo li rompis ĝin kontraŭ sia genuo.

La vizaĝo spasmatis, la ĉiro ekis malantaŭen. Gajal saltis antaŭen, trenis Ŝierl-on en la galerion, levis ŝin, portis ŝin retroen, el de ĉira etendokampo.

Nun tra la pordejo, Gajal minace rigardis en kaj malamo kaj timo. La buŝo jam fermiĝis; ĝi ridetaĉe esprimis sian malesperiĝon kaj frustritan fideziron. Kaj

nun Gaja vidis strangan aferon: el la malseketa naztruo eksudis nubeto blanka kio kirliĝis, baraktis, formiĝis en alta estulo en blanka robo — estulo kun longa vizaĝo kaj okuloj tiaj kiaj truoj en kranio. Dolor-ĝemetante kaj plor-ĝemetante en malŝato pro la lumo, ĝi ondetis antaŭen en la galerion, moviĝante kun strangetaj etaj paŭzoj kaj hezitoj.

Gajal staradis senmove. Timo jam eluzis la tuton de sia povo; timo ne plu havis signifon. Cerbo povus reagi nur ĝis la maksimumo de sia intenseco; kiel ĝi povus vundi lin nun? Li ĝin frape platigus per la manoj, disfrapus ĝin en suspiranta nebulon.

“Haltu, haltu, haltu!” venis nova

voĉo. “Haltu, haltu, haltu. Miaj sorĉetoj kaj sorĉsigno, malbona tago por Tórsingol... Sed tamen, atentu, fantomo vi, reeniru la orificon, reen kaj atentu, atentu, mi diras! Iru, aŭ mi ekŝaltos la lumegofontojn; trapaso ne permesiĝas, pere de plej grava ordono de la Likúrgant; ja vere, la Likúrgant de Tórsingol. Atentu, jen tiel.”

La fantomo ondetis, paŭzis, fiksrigardante en subita pasiveco al la maljuna viro kiu jus lame eniris la galerion.

Revene al la **ronkanta** vizaĝo vagis la fantomo, kaj lasis sin esti ensuĉita en la naztruon.

La vizaĝo muĝetis vibrege malantaŭ la lipoj, poste malfermis la grandan grizan kavaĵon kaj ruktis blankan flagrantan nubon kiu kvazaŭis flamo sed ne estis flamo. Ĝi flagris vele, klapmovis al la maljunulo, kiu moviĝis neniom. El stango fiksita alte en la porda framo venis ĝiranta diskaĵo el oraj sparkoj. Ĝi altrancis kaj disigis la blankan velaĵon, detruis ĝin tute ĝis atingi la buŝon de la vizaĝo, de kio nun etendiĝis nigra stango. Tiu stango etendiĝis al la giranta disko kaj sorbis la sparkojn. Estis momento de plena silento.

Poste la maljunulo venke kriis. “Ho, vi malbonega epizodo; vi provas interrompi mian deĵoron. Sed ne, estas

nenia valideco en via celo; mia lerta bastono nuligas vian nenaturan sorĉaĵon; vi estas kvazaŭ nenio; kial vi ne ekmaltenu kaj retretu al Jeldred?”

La vibrado malantaŭ la lipegoj daŭriĝis. La buŝo malfermiĝegis: griza viskoza kaverno tiel montriĝis. La okuloj briletadis en kolosa emocio. La buŝo kriegis, muĝa ondo de malpaco, sono tiom granda ke ĝi frapetadas la aeron kaj martelas ŝokon kvazaŭ najlon en la menson de aŭskultanto.

La bastono ŝprucigis nebulon arĝentan. La sono kurbiĝis kaj centriĝis kaj alsuĉis la mensan nebulon; la sono estis kaptita kaj elsuĉita; ĝi fariĝis malaŭdata. La nebulo pilkiĝis, longiĝis

por fariĝi sago, plonĝis kun ega rapido al la nazo, kaj penetris profunde en la pulpon. Estis peza sono, eksplodo; la vizaĝo ege spasmadis pro doloro kaj la nazo ekestis eksplodita malordaĵo el ŝiritaj grizaj **plasmoj**. Ili ondis kiel brakoj de **asterio** kaj kreskiĝis ripare, kaj nun la nazo estis pinta kiel konuso.

La maljunulo diris, “Vi disputemas hodiaŭ, mia demonia vizitanto — malica trajto. Vi volus agaci kompatindan maljunan Kerlen dum liaj laboroj? Nu. Vi estas genia kaj **neglektema**. Do jen. Bastono,” kaj li turniĝis kaj fiksrigardis al la bastono, “vi gustumis tiun sonon? Ŝprucigu decan punon, **ŝmiri** la malbelegan vizaĝon per via nerezistebla

repliko.”

Plata sono, nigra vipo kio kurbiĝis, frapis la aeron kaj batis vunde al la vizaĝo. Lumanta vundstrio ekaperis. La vizaĝo suspiris kaj la okuloj tordiĝis supren inter siaj faldaĵoj de verdeca histo.

Kerlen la Kuratoro ridis, akra blekado unutona. Li ekhaltis kaj la ridado malaperis kvazaŭ ĝi neniam komencis. Li turniĝis al Gajal kaj Ŝierl, kiuj staris interprete tuj apude en la pordejo.

“Kiel nun, kiel nun? Vi estas post la gongo; la horoj por studi jam delonge pasis. Kial vi restadas?” Li skuis admonan fingron. “La Muzeo ne estas loko por friponado; tion ĉi mi admonas.

Do, ekiru for, hejmen al Tórsingol; venontfoje estu pli akurata; vi **perturbas** la establitan ordon...” Li paŭzis kaj tuniĝis rigardi timete trans sia ŝultro. “La tago malboniĝis; la Nokta Ŝlosilo-tenanto nepardoneble malfruas... Certe mi jam atendadis horon por la malakuratulo; la Likúrgant estos informata. Mi volas esti hejma ĉe litseĝo kaj fajrejo; jen estas malbona traktado por maljuna Kerlen, ke oni tiel deteni lin por la senzorgema stultulo de la nokta gardisto... Kaj plue, la trudado de vi du gemalfruuloj; for de mi nun, kaj foriru; eksteren en la krepuskon!” Kaj li antaŭiris, faranta direktajn gestojn per la manoj.

Gajal diris, “Mia Lordo Kuratoro,

Mi devas alparoli vin.”

La maljunulo haltis, alrigardis. “Eh? Kio nun? Je la fino de laboro de longa tago? Ne, ne, vi maldecas; reguloj devas esti observataj. Memprezentu al mia aŭskultejo je la kvara ciklo je morgaŭ matene; tiam mi aŭdos vin. Do iru nun, iru.”

Gajal paŝis retroen konsternita. Ŝierl falis sur la genuojn. “Sinjoro Kuratoro, ni almozas por gajni vian helpon; ni havas nenian lokon por ke ni aliru.”

Kerlen la Kuratoro alrigardis ŝin senesprime. “Nenian lokon por aliri! Kian plenan stultaĵon vi diras. Aliru vian hejmejon, aŭ al la Puberaĉambrego, aŭ al

la Templo, aŭ al la Ekstercela Gastejo. En vero, Tórsingol estas donacema pri loĝejoj; la Muzeo estas neniam ordinara taverno.”

“Mia lordo,” kriis Gajal senespere, “ĉu vi aŭdos min? Ni parolas pro krizo.”

“Parolu plu, do.”

“La malicaĵo okazis por sorĉi al vi la cerbon. Ĉu vi konsiderus tion ĉi?”

“Ho, ĉu vere?” pripensadis la Kuratoro.

“Ne plu ekzistas Tórsingol. Restas nenio krom malluma senhomeco. Via urbo jam malestis je epoko pasinta.”

La Kuratoro ridetis beneme. “Ah, kompatinde... Kompatinda kazo. Jen tiel estas je tiaj ĉi junaj mensoj. La furioza instigo de vivo estas la Ĉefa Frenezigilo.” Li gestis kapnee. “Al mi la devo klaras. Lacaj ostoj, vi devas atendi la ripozon kion vi meritas. Laciĝo — malaperu; devo kaj simpla homaranismo ambaŭ postulas; jen frenezeco por esti kuracata kaj senigita. Kaj ĉiuokaze la Nokta Ŝoliltenanto ne ĉeestas por mildigi mian tedecon.” Li gestis, ke ili sekvu. “Venu.”

Hezitante Gajal kaj Ŝierl sekvis lin. Li malfermis unu el siaj pordoj, trapasis murmurante kaj protestante kun dubo kaj garda atento. Gajal kaj Ŝierl venis poste.

La ĉambro estis kuba, kun planko el

nebrila nigra materialo, kun muroj havantaj multegon da oraj ansoj ĉiufланke. Kapuĉhava seĝo okupis la mezon de la ĉambro, kaj apud tio estis brust-nivele alta pulpito kies fronto surhavis kelke da ŝaltiloj kaj iks-kanelitaj radetoj.

“Jen la Seĝo de Scio de la Kuratoro mem,” eksplikis Kerlen. “Estante tio, ĝi funkcios, post ĝustigado, por devigi aferojn laŭ la Ŝablono de Hinómenerva Klareco. Do — mi postulas la ĝustan sómetsindika aranĝiĝo — ” li manipulis la regilojn “ — kaj nun, se vi pozus vin komforte, mi riparos vian halucinon. Tio ĉi preteras mian ordinaran devaron, sed mi estas kompata kaj ne volas esti

priparolata por esti malbonvola aŭ malvolema.”

Gajal demandis maltrankvile, “Lordo Kuratoro, tiu ĉi Seĝo de Klareco, kiel ĝi efikus min?”

Kerlen la Kuratoro diris grandmiene, “La fibroj de via cerbo estas mise interplektitaj, elfrotitaj, kaj tial konektiĝas al maldecaj lokoj. Per la mirinda metiaro de niaj modernaj cerbologistoj, tiu ĉi kapuĉo reordigos al vi la [sinapsojn](#) laŭ la ĝustaj registraĵoj el la biblioteko — tiuj de normaleco, vi devas kompreni — kaj tiel ripari la interplektaĵon, kaj faru, ke vi refoje estu plena viro.”

“Post mi eksidiĝos en la seĝo,”
Gajal demandis, “kion vi faros?”

“Simple fermu tiun ĉi kontaktilon,
tiru tiun ĉi stangon, puŝu tiun ĉi
ŝaltilon — post kiam vi stuporos. Post
tridek sekundoj, tiu ĉi amplolo
eklumiĝos, indikante la sukceson kaj
pleniĝon de la kuracado. Poste mi
renversigos la manipuladon, kaj vi
stariĝos kiel estulo kun renovigita mensa
sano.”

Gajal rigardis al Ŝierl. “Ĉu vi aŭdis
kaj komprenis?”

“Jes, Gajal,” en mallaŭta voĉo.

“Memoru.” Poste al la Kuratoro:

“Mirinde. Sed kiel mi devas pozi sidante?”

“Simple ripozu en la seĝo. Poste mi tiros antaŭen iomete tiun ĉi kapuĉon, por ŝirmi la okulojn de distraĵoj.”

Gajal kliniĝis antaŭen, rigardis timete en la kapuĉon. “Mi timete konfesas, ke mi ne komprenas.”

La Kuratoro saltis antaŭen senpacience, “Ĝi estas afero de la pleja facileco. Jen tiel.” Li sidiĝis en la seĝo.

“Kaj kiel estos la kapuĉo aranĝota?”

“Laŭ tiu ĉi maniero.” Kerlen ektenis la anson, tiris la ŝirmilon por kovri al si la

vizaĝon.

“Rapide,” diris Gajal al Ŝierl. Ŝi risortis al la pulpito; Kerlen la Kuratoro faris moveton por retroirigi la kapuĉon; Gajal ektenis la delikatan korpframon, tenadis ĝin. Ŝierl ekfunkciigis la ŝaltilojn; la Kuratoro ekripozis, suspiris.

Ŝierl rigardadis al Gajal, malhelaj okuloj tiel larĝaj kaj likvaj kiel la granda akvo-flamulano de Suda Almerio. “Ĉu li — mortis?”

“Mi esperas , ke ne.”

Ili rigardadis sencerte al la ripozigita formo. Sekundoj pasis.

Sonora sono aŭdiĝis de malproksime — premego, tordiĝo, ĝojega muĝego, malplaj hup-sonoj de sovaĝa triumfo.

Gajal ekkuris al la pordo. Prancante, ondetante, glitante en la galerion venis multego da fantomoj; tra la malfermita pordo malantaŭ ili, Gajal povis vidi la grandegan kapon. Ĝi puŝis sin en la ĉambron. Grandaj oreloj aperis, parto de virbove dika kolo, ĉirkaŭita de purpuraj haŭtopendaĵoj. La muro fendiĝis, subenflekiĝis, dispecetiĝis. Granda mano trapuŝiĝis, antaŭbrako...

Ŝierl kriegis. Gajal, pala kaj tremanta, malfermegis la pordon tuj kontraŭ la vizaĝo de la plej proksima

fantomo. Ĝi ĉirkaŭfluis la randon, malrapide, nubeto post nubeto.

Gajal risortis al la podio. La ampolo montris malbrilecon. La manoj de Gajal treme moviĝis laŭlonge la regiloj. “Nur la konscio de Kerlen funkciigas la bastonon,” li anhelis. “Tiom el la afero klaras.” Li fiksrigardis en la ampolon kun dolorigita urĝeco. “Lumiĝu ampolo, lumiĝu...”

Apud la pordo la fantomo enfluadis kaj ŝveliĝis.

“Lumiĝu, ampolo, lumiĝu...”

La ampolo lumiĝis. Kun akra krio Gajal renversigis la ŝaltilojn al

neŭtraleco, subensaltis, tiris supren la kapuĉon.

Kerlen la Kuratoro sidis alrigardanta lin.

Malantaŭe la fantomo formigis sin — alta blanka estulo en blanka robo, kaj la malhelaj okul-truoj fiksrigardadis kiel elirejoj al malimagado.

Kerlen la Kuratoro sidis rigardanta.

La fantomo moviĝis sub sia robo. Mano tia kia piedo de birdo aperis, entenanta bulon de malpuraspekta materialo. La fantomo ĵetis la materialon al la planko; ĝi eksplodiĝis por formi nubeton da nigra polvo. La polveroj de la

nubo kreskiĝis, fariĝis multego da tordiĝantaj insektoj. Kun unuanima volo ili ekiris trans la planko, kreskiĝantaj dum ili disvastiĝis, kaj fariĝis rapide rampantaj estuloj kun simio-kapoj.

Kerlen la Kuratoro ekmoviĝis. “Bastono,” li diris. Li tenis supren la mano. Ĝi tenis lian bastonon. La bastono kraĉis oranĝan verŝegon — ruĝa polvo. Ĝi nubetiĝis antaŭ la alrapidanta amaso kaj ĉiu polvo fariĝis ruĝa **skorpio**. Tiel komencis feroça batalo; kaj etaj krioj kaj insektaj sonoj supreniris de la planko.

La simio-kapaj estuloj mortigiĝis, forĉasiĝis. La fantomo suspiris, movis sian ungaran manon fojon plu. Sed la bastono elkraĉis lumstrion el la plej pura

ruĝo kaj la fantomo elfandiĝis por fariĝi nenio.

“Kerlen!” kriis Gajal. “La demono enrompas la galerion.”

Kerlen malrapidegis la pordon, paŝis elen.

“Bastono,” diris Kerlen, “faru vian plejan volaĵon.”

La demono diris, “Ne, Kerlen, detenu la magion; Mi kredis, ke vi stuporis. Nun mi retretas.”

Kun granda tremegado kaj tirego de masivo li tiris sin retroen ĝis refoje nur lia vizaĝo montriĝis tra la truo.

“Bastono,” diris Kerlen, “estu gardema.”

La bastono malaperis el lia mano.

Kerlen turniĝis por fronti al Gajal kaj Ŝierl.

“Estas bezono nun por multaj vortoj, ĉar nun mi mortas. Mi mortas, kaj la Muzeo poste ripozos sola. Do nu parolu rapide, rapide, rapide...”

Kerlen moviĝis per feblaj paŝoj al portalo kio ekglitis flanken je lia alproksimiĝo. Gajal kaj Ŝierl, prognozantaj pri la probablaj direktoj de la sinteno de Kerlen, staris hezite ĉe la malantaŭo.

“Venu, venu,” diris Kerlen akre senpacienca. “Mia forteco elĉerpiĝas, mi mortas. Vi estis al mi la morto.”

Gajal moviĝis malrapide antaŭen, kun Ŝierl duona paŝo malantaŭa. Deca respondo al la akuzo evitis lian serĉon; vortoj ŝajnis esti sen konvinka povo.

Kerlen stude rigardis ilin kun malforta rideto. “Haltigu viajn bedaŭrojn kaj hastu; la necesaj aferoj plenumendaj en la tempo havebla por ili faras, ke la tasko similu al provi skribi la Libregoj de Kae per minimumo da inko. Mi fadas; mia pulsado venas por malfortaj tajdoj, mia vidkapablo flagras...”

Li gestis senespere per mano, poste,

turniĝanta, kondukis ilin en internan ĉambron, kie li duonfale sidiĝis en granda seĝo. Kun multaj maltrankvilaj ekrigardoj al la pordo, Gajal kaj Ŝierl sidiĝis sur remburita longseĝo.

Kerlen moke ridis per febla voĉo, “Vi timas la blankajn fantomaĵojn? Pfa, ili estas baritaj el la galerio per la bastono, kio limigas ĉiujn iliajn provojn. Nur tiam, kiam mi estas stupora el konscieco — aŭ mortinta — ĉesos la bastono je sia funkciado. Vi devas scii,” li aldonis kun iom plia vigleco, “ke la energioj kaj dinamioj ne trairas el la kanelo de mia menso sed el la centra potenciejo de la Muzeo, kio estas ĉiama; mi nur direktas kaj ordigas la stangeton.”

“Sed tiu ĉi demono — kiu aŭ kio li estas? Kial li venas por rigardi tra la muroj?”

La esprimo de Kerlen ŝanĝiĝis al senespera masko. “Li estas Blikdak, Estro-Diulo de la demono-mondo Ĝeldred. Li torde tiris truon cele por ensuĉegi la sciaron de la Muzeo en sian menson, sed mi haltigis lin; do li sidas atendente en la truo ĝis mi mortos. Poste li supersatos sin per **erudicio** je la granda malavantaĝo de homoj.”

“Kial oni ne povas devigi tiun ĉi demonon por kaj forigi la truon?”

Kerlen la Kuratoro kapneis. “La fajroj kaj furiozaj povoj kiujn mi regas ne

validas en la aero de la demono-mondo, kie substanco kaj formo estas el malsama esteco. Do, tiom multe kiom vi povas lin vidi, li estas portinta kun si la propran medion; ĝis tia grado li estas sekura. Kiam li provas eniri plue en la Muzeon, la povo de Tero dissolvas la estecon de Ĝeldred; tiam mi povas ŝprucigi al li per la prisma fervoro el la potenciejo... Sed atendu, sufiĉe pri Blikdak por la nuna momento; diru al mi, kiuj vi estas, kial vi ĉi tien veturis, kaj kio estas la novaĵo el Tórsingol?”

Gajal diris en haltema voĉo, “Thorsingol jam pasis el memoro. Nenio restas supere krom arida tundro kaj la malnova urbeto de la Saponedoj. Mi estas

el la suda lando; mi vojaĝis multajn leŭgojn por alparoli vin kaj plenigi mian menson per scioj. Tiu ĉi knabino Ŝierl estas el la Saponedoj, kaj viktimo de antikva kutimo kio sendas belon al la Muzeo je la alvoko de la fantomoj de Blikdak.”

“Ah,” spiris Kerlen, “ĉu mi estis tiom sencela? Mi memoras tiujn ĉi belajn formojn kiujn Blikdak dungis por mildigi la tedecon de sia deĵoro... Ili fluge ekpasas tra mia memoro tiel kiel printempaj **efemeroj** preter panelo da vitro... Mi flanken ŝovis la aferon kiel kreituloj el lia propra naskado, proponitaj per lia propra imago...”

Ŝierl ŝultrolevis esprime de sia

konfuzo. “Sed kial? Por kia utilo al li estas homaj estuloj?”

Kerlen diris malsprite, “Knabino, vi estas tute el ĉarmo kaj freŝeco; la monstraj urĝoj de la demono-lordo Blikdak preteras via imagkapablo. Tiuj ĉi gejunuloj estis lia ludado, sur kiuj li praktikas variajn kunigojn, koitojn, perversojn, sadismojn, naŭzojn, histrionojn kaj fine baraktojn ĝis la morto. Poste li sendas elen pluan fantomon por postuli pluan junecon kaj belecon.”

Ŝierl flustris, “Tiu estis la estonta sorto mia...”

Gajal diris konfuzite, “Mi ne

komprenas. Tiaj agoj, laŭ mia kompreno, estas karakterecoj de la homaro. Ili estas antropaj laŭ la baza naturo de la funkciantaj sako, glandoj kaj orgenoj. Pro tio ke Blikdak estas demono...”

“Pripensu lin!” parolis Kerlen. “Liajn liniarojn, liajn aparatojn. Li estas nenio alia krom antropa, kaj tiel estas lia origino, kune kun ĉiu el la demonoj, fréjtoj kaj lumokulaj kreituloj kiuj infestas fin-tempan Teron. Blikdak, kiel la aliaj, estas el la menso de homoj. La ŝvita kondensaĵo, la fiodoro kaj naŭzindeco, la seksaj perfortoj kaj sodomioj, la feko-afrodiziaj kapricoj, la multoblaj ridaĉindaj lubrikaĵoj kiuj drene trafluadis la tutan homaron kune

produktis grandegan tumoron; el tio Blikdak akiris sian estiĝon, do tiel li estas. Vi jam vidis la manieron laŭ kio li tenas sian estecon, do li samkvalite aranĝas siajn distraĵojn. Sed pri Blikdak, sufiĉe. Mi mortas, mi mortas!” Li faletis ripoze sur sian seĝon kun anhelanta brusto.

“Vidu min! Miaj okuloj varias kaj ŝanceliĝas. Mia spirado tiel malprofundas kiel tiu de birdo, miaj oscedoj estas kiel la **medolo** de maljuna grimpoplanto. Mi jam vivis pli longe ol memoro; en mia frenezeco mi ne sciis pri pasado de tempo. Kiam ne estas ajna scio tiam ne okazas **somataj** konsekvencoj. Nun mi rememoras la jarojn kaj centjarojn, la

miljarojn, la epokojn — ili similas al rapidaj ekvidoj tra **obturatoro**. Do, per kuraci min de mia frenezeco, vi estas mortinta min.”

Ŝierl palpebrumis, kliniĝis malantaŭen. “Sed kiam vi mortos? Kio poste? Blikdak...”

Gajal demandis, “En la Muzeo Homara, ĉu ne troveblas informoj pri la ekzorcaĵoj necesaj por dissolve tiun ĉi demonon? Klaras, ke li estas nia unuranga kontraŭulo, nia plej tuja afero.”

“Blikdak devas esti detruita,” diris Kerlen. “Post tio mi mortos komforte; tiam vi devas alpreni la zorgadon de la Muzeo,” Li lekis siajn blankajn lipojn.

“Antikva principo specifigas, ke por detrui substancon, oni devas **determini** la naturon de la substanco. Por diri mallonge, antaŭ ol ni povas dissolvi Blikdak-on, ni devas malkovri lian bazan naturon.” Kaj liaj okuloj moviĝis vitre al Gajal.

“Via deklaro validas preter disputo,” agnoskis Gajal, “sed kiel ĝi estu farata? Blikdak neniam permesos tian enketon.”

“Ne; necesas, ke estu artefikado, ia trompa metodo...”

“La fantomoj, ĉu ili estas same el la materialo de Blikdak?”

“Ja.”

“Ĉu la fantomoj povas esti baraktataj kaj obstaklataj?”

“Certe; en skatolo el lumo, kion mi povas efektiviĝi per nur penso. Jes, fantomon ni devas havi.” Kerlen levis la kapon. “Bastono! unu fantomon; enlasu fantomon!”

Momento pasis; Kerlen levis manon. Aŭdiĝis kvieta grato ĉe la pordo, kaj mola ĝemeto aŭdeblis de ekstere. “Malfermiĝu,” diris voĉo, plena de plorsonoj kaj ekpaŭzoj kaj tremetoj. “Malfermu kaj lasu eliri la junajn estulojn al Blikdak. Li trovas tedecon kaj lasecon en sia deĵoro; do lasu, ke la duopo venu antaŭen por nuligi lian malkomforton.”

Kerlen strebe levis sin por stari.

“Jam farita.”

De malantaŭ la pordo aŭdiĝis malĝoja voĉo, “Mi obstakliĝas, mi kaptiĝis en bruliga brilado!”

“Nun ni malkovros,” diris Gajal. “Kio dissolvas la fantomon, tio dissolvos Blikdak-on.”

“Ja prave,” akordis Kerlen.

“Kial ne lumo?” demandis Ŝierl. “Lumo apartigas la ŝtofon de la fantomoj tiel kiel subita vento disŝiras nebulon.”

“Sed nur pro ilia maldureco; Blikdak estas akra kaj solida, kaj povas travivi la

plej ferocan radiegon en sia demonolanda alkovo.” Kaj Kerlen pensadis. Post momento li gestis al la pordo. “Ni iros al la bildo-pligrandigilo; tie ni eksplodos la fantomon ĝis makroa dimensio; tiel ni trovos lian bazaĵon. Gajal de Sfer, vi devas subteni mian malfortecon; vere, miaj membroj malfortas kiel vakso.”

Sur la brako de Gajal li ŝancelis antaŭen, kaj kun Ŝierl tuj postsekvante ili atingis la galerion. Ĉi tiel la fantomo ploradis en sia kaĝo el lumo, kaj serĉis konstante por malluma aperturo tra kiu li povus eksudi sian esencaĵon.

Neniom atentanta lin, Kerlen paŝadis lambe trans la galerion. Post ili sekvis la skatolo el lumo kaj perforte la

fantomo.

“Malfermu la grandan pordon,” kriis Kerlen en voĉo difektita de kraklado kaj raŭkeco. “La grandan pordon eniran al la Stokejo de Scioj!”

Ŝierl kuris antaŭen kaj puŝis forte kontraŭ la pordon; ĝi glitis flanken, kaj ili enrigardis la grandan malluman halon, kaj la ora lumo de la galerio grade malpliiĝis inter la ombroj kaj fariĝis nenio.

“Voku por Lumeno,” Kerlen diris.

“Lumenon!” kriis Gajal. “Lumeno, atentu!”

Lumo estiĝis en la granda halo, kaj ĝi montriĝis tiom alta ke la pilastroj sterniĝe situaj laŭlonge en la halo etendiĝis supren por fariĝi fadenoj, kaj tiom longa kaj larĝa ke viro povus perdi sian spirkapablon kuranta laŭlonge de ajna dimensio. Sternitaj po egalaj vicoj estis la nigraj ŝrankoj kun kupraj fostetoj kiujn Gajal kaj Ŝierl estis observintaj dum sia eniro. Kaj super ĉiu pendis kvin similaj ŝrankoj, precize fiksitaj, ŝvebantaj sen subteno.

“Kio estas tiuj ĉi?” demandis Gajal mirigita.

“Mi volas ke la propra sensufiĉa cerbo enhavus centonon da tio kion scias tiujn ĉi memoro-stakojn,” anhelis Kerlen.

“Ili estas grandegaj cerboj plenplene ŝtopitaj de ĉio kio estas sciata, spertita, farita aŭ registrita de la homaro. Ĉi tie estas ĉiom da la perdita sciaro, frua kaj malfrua, la altaj imagaĵoj, la historio de dek milionoj da urboj, komencoj de tempo kaj la supozataj finiĝoj; la kialo de homa ekzisteco kaj la kialo pri la kialo. Tage mi laboradis kaj strebis inter tiuj ĉi memoro-stakoj; mia sukcesaĵo estis resumo el la plej surfaca tipo: panoramo de larĝa kaj multeparta lando.”

Ŝierl diris, “Ĉu ne estus la metodo por detrui Blikdakon stokita ĉi tie?”

“Jes ja; nia tasko estus nur trovi la informon. Interne de kiu ŝranko ni serĉu? Konsideru la kategoriojn: Demonio-

landoj; Mortigoj kaj Mortmalsanoj;
Ekspozicioj kaj Dissolvoj de Malbono;
Historio de Granvilundo (kie simila
estulo estis forigita); Logaj kaj Mallogaj
Superordigoj; Terapio por Halucinigoj
kaj Fantomo-prenistoj; Konstruada
Ĵurnalo, instruo por regenerado de
rompitaĵoj, sub-sekcio pri invado
pere de demonoj; Metodaj Sugestoj je
Tempo Riska... Ja, tiuj ĉi kaj mil pliaj. Ie
estas scio pri kiel frapegi la abomenindan
vizaĝon de Blikdak retroen al sia
kvazaŭa-loko. Sed kie serĉi? Indekso
Supra mankas; nenia krom la malsufiĉa
resumo de mia propra kompilado. Tiu kiu
serĉas specifan scion ofte devas esplori
longatempe...” Lia voĉo grade fadis.
Poste: “Antaŭen! Antaŭen tra la

memorigiloj al la Meĥanismo.

Do ili iris inter la memoro-stakoj, kiel blatoj tra labirinto, kaj poste trenŝvebis la kaĝo el lumo kun la plorĝemanta fantomo. Finfine ili eniris ĉambron odoran je metalo; refoje Kerlen instruis al Gajal kaj Gajal vokis, “Servu nin, Lumeno, servu!”

Inter komplikaj meĥanismoj marŝis la triopo, Gajal perdita kaj mirigita preter demandokapablo, malgraŭ tio ke lia cerbo doloris pro la deziro por sciado.

Ĉe alta budo Kerlen haltigis la kaĝon el lumo. Vitra plato subeniris antaŭ la fantomo. “Observu nun,” Kerlen diris, kaj manipulis la aktivigilojn.

Ili vidis la fantomon, bildigita kaj projekciita: la flua robo, la marasma vizaĝaspekto. La vizaĝo pligrandiĝis, platiĝis; sekcio sube de la vaka okulo fariĝis krusta blanka loko. Ĝi apartiĝis en pustulojn, kaj sola pustulo ŝvelis plene en la vitra ekrano. La kavo de la pustulo estis komplike malglata surfaco, plektaĵo kvazaŭ ŝtofo, trikita laŭ punteca interplekto.

“Jen!” diris Ŝierl. “Li estas aĵo teksita kvazaŭ el fadeno.”

Gajal turnis entuziasme al Kerlen; Kerlen levis fingron por havi silenton. “Vere, vere, bona penso, aparte pro tio ke ĉi tie apud ni estas **rotoro** el ega rapido, uzata por **bobeni** la **kognajn filamentojn**

de la ŝrankoj... Nun observu; mi etendas en tiun ĉi panelon, mi elektas maŝon, mi eltiras fadenon, kaj atentu! La maŝoj malstriktiĝas kaj disiĝas. Kaj nun al la bobeno sur la rotoro, kaj mi volvas la fadenon, kaj nun per tordeto ni ĝin ligas...”

Ŝierl diris dubeme, “Ĉu la fantomo ne observas viajn agojn?”

“Neniel,” certigis Kerlen. “La plato el vitrieno muras inter li kaj niaj faroj; li estas tro agacita por atenti. Kaj nun mi dissolvas la kaĝon kaj li estas libera.”

La fantomo vagis elen, kaŭranta for de la lumo.

“Iru!” kriis Kerlen. “Returnu al via fontulo; reiru, returnu kaj iru!”

La fantomo foriris. Kerlen diris al Gajal, “Sekvu; eksciu pri kiam Blikdak enflaros lin.”

Gajal, ĉe sekura distanco, rigardis la fantomon sorbiĝi supren en la nigran naztruon, kaj revenis tien kie Kerlen atendis apud la rotoro. “La fantomo estas refoje fariĝinta parto de Blikdak.”

“Nu do,” diris Kerlen, “ni kaŭzas ke la rotoro turniĝi, la bobeno giri, kaj ni observos.”

La rotoro giris ĝis nefokusebla rapido; la bobeno (tiom longa kiom la

brako de Gajal) fariĝis survolvita de fantomo-fadeno, unuamonte el paŝtela ĉiokoloro, poste perlamoto, kaj poste el fajna lakta-eburo.

La rotoro giradis, po miliono da fojoj en ĉiu minuto, kaj la fadeno tiritaj nevideble kaj nesciate de Blikdak dikiĝis sur la bobeno.

La rotoro giradis; la bobeno pleniĝis — cilindro lumanta de rebrila silka reflektado. Kerlen malrapidigis la rotoron; Gajal surfiksis novan bobenon tiuloke, kaj la malplektado de Blikdak plufariĝis.

Tri bobenoj — kvar — kvin — kaj Gajal, observante Blikdak-on de

malproksime, trovis la gigantan vizaĝon kvieta, la buŝo moviĝetanta kaj suĉanta, faranta tiun klakan sonon kiu je la komenco estis kaŭzinta maltrankvilecon por ili.

Ok bobenoj. Blikdak malfermis la okulojn, elrigardis konfuzo ĉirkaŭ la ĉambro.

Dek du bobenoj: malsamkolora makulo aperis sur la subenfleksanta vango, kaj Blikdak tremis pro maltrankvilo.

Dudek bobenoj; la makulo plivastiĝis trans la vizaĝo de Blikdak, trans la klina antaŭa nodo, kaj lia buŝo pendis malstrikte; li siblis kaj baraktetis.

Tridek bobenoj: la kapo de Blikdak aspektis malfreŝa kaj putra; la blue metala rebrilo estis fariĝanta kolera brunruĝo, la okuloj ŝvelis, la buŝo pendis malfermita, la lango pendis elfale malstrikta.

Kvindek bobenoj: Blikdak kolapsis. Lia fronta nodego falis kontraŭ la febreca buŝo; liaj okuloj brilis kiel febraj braĝoj.

Sesdek bobenoj: Blikdak estis ne plu.

Kaj kune kun la dissolviĝo de Blikdak tiel ankaŭ dissolviĝis Ĝeldred, la demonolando kreita por la endomiĝado de malbonego. La fendo en la muro kondukis al nuda roko, sen rompo kaj

rigida.

Kaj en la Meĥanismo restis sesdek lumantaj bobenoj nete stakitaj; la malbonegeco tiel ĉi malordigita brilis en pureco kaj irizeco.

Kerlen faletis malantaŭen kontraŭ la muro. “Mi mortas; mia tempo nun venas. Mi gardis bone la Muzeon; kune ni reprenis ĝin for de Blikdak... Atentu min nun. En viajn manojn mi transdonas la kuratoradon; nun la Muzeo estas via deĵoraĵo por gardi kaj bonteni.”

“Por kiu celo?” demandis Ŝierl. “Tero mortas, preskaŭ kiel vi... Por kio servos scioj?”

“Pli nun ol ĉiam antaŭe,” anhelis Kerlen. “Atentu: la steloj brilas, la steloj belas; la memoro-stakoj scias benan magion por rapidigi vin al junajn klimatojn. Nun — mi iras. Mi mortas.”

“Atendu!” kriis Gajal. “Atendu, mi petegas!”

“Kial atendi?” flustris Kerlen. “La vojo al paco logas min; ĉu vi vokus min revene?”

“Kiel mi elprenu de la memoro-stakoj?”

“La ŝlosilo por la indekso estas en miaj ĉambroj, la indekso de mia vivo...”
Kaj Kerlen mortis.



Gajal kaj Ŝierl suprenpaŝis al la supraj etaĝoj kaj staris ekstere de la portalo sur la antikva pavimita planko. Estis nokto; la marmoro rebriletis subpiede, la rompitaĵoj kolumnoj staris altaj kontraŭ la ĉielo.

Trans la ebenejo la flavaj lumoj de Saponco briladis varmete inter la arboj; supere en la ĉielo briladis la steloj.

Gajal diris al Ŝierl, “Jene situas via hejmo; jen Saponco. Ĉu vi volas returni?”

Ŝi neis kapti. “Kune ni estis rigardantaj tra la okuloj de scio. Ni estas vidintaj malnovan Tórsingolon, kaj la

Imperion de Ŝerredo antaŭ tio, kaj Golŭan Andraon antaŭa je tio kaj la Kvardek Kádoj eĉ pli antaŭaj. Ni estas vidintaj la militemajn verdulojn, kaj la saĝajn Fárilaojn kaj la Kléŭmbojn kiuj forlasis Teron por aliri la stelojn, kiel faris Merionefo antaŭ ili kaj la Grizaj Sorĉistoj eĉ pli antaŭe. Ni estis vidintaj oceanojn leviĝi kaj refali, la montojn krustiĝi supren, supriĝi kaj fandiĝi sub la alfrapado de pluvoj; ni estas alrigardantaj la sunon dum ĝi lumis varma kaj plena kaj flava... Ne, Gajal, ne estas loko por mi nun ĉe Saponco...”

Gajal, apoganta kontraŭ la vetere erodita kolumno, suprenrigardis al la steloj. “Scio estas nia, Ŝierl — ĉiom da

sciebleco haveblas al ni. Kaj kion ni faru?”

Kune ili rigardis supren al la blankaj steloj.

“Kion ni faru...”



aberaci/o **1** Diferenco inter la ŝajna kaj la vera situo de astro. **2** □ Disperso de la lumradioj, kiu kontraŭstaras la formiĝon de preciza bildo. **3** ♥ Devio disde la normala tipo. **4** § Deflankiĝo disde la normala stato.

abomen/i **1** Malamegi pro fizike naŭzaj ecoj. **2** Malamegi pro morale tre malplaĉaj ecoj.

acerb/a **1** Adstringagusta, kiel nematura frukto. **2** (f) Kritike, ofendintence pika, morda.

afekci/i (tr) Estigi ŝanĝon en la animstato de ekzistaĵo

afrodizi/o §♂ Eksciteco de la

seksorganoj.

agat/o Mineralo, variaĵo de kalcedono laŭzone diverskolora, uzata en juvelarto.

agit/i (tr) **1** Varbi por politika, sociala, religia ks celo, ekscitante la sentojn. **2** Naski en animo sinsekvajn sentojn, kiuj ĝin malkvietigas.

aktini/o Floro-aspekta mar-besto, vivanta unuope, fiksiĝinta sur ŝtonoj.

alegori/o ♣ Metafora parolo, kiu sub la propra senco aludas kaŝitan signifon pli profundan, plej ofte moralan.

aler/o Tegmenteto super domenireja pordo, destinita por ŝirmi precipe kontraŭ

pluvo. ~*EB 39/67*

amfiteatr/o Ronda konstruaĵo, kie seĝovicoj altiĝas unu poste k supre de alia ĉirkaŭ centra libera spaco, en kiu antikvuloj aranĝis diversajn spektaklojn
~*EB 296/1-3*

ampeplos/o Genro de grim paj lianoj kun forkaj ĉiroj sen alfiksiĝaj disketoj; 25 specioj el mezvarmaj kaj tropikaj regionoj de Azio k Ameriko.

amulet/o Objekto, kiu per supozata magia efiko gardas sian portanton kontraŭ danĝero, malsano, sorĉo ktp.

antrop/o Homo.

apati/o Stato de spirito, kiun nenio tuŝas, ekscitas aŭ suferigas

apokrif/a 1 ⚔ Ne akceptita en la kanono de la Biblio fare de judismo aŭ de iuj kristanaj eklezioj: ekzistas pluraj apokrifaj evangelioj. ➡ kanona.

2 Neaŭtentika: apokrifa dokumento, testamento. ➡ falsa.

ardez/o 1 ⊕ Petro fajne kristala, malforte metamorfa, fendiĝanta en platajn tavolojn, uzatajn inter aliaj por fari tegmentojn: ardezo estas blugriza. ➡ skisto, filito. 2 Tabuleto, pasintece el ardezo, uzata de junaj lernantoj por skribado per kreto aŭ speciala krajono. ➡ grifelo.

arĥitrav/o La malsupra parto de entablemento, kiu kuŝas senpere sur la kapituloj. ~*EB* 316/18; ~*BeE* 163/16,27

arkan/o ⊖ Sekreta instruo aŭ rito, rezervita al inicitoj.

arpeĝ/o Akordo, kies tonoj sonas ne samtempe, sed en rapida sinsekvo.

asket/o Piulo, celanta animan perfektigon per korpaj rigoraĵoj

asteri/o Genro de ekinodermoj, en formo de kvinpinta stelo. 📖 orfiuro
~*EB* 340/23; ~*BeE* 176/43

aster/o Genro de unu-, du- k plur-jaraj herboj, kies radiajn kapitulojn

karakterizas flava aŭ purpura disko k
granda, blanka aŭ okulfrape kolora
krono; ĉirkaŭ 250 specioj, N-hemisferaj,
multaj pororname kultivataj.

aŭgur/o **1** Signo, interpretata por
antaŭvidi estontan okazaĵon. **2** (f)
Antaŭsigno. 📖 aŭspicio, prognozo. **~i** (tr)
1 ☹️ Diveni estontaĵon per observo de
birdoflugo aŭ de ĉielaj fenomenoj.
2 Antaŭvidi k antaŭdiri per ia ajn rimedo.
3 (f) Antaŭimagi. **4** (f) Esti la antaŭsigno
de io.

aŭreol/o Luma radiado ĉirkaŭ io, kutime
sfera aŭ ringoforma.

aŭr/o **1** Sensaĵo (aŭda, vida k.a.), kiu
anoncas al malsanulo baldaŭan atakon de

epilepsio, histerio, astmo, kaj simile.

2 Spiriteca substanco, iom simila al lumo, povanta havi diversajn kolorojn, troviĝanta en kaj ĉirkaŭ vivanta korpo, de kie ĝi disradias; laŭ iuj kredoj ĝi estas videbla de inicitoj. **3** Etoso, disradiata de persono.

aŭspici/o Antaŭsigno pri la estonta evoluo de io.

aven/o 1 Genro de unujaraj herboj, unu specio el kio kultiviĝas pro ties grajnoj kiuj uziĝas kiel karakteriza nutraĵo por ĉevaloj, sed ankaŭ en diversaj formoj kiel manĝaĵo por homoj, aparte matena kaĉo.

avid/a Forte deziranta ricevi aŭ ekposedi ion. 🖱️ avara. Rim. avid estas ofte uzata

suf-e, kun la senco de am, sed kun pli forta kaj ordinare malfavora nuanco.

~e En avida maniero. **~i** (tr) Pasie deziri ekposedi aŭ ricevi.

azil/o Loko, kie persekutata homo estis, laŭ kutimo aŭ leĝo, sekura kontraŭ siaj persekutantoj:

balkon/o Plata elstarajo ĉe la fasado de domo, ĉirkaŭita per balustrado aŭ krado kaj komunikiĝanta kun la interno. *~EB 296/17,18 39/69 252/93 10/1*

balustrad/o **1** Vico da balustroj kun supra breto, ĉe la rando de teraso, balkono kaj simile. **2** Ĉia analoga barilo aŭ apogilo, starigita por eviti defalon. *~EB 39/9, 40/25 ; ~BeE 44/18,*

276/22,50

barĝ/o Platkarena, malalta, kargoporta barko aŭ ŝipo, uzata ordinaro en riveroj, havenoj kaj kanaloj. ~*EB* 211/25, 220/20,22 ; ~*BeE* 375/87

basalt/o Vulkana petro, nigra kaj nebrila, el kiu konsistas la plejparto de la terkrusto.

baŭm/i (ntr) Stariĝi sur la postaj piedoj, precipe pri ĉevalo kaj simile.

bed/o Plata aŭ nivelita peco de grundo, preparita por plantoj


boben/o Cilindra aŭ konusa peco el ajna materialo ĉirkaŭ kiu oni volvas longan,

relative maldikan materialon kiel fadeno,
drato, filmo, ktp. ~**i** (tr) Volvi ĉirkaŭ
bobeno. ~*EB* 233/60; ~*BeE* 253/29,
318/47

braĉ/o ☒ Speco de pantalono, portata de
gaŭloj, ĝermanoj k kelkaj Aziaj popoloj.

braĝ/o **1** Ardaj karbetoj restantaj, post
kiam la ligno- aŭ karbo-pecoj ne plu ĵetas
flamon. **2** Tiaj samaj karbetoj, estingitaj
antaŭ forkonsumiĝo, kaj uzataj aŭ kiel
bruligaĵo, aŭ kiel elektrodo.

brez/i (tr) Kuiri per milda fajro, sen
elvaporiĝo, por ke la kuiraĵo konservu
ĉiujn siajn sukojn kaj bruniĝu.

brod/i (tr)  **1** Kudre ornami ŝtofon aŭ

ledon per fadenoj. 🖱️ broki. **2** Desegni per tiaj fadenoj.

brog/o **1** Trempi en, aŭ surverŝi per bolanta akvo. **2** Ĵeti en bolantan akvon viandon aŭ legomojn, por ilin pretigi al posta kuirado aŭ depreni de ili ian akrecon. **brogaĵo** Akvo, en kiu oni bolkuiris viandon.

brok/i (tr) 🗄️ Interteksi sur la fono fadenojn el silko, arĝento aŭ oro, por aperigi desegnojn sur la ŝtofo. **~ado** Tia procedo de teksado. **~aĵo** Tiel teksita kaj ornamita ŝtofo.

bronz/o Alojo de kupro k stano (en proporcio ĉ 8/1), al kiu oni ofte aldonas en ioma kvanto zinkon aŭ plumbon:

Ŝildo, sonorilo, kanono, statueto el bronzo; alumina bronzo (en kies aloj aluminio anstataŭas stano). 🖐️ kupro, latuno, tombako.

burlesk/a Ekstravagance komika, kontrastiganta la noblecon de la temo kun la trivialeco de la stilo, aŭ male.

cinabr/o Ruĝa sulfido de hidrargo, uzata kiel kolorilo, HgS.

citadel/o Fortikigita loko en urbo, por defendi ĝian alirejon.

col/o Mezurunuoj de longo. Proksime tiom longa kiom fingra artikolo.

ĉarnir/o Ⓣ Metalaĵo, konsistanta el du

platoj, kunligitaj per komuna akso, ŝraŭbitaj sur la fiksa parto de meblo, kofro kaj simile, respektive sur la pordo aŭ kovrilo, k ebliganta ties malfermon. 📍 pordhoko, kardino, pivoto. ~EB 134/57 ; ~BeE 293/56

dafodilo Specio de sovaĝa narciso (*Narcissus pseudonarcissus*) kun nur unu granda, senodora, ore flava floro, karakterizata de granda kromkorola tubo; hejma en Eŭropo, herbeja, pororname kultivata. Alimome ‘trumpetnarciso’ ~BeE 213/3 📍 jonkvilo.

dampi Mane aŭ ile malpliigi la vibradon, aŭ ŝanĝi obtuzige la sonkvaliton

debat/o Diskuto laŭ ordigita maniero en oficiala kunveno (kongreso, parlamento ktp) aŭ, porekzerce, en klaso.

dekdec/o Komenco de ruiniĝo, de malfortiĝo, de malprosperiĝo.

delir/i (ntr) Esti en stato de nedaŭra psika malordo, kaŭzita de febro, malsano aŭ ebrieco, kaj karakterizata de halucinaj imagoj k nekonsekvencaj senkonsciaj paroloj.

desapont/i (tr) Ne kontentigi la esperojn de iu. ~**iĝi** Iĝi seniluziigita en siaj atendoj aŭ deziroj.

determin/i (tr) Precize fiksi ion necertan, indikante la limojn, inter kiuj

tiu io estas entenata.

dig/o 1 Remparo, starigita por ŝirmi lokon kontraŭ inundo de rivero aŭ maro.

2 Transversa muro, konstruita en rivero, por provizore haltigi, aŭ malakceli, la fluon, aŭ reguligi la nivelon. ~*EB 212/49,57-64*; ~*BeE 370/3,64*

dilat/o Fenomeno, en kiu la amplekso aŭ la volumeno de gasa, likva aŭ solida substanco pligrandiĝas.

dilem/o 1 Rezono, prezentanta alternativon inter du malsamaj aŭ kontraŭaj asertoj, kiuj ambaŭ kondukas al sama konkludo. **2** Alternativo, enhavanta du kontraŭajn proponojn, inter kiuj oni

nepre devas elekti.

distil/i (tr) Apartigi substancon de ĝiaj malpuraĵoj aŭ de kunkomponaĵoj, vaporigante per varmo ĝiajn vaporiĝemajn erojn kaj poste relikvigante la vaporojn per malvarmo. *Tie ĉi temas pri supernatura afero produktita en maniero analoga al distilado.*

duilion/o Grandega nombro, 10^{12} .

ebur/o Blanka kaj malmola substanco, kiu konsistigas la dentegojn de elefanto, hipopotamo, kaj aliaj. ~EB 337/39; ~BeE 162/39

efemer/a Mallongedaŭra; rapide pasanta: la diversaj novaj proponataj

sistemoj estas nur efemeraj ne pripensitaj provoj. 🖱 kaduka, pasema, unutaga. ~**o**
1 Efemeraĵo. **2** ♂ Genro de insektoj, kies larvoj vivas en sensala akvo, k kiesfluganta plenkreskulo vivas nur tre mallongdaŭre (kelkajn horojn ĉe iuj spoj). ~*EB 342/6*; ~*BeE 175/8*

ekskvizit/a Tre ege altkvalita laŭ artistadesegno, materiala konstruo. Esprimanta la plej puran modon.

ekspansi/o Plivastiĝo, plietendiĝo de ies influo aŭ regado. ~**i** (ntr) Prezenti tiun fenomenon.

eksud/i (ntr) § Eliĝi tra histo, simile al ŝvito: la sango eksudas iafoje tra poroj de haŭto. 🖱 elŝvit(iĝ)i. ~**o** Tia fenomeno.

~aĵo Organika likvo, sereca, fibreca aŭ mukeca, kiu eksudas el inflamita histo.

ekzalt/i (tr) Tre eksciti, levante la sentojn ĝis alta grado de intenseco.

~iĝo Ekstato de iu ~ita.

ekzorc/i (tr) Elpeli el vivanto malbonan spiriton, demonon ks, per magia formulo en formo de malbeno aŭ de preĝo.

elast/a Tia, ke ĝi facile kuntiriĝas, etendiĝas aŭ aliformiĝas pro premanta aŭ tiranta forto, kaj reprenas sian antaŭan formon, kiam tiu forto ĉesas.

eliksir/o **1** Likva medikamento, solvaĵo de unu aŭ pluraj substancoj en alkoholo. **2** Alkemia preparaĵo, por ŝanĝi

metalojn en oron, aŭ por senfine daŭrigi la vivon aŭ simile.

emajl/o Vitrosimila diverskolora substanco, per kiu oni kovras potojn, fajencon, metalon per bakado je alta temperaturo.

empiri/o **1** Sperto, rigardata kiel bazo k kogna kriterio de filozofio k scienco. **2** Nescienca rutina metodo bazita sur nura praktika, nesufiĉe kontrolita sperto.

ensembl/o **1** Trupo de muzikistoj aŭ aktoroj kune ludantaj. **2** Tuto de la dekoracio, de la mebloj kaj de la ornamaĵoj de ĉambro, harmonie elektitaj kaj aranĝitaj. **3** Tuto de la diversaj pecoj de kostumo harmonie alfaritaj. **4** Tuto da

konstruaĵoj, prezentantaj arkitekturan unuecon. **5** Imagita aro de similaj fizikaj sistemoj kies distribuo por iu(j) fizika(j) grando(j) estas proporcia kun specifa probablo; uzata por doni fizikan interpreton al probabloj.

epizod/o **1** ♣ Akcesora agado, ne strikte ligita kun la ĉefa temo, en rakonto aŭ poemo: la lastaj ses libroj de Eneado estas plenaj de epizodoj. **2** Aparta kurioza fakto en historia aŭ grava okazintaĵo. 📖 incidento.

erik/o **1** Geno de plantoj—daŭrafoliaj arbustetoj, tufarbustoj kaj kelkaj trunkarbustoj, multaj pororname kultivataj. **2** Ĉiu arbusteto aŭ arbusto el la g. Erica k parencaj g-oj, precipe kaluno.

~EB 316/19; ~BeE 195/19

erudici/o Multesciado pri detaloj kaj dokumentoj en ia faka scienco.

falĉi/i (tr) Detranĉi herbon aŭ grenon per falĉilo aŭ falĉileto. ~**ileto** ~EB 66/17; ~BeE 208/8

fascin/i (tr) **1** Senigi je ĉia povo de forkuro aŭ kontraŭstaro per intense fiksita rigardado. **2** Nerezisteble allogi, ravi.

faz/o **1** Perioda aspektoŝanĝo de astro: la fazoj de Luno. **2** Ĉiu el la difinitaj sinsekvaj statoj en la evoluado de fenomeno

fe/o Fabela estaĵo de malsupera rango,

dotita per supernaturaj povoj

filament/o \equiv Tre maldika drato en elektra ampolo aŭ elektrontubo, kiu, varmigata de kurento, produktas lumon aŭ favoras la elradiadon de elektrono.

filigran/o **1** Delikata aĵura teksaĵo el oraj aŭ arĝentaj fadenoj. **2** $\text{\textcircled{T}}$ Travidebla desegno, marko en papero. \sim EB 38/16, 101/30; \sim BeE 254/30

flagr/i (ntr) **1** Eligi tien kaj reen rapide moviĝantan lumon: la flamo de la kandelo flagradis en la aerblovo^Z. **2** Intermite treme k skue brili.

flakon/o Boteleto por parfumoj, medikamentoj, likvoroj, plejofte fermita

per ĝustege adaptita ŝtopilo el la sama materialo.

flok/o Peceto, tufeto el maldensa k malpeza materio, kiu ŝvebas en aero, malrapide falante.

fluoresk/i (ntr) □ Resendi laŭ pli longaj ondoj la ricevitan lumon, precipe la violan k ultraviolan. ☞ lumineski.

flut/o 뿔뿔뿔 Blovinstrumento, konsistanta el ligna aŭ metala tubo kun truoj. ~EB 302/31, 308/66, 366/47; ~BeE 161/47

fosforesk/i Lumi dum k post prilumigo per alia lumfonto.

fosili/o ⊕ ✂ Restaĵo, natura muldaĵo aŭ spuro de vivulo aŭ (vs.) de ties agado, konservata en petro (ĝenerale sedimenta) aŭ sedimento.

fragil/a (pecipe pri materio) Rompiĝema ĉe ekfrapo aŭ abrupta streĉo.

fragmit/o Iu el tri specoj de kanoj, kreskantaj ĉe rando de marĉoj kaj lagetoj.
~*BeE 196-23*

frakas/i Perforte k brue disrompi, dispecigi.

fret/o Listelforma, ronda aŭ plata ornamo, konsistanta en kontinuaj kombinoj de rektaj linioj ortangule aŭ zigzage kunigitaj.

fronton/o Ornamaĵo ĉe la fronto de konstruo, super pordo aŭ fenestro. ~*EB* 316/3; ~*BeE* 9/14

fut/o Mezurunuoj de longo, triono de la distanco inter nazo kaj la fingropintoj de etendita brako.

gab/o Supra triangula parto de muro, sur kiu sin apogas la firsta k mezaj patnoj, laŭ la deklivo de la tegmento. ~*EB* 39/15a, 116/3, 117/25; ~*BeE* 275/25, 44/11

gagat/o Variaĵo de nigra, brila lignito, uzata por juveloj.

galop/i (ntr) **1** (pp ĉevaloj kaj simile): Kuri per la plej rapida kurmaniero, en kiu

la kvar piedoj samtempe delasas la grundon ĉe ĉiu paŝego. 🖐 ambli, paŝi, troti. **2** Rajdi tiamaniere: la dio de la dormo galopis antaŭen. **3** (f) Tre rapide iri.

gaz/o Teksaĵo, malpeza kaj travidebla, el silko, lino.

gelaten/o **1** Senforma, travidebla, flaveta, duonsolida substanco (proteino sub formo de ĝelo), fandiĝanta ĉ. 25°C, ricevata per agado de varma akvo sur bestajn histojn (precipe ostojn). **2** Simila substanco, ekstraktata el iuj vegetaĵoj.

gerani/o Flora planto. ~*EB* 56/1; ~*BeE* 205/1

gir/i (ntr) Rondire turniĝi.

girland/o Ornama kunplektaĵo el floroj k folioj, en formo de kurba ĉeno. 📖 festono. ~EB 289/17; ~BeE 124/14

glace/a Ricevinta apartan brilan aspekton per polurado aŭ glatigado.

gong/o Sonorilo el vertikale pendanta metala disko, kiu forte resonas sub frapoj. ~BeE 117/46; PIV XXV/8

grajl/o ❄️ Speco de hajlo, kiu falas sub formo de tre malgrandaj k tre blankaj grajnoj. 📖 prujno.

graŭl/i (ntr) Kolermurmuri, grumbli,

murmuregi. Minaci hunde per gorĝa sono kaj levo de lipoj por montri dentojn.

granat/o Frukto de granatujo; bero pomgranda, kun ledeca ŝelo, enhavanta multajn manĝeblajn, purpuretajn semojn, uzatajn por farado de granatsiropo.

~EB 368/19; ~BeE 202/19

granit/o ⊕ Plutona petro, grajna, acida, precipe konsistanta el feldspato, kvarco kaj glimo. 🖱 sienito, gnejso, porfiro.

gruz/o **1** Malsubtila sablo, miksitita kun malgrandaj ŝtonetoj, precipe uzata por kovri park-aleojn, vojojn kaj simile. **2** Similforma dispecigita malmola substanco.

nekrofaĝ/o Tiu kiu nutras sin sur mortintaj uloj. Ordinare temas pri mikrobiologiaj aferoj, sed la aŭtoro kutimas uzi ĉi tiun terminon neologisme pri homoj. Leganto tial subtekste komprenas ke temas pri kulturo iom pli ol nur kanibala.

érb/o Danĝera arbar-loĝanta bestulo havanta kvar gambojn, fortan odoron kaj sensivan flarkapablon. Eble hibrido el urso, viro, lánk-lacerto kaj demono. Ĉasas naz-sekvante spurojn.

relajs/o Aparato, kiu ricevas malfortan efikon k kiu siavice resendas la saman aŭ similan efikon fortigitan, aŭ kiu resendas diferencon efikon deziritan; la efikoj ricevataj k elsendataj povas esti

mekanikaj movoj, elektraj kurentoj, pulso de lumo ktp.

hant/i (tr) Vizitadi tiel ke iu loko fariĝi timiga. Precipe (sed ne necese) temas pri fantomo.

hiacint/o Genro de herboj kun skvama bulbo, el kiu kreskas bazaj folioj kaj stara grapolo kun preskaŭ nuda pedunklo kun pendantaj, ofte bonodoraj floroj, havantaj malsupraduone kuniĝintajn tepalojn po 6; 3 sp-oj el U k C Azio, multe kultivataj, i.a. en Nederlando. → jacinto.

hibrid/o Individuo, kies du generintoj apartenas al du diversaj specioj, subspecioj, varioj aŭ formoj.

hipnot/o § Koscio-stato, estigita per artaj procedoj, fizikaj kaj psikaj, karakterizata de alta sugestio kaj volo parte senkritikigita.

histeri/o **1** Kompleksa fizika stato, en kiu la nerva sistemo, danke al ĝis nun neklarigita kapablo, povas krei neŭropatiajn simptomojn, plej variajn kaj plej mirigajn pro iliaj abruptaj aperoj kaj malapero. **2** Neŭrozo, karakterizata de ega intensigo de la emocia esprimo, akompanata de simptomoj ŝajne fizikaj aŭ de psikaj nekutimaj manifestiĝoj, kiel forta angoro, halucino, deliro kaj mitomanio.

hul/o Mara ondomovo estiĝanta sen ŝaŭmrompiĝo.

hum/o Kompleksa miksaĵo de organikaj substancoj, devenantaj el la malkomponiĝo de mortaj, precipe vegetaĵaj organismoj de grundoj.

ĥul/o Monstro kun homa formo kio loĝas ĉe tombejoj kaj manĝas la korpojn de mortintuloj, eble pretermorta homo aŭ mortinta homa korpo enloĝata de malbona spirito.

iks-kanel/i (tr) Fari malglata por pli facila tenado per ikse ordigitaj kruc-kaneloj kun rezulto ke estu (inter la krucaj kaneloj) multe da diamantformaj pintoj sur la tuto de antaŭe glata surfaco.

improviz/i (tr) **1** Tuj kaj senprepare produkti. **2** Senprepare organizi ion.

imun/a 1 ♀§ (pp organismo) Denaske aŭ (jen spontane, jen estige) akirinte rezistecon kontraŭ aparta mikrobo, veneno aŭ toksa. 2 ⚖ Ne respondeca antaŭ la leĝo, ŝirmita per leĝa privilegio. ☞ eksterteritoria. → tabua. 3 ⓘ Ⓟ Ŝirmita kontraŭ ia difekto, danĝero ks pro sia konsisto, materialo, konstruiĝo aŭ antaŭpretigo.

indig/o Malhelblua koloraĵo, antaŭe ekstraktita el indiguj, nuntempe sinteze preparita.

indukt/i (tr) Φ Rezoni, konkludante el apartaj faktoj al ĝenerala leĝo, el specoj al specaro, el efikoj al kaŭzo.

infest/i (tr) Svarme invadi, pp ratoj ks en

iun lokon, aŭ (\$) precipe pri parazitoj en iun organismon.

insolent/a Ofende senhonta, malrespektema.

intermit/i (ntr) Periode interrompiĝi, k rekomenciĝi ordinare post egalaj intertempoj.

interpret/i (tr) Atribui difinitan sencon al io, kaj sekve

iriz/a Prezenta tiajn kolorojn, kiuj sangiĝas laŭ la pozicio de la observanto.

ĉir/o 1 Maldika, volva organo de grim paj plantoj, per kiu ili alkroĉiĝas.
2 ♂ Fadenforma apendica palpilo ĉe

diversaj senvertebruloj, inter aliaj poliketoj, krinoidoj kaj brankiostomo.

☞ barbfadeno. ~EB 59/4, 80/4;

~BeE 209/4, 211/32

jad/o Mineralo. Densa, polurebla variaĵo de amfibolo aŭ pirokseno, kun koloro varianta de la hela grizverdo ĝis la blanko, uzata en Oriento por etaj art-objektoj.

jard/o Mezurunuoj de longo, egala al tri futoj, iomete malpli longa ol metro.

junk/o Genro de unu- kaj plur-jaraj herboj kun longaj tigoj enhavantaj spongecan histon, kun trinombraj floroj kaj kun trikameraj kapsuloj. Kreskas ĉe akvobordoj kaj uziĝas de korbistoj. ~EB

130/28; ~BeE 289/28

kab/o Pli-malpli altnivela pinto de terlando, kiu elstaras en la maro.

kahel/o Plato el bakita kaj glazurita argilo aŭ simila materialo, uzata por pavimi aŭ tegi. ~EB 260/35 & 41/51

kalendul/o Genro de unujaraj herboj kun integraj, longe elipsaj folioj, kun flavaj aŭ oranĝaj, radiaj kapituloj kaj kun senegretaj akenoj. ~BeE 203/33

kaŭlorap/o Kultivita vegetaĵo, tigo-brasiko, aparte ĝia tubero. ~EB 59/26

kam/o Rotacianta disko, kun elstaraĵo(j), kiu(j) ĉe ĉiu turno de la akso de la disko,

puŝas pecon sin apogantan sur ĝi, kaj uzata por la regado de mekanikaj aŭ elektraj organoj. ~*EB 184/60*;
~*EeB 343/5*

kapriol/i Kaprica, petola salto en kapra maniero.

kapuĉ/o Kapvesto, alkudrita aŭ alfiksita al mantelo. Se estus sufiĉe granda, obskurus ankaŭ la vizaĝon per sia ombro.

karakol/i (ntr) (pp ĉevalo aŭ rajdanto) Fari, dum irado, fantaziajn turniĝojn k saltetojn.

kard/o Plantoj el la tipo de karduo, t.e. pikilhavaj el la asteracoj kaj dipsakacoj.
~*EB 63/32*; ~*BeE 214/32*

karmezin/a Brile malhelruĝa. **brun-karmezina** HTML koloro #800000, ruĝ-verd-blua 128,0,0.

kask/o Metala aŭ fortikleda kapŝirmilo por soldatoj, fajrestingistoj, ministoj ktp. ~EB 246/4, 308/10, 310/39-42 & 60; ~BeE 82/20

katapult/o Malnova militmaŝino, funkcianta per streĉado kaj subita malstreĉo de ŝnuroj, kaj utiligata por antaŭenpafi ŝtonojn, ĵetarmilojn kaj aliaj.

kitel/o Vasta manikhava vesto el vulgara ŝtofo, kovranta la korpon de la ŝultroj ĝis la genuoj; longa bluzo. ~EB 32/19; ~BeE 35/49

klab/o 1 Tubera bastono, pli dika ĉe unu ekstremaĵo ol ĉe la alia, servanta kiel kontuza armilo: la klabo de Heraklo. 🖱 madzo. ~*EB* 94/8, 278/32 ; ~*BeE* 162/33 **2** Speco de bastono, uzata por batĵeti pilkon en golfo. **3** Supro de la malantaŭa femuro de ŝafo aŭ porko. ~**i** (tr) Frapi per klabo, precipe sur kapon.

klan/o Grupo de individuoj, kiuj rigardas sin parencaj unu al aliaj, sed kiuj rekonas ekskluzive tiun parencecon.

klarion/o Latuna blovinstrumento kun laŭta sono, uzata ofte en infanterio. ~*BeE* 140/2

klimaks/o **1** La lasta termo de gradacio. **2** Plej supra punkto, apogeo, zenito. **3** La

lasta termo de progresiva sukcesio.

klink/o **1** Tiu movebla peco de pordfermilo, kiu konsistas el metala dika lameno pivotfiksita ĉe unu fino, k kiu oni povas, levante aŭ mallevante, enigi en hokon fiksitan sur la pordokadro. **2**

Analoga peco de aŭtomata fermilo, kies levo elklikigas serurmekanismon k ebligas malfermon de pordo. ~*EB* 199/60; ~*BeE* 49/32

koaguli (tr) Transigi de likva stato al la stato de ĝelo.

kogn/i (tr) Φ Rekoni, percepti, kapti (veron) helpe de logika konkludado. ~**o** Fenomeno aŭ ago, per kiu oni perceptas veron. ~**a** Rilata al kugno.



koket/a Penanta plaĉi, precipe al eventualaj seksaj partneroj, per elegantaj vestoj kaj logaj maniero. 🖐️ flirtema.
→ galanta.

kolizi/i (ntr) Renkontiĝi kaj fortege tuŝegi sin reciproke.

kolos/o **1** Statuo de grandegaj dimensioj.
2 Giganta homo aŭ regno: la libereco elkovas kolosojnZ; Betoveno estas ia muzika koloso. ~**a** Havanta eksterordinarajn proporciojn aŭ ecojn. 🖐️ elefanta, giganta, mamuta, titana.

komplez/o Ago, per kiu oni penas plaĉi al iu, helpante, farante servon aŭ havigante profiton.

komuni/i Plej specife temas pri kristana rito en kiu oni simbole trinkas la sangon kaj manĝas la korpon de Kristo. **Vance:** Temas pri la plej sankta rito de ajna religio, tiu je kio nur plene veraj membroj rajtas partopreni.

kondens/i (tr)  Transirigi vaporon al la likva aŭ solida stato.  faztransiro.

kontempl/i (tr) Longe k medite rigardi, per la korpaj aŭ la spiritaj okulo.

kontrakt/i (pri) Interkonsenti, per interŝanĝo de jure validaj deklaroj, pri difinitaj rajtoj k devoj de la respektivaj partioj: **~o** Jure valida interkonsento, laŭ kiu ĉiu partio ricevas difinitajn rajtojn kaj devojn.

koral/o Kalka, pli-malpli arborforma skeleto de diversaj kolonioj de kniduloj, ordinare fiksiĝinta al submaraj rokoj, el kiu oni faras ornamaĵojn. ~*EB 340/35*; ~*BeE 176/19*

krak/i (ntr) Eligi sekan bruon, kiel de rompado aŭ krevado.

kramp/o Fera kurba peco, kun unu aŭ pluraj pintoj, kiu, en ĉarpentaĵoj aŭ masonaĵoj, servas por kunigi aŭ forte fiksi. ~**i** (tr) **1** Fiksi per krampoj. **2** Forte alkroĉi

krepit/i (ntr) Aŭdigi kraketadon, serion da etaj sekaj eksplodbruoj.

kret/o **1** ⊕ Mara sedimenta kalkopetro,


fajnagrajna kaj mola, precipe konsistanta el restaĵoj de mikroskopaj maraj vivuloj (☞ kokolito) kaj uzata plejofte sub pulvora formo: dekantita kreto (fajnegita, por purigi dentojn, arĝenton ktp).

2 Bastoneto el tiu substanco, aŭ el ia simila, uzata por skribi sur nigra surfaco.

krust/o **1** Ekstera parto de bakaĵo, malmoliĝinta pro kuirado. **2** Bakita pastaĵo en formo de ujo, por enteni iajn manĝaĵojn. **3** Malmoliĝinta parto, kiu formiĝas supraĵe de pli-malpli likvaj substancoj: la ŝlimo sub la suno kovriĝis per nigra krusto. **4** Patologia formiĝo el la sekiĝo de sero, puso, sango. **5** Terkrusto.

kupol/o Tegmento de konstruaĵo en formo de renversita kaliko. ~*EB* 318/43;

~BeE 153/72

kurator/o 1  Individuo, jure nomita por zorgi pri persono k havo de neplenaĝa orfo aŭ de iu, kiu ne posedas la personajn rajtojn. 2 Konservisto de muzeo aŭ biblioteko.

kvast/o unaĵo el mallongaj fadenoj lanaj aŭ silkaj, en formo de tufo aŭ peniko, kiu servas kiel ornamo por vestoj aŭ meblaro.

laminari/o Genro de maraj brunalgoj, kies talo konsistas el ronda tigo kaj lamenforma plato. ~EB 362/48;
~BeE 196/50

lampir/o Genro (Lampyris) de insektoj el la ordo de koleopteroj, havantaj

lumantajn organojn sur la abdomeno;

lanc/o Batalilo, konsistanta el longa ligna stango kaj akra ferpinto.

~*EB* 287/62, 308/20; ~*BeE* 128/17 & 29

ĵet~ Lanco por esti ĵetata. ~*EB* 280/54;

~*BeE* 146/2

langvor/o Malvigleco, malstreĉiĝo de la korpaj aŭ animaj fortoj, sen difinita kaŭzo. ~**a** Malrapide moviĝanta, malema al ekzerciĝo, ne interesiĝanta al la ekstera mondo.

lasciv/a Avida aŭ instiga al amorĝuoj.

latent/a **1** Tia, ke ĝiaj simptomoj ne estas percepteblaj: latentata malsano. **2** Ne ekstere konstatebla, sed ekzistanta kaj

aperigebla.

latun/o Ĉiaspeca alojo de kupro kaj zinko, flavkolora. **~a** Farita el ~o.

lavang/o Neĝ- aŭ ter-amasego, ruliĝanta de monto:

lavend/o Purpur-blua, bonodora floro, el kio estas farata parfumo.

leŭg/o Malnova mezurunuo de longo, la distanco kiun homo povas marŝi dum horo.

letargi/o **1** Stato, en kiu la psikaj funkcioj ŝajnas neniigitaj kaj la korpo profunde dormanta. **2** Plena inerteco kaj indiferenteco.

libel/o Granda insekto kun longa abdomeno, ofte metalkolora, kun kvar longaj, travideblaj flugiloj riĉaj je vejnoj, lerte fluganta. ~*EB* 342/3; ~*BeE* 175/5



liĥen/o Simboizita kombino el fungo kaj algo, plejofte verde blua, kio povas vivteni sur nuda roko en preskaŭ ajna klimato.

limak/o Surtera molusko el la klaso de gastropodoj, relative granda besto sen konko, manĝanta precipe vegetaĵojn. ~*BeE* 234/44

lintel/o Ŝtona, betona, ligna aŭ fera trabo, bloko horizontale metita sur la fostoj de fenestro aŭ pordo. 🖱️ sojlo. ~*EB* 39/25, 113/9,13, 115/57; ~*BeE* 44/14

litani/o Preĝo, konsistanta el longa serio da mallongaj alvokoj al Dio aŭ sanktuloj.

lot/i (ntr) Konsulti la sorton per loto

lubriki (tr)  Meti substancon speciale glitemigan inter du frotiĝantajn surfacojn, por faciligi la glitadon kaj malhelpi la rajpon.  olei, ŝmiri.

majstr/o En la iamaj korporacioj, tiu, kiu pruvis sian sperton per tiucela ellaboritaĵo, estis akceptita de la aliaj korporaciestroj kiel egalulo, k rajtis dungi submajstrojn k metilernantojn.

makabr/a Terurelvoka, mortrikana.

makro/ Prefikso, montranta:

1 grandegecon aŭ grandskalecon: makromolekulo, makrokosmo, makroanalizo, makrofotado. **2** (precipe ♀⊕) ion nudokule videblan (makroskopan): makrofaŭno, makroorganismo. ➡ mikro/.

malakit/o Kupra hidrokarbonato, konsistiganta belan verdan polureblan ŝtonon, uzatan por fari juvelojn, ornamajn vazojn, ktp. $(\text{CuOH})_2\text{CO}_3$

mandragor/o Planto kun homforma tubera radiko.

manovr/i **1** (ntr) Fari ekzerce movojn k direktoŝanĝojn laŭ komandoj aŭ plano: la eskadro, floto, regimento, aviadilaro manovras ĉiujare. **2** (ntr) (pp trupo, ŝipo,

aviadilo ks) Fari laŭcelajn movojn kaj direktoŝanĝojn, por esti en la plej taŭga loko aŭ pozicio por plenumi sian intencon. **3** (tr. aŭ ntr). Lerte, artifike klopodi, por atingi celon.

maŝ/o Ĉiu el la nodoj, kiun formas la lanaj, silkaj kaj similaj fadenoj en trikita teksaĵo aŭ en reto. ~*EB 125/25*;
~*BeE 323/30*

marasm/o Malsaneca ekstrema malgraseco kaj senvigleco. 🖐 apatio, inerteco, kadukeco, paralizo.

marmor/o Tipo de ŝtono. Polurebla kalkpetro, tute grandkristala, ofte enhavanta kolorajn vejnojn pro malpuraĵoj, uzata en konstruado kaj

skulpturo.

marod/i (tr) Ŝteli por sia propra uzo, diversaloke, laŭ oportuno.

matric/o **1** Gravurita metala peco aŭ muldilo. **2** Aro da nombroj aŭ aliaj elementoj aranĝitaj plur-dimensie (rektangule, kube, ktp) laŭ strikte regula ordo.

matron/o **1** ☹ Nobela patrino en antikva Romo. **2** (f) Maturaĝa, alte respektinda sinjorino.

med/o Alkohola trinkaĵo, farita el fermentigita mielo.

medol/o **1** ♥ (medulla) Pulpeca mola

substanco, pli-malpli grasa, pli-malpli sangabunda, entenata en ĉiuj kavaĵoj de la osta histo. **2** (pp vaskulplantoj) La centra, mola, parenkima parto de tigo aŭ de radiko, ĉirkaŭita de cilindro el vaskulfaskoj: la spongeca medolo de sambuko; medola radio.~*EB 354/14*; ~*BeE 188/14*

meger/o Ruza, malica virinaĉo

mejl/o Mezurunuoj de longo. Miloble tiu distanco inter unu dekstra paŝo kaj sekva dekstra paŝo. Alivorte, du mil paŝojn.

meldu/o Surplanta, ĝenerale blanka ŝimkovraĵo kaj la kun ĝi rilata plantmalsano, kaŭzata de askofungoj el erizifaloj, inter aliaj de ojdio. 📖 foliŝimo.

membran/o Maldika hista lameno, teganta iujn vegetalajn aŭ animalajn organojn. ~*EB* 75/53

ŝmir/i (tr) Froti sur ion maldikan tavolon da grasa aŭ algluiĝanta substanco.

mole/o Ligna aŭ ŝtona digo, konstruita antaŭ enirejo de haveno, por ŝirmi ĝin kontraŭ la ondoj k sendanĝerigi la ŝipojn. ~*EB* 212/15, 16/48; ~*BeE*371/18, 380/42

monolit/o Kolono aŭ monumento farita el nur unu bloko. ~*EB* 309/18;
~*BeE* 146/18

morter/o Miksaĵo de kalko kun sablo, per kiu oni kunigas la ŝtonojn aŭ brikojn de muro, konstruaĵo kaj simile.

mozaik/o Desegnaĵo aŭ pentraĵo, kunmetita el diverskoloraj formtranĉitaj ŝtonetoj aŭ lignaj pecetoj, por ornamo.

mucid/a Havanta ŝiman odoron aŭ guston.

mukoz/o Membrano, kiu tegas la kavajn organojn kaj juntiĝas kun la haŭto ĉe la naturaj aperturoj de la korpo.

muld/i (tr) Reprodukti objekton, enpremante moligitan materialon en ujon, kiu havas la deziratan formon: muldi medalon per vakso.. ~*EB 154/15*

musk/o Klaso de herboj kun malgrandaj, foliecaj, ofte tufiĝantaj tigoj, mallarĝaj folioj dense sidantaj, kaj sur la pintoj de

la ŝosoj kun krucformaj sporujoj. Ofte trovata ĉe subo de arbo, sur la flanko for de l' suno. ~*EB* 361/17

muzel/o Elstara parto de la kapo de tiuj bestoj, ĉe kiuj la nazo kaj buŝo elpintiĝas el la vizaĝo. ~*EB* 71/4, 73/6-10, 74/10, 88/53; ~*BeE* 241/68, 223/4, 224/10

nan/a Notinde malgranda kompare kun la normalaj individuoj de la specio

nard/o 1 **☒** Bonodora substanco, kiun la antikvuloj eltiris el la rizomo de nardo 2: mia nardo bonodora; funto da pura narda ŝmiraĵo. **2** = nardostakio. **3** Genro (Nardus el poacoj) de nur unu specio (N. stricta) de plurjara herbo el la montaraj herbejoj de Eŭropo kaj Azio.

navig/i (ntr) Vojaĝi, per tiucela veturilo, sur maro, lagoj, riveroj aŭ en aero.

nav/o Tiu parto de preĝejo, kiu etendiĝas de la pordego ĝis la ĥorejo, inter du paralelaj muroj aŭ kolonaroj. ~EB 316/62; ~BeE 153/76,77

neglekt/i (tr) Lasi ne farita, ne atentata, ne zorgita.

noĉ/o V-forma entranĉo en eĝo aŭ konvekso surfacaĵo.

obelisk/o Monumento, plej ofte el unusola ŝtono, pritrancita en formo de kvarangula pinta kolono.

oblikv/a Kliniĝanta for de la vertikala aŭ

orta direkto. **~i** (ntr) Iri en oblikva direkto.

obscen/a (pj) Ofendanta la antaŭjuĝojn de puduloj. 🖐 *malĉasta, maldeca.*

obtur/i (tr) Hermetike fermi (aperturon de la korpo, tubon de pafilo ktp). **~atoro** Fotoaparata obturilo. *~EB 111/44; ~BeE 266/33, 267/21*

okult/a Rilata al misteraj fenomenoj, kiujn iuj homoj kredas supernaturaj, kaj kiujn esploras diversaj doktrinoj kaj ties praktikoj (magio, elvokado de mortintoj kaj aliaj). **~ismo** Doktrina k praktika esplorado pri okultaj fenomenoj.

opal/o Juvelŝtonno. Mineralo, var. de

silico sub formo de ŝajne nekristalaj amasetoj aŭ konkrecioj

orgi/o 1 Festo, dediĉita al kolektivaj k ekscesaj ĝuoj manĝaj, drinkaj, seksaj.

2 Okazaĵo, karakterizata de la abundeco de ĝuigaĵoj.

orl/o Rando de ŝtofo refaldita k kudrita tiel, ke la eĝo mem estas protektata k nevidebla. ~*EB 102/2*

pantofl/o Hejma piedvesto, malpeza kaj oportuna, mola kaj komforta.

pantomim/o Teatraĵo, en kiu la aktoroj esprimas sin nur per gestoj.

parazit/o 1 Tiu, kiu kvazaŭ profesie

manĝas konstante ĉe fremda tablo,
flatante aŭ distrante la
gastiganton. **2** Nenionfaranto, kiu
ekspluatas la laboron de aliaj.

pelerin/o Pli-malpli longa, senmanika
manteleto, kovranta la dorson k bruston
ĝis la talio. ~*EB 338/29*; ~*EeB 35/17*

pent/i (pri aŭ tr) Senti bedaŭron pro
farita kulpo kun deziro ripari ĝin k plu ne
rekulpi:

perturb/i (tr) Kaŭzi malordon.

pedestal/o Dika, memstara, foje
kolonforma, masiva subtenilo desegnata
por surmeti alian masivaĵon. ~*EB 290/55*;
~*BeE 125/56*

pigme/o **1** Ano de nana gento, kiu akre batalis kontraŭ la gruoj. **2** Ano de malalkreska negra gento, vivanta en la arbaroj de C-Afriko. **3** Tre malgranda homo. ~*EB* 337/31; ~*EeB* 162/41

pilastr/o Prisma kolono, plejofte enigita en muro. ~*EB* 317/46; ~*BeE* 154/46

piĉ/o La relativa alteco de mizika tono je voĉo aŭ instrumento.

plasm/o **1** Likva parto de sango, en kiu naĝas blankaj kaj ruĝaj globeroj. **2** Fluida interna parto de ĉelo. **ekto~o** Ekstera parto de ĉel~o. **endo~o** Interna parto de ĉel~o. **3** Substanco je tiom alta temperaturo, ke eletronoj disiĝas de la nukleoj. **4** Simila, sed preternatura

substanco el kiu konsistas la korpo de fantomo.

plet/o Plato el ligno, metalo, plasto kaj aliaj, kiu servas por alporti telerojn, pladojn, glasojn, tasojn, kaj sisimile. ~*EB* 45/60, 260/19&54, 261/14; ~*BeE* 32/6

pob/o Malantaŭa parto de boato aŭ ŝipo.

poci/o **1** § Likva medikamento, pokulere trinkota. **2** Simila afero, ofte drogo, miksita fare de sorĉisto por efektiviĝi diversajn rezultojn.

podio/o Kroma planko el tabuloj, altigita super la grundo aŭ planko de salono, aŭlo, koncertejo, halo kaj simile, por ke

parolanto, eminentuloj, artistoj kaj aliaj estu pli videblaj kaj aŭdeblaj. ~EB 99/28, 249/11, 321/30; ~EeB 69/3, 157/30

pomel/o **1** Globa ekstremaĵo de la tenilo de spado aŭ sabro. ~EB 277/54; ~BeE 11/54 **2** Elstara antaŭa parto de selo.

ponard/o Pinta ambaŭtranĉa mallonga pikarmilo, portata ĉe la zono aŭ laŭlonge de kruro. ~EB 266/46, 309/22, 336/44; ~BeE 125/41

popl/o Genro de dioikaj, falfoliaj, ofte grandaj arboj kun longpetiolaj, larĝaj folioj, kun floroj en longaj, pendaj amentoj aperantaj antaŭ la folioj, kaj kun fruktoj enhavantaj lanugajn semojn po multaj. ~EB 355/15; ~BeE 189/15

portik/o Galerio, kiu malfermiĝas, almenaŭ unuflanke, per kolonaro. ~*EB* 316/50,56; ~*EeB* 153/64

pseŭdo/ Prefikso, esprimanta **1** ŝajnecon. **2** falsecon, neaŭtentikecon.

punt/o Maldensa delikata plektaĵo el kotonaj, linaj aŭ silkaj fadenoj, kies maŝoj, aranĝitaj laŭ metoda trikado, prezentas artajn desegnaĵojn. ~*EB* 101/18,30

pustul/o § Epiderma ŝvelaĵo, entenanta puson.

ramp/o Dekliva vojo, ebliganta al veturiloj atingi la suprajn etaĝojn de konstruaĵo. ~*EB* 114/41, 202/1; ~*BeE*

rapir/o Longa glavo, precipe pinta, foje ankaŭ tranĉila, sed nur ĉe la pinto.

refrakt/i (tr> Ŝanĝi je difinita angulo la direkton de lumradio, kiam ĝi trairas de unu medio en alian de malsama densoj.

replik/o Respondo al tio, kion alia asertis aŭ postulis en diskutado.

retret/o **1** Ceda returniro de armeo, kiu forlasis pozicion sub la premo de la malamiko. **2** Retiriĝo for de la kortego, de la publikaj funkcioj, de la burĝa vivo.
~ejo Izola domo en loko de natura belo.

rezidu/o **1** ⊕ Restaĵo el petroj, pasintece

elmetataj al la agado de eksteraj fenomenoj, nek transportita nek sedimentita: rezidua arkozo, rezidua argilo (el argila reziduo de dissolvitaj kalkpetroj). **2** Ⓚ Restaĵo. **3** ⚖ Tio, kio restas el heredaĵo, post pagado de la ŝuldoj, impostoj k legacoj.

rival/o Tiu, kiu strebas por superi alian, precipe en la artaj aŭ amaj aferoj.

riverenc/o Respekta ĝentila movo de korpo, klino de la busto. **~i** (tr) Fari riverencon.

rodokrozit/o Mineralo, mangana karbonato, kun kemia enhavo $MnCO_3$. En ĝia (rara) pura stato, ĝi kutime estas roso-ruĝe kolora, sed nepuraj specimenoj

povas koloriĝi laŭgrade rose ĝis palbrune.

ronk/i (ntr) Eligi bruon dum dormi, plejofte pro vibrado de la plata velo.

rotor/o (T) Rotacianta parto de dinamomaŝino. ~*EB 331/78*

run/o Litero, desegnita por esti gravurita. Tie ĉi, antikva skribmaniero uzata en magiaj procedoj.

sakrilegi/o (Θ) Malrespekta ago kontraŭ sanktigita persono, objekto aŭ loko.

sangvin/a Riĉtemperamenta, gajhumora, optimista.

sapŝtono Kompakta aŭ fajngrajna talko, uzata en konstruado, por skulptado, ktp. Sinonimo: steatito.

sardon/a Epiteto de speciala rido.

1 Ŝajna rido de iu kies vizaĝaj muskoloj kuntiriĝis pro toksiĝo aŭ malsano. **2**

Mieno esprimanta vidpunkton de amara, iom sarkasma amuzeco.

sateno/o Teksaĵo silka, nilona, lana, kotona, de kiu unu flanko estas glata kaj brila, ricevita per neegala nodado de la vefto aŭ de la varpo.

saturnali/oj Saturnaj festoj. Festnoktoj dum kiuj la ordinaraj leĝoj de deco kaj socia hierarkio estis interrompitaj.

savan/o **1** ☀ Tropika herba vegetaĵaro (vs ekosistemo), karakterizata de la plejkovreco de gramineoj 1—2m altaj, ĝenerale ankaŭ de disaj arboj k arbustoj.

2 Loko, ofte vasta ebenaĵo, kie kreskas savano. 📍 stepo.

scintil/i (ntr) **1** (pri fluoreska materialo) Fulmeti pro trafiĝo de altenergia partiklo.

2 (pp stelo) Brili treme koncerne helon k pozicion pro trairo de ĝia lumo tra la teratmosfero.

sekt/o Aro da personoj, havantaj la saman doktrinon, aŭ interne de religio, aŭ disiĝinte de sia origina religio.

serpente/o Mineralo el magnezia, monoklina folisiliciato, uzata kiel ornamo

en konstruanto pro ĝiaj verdaj lamenoj.

sfing/o Genro de grandaj noktpapilioj, kiuj dum ripozo tenas la flugilojn horizontale, k kies larvoj havas dorsan kornon sur la malantaŭa parto de la abdomeno k vivas sur diversaj plantoj. ~*EB* 348/9; ~*BeE* 175/61

sibl/i Eligi sonon similan al longedaŭra ‘s’.

silik/o Ege malmola ŝtono, rompebla kiel vitro, uzata de prauloj por farbi sag-pintojn, hakilojn, ktp.

siluet/o Aspekto de objekto aŭ persono, vidata kontraŭ la lumo, tiel ke nur la konturoj estas distingataj. ~*EB* 298/28;

sinaps/o ♀ Loko de kontakto inter la ekstremaĵoj de du nervoĉeloj aŭ inter nervoĉelo kaj muskol-, gland- aŭ sensoĉelo.

sintez/o **1** Operacio, per kiu multeco estas reduktita al unueco, per kombinado aŭ kunigo. **2** Operacio, per kiu, kombinante elementajn komponantojn, oni ricevas novaspecan produkton, kun apartaj ecoj.

sinu/o Ĉiu el la kurbaĵoj, fleksoj de vojo, rivero kaj simile. ~**i** Esti sinua, moviĝi serpente (sen antaŭeniro), kaj simile.

skal/o Serio de gradoj, sisteme kaj

regule aranĝitaj. **muzika** ~o Serio de notoj, regule apartaj laŭ frekvenco.

~EB 299/47-50

skapol/o Maldika plata triangula osto de la posta parto de la ŝultro. ~EB 18/23;

~BeE 19/32

skarlat/o Brilega sangoruĝa koloro.

skarp/o **1** Longa peco de teksaĵo, kiun virinoj portas sur la ŝultroj k kies baskoj pendas ambaŭflanke antaŭ la brusto ĝis la genuoj: silka, indiana skarpo; (f) la skarpo de Iriso (ĉielarko). **2** Oficiala insigno, konsistanta el longa peco de teksaĵo, portata de viroj oblikve sur la brusto aŭ zone ĉirkaŭ la talio. **3** Longa peco de teksaĵo, surŝultre alligita kaj

servanta por subteni vunditan brakon.

~*EB 203/14*; ~*BeE 38/5*

skem/o Teoria simpligita figuraĵo, prezentanta maldetale ne la formon, sed la aranĝon k la rilatojn de io.

skorpi/o ♂ (kn) Artropodo el la klaso de araneoidoj, kun cefalotorako portanta paron da fortaj pinĉiloj kun 4 parojn da movaj membroj, kaj kun duparta abdomeno, antaŭ- kaj post-abdomeno, ĉi-lasta sessegmenta kaj finiĝanta per venena pikilo. ~*EB 342/40*; ~*BeE 175/44*

sodomi/i (tr) Sekse kuniĝi tiel ke la peniso penetras ne la vaĝinon, sed ansataŭe aŭ la buŝon aŭ la anuson.

solv/i (tr) **1** (K) Homogene kaj stabile miksi kun likvo solidon, alian likvon aŭ gason. ➡ emulsii, fandi. **2** Trovi la nekonataĵon de problemo, la respondon al demando, la rimedon al malfacilaĵo.

dis~ Disigi en solvo.

~o **1** (K) Ago solvi. **2** Respondo al dubo, demando; klarigo de problemo, de implikita situacio. **~aĵo** Tuto de la solvita(j) substanco(j) k de la ĝin (ilin) solvinta likvo.

somat/o ♀ **1** Tuto de la ĉeloj de embrio k poste de individuo, kun escepto de la sekse reproduktiĝaj ĉeloj. ➡ ĝermeno. **2** La tuta korpo, kontraste al la psiko.

somnambul/o Homo nerve malsana, kiu dum dormo senkonscie k senmemore

iras, parolas kaj agas, kvazaŭ li estus maldormanta kaj konscia.

spasm/o **1** Nevola kontraĥiĝo de muskolo aŭ muskolgrupo: la spasmoj de la volupto. **2** Konvulsia kontraĥiĝo de la visceraj muskoloj.

staj/o Fortika ŝnuro, kiu streĉite tenas maston vertikala. ~*EB 214/10-15*

stak/o **1** Alta amaso de grenpajlo, kunrastita fojno, garboj, dehakitaj ŝtipoj ktp. **2** Amaso da samformaj objektoj, metitaj unu sur la aliaj: stako da libroj, da teleroj. 📖 kolumno. **3** Datenstrukturo, konsistanta el vico de elementoj, ĉe kies unu fino oni povas aldoni aŭ forpreni elementon: surstakigi, elstakigi datenon;

plenumstako (por teni lokajn variablojn k la revenadreson dum plenumado de proceduro); oni povas realigi stakon per listo aŭ per tabelo. ~igi Fari stakon el iu materialo.

sturm/i (tr) Kurante aŭ alsaltante ataki.

sufuz/i (ntr) Elverŝiĝi el vaskulo (sango), el peritoneo (ascito), kaj disvastiĝi en la histojn. *Iom simile al 'mal-sorbi' sed tute interne, sen perdi el la histo.*

sukub/o Diablo, kiu alprenis la formon de virino, por kuniĝi kun viro.

sulfur/o **1** (K) Elemento, S, atomnumero 16, atommaso 32,07. **2** (K) Nemetalo

solida, helflava, senodora (en pura stato, sed forte ordora kiel sulfido), facile fandebla kaj brulema, kiun oni trovas en la vulkanaj elsputaĵoj aŭ ekstraktas el ercoj aŭ naturgasoj.

supl/a Malrigida, facile deformebla.

susur/i (ntr) Eligi sonon malfortan kaj iom sekan, kiel de sateno, silko, ĉifita papero kaj simile.

svelt/a Harmonie aŭ elegante maldika.

sven/i (ntr) Perdi dum kelkaj momentoj la konscion k movkapablon

ŝakt/o 1 Vertikala truo, ĝenerale profunda, kiun oni boras en tero por

ekspluati minaĵon, karbon, nafton, salon kaj simile. ~*EB* 137/14; ~*BeE* 297/25
&32 **2** Spaco, en formo de vertikala truo, aranĝita en konstruaĵo por ricevi ŝtuparon aŭ lifton.

ŝim/o Mikroskopa fungo aŭ oomikoto, havanta bone rimarkeblan micelion aŭ sporaron.

ŝlim/o Akvomoligita tero aŭ simila substanco, demetiĝinta sur la fundon de akvujoj sen forta fluo.

taburet/o Tri- aŭ kvar-pieda seĝeto sen brakoj kaj dorsapogilo. ~*EB* 48/5, 314/11; ~*BeE* 157/25

taksus/o Pingloarbo kun molaj pingloj

kaj ruĝaj, unuopaj, beraspektaj semoj.

talisman/o Luksaĵeto, plejofte gemo gravurita per astrologiaj aŭ kabalaj signoj, kiu laŭ iuj kredoj gardas la portanton kontraŭ malbono.

Tantal/o Reĝo, kiu pro siaj krimoj estis kondamnita en Hadeso neniam povi satigi sian soifon kaj malsaton: tiele semis nepoj de Tantalo per plena man' malbenon post malbeno. **tantaligi** Fari el iu kvazaŭ Tantalon, allogante, sed neniam kontentigante.

tarantel/o 탯탯탯 Vigle turniĝa itala danco, k ties muziko.

tenden/o Blankeca, fibreca

muskolestremaĵo, kiu alligas la muskolon plej ofte al osto. ~EB 20/48; ~BeE 21/48

teori/o Supozo celanta klarigi ion, sed restanta en la sfero de la spekulativa penso.

tindr/o Spongeca, tre ekbrulema k ardema substanco, precipe el la bazidiujo de tindrofungo.

ton/o 텃텃텃 Muzika sono kun difinita alto. 🗣️ noto, sono, tembro.

topaz/o Mineralo, konsistanta el alumina silikato, tre malmola pli-malpli diafana, plejofte flaveca, uzata kiel juvelŝtono. ~a pale flavluma.

torak/o Brusto-kaĝo ĉe homoj, analoga korpoparto ĉe insektoj.

torĉ/o Malnova kruda lumigilo konsistanta el tordita ŝnuro aŭ ligna bastono ŝmirita per rezino, vakso aŭ peĉo. ~*EB 306/38*

tribun/o Elstara podio, plejofte kun seĝo k pupitro, de kie parolas oratoro, precipe politika aŭ religia.

tuber/o **1** Ĉiuspeca bulforma elstaraĵo aŭ ŝvelaĵo sur la surfaco aŭ en la interno de korpo. **2** Bulforma aŭ ŝvela, rezervoplena parto de tigo.

tundr/o Malvarmklimata, precipe boreala malalta vegetaĵaro, karakterizata

de arbustetoj, herboj, likenoj.

tunik/o Antikva mallongmanika vesto, vira aŭ virina, ordinare portata sub alio, atinganta ĝis la genuoj.

turbul/i (ntr) Flui tiamaniere, ke la diversaj tavoloj de la fluido miksiĝas unu kun la aliaj. **turbul(ad)o** Kirla movado en la aertavoloj.

turment/i (tr) **1** Kaŭzi al iu grandajn korpajn suferojn: eĉ muŝo sentas, kiam vi ĝin turmentas, **2** Kaŭzi al iu grandajn moralajn suferojn.

ulcer/o § Lezo de haŭto aŭ mukozo kun substancoperdo k malforta tendenco cikatriĝi.

uleks/o Genro de dornaj tufarbustoj kun folioj parte ŝanĝiĝintaj al apekse dornaj filodioj, kaj kun flavaj, unuope akselaj floro.

unc/o Mezurunuoj de pezo, uzata en Britio (alilande por la oro aŭ iaj farmaciaj substancoj), kaj egalvalora plejofte al la dekduono de funto.

ungvent/o Medikamenta kun firmeco de pasto, kion oni aplikas aŭ ŝmiras sur la haŭton.

ŝuti Elglitigi substancon nelikvan, konsistantan el multaj apartaj, ne kunigitaj eroj. **~ilo** ~EB 221/66; ~BeE 365/32, 382/56

vampir/o **1** Mamulo simila al fluganta muso kiu manĝas plejparte insektojn kaj dormas pende de la piedoj, plejparte en kavernoj. **2** Fabela fantomo, eliranta nokte por suĉi sangon de dormantoj.

velur/o Silka, kotona aŭ lana ŝtofo, prezentanta unuflanke densan teksaĵon, k aliflanke molan supraĵon konsistantan el multaj mallongaj, rekte starantaj brilaj haroj

verv/o Inspira, fervora, vigla maniero de verkado, parolado, pentrado, komponado.

vip/o Batilo, konsistanta el ŝnuro aŭ rimeno, alligita al tenilo. ~*EB* 272/38; ~*BeE* 105/24

volb/o Arkoforma plafono. ~EB 80/22;
~BeE 232/1

Atribuoj

La subaj homoj kontribuis al tiu ĉi traduko, ĉiuj en diversaj tempoj kaj lokoj. Kie mankas indiko pri lando, tio okazis en Usono.

Verkis:

Jack Vance (1916-2013)
Anglalingva titolo: *T'sais*

Permesis:

Jack & Norma Vance (*inter 1997 & 2013*)
John Vance & Spatterlight Press
(*post 2013*)

Tradukis:

Ĝan Ŭesli Starling, — *Usono*
Orlando Hernández — *Hispanio*

Ilustris:

Paul Rhoads — *kovrilon & ses bildojn*

Kontrolis:

Pluaj kontrolistoj invitiĝas — Ĉu eble vi?

Se vi volas kontribui per ilustraj aŭ per plue kontroli, kontaktu eposte: gan@starling.us

Helpis ankaŭ la sube listitaj referenciloj. Se vi ne povas kontribui al nia projekto per kontroli aŭ ilustraj, bonvolu pripensi monan donacon al unu el ili.



Vortaro — *reta vesio de PIV*



Lingvohelpilo — *projekto de E@I kaj ESF*

Senpage Haveblaj

<http://esperanto.us>

ATOM

Fantasto — *La Mortanta Tero*

Mazirien la Magiisto

Ses interligitaj noveloj pri la fintempo de la Tero, kiam magio regas super scienco kaj la suno montras signojn de baldaŭa estingiĝo.

La Sorcisto Fejresm

Kugel la Ruza manĝas ion

nedigestablan.

La Sakpleno da Songôj

Kugel la Ruza konkuras en
spektaklo de magiaj mirindaĵoj.

Scienca Fikcio — *Diversaj*

Trigamba Joĉjo

Sur planedeto senaera du junuloj
alfrontas beston nevenkeblan.

La Luna Sfingo

En kulturo kie ĉiuj portas maskojn,
ĵus alveninta diplomato ĉasas
murdiston.

Domo de l' Se

Post respondi al reklmao pri

aventuro, viro ekfrontas multon pli ol
atendite.

Retretejo Ulvarda

Kiam surtere estas 50 miliardoj da
homoj, ĉu izoleco dezirindas pli ol
ĉio?



Tiu ĉi Esperanta traduko *Guyal of Sfere* verkita de Jack Vance estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Nekomerce-Nemodifite 4.0 Tutmonda

La permesilo temas sole pri tiu ĉi Esperanta traduko. La permesilo temas neniel kaj neniom pri la originalo kies ĉiuj rajtoj daŭre apartenas al John Vance kaj Spatterlight Press.